

LA VOJAĜOJ DE
DOKTORO DOLITTLE
DE
HUGH LOFTING

TRADUKITA DE DONALD BROADRIBB

2005

Kompostita de Donald Broadrib, per: iMac.
Programo: Mellel.
Tiparo: Warnock Pro, 14 pkt. sur 16.8 pkt.
Elektronike eldonita kiel pdf 2005.

Ĉi tiu eldono konformas laŭeble al la engaĝigo de la originala anglalingva eldono, tiel ke la paĝnumeroj kaj lokigo de teksto kaj ilustraĵoj preskaŭ identas kun tiuj de la originalo. La ilustraĵoj fidele reproduktas la originalojn.




LA
POPSIPETELA
BILDO-HISTORIO DE
REÛO JONGO PENSOMULTA





LA ORIGINA TITOLPAÇO DE 1923

**LA VOJAĜOJ DE
DOKTORO
DOLITTLE**



VERKITA KAJ
ILUSTRITA

DE HUGH LOFTING.

Tradukita de Donald Broadribb
2005

La anglalingva originalo publikiĝis en 1923.
La esperanta traduko estis publikigita kiel pdf-o en
2005.

© (traduko) Donald Broadribb 2005

Al
COLIN
kaj
ELIZABETH

Enhavo

Prologo.....	p.15
--------------	------

PARTO UNU

1. La filo de la ŝufaristo.....	17
2. Mi aŭdas pri la granda naturostudisto.....	21
3. La domo de la doktoro.....	27
4. La vif-vafo.....	35
5. Polinezio.....	42
6. La vundita sciuro.....	49
7. Konkofiŝa parolo.....	52
8. Ĉu vi estas bona rimarkisto?.....	55
9. La ĝardeno de revoj.....	60
10. La privata zoo.....	64
11. Mia instruisto polinezio.....	68
12. Mia grandioza ideo.....	72
13. Veturanto alvenas.....	76
14. La vojaĝo de Ĉi-Ĉio.....	80
15. Mi fariĝas doktor-asististo.....	83

PARTO DU

1. La ŝipanaro de <i>La Kurlo</i>	87
2. Luko la ermito.....	90
3. Jipo kaj la sekreto.....	93
4. Roĉjo.....	96
5. Mendozo.....	101
6. La hundo de la juĝisto.....	106
7. La fino de la mistero.....	111
8. Tri huraoj.....	115
9. La Purpura Paradizeo.....	119
10. Longa Sago, La Filo de Ora Sago.....	122
11. Blinda veturado.....	127
12. Destino kaj destinado.....	131

PARTO TRI

1. La tria viro.....	135
2. Adiaŭ!.....	141
3. Niaj ĝenoj komenciĝas.....	144
4. Niaj ĝenoj pliiĝas.....	149
5. Polinezio havas planon.....	155
6. La litfaristo de Monteverdo.....	159

7. La veto de La Doktoro.....	163
8. La granda taŭrobatalo.....	169
9. Ni foriras haste.....	177

PARTO 4

1. Denove la molusko-lingvoj.....	181
2. La rakonto de la fiĝito.....	187
3. Malbona vetero.....	200
4. Averio!.....	204
5. Tero!.....	211
6. La ĵabizro.....	216
7. La falkokapa monto	221

PARTO 5

1. Granda momento.....	229
2. “La viroj de la moviĝanta lando”.....	236
3. Fajro.....	239
4. Kio flosigas insulon.....	243
5. Milito!.....	247
6. Generalo Polinezio.....	253
7. La paco de la papagoj.....	257
8. La pendanta ŝtono.....	260
9. La elekto.....	267
10. La kronado de Reĝo Jongo.....	274

PARTO 6

1. Nova Popsipetelo.....	279
2. Sopiro al la hejmo.....	286
3. La scienco de la ruĝulo.....	291
4. La marserpento.....	294
5. La moluska enigmo fine solvita.....	301
6. La lasta kabineta kunveno.....	306
7. La decido de la doktoro.....	309

Ilustraĵoj

LA POPSIPELELA BILDOHISTORIO DE REĜO JONGO PENSOMULTA (KOLORA)	ANTAŬBILDO
	PAĜO
“MI SIDIS SUR LA RIVERMURO, KUN LA PIEDOJ PENDANTAJ SUPER LA AKVO.”	19
“KAJ PER SIA DEKSTRA PIEDO ŜI PORTIS BRULANTAN KANDELON!”	32
“ESTI BONA RIMARKISTO ESTAS EGE GRAVE.”	58
“VETURANTO ALVENAS.”	78
“SUR LA LITO SIDIS LA ERMITO.”	98
“SIDIS GRIMACANTE AL LA MIRANTA KAJ GAPANTA ĴURIO.”	109
“KION ALIAN MI POVUS SUPOZI?”	125
“KNABO, KIE ESTAS LA ESTRO?”	137
“LA DOKTORO KOMENCIS BABILADI HISPANLINGVE KUN LA LITFARISTO”	161
“AKROBATE SUR LA KORNOJ DE LA BESTO.”	173
“LI PAROLAS ANGLE!”	184
“MI ESTIS SOLA EN LA OCEANO!”	205
“ESTIS GRANDA MOMENTO.”	233
“LA TERURA TRIO.”	250
“FIDELE PUŜANTAJ LA FINAĴON DE LA INSULO PER SIAJ NAZOJ.”	261
“LA FLUSTRANTAJ ROKOJ”	263
“DEVIS ĈASI SIAJN PAPILOJN PORTANTE KRONON SUR LA KAPO.”	282
“PIEDPINTE MARŜU INKOGNITE,” FLUSTRIS BUMPO.	311
“KIAM LI SUBITE MALREKTIGIS SIN.”	<i>post paĝo</i> 318

La vojaĝoj de Doktoro Dolittle

PROLOGO

PRi ĉio kion mi ĝis nun verkis pri Doktoro Dolittle mi sciiĝis longe post la koncernaj eventoj, de uloj kiuj konis lin — efektive, multe da ĝi okazis antaŭ mia naskiĝo. Sed nun mi entreprenas surpaperigi tiun parton de la vivo de la granda homo kiun mi mem vidis kaj partoprenis.

Antaŭ multaj jaroj la Doktoro donis al mi permeson fari ĉi tion. Sed ni ambaŭ tiam estis tiom okupataj pro ĉirkaŭvojaĝado en la mondo, spertante aventurojn kaj plenigante notlibrojn de natura historio ke ŝajne mi neniam trovis tempon por sidiĝi kaj skribi pri nia agado.

Nun, kompreneble, kiam mi estas tre maljuna, mia memoro ne plu estas egale bone. Sed kiam ajn mi dubas pri io kaj devas heziti kaj pensi, mi ĉiam demandas al Polinezio, la papago.

Tiu mirinda birdo (ŝi nun aĝas preskaŭ ducent kvindek jarojn) sidas sur mia skribtablo, kutime zumante maristajn kantojn al si, dum mi verkas ĉi tiun libron. Kaj, kiel scias ĉiu kiu iam renkontis ŝin, la memoro de Polinezio estas la plej mirinda memoro en la mondo. Se temas pri io pri kio mi ne tute certas, ŝi ĉiam povas korekti min, diri al mi precize kiel okazis, kiu partoprenis kaj ĉion pri ĝi. Efektive, kelkafoje mi preskaŭ opinias ke ĉi tiun libron verkis Polinezio anstataŭ mi.

Do, mi komencos. Kaj unue mi devas diri al vi iom pri mi mem kaj pri kiel mi renkontis la Doktoron.

Parto Unu

1. LA FILO DE LA ŜUFARISTO

MI nomiĝas Tomĉjo Stubbins, filo de Jakobo Stubbins, la ŝufaristo de Puddleby-sur-la-Marĉo; kaj mi estis naŭ-kaj-duona-jara. Tiutempe Puddleby estis nur tre malgranda vilaĝo. Rivero trairis ĝian mezon; kaj transiris ĉi tiun rivero tre malnova ŝtona ponto, nomita Reĝponto, kiu kondukis de la bazaro ĉe unu flanko al la preĝejo tombejo ĉe la alia flanko.

Velŝipoj venis de la maro laŭ ĉi tiu rivero kaj ankris apud la ponto. Mi ofte iris rigardi de la rivermuro la maristojn malŝarĝantajn la ŝipojn. La maristoj kantis kuriozajn kantojn dum ili tiris la ŝnuregojn; kaj mi parkere lernis tiujn kantojn. Kaj mi sidis sur la rivermuro, kun la piedoj pendantaj super la akvo, kaj kantis kun la viroj, imagante ankaŭ min maristo.

Ĉar mi ĉiam sopiregis forveli kun tiuj bravaj ŝipoj kiam ili turnis la dorson al Preĝejo de Puddleby kaj rerampis laŭ la rivero, trans la larĝajn solsentigajn marĉojn al la maro. Mi sopiregis akompani ilin en la mondon por serĉi mian fortunon en fremdaj landoj — Afriko, Hindujo, Ĉinujo, kaj Peruo! Kiam ili ĉirkaŭiris la kurbon en la rivero kaj la akvo ne plu videblis, oni ankoraŭ povis vidi iliajn grandajn brunajn velojn turi super la tegmentoj de la vilaĝo, antaŭen moviĝante malrapide — kvazaŭ afablaj gigantoj marŝantaj senbrue inter la domoj. Kiajn mirindaĵojn ili estis vidintaj, mi diris al mi, kiam ili poste revenis ankri ĉe Reĝponto! Kaj, revante pri la landoj kiujn mi neniam vidis, mi plu sidis tie,

rigardante ĝis ili ne plu estis videblaj.

Tri ĉefamikojn mi havis en Puddleby tiutempe. Unu estis Joĉjo, la mitulisto, kiu loĝis en malgranda dometo apud la akvo sub la ponto. Tiu maljunulo estis mirindege kapabla fari aĵojn. Neniam mi vidis viron egale lertan per siaj manoj. Li kutimis ripari miajn ludilajn ŝipojn por mi, kiujn mi veligis sur la rivero; li konstruis vento-muelilojn el pakkestoj kaj bareldaŭboj; kaj li povis fari plej belajn kajtojn el malnovaj ombreloj.

Kelkafoje Joĉjo kunprenis min en sia mitulboato, kaj dum la malfluso ni pagajis laŭlonge de la rivero ĝis la rando de la maro por akiri mitulojn kaj omarojn por vendi. Kaj tie sur la malvarmaj solsentigaj marĉoj ni vidis sovaĝajn anserojn flugi, kaj numeniojn kaj ruĝkrurajn tringojn kaj multajn aliajn specojn de marbirdoj loĝantaj inter la herboj kaj la longaj gresoj de la granda sala marĉo. Kaj dum ni rampis laŭ la rivero en la vespero, dum la tajdofluso ni povis vidi la lumilojn sur Reĝponto scintili en la krepusko, memorigante al ni la manĝohoron kaj varmajn fajrojn.

Alia amiko mia estis Mateo Mugg, la porkata-viandovendisto. Li estis kurioza oldulo kun grava strabo. Li aspektis iom aĉa, sed envere estis tre afabla konversacianto. Li konis ĉiun en Puddleby; kaj li konis ĉiujn hundojn kaj ĉiujn katojn tie. Tiutempe esti porkata-viandovendisto estis normala laboro. Kaj oni povis vidi tiajn homojn preskaŭ ĉiutage trairi la stratojn kun ligna pleto plena de viandopecoj kiujn trairis stangetoj kaj ili kriadis “Vian-do! V-I-A-N-D-O!” Oni pagis lin doni tiun viandon al iliaj katoj kaj hund-



“MI SIDIS SUR LA RIVERMURO, KUN LA PIEDOJ PENDANTAJ SUPER
LA AKVO.”

oj, anstataŭ doni al ili hundobiskvitojn aŭ postrestaĵojn el la manĝo.

Mi ĝuis ĉirkaŭiri kun olda Mateo kiaj vidi la katojn kaj hundojn veni kurante al la ĝardenpordoj kiam ili aŭdis lian krion. Kelkafoje li permesis ke mi mem donu la viandon al la bestoj; kaj mi opiniis tion tre plezuriga. Li sciis multon pri hundoj kaj li diris al mi la nomojn de la diversaj specoj dum ni trairis la vilaĝon. Li mem havis plurajn hundojn; unu, grejhundeto, estis tre rapida kuranto, kaj Mateo ofte akiris premiojn per ŝi ĉe la sabataj ĉaskonkuroj; alia, terhundo, estis bonega ratkaptisto. La porkata-viandovendisto profesie ratkaptadis por la muelistoj kaj kultivistoj, kiel ankaŭ je lia alia laboro vendi porkatan viandon.

Mia tria ĉefamiko estis Luko la Ermito. Sed pri li mi rakontos al vi poste.

Mi ne studis en lernejo; ĉar mia patro ne estis sufiĉe riĉa por sendi min. Sed mi ege amis bestojn. Do mi kutimis uzi mian tempon kolektante birdovojn kaj papiliojn, fiŝkaptante en la rivero, vagadante tra la kamparo serĉante rubusojn kaj agarikojn kaj helpante la mituliston ripari siajn retojn.

Jes, mia vivo dum tiuj tagoj antaŭ tre longe estis tre plaĉa — kvankam kompreneble mi ne opiniis tiel tiam. Mi estis naŭ-kaj-duona-jara; kaj kiel ĉiuj knaboj, mi volis plenkreskiĝi — mi ne sciis kiom bonstata mi estis sen zorgoj kaj sen ĝenoj. Ĉiam mi sopiris la tempon kiam mi estos permesita foriri el la domo de mia patro, veturi en unu el tiuj bravaj ŝipoj, veli laŭ la rivero tra la nebulaj marĉoj al la maro — en la eksteran mondon por serĉi mian fortunon.

2. MI AŬDAS PRI LA GRANDA NATUROSTUDISTO

UNU fruan matenon en la printempo, kiam mi vagadis inter la montetoj malantaŭ la vilaĝo, mi hazarde trovis falkon tenantan sciuron per siaj ungoj. Ĝi staris sur roko kaj la sciuro baraktadis por sia vivo. La falko tiom ektimis kiam mi ekvenis al ĝi tiel, ke ĝi faligis la povran beston kaj forflugis. Mi prenis la sciuron kaj trovis ke du el ĝiaj kruroj estis grave vunditaj. Do mi portis ĝin en miaj brakoj al la vilaĝo.

Kiam mi atingis la ponton mi eniris la dometon de la mitulisto kaj demandis al li ĉu li povas helpi ĝin. Joĉjo surmetis siajn okulvitrojn kaj zorge ekzamenis ĝin. Post tio li kapneis.

“Jena besto havas rompitan kruron”, li diris “kaj la alia estas severe tranĉita. Mi povas ripari viajn boat-ojn, Tomĉjo, sed mi havas nek la instrumentojn nek la trejniĝon por rebonigi rompitan sciuron. Tio estas tasko de kirurgo — kaj efektive de vere lerta kirurgo. Mi konas nur unu homon kapablan savi la vivon de jena besto. Tiu estas Johano Dolittle”.

“Kiu estas Johano Dolittle?” mi demandis. “Ĉu li estas veterinaro?”

“Ne”, diris la mitulisto “Li ne estas veterinaro. Doktoro Dolittle estas naturosciencisto”.

“Kio estas naturosciencisto?”

“Naturosciencisto”, diris Joĉjo, demetante siajn okulvitrojn kaj komencante plenigi sian pipon, “estas homo kiu scias ĉion pri bestoj kaj papilioj kaj plantoj kaj rokoj kaj tiaĵoj. Johano Dolittle estas tre granda

naturosciencisto. Mirigas min ke vi neniam aŭdis pri li — ĉar vi tiom amegas bestojn. Li scias multon pri moluskoj — mi scias tion pro mia propra scio. Li estas kvieta homo kaj malmulte parolas; sed oni diras ke li estas la plej grava naturosciencisto en la mondo”.

“Kie li loĝas?” mi demandis.

“For, ĉe la Vojo al Oksentorpo, aliflanke de la vilaĝo. Mi ne scias precize en kiu domo, sed preskaŭ ĉiu tiuloke povas informi vin, mi kredas. Iru konsulti lin. Li estas vera gravulo.”

Do mi dankis la mituliston, reprenis mian sciuron kaj komencis marŝi cele la Vojon al Oksentorpo.

Tuj kiam mi eniris la bazarejon mi aŭdis iun kriadi “Viando! V-I-A-N-D-O!”

“Jen Mateo Mugg”, mi diris al mi. “Certe li nepre scias kiel loĝas tiu Doktoro. Mateo konas ĉiujn homojn.”

Do mi hastis trans la bazarejon kaj atingis lin.

“Mateo”, mi diris, “ĉu vi konas Doktoron Dolittle?”

“Ĉu mi konas Doktoron Dolittle!” diris li. “Nu, mi ja kredas ke jes. Mi konas lin tiom bone kiom mian propran edzinon — pli bone, eble. Li estas tre grava homo — gravega viro”.

“Ĉu vi povas montri al mi kie li loĝas?” mi demandis. “Mi volas preni ĉi sciuron al li. Ĝi havas rompitan kruron”.

“Certe,” diris la porkata-viandovendisto. “Mi pasos lian domon tre baldaŭ. Venu kaj mi montros al vi.”

Do ni foriris kune.

“Ho, mi konas Johanon Dolittle de tre multaj jaroj”, diris Mateo dum ni marŝis el la bazarejo. “Sed

mi preskaŭ certas ke li ne estas ĉehejme ĝuste nun. Li vojaĝas. Sed li devos reveni post ne longe. Mi montros al vi lian domon kaj tiel vi scios kie trovi lin”.

Tutdum ni marŝadis laŭ la Vojo al Oksentorpo Mateo apenaŭ ĉesis paroli pri sia granda amiko, Doktoro Johano Dolittle — “M.D.” Li tiom parolis ke li forgesis vokadi “Viando!” ĝis subite ni rimarkis ke granda vico de hundoj pacience sekvas nin.

“Kien la Doktoro iris per ĉi tiu vojaĝo?” mi demandis dum Mateo disdonis la viandon al ili.

“Mi ne scias”, li respondis. “Neniu iam scias kien li iros, nek kiam li iros, nek kiam li revenos. Li loĝas tute sola, escepte de siaj dorlotbestoj. Li faris kelkajn grandajn vojaĝojn kaj kelkajn mirindajn trovojn. Lastafoje li revenis kaj diris al mi ke li trovis tribon de Ruĝaj Indianoj en Pacifika Oceano — loĝadas sur du insuloj ili. La edzoj loĝas sur unu insulo kaj la edzinoj sur la alia. Saĝaj estas kelkaj el tiuj sovaĝuloj. Ili interrenkontiĝas nur unufoje en la jaro, kiam la edzoj venas viziti la edzinojn por granda festeno — je la kristnasko, verŝajne. Jes, li estas mirindulo, tiu Doktoro. Kaj pri bestoj, nu, neniu scias tiom pri ili kiel li.”

“Kiel li akiris tiom da scio pri bestoj?” mi demandis.

La porkata-viandovendisto haltis kaj klinis sin por flustri en mian oreilon:

“*Li parolas ilian lingvon,*” li diris per raŭka mistera voĉo.

“La lingvon de la bestoj?” mi kriis.

“Jes certe”, diris Mateo. “Ĉiuj bestoj havas ian

lingvon. “Kelkaj specoj parolas pli ol aliaj; kelkaj parolas nur per signalado, samkiel surdmutuloj. Sed la Doktoro, li komprenas ilin ĉiujn — ne nur bestojn sed ankaŭ birdojn. Ni sekretigas pri tio, tamen, li kaj mi, ĉar oni nur mokas kiam oni parolas pri ĝi. Ho, li eĉ povas skribi besto-lingvon. Li voĉlegas al siaj dorlotbestoj. Li verkis historilibrojn per similingvo, poezion en kanarilingvo kaj komikajn kantojn kiujn la pigoj povas kanti. Tutvere. Li nun okupas sin per lernado de la lingvo de moluskoj. Sed li diras ke temas pri tre malfacila laboro — kaj li aĉe malvarmumiĝis plurfoje, ĉar li tenas sian kapon subakve tiom. Li estas granda viro”.

“Evidente”, mi diris. “Mi volegas ke li estu ĉehejme, por ke mi povu renkonti lin”.

“Nu, jen lia domo, rigardu”, diris la porkataviandovendisto — “tiu malgranda domo ĉe la vojkurbiĝo tie — la tre alta domo — kvazaŭ ĝi sidas sur la muro super la strato”.

Ni nun estis irintaj preter la randon de la vilaĝo. Kaj la domo indikita de Mateo estis tre malgranda, kaj tute sola. Ŝajne estis granda ĝardeno ĉirkaŭ ĝi; kaj tiu ĝardeno estis multe pli alta ol la vojo, tiel ke oni devis ascendi ŝtuparon en la muro antaŭ ol atingi la barilon ĉe la supro. Mi povis vidi ke estas multaj belaj fruktarboj en la ĝardeno, ĉar iliaj branĉoj pendis super la muron kelkaloke. Sed la muro estis tiom alta ke mi povis vidi nenion alian.

Kiam ni atingis la domon Mateo ascendis la ŝtuparon al la barilo kaj mi sekvis lin. Mi supozis ke li eniros la ĝardenon; sed la barilo estis ŝlosita. Hundo

alkuris el la domo; kaj li prenis plurajn pecojn de viando kiujn la porkata-viandovendisto puŝis tra la kradon de la barilo, kaj kelkajn paperajn sakojn da tritiko kaj brano. Mi rimarkis ke la hundo ne haltis por manĝi la viandon, kiel agas ĉiu ordinara hundo, sed li prenis ĉion retroen al la domo kaj malaperis. Li havis kuriozan larĝan kolumon ĉirkaŭ sia kolo kiu aspektis kiel farita el latuno aŭ io tia. Post tio ni foriris.

“La Doktoro ankoraŭ ne revenis”, diris Mateo, “alie la barilo ne estus ŝlosita”.

“Kio estis tiuj aĵoj en paperaj sakoj kiujn vi donis al la hundo?” mi demandis.

“Ho, tio estis provianto”, diris Mateo — “manĝaĵoj por la bestoj. La domo de la Doktoro estas plenega de dorlotbestoj. Mi donas la provianton al la hundo dum la Doktoro forestas, kaj la hundo disdonas ĝin al la aliaj bestoj”.

“Kaj kio estis tiu kurioza kolumo kiun li portis ĉirkaŭ sia kolo?”

“Tio estas hundokolumo el solida oro”, diris Mateo. “Ĝi estis donita al li kiam li estis kun la Doktoro dum unu el liaj vojaĝoj antaŭ longe. Li savis la vivon de viro”.

“De kiom longe la Doktoro havas lin?” mi demandis.

“Ho, de tre longe. Jipo estas tre maljuna nun. Tial la Doktoro ne plu kunprenas lin dum siaj vojaĝoj. Li postlasas lin por prizorgi la domon. Ĉiujn lundon kaj ĵaŭdon mi portas la manĝaĵojn al la barilo tie kaj donas ilin al li tra la krado. Li neniam permesas ke iu

eniru la ĝardenon dum la Doktoro forestas — eĉ ne min, kvankam li bone konas min. Sed vi ĉiam povos scii ĉu la Doktoro revenis aŭ ne — ĉar se jes, la barilo certe estos malferma”.

Do mi reiris hejmen al la domo de mia patro kaj enlitigis mian sciuron en malnovan lignan skatolon plenan per pajlo. Kaj tie mi mem flegis lin kaj prizorgis lin laŭeble ĝis venos la tempo de la reveno de la Doktoro. Kaj ĉiutage mi iris al la malgranda domo kun la granda ĝardeno ĉe la rando de la vilaĝo por trovi ĉu ĝi estis ŝlosita. Kelkafoje la hundo, Jipo, venis al la barilo por renkonti min. Sed kvankam li ĉiam skuadis sian voston kaj aspektis ĝoja renkonti min, li neniam permesis ke mi eniru la ĝardenon.

3. LA DOMO DE LA DOKTORO

UNU lundan posttagmezon preskaŭ fine de aprilo mia patro petis min porti kelkajn ŝuojn kiujn li estis riparinta al domo aliflanke de la vilaĝo. Ili estis por Kolonelo Bellows, kiu estis tre postulema.

Mi trovis la domon kaj sonorigis ĉe la antaŭa pordo. La Kolonelo malfermis ĝin, elpuŝis tre ruĝan vizaĝon kaj diris, “Ĉirkaŭiru al la metiista enirejo — iru al la malantaŭa pordo”. Post tio li brufermis la pordon.

Mi volis ĵeti la ŝuojn en la mezon de lia florbedo. Sed mi pensis ke mia patro eble kolerus, do mi ne faris tion. Mi ĉirkaŭiris al la malantaŭa pordo, kaj tie la edzino de la Kolonelo renkontis min kaj prenis de mi la ŝuojn. Ŝi aspektis timida malgranda virino kaj ŝiaj manoj estis kovritaj per faruno kvazaŭ ŝi faras panon. Ŝi ŝajnis timegi sian edzon, kiun mi ankoraŭ povis aŭdi peze marŝadi ie en la domo, indigne muĝante ĉar mi iris al la antaŭa pordo. Tiam ŝi demandis al mi flustre ĉu mi deziras bulkon kaj glason da lakto. Kaj mi diris, “Jes, bonvolu”.

Manĝinte la bulkon kaj lakton, mi dankis la edzinon de la Kolonelo kaj foriris. Tiam mi ekpensis ke antaŭ ol reiri hejmen mi iros vidi ĉu la Doktoro jam revenis. Mi jam estis irinta al lia domo tiun matenon. Sed mi pensis ke mi deziras iri kaj rerigardi. Mia sciuro ne regajnadis sanon kaj mi komencis tre maltrankvili pri li.

Do mi turnis min al la Vojo al Oksentorpo kaj komencis marŝi cele la domon de la Doktoro. Survoje

mi rimarkis ke la ĉielo kovriĝas per nuboj kaj ke aspektas ke pluvos.

Mi atingis la barilon kaj trovis ĝin ankoraŭ ŝlosita. Mi sentis grandan senkuraĝiĝon. Mi venadis tien ĉiutage jam de semajno. La hundo, Jipo, venis al la barilo kaj skuadis sian voston kiel kutime, kaj post tio sidiĝis kaj atentis min por certigi ke mi ne eniros.

Mi komencis timi ke mia sciuro mortos antaŭ ol la Doktoro revenos. Mi forturnis min malfeliĉe, descendis la ŝtuparon al la vojo kaj returnis min hejmen.

Mi scivolis ĉu jam estas la manĝohoro. Komprenoble mi ne posedis propran poŝhorloĝon, sed mi rimarkis ĝentlemanon kiu venas miadirekte laŭ la vojo; kaj kiam li pliproksimiĝis mi vidis ke li estas la Kolonelo promenanta. Li estis plene envolvita per modaj manteloj kaj ŝaloj kaj brilaj gantoj. La tago ne estis tre malvarma sed li surhavis tiom da vestoj ke li aspektis kuseno interne de rulo de lankovriloj. Mi demandis lin ĉu li bonvolos diri al mi la tempon.

Li haltis, gruntis, kaj gapadis min — lia ruĝa vizaĝo fariĝis eĉ pli ruĝa; kaj kiam li parolis la sono estis kia tiu de korko tirata el botelo da zingibroiero.

“Ĉu vi eĉ unu momenton imagas”, li elŝprucis, “ke mi plene malbutonumos min nur por diri al malgranda knabo kia vi *la tempon!*” Kaj li plu iris piedbatante la straton dum li marŝis, gruntante eĉ pli forte ol antaŭe.

Mi staris senmove dum momento, postrigardante lin kaj cerbumante pri kiom aĝa mi devos esti por ke li ĝenu sin per eltiro de sia poŝhorloĝo. Kaj tiam, tute subite, la pluvo ektorentis.

Neniam mi vidis tiel densan pluvegon. Senlumiĝis, preskaŭ kiel nokte. La vento komencis blovi; la tondro muĝis; la fulmo flagris, kaj post momento la defluejoj de la vojo fluplenis kiel rivero. Estis neniu utiligebla ŝirmejo proksima, do mi klinis mian kapon kontraŭ la pelanta vento kaj komencis kuri hejmen.

Mi ne estis multe irinta kiam mia kapo batis ion molan kaj mi subite sidiĝis sur la pavimo. Mi supren rigardis por vidi kun kiu mi koliziis. Kaj jen antaŭ mi, sidanta sur la malseka pavimo samkiel mi, estis malgranda ronda viro kun tre afabla vizaĝo. Li surhavis ĉifan altan ĉapelon kaj en la mano li tenis malgrandan nigran valizon.

“Mi multe bedaŭras”, mi diris. “Mia kapo estis klinita kaj mi ne vidis vin veni”.

Tre surprize al mi, anstataŭ koleri pro sia ekfalo, la malgranda viro komencis ridi.

“Ja tio memorigas min”, li diris, “pri kio okazis al mi foje en Hindujo. Mi koliziis plenrapide kun virino dum fulmotondro. Sed ŝi estis portanta poton da melaso sur sia kapo kaj sekve melaso restis en mia hararo dum pluraj postaj semajnoj — muŝoj sekvis min ĉien. Espereble mi ne vundis vin”.

“Ne”, mi diris. “Nenia vundo”.

“Mi mem egale kulpis kiel vi”, diris la malgranda viro. “Ankaŭ mia kapo estis klinita — sed atentu, ni nepre ne plu sidadu parolante ĉi tie. Nepre vi estas malsekega. Mi scias ke mi ja. Kiom pli vi devos iri?”

“Mia hejmo estas aliflanke de la vilaĝo”, mi diris, dum ni stariĝis.

“Jadi, tiu pavimo *vere* estis malseka!” diris li. “Kaj

jen pluvegas eĉ pli, nun. Venu kun mi al mia domo kaj sekiĝu. Ĉispeca ŝtormo ne povos longe daŭri”.

Li prenis mian manon kaj ni komencis rekuri kune laŭ la vojo. Kurante mi demandis al mi kiu estas ĉi kurioza vireto, kaj kie li loĝas. Mi estis tute nekonata de li, tamen li gvidis min al sia propra domo por sekiĝi. Tia ŝanĝo, post la olda ruĝvizaĝa Kolonelo kiu rifuzis eĉ diri al mi la tempon! Baldaŭ ni haltis.

“Jen ni alvenis”, li diris.

Mi supren rigardis por vidi kie ni estas kaj trovis min denove ĉe la malsupro de la ŝtuparo kondukanta al la malgranda domo kun la granda ĝardeno! Mia nova amiko jam suprenkuris la ŝtupojn kaj estis malfermanta la barilon per kelkaj ŝlosiloj kiujn li prenis el sia poŝo.

“Certe”, mi pensis, “ĉi tiu ne povas esti la granda Doktoro Dolittle mem!”

Mi supozas ke aŭdinte tiom pri li, mi anticipis iun tre altan kaj fortan kaj mirindan. Estis malfacile kredi ke ĉi tiu kurioza malgranda viro kun la afabla ridetanta vizaĝo vere estas li. Tamen jen li, tute vere, suprenkurinta la ŝtupojn kaj malfermanta la barilon mem kiun mi rigardadis dum tiom da tagoj!

La hundo, Jipo, venis kurante kaj komencis salti sur lin kaj bojadi pro ĝojo. La pluvo faladis eĉ pli forte ol antaŭe.

“Ĉu vi estas Doktoro Dolittle?” mi kriis dum ni hastis laŭ la mallonga ĝardenpado al la domo.

“Jes, mi estas Doktoro Dolittle”, diris li, dum li malfermis la antaŭan pordon per la sama ŝlosilaro. “Eniru! Ne necesas viŝi viajn piedojn. Ne atentu la


koton. Prenu ĝin kun vi. Eniru el la pluvo!”

Mi enkuris, dum li kaj Jipo sekvis. Poste li brufermis la pordon malantaŭ ni.

La ŝtormo estis sufiĉe malluma ekstere; sed en la domo, kun la pordo fermita, estis senlume kiel dum la nokto. Tiam komenciĝis la plej eksterordinara bruo kiun iam mi aŭdis. Sonis kvazaŭ ĉiaspecaj bestoj kaj birdoj vokas kaj blekas kaj krias samtempe. Mi povis aŭdi ulojn paŝegantajn laŭ la ŝtuparo kaj rapidantajn en koridoroj. Ie en la senlumo anaso kvakadis, koko kokerikis, kolombo rukulis, strigo blekadis, ŝafido muĝadis kaj Jipo bojadis. Mi sentis birdoflugilojn flirtadi kaj blovadi apud mia vizaĝo. Uloj daŭre koliziis kun miaj kruroj kaj preskaŭ renversis min. La tuta antaŭa koridoro ŝajnis esti pleniĝanta per bestoj. La bruo, kune kun la bruegado de la pluvo, estis enorma; kaj mi komencis iomete timi, sed tiam mi sentis la Doktoron preni mian brakon kaj li kriis en mian orelon:

“Ne estu alarmita. Ne timu. Nur temas pri kelkaj el miaj dorlotbestoj. Mi forestis dum tri monatoj kaj ili ĝojas vidi min denove hejme. Staru senmove ĝis mi estigos lumon. Jadi, kia ŝtormo! — Nur aŭskultu tiun tondradon!”

Do tie mi staris en la plenega mallumo, dum ĉiaj bestoj kiujn mi ne povis vidi babiladis kaj moviĝadis ĉirkaŭ mi. Estis kurioza kaj stranga sento. Mi ofte scivolis, dum mi enrigardis tra la antaŭa barilo, kia estas Doktoro Dolittle kaj kion la kurioza dometo enhavas. Sed mi neniam imagis ke estus iel simile al ĉi tio. Tamen iel, sentinte la manon de la Doktoro sur



“KAJ PER SIA DEKSTRA PIEDO Ê SI PORTIS BRULANTAN KANDELON!”

mia brako, mi ne sentis timon, nur konfuzon. Ĉio ŝajnis ia kurioza songo; kaj mi komencis demandi al mi ĉu mi efektive estas veka, kiam mi aŭdis la Doktoron paroli denove.:

“Miaj benitaj alumetoj estas ĉiuj malsekaj. Ili rifuzas bruli. Ĉu vi havas alumetojn?”

“Ne, bedaŭrinde ne”, mi vokis responde.

“Ne gravas”, diris li. “Eble Dab-Dabo povas estigi lumon por ni ie”.

Tiam la Doktoro faris kelkajn kuriozajn klakajn bruojn per sia lango kaj mi aŭdis iun repaŝegi supren laŭ la ŝtuparo kaj komenci moviĝadi en la ĉambroj tie.

Ni atendis tre longe sed nenio okazis.

“Ĉu la lumo longe prokrastos?” mi demandis. “Iu besto sidas sur mia piedo kaj miaj piedfingroj komencas dormi”.

“Ne, nur minuton”, diris la Doktoro. “Ŝi revenos post minuto”.

Ĝuste tiam mi vidis la unuaj biletojn de lumo ĉirkaŭ la supro de la ŝtuparo. Tuj la bestoj ĉiuj silentiĝis.

“Mi kredis ke vi loĝas sola”, mi diris al la Doktoro.

“Tiel estas”, diris li. “Dab-Dabo alportas la lumon”.

Mi rerigardis supren laŭ la ŝtuparo, penante vidi kiu venas. Mi ne povis vidi ĉirkaŭ la ŝtuparo-platformon, sed mi aŭdis plej kuriozajn paŝojn sur la supraj ŝtupoj. Sonis kiel iu saltanta de unu ŝtupo al la sekva, kvazaŭ uzante nur unu kruron.

Dum la lumo pliproksimiĝis, ĝi fariĝis pli brila kaj komencis fari strangajn saltantajn ombrojn sur la

muroj.

“Ha — fine!” diris la Doktoro. “Mia Fidela Dab-Dabo!”

Kaj tiam mi kredis ke *vere* mi songas. Ĉar jen, turnante sian kolon por vidi ĉirkaŭ la kurbon de la ŝtuparoplatformo, salte descendante la ŝtuparon per unu kruro, venis senmakule blanka anaso. Kaj per sia dekstra piedo ŝi portis brulantan kandelon!

4. LA VIF-VAFO

KIAM fine mi povis ĉirkaŭrigardi mi trovis ke la koridoro ja estas tute plena de bestoj. Al mi ŝajnis ke preskaŭ ĉia kampara besto nepre ĉeestas: kolombo, blanka rato, strigo, melo, monedo — eĉ malgranda porko, ĵus enveninta el la pluvoplena ĝardeno, zorge viŝante siajn piedojn per la mato dum la kandellumo brilis sur lian malsekan palruĝan dorson.

La Doktoro prenis de la anaso la kandelington kaj turnis sin al mi.

“Atentu”, li diris; “vi devos demeti tiujn malsekajn vestojn — ho, ankaŭe, kiel vi nomiĝas?”

“Tomĉjo Stubbins”, mi diris.

“Ho, ĉu vi estas la filo de Jakobo Stubbins, la ŝufaristo?”

“Jes”, mi diris.

“Bonega botfaristo, via patro”, diris la Doktoro. “Ĉu vi vidas ĉi tiujn?” kaj li supren tenis sian dekstran piedon por montri al mi la enormajn botojn kiujn li surhavas. “Via patro faris ĉi tiujn botojn por mi antaŭ kvar jaroj, kaj mi portas ilin konstante de tiam — perfekte bonegaj botoj — Nu, atentu, Stubbins. Vi devas ŝanĝi tiujn malsekajn vestojn — kaj rapide. Atendu momenton ĝis mi lumigos pli da kandeloj, kaj tiam ni ascendos por trovi kelkajn sekajn vestojn. Vi devos surhavi malnovan kompletan mian ĝis ni povos resekiĝi viajn apud la kuirejfajro”.

Do baldaŭ, kiam pli da kandeloj estis lumigitaj en

diversaj partoj de la domo, ni iris al la supra etaĝo; kaj kiam ni eniris dormoĉambron la Doktoro malfermis grandan vestoŝrankon kaj elprenis du malnovajn vestokompletejn. Ni vestis nin per ili. Post tio ni portis niajn malsekajn vestojn al la kuirejo kaj faris fajron en la granda kameno. La frako de la Doktoro kiun mi surhavis estis tiom granda ke mi multafoje tretis sur miajn proprajn baskojn dum mi helpis alporti brulligon el la kelo. Sed tre baldaŭ ni havis grandegan fajron brulanta en la kameno kaj ni ĉirkaŭpendigis niajn malsekajn vestojn sur seĝoj.

“Nun ni kuiru iom da vespermanĝo”, diris la Doktoro. — Vi restos por manĝi kun mi, Stubbins, kompreneble, ĉu ne?”

Jam mi komencis multe ŝati ĉi tiun kuriozan malgrandan viron kiu nomis min “Stubbins” anstataŭ “Tomĉjo” aŭ “knabeto” (mi ege malamis esti nomata “knabeto”!) Ĉi viro ŝajne jam dekomence traktis min kvazaŭ mi estas adolta amiko lia. Kaj kiam li petis min resti por manĝi kun li mi sentis grandegajn fieron kaj feliĉon. Sed mi subite memoris ke mi ne estis informinta mian patrinon ke mi forestos ĝis malfrue. Do tre malfeliĉe mi respondis:

“Tre grandan dankon. Volonte mi restus, sed mi multe timas ke mia patrino komencos maltrakviliĝi kaj ne kompreni kie mi estas se mi ne rehejmeniros.”

“Ho, sed mia kara Stubbins”, diris la Doktoro, ĵetante novan ŝtipon sur la fajron, “viaj vestoj ankoraŭ ne estas sekaj. Vi devos atendi ilin, ĉu ne? Kiam ili estos pretaj por resurmetiĝo, ni jam estos kuirintaj nian vespermanĝon kaj manĝintaj ĝin. Ĉu vi rimarkis

kien mi metis mian valizon?”

“Mi kredas ke ĝi plu restas en la enirejo”, mi diris.
“Mi iros serĉi.”

Mi trovis la valizon apud la antaŭa pordo. Ĝi estis el nigra ledo kaj aspektis tre tre malnova. Unu el la seruroj estis rompita, kaj ĝi estis ĉirkaŭligita ĉe sia mezo per ŝnuro.

“Dankon”, diris la Doktoro, kiam mi portis ĝin al li.

“Ĉu tiu valizo estis la sola ujo kiun vi uzis dum via vojaĝo?” mi demandis.

“Jes”, diris la Doktoro, malfermante la ŝnurligon.
“Mi malemas je multa bagaĝo. Estas tro ĝene. La vivo estas tro mallonga por sin ĝeni pri ĝi. Kaj ĝi vere ne necesas, komprenu. *Kien* mi metis tiujn kolbasojn?”

La Doktoro palpadis en la sako. Unue li elportis novan panon. Sekvis vitra poto kun kurioza metala kapsulo. Li tenis ĉi tion tre zorge apud la lumilo antaŭ ol meti ĝin sur la tablon; kaj mi povis vidi ke estas ia kurioza malgranda akva besto naĝanta en ĝi. Fine la Doktoro elprenis duonan kilogramon da kolbasoj.

“Nun”, li diris, “bezona estas nur fritilo”.

Ni eliris en la postkuirejon kaj tie ni trovis kelkajn potojn pendantajn sur la muro. La Doktoro deprenis la paton. Ĝi estis tre rusta interne.

“Jadi, nur rigardu ĝin!” diris li. “Jen la ĉefa malbono de longa foresto. La bestoj estas tre afablaj kaj bonege tenas la domon pura, laŭ sia kapablo. Dab-Dabo estas mirinde kapabla mastrumisto. Sed kompreneble ili ne povas sukcesi pri kelkaj aĵoj. Ne gravas, ni baldaŭ repurigos ĝin. Vi trovos frotsablon

malsupre, sub la akvopelvo, Stubbins. Bonvolu ĝin elpreni por mi.”

Post kelkaj momentoj la pato estis tute brila kaj la kolbasoj estis kuirantaj super la fajro kaj bela fritodoro plenigis la domon.

Dum la Doktoro okupis sin per kuirado mi iris rerigardi la kuriozan beston naĝantan en la vitra potu.

“Kio estas ĉi tiu besto?” mi demandis.

“Ho tio”, diris la Doktoro, turninte sin — “tio estas Vif-Vafo. Ĝia plena nomo estas *hippocampus pippitopitus*. Sed la indiĝenoj simple nomas ĝin Viv-Vafo — laŭ la maniero de ĝia vostosvingado, dum ĝi naĝas, mi supozas. Por ĝi mi faris mian plejnovan vojaĝon, por akiri ĝin. Komprenu ke mi estas tre okupata nun penante lerni la lingvon de la moluskoj. Ili ja *havas* lingvojn, mi certas pri tio. Mi povas paroli iom da ŝarka lingvo kaj focena dialekto jam. Sed mi precipe volas lerni la moluskan, ĝuste nun.”

“Kial?” mi demandis.

“Nu, komprenu, kelkaj el la moluskoj estas la plej malnova speco de bestoj en la mondo laŭ nia scio. Ni trovas iliajn konkajn en la rokoj — ŝtoniĝintajn. Do mi estas tute certa ke se mi sukcesus paroli ilian lingvon, mi povus lerni multegon pri kia estis la mondo antaŭ multegaj epokoj. Ĉu ne?”

“Sed ĉu iuj el la aliaj bestoj ne povus egale bone informi vin?”

“Mi kredas ke ne”, diris la Doktoro, pikante la kolbasojn per forko. “Komprenoble, la simioj kiujn mi konis en Afriko antaŭ kelka tempo estis tre helpaj per

sia rakontado pri antaŭaj epokoj; sed ili sciis nur pri la pasintaj mil jaroj, pli-malpli. Ne, mi certas ke la plej malnovan historion en la mondo oni povas havigi de la moluskoj — nur de ili. Komprenu, la plej multaj aliaj bestoj kiuj vivis en tiuj tre antikvaj epokoj ne plu vivas.”

“Ĉu vi jam lernis iom da moluska lingvo?” mi demandis.

“Ne. Mi nur ĵus komencis. Mi volis ĉi tiun specifan specon de pipfiŝo ĉar li estas duone molusko kaj duone ordinara fiŝo. Mi iris eĉ al la Orienta Mediteraneo por serĉi lin. Sed mi tre multe timas ke li ne multe helpos min. Verdire, min iom ĉagrenas lia aspekto. Li ne *aspektas* tre inteligenta, ĉu?”

“Vi pravas”, mi konsentis.

“Ha,” diris la Doktoro — la kolbasoj estas bele kuiritaj. Venu — apudigu vian teleron kaj mi donos al vi kelkajn.”

Tiam ni sidiĝis ĉe la kuirejtablo kaj komencis tre satigan manĝon.

Tiu ja estis mirinda kuirejo. Mi tre ofte manĝis tie, poste, kaj mi trovis ĝin pli bona manĝoloko ol la plej grandioza manĝoĉambro en la mondo. Ĝi estis tiom komfortiga kaj hejmea kaj varma. Ĝi estis tiom konvena por la manĝaĵoj, ankaŭ. Oni prenis ilin rekte de la fajro, varmegajn, kaj metis ilin sur la tablon kaj manĝis. Kaj oni povis kontroli la toastadon ĉe la fendro por certigi ke la toasto ne brulas dum oni trinkas sian supon. Kaj se oni forgesis meti la salon sur la tablon, ne necesis stariĝi kaj eniri alian ĉambron por akiri ĝin; oni simple turnis sin kaj

prenis la grandan lignan skatolon de sur la tirkesto malantaŭ oni. Kaj la kameno — la plej granda kameno iam vidita — mem estis kvazaŭ ĉambro. Oni povis tute eniri ĝin, eĉ dum la ŝtipoj bruladis, kaj sidi sur la larĝaj benkoj ambaŭflanke kaj rosti kaŝtanojn por la manĝo — aŭ aŭskultadi la kantadon de la kaldrono, aŭ rakontadi, aŭ rigardi bildolibrojn per la lumo de la fajro. Ĝi estis mirinda kuirejo. Ĝi estis simila al la Doktoro, komforta, bonsenca, amikema, kaj solida.

Dum ni manĝegadis, la pordo subite malfermiĝis kaj enmarŝis la anaso, Dab-Dabo, kaj la hundo, Jipo, trenante litkovrilojn kaj kusenkovrilojn trans la puran kahelitan plankon. La Doktoro, rimarkinte mian surpriziĝon, klarigis al mi:

“Ili nur celas aerumi la litkovraĵojn por mi antaŭ la fajro. Dab-Dabo estas vere trezoreca mastrumisto; ŝi neniam forgesas ion ajn. Iam mi havis fratinon kiu mastrumadis por mi (povra, kara Sarao! Kiel ŝi statas nun? — mi jam ne vidas ŝin de multaj jaroj). Sed ŝi tute ne estis tiom kompetenta kiel Dab-Dabo. Ĉu vi deziras alian kolbason?”

La Doktoro turnis sin kaj diris kelkajn vortojn al la hundo kaj anaso per iaj strangaj parolo kaj signoj. Ili ŝajne perfekte komprenis lin.

“Ĉu vi povas paroli la sciuran lingvon?” mi demandis.

“Ho jes. Tiu estas tre facila lingvo”, diris la Doktoro. “Vi mem povus lerni ĝin sen multa malfacilo. Sed kial vi demandas?”

“Ĉar ĉehejme mi havas malsanan sciuron”, mi diris. “Mi prenis ĝin de falko. Sed du el ĝiaj kruroj

estas aĉe malbonstataj kaj mi multege volis ke vi ekzameni ĝin, se vi bonvolus. Ĉu mi alportu ĝin morgaŭ?”

“Nu, se ĝia kruro estas rompita mi opinias ke plej bone estos ke mi ekzameni ĝin jam ĉinokte. Eble estas tro malfrue por multon fari; sed mi hejmeniros kun vi kaj rigardos ĝin.”

Do baldaŭ ni palpis la vestojn apud la fajro kaj trovis ke miaj estas tute sekaj. Mi prenis ilin al la litĉambro sur la supra etaĝo kaj ŝanĝis miajn vestojn, kaj kiam mi redescendis la Doktoro jam estis preta, atendanta min kun sia malgranda nigra valizo plena de medikamentoj kaj bandaĝoj.

“Venu”, li diris. “La pluvo jam ĉesis.”

Eksterdome estis ree lume kaj la vespera ĉielo estis ruĝe kolorita de la malleviĝanta suno; kaj turdoj kantadis en la ĝardeno dum ni malfermis la barilon por descendi al la vojo.

5. POLINEZIO

“**L**AŬ MIA OPINIO via domo estas la plej interesa domo en kiu iam mi estis”, mi diris dum ni komencis marŝi cele la vilaĝon. “Ĉu vi permesas ke mi vizitu vin denove morgaŭ?”

“Certe”, diris la Doktoro. “Venu kiam ajn vi deziras. Morgaŭ mi montros al vi la ĝardenon kaj mian privatan zoon.”

“Ho, ĉu vi havas zoon?” mi demandis.

“Jes”, diris li. “La pli grandaj bestoj estas tro grandaj por la domo, do mi tenas ilin en zoo en la ĝardeno. Ne temas pri tre granda kolekto sed siamaniere ĝi estas interesa.”

“Devas esti grandioze”, mi diris, “povi paroli ĉiujn lingvojn de la diversaj bestoj. Ĉu vi kredas ke mi mem povus lerni fari tion?”

“Ho, nepre”, diris la Doktoro, “post praktikado. Oni devas esti tre pacienca, sciu. Vere vi devus havi Polinezion por instrui vin. Ŝi donis al mi miajn unuajn lecionojn”.

“Kiu estas Polinezio?” mi demandis.

“Polinezio estis okcidentafrika papago kiun mi havis. Ŝi ne plu estas kun mi”, diris la Doktoro, malfeliĉe.

“Kial — ĉu ŝi mortis?”

“Ho, ne”, diris la Doktoro. “Ŝi plu vivas, mi esperas. Sed kiam ni atingis Afrikon ŝi tiom ĝojis reesti en sia propra lando. Ŝi ploris pro ĝojo. Kaj kiam venis la tempo kiam mi devis reveni ĉi tien, mia

kompato ne permesis ke mi forprenu ŝin el tiu sunoplena lando — kvankam verdire, ŝi ja proponis kune veni. Mi lasis ŝin en Afriko. Ha, nu! Mi ege sentas ŝian foreston. Ŝi ploris denove kiam ni foriris. Sed mi kredas esti aginta ĝuste. Ŝi estis unu el miaj plej bonaj amikoj. Ŝi unue donis al mi la ideon lerni la bestolingvojn kaj fariĝi kuracisto por bestoj. Mi ofte demandas al mi ĉu ŝi restis feliĉa en Afriko, kaj ĉu mi iam revidos ŝian komikan oldan solenan vizaĝon. — Kara olda Polinezio! — Vere eksterordinara birdo! — Nu, nu!”

Ĝuste tiumomente ni aŭdis la sonon de iu postkuranta nin; kaj turninte nin ni vidis Jipon la hundon rapidadi laŭ la vojo cele nin, tiom rapide kiom povis porti lin liaj kruroj. Li aspektis tre ekscitita pri io, kaj tuj kiam li atingis nin, li komencis bojadi kaj krietadi al la Doktoro tre strangamaniere. Tiam ankaŭ la Doktoro ŝajnis tre ekscitiĝi kaj li komencis paroli kaj fari kuriozajn signojn al la hundo. Fine li turnis sin al mi, lia vizaĝo brilis pro ĝojo.

“Polinezio revenis!” li kriis. “Imagu! Jipo diras ke ŝi ĵus alvenis ĉe la domo. Ho! Kaj jam de kvin jaroj mi ne vidas ŝin. Pardonu min dum minuto.”

Li turnis sin kvazaŭ por reiri hejmen. Sed la papago, Polinezio, jam estis fluganta cele nin. La Doktoro kunfrapis siajn manojn kvazaŭ infano ricevanta novan ludilon; dum la grego da hirundoj en la vojo flirtis, klaĉante, supren sur la barilojn, tre skandalitaj vidante grizan kaj skarlatan papagon flugantan laŭ angla vojeto.

Rekte ŝi venis sur ŝultron de la Doktoro, kie ŝi tuj

komencis parolegadi en lingvo kiun mi ne komprenis. Ŝajne ŝi volis diri multegon. Kaj tre baldaŭ la Doktoro estis forgesinta min kaj mian sciuron kaj Jipon kaj ĉion alian; ĝis post iom da tempo la birdo klare demandis al li ion pri mi.

“Ho, pardonu min, Stubbins!” diris la Doktoro. “Min tiom interesis aŭskultadi ĉi tiun mian malnovan amikon. Ni devas pluri kaj vidi tiun sciuron vian. Polinezio, ĉi tiu estas Tomaso Stubbins.”

La papago, sur la ŝultro de la doktoro, kapklinis solene al mi, kaj post tio, multe surprize al mi, diris tute klare en la angla lingvo:

“Saluton. Mi memoras la nokton kiam vi naskiĝis. Estis aĉe malvarmega vintro. Vi estis tre malbela bebo.”

“Stubbins fervoras lerni bestolingvojn”, diris la Doktoro. “Mi ĵus diris al li pri vi kaj la lecionoj kiujn vi instruis al mi, kiam Jipo alkuris kaj informis min pri via alveno”.

“Nu”, diris la papago, turninte sin al mi, “mi ja komencis lernigi al la Doktoro, sed mi neniel povus fari eĉ tion se li ne estus antaŭe instruinta al mi kompreni kion *mi* diras kiam mi parolas angle. Sciu, multaj papagoj povas paroli kiel persono, sed tre malmulte da ili komprenas kion ili diras. Ili nur diras ĝin ĉar — nu, ĉar ili imagas ke tio estas impona, aŭ ĉar ili scias ke oni donos al ili biskvitojn”.

Jam ni estis turnintaj nin kaj iris cele mian hejmon, kun Jipo antaŭkuranta kaj Polinezio ankoraŭ staranta sur ŝultro de la Doktoro. Tiu birdo babiladis senhalte, plejparte pri Afriko; sed nun ŝi parolis

anglalingve, por esti ĝentila al mi.

“Kiel statas Princo Bumpo?” demandis la Doktoro.

“Ho, estas bone ke vi demandis min”, diris Polinezio. “Mi preskaŭ forgesis diri al vi. Kion vi supozas? — *Bumpo estas en Anglujo!*”

“En Anglujo! — Ĉu vere?” kriis la Doktoro. “Sed kion li faras ĉi tie?”

“Lia patro, la reĝo, sendis lin ĉi tien al loko nomata — e..., a..., — Taŭrofordo, mi kredas ĝi nomiĝas tiel — por studi lecionojn”.

“Taŭrofordo! — Taŭrofordo!” murmuris la Doktoro. “Mi neniam aŭdis pri tiu loko — ho, vi celas diri *Oksfordo*”.

“Jes, jen la loko — Oksfordo”, diris Polinezio. “Mi sciis ke bovoj iel rilatas al ĝi. Oksfordo, li iris tien.”

“Nu, nu,” murmuris la Doktoro. “Imagu, Bumpo studas ĉe Oksfordo. Nu, nu!”

“Multo okazis en Ĝoliginkiujo kiam li foriris. Li timegis veni. Li estas la unua persono el tiu lando kiu iris al fremda lando. Li kredis ke lin manĝos blankaj kanibaloj, aŭ ion tian. Vi scias kiaj estas tiuj nigruloj — tiom sensciaj! Nu! — Sed lia patro devigis lin veni. Li diris ke ĉiuj nigraj reĝoj sendas siajn filojn al Oksfordo, nuntempe. Estas la aktuala modo, kaj ankaŭ li devos fari tion. Bumpo volis kunvenigi siajn ses edzinojn. Sed la reĝo malpermesis ankaŭ tion. Povra Bumpo foriris larmoplena — kaj ĉiu en la palaco ankaŭ ploris. Neniam vi aŭdis tian bruadon.”

“Ĉu vi scias ĉu li efektive rekomencis serĉi la Dormantan Belulinon? demandis la Doktoro.

“Nu li reportis ion kio *laŭ li* estis la Dormanta

Belulino. Mi mem, nu mi kredas ke temis pri albina negrino. Ŝi havis ruĝan hararon kaj la plej grandajn piedojn iam viditajn. Sed al Bumpo ŝi senmezure plaĉis kaj fine li edzinigis ŝin dum longa festena ĝojado. La festenoj daŭris dek tagojn. Ŝi fariĝis lia ĉefedzino kaj nun estas konata tie kiel la Kron-Princino Bumpá — oni akcentas la lastan silabon”.

“Kaj diru al mi, ĉu li restis blanka?”

“Nur dum proksimume tri monatoj”, diris la papago. Post tio lia vizaĝo malrapide reakiris sian naturan koloron. Tiel estis plej bone. Li estis tiom strangaspekta en naĝkalsono, kia li estis, pro sia vizaĝo blanka kaj la cetera korpo nigra”.

“Kaj kiel statas Ĉi-Ĉio? — Ĉi-Ĉio”, aldonis la Doktoro klarige al mi. “estis dorlotsimio kiun mi havis antaŭ multaj jaroj. Mi lasis ankaŭ lin en Afriko kiam mi forvenis”.

“Nu”, diris Polinezio, sulkante la frunton, “Ĉi-Ĉio ne estas tute feliĉa. Mi tre ofte renkontis lin dum la ĵus pasintaj kelkaj jaroj. Li fariĝis terure nostalgia pri vi kaj la domo kaj la ĝardeno. Estas kurioze, ĉar mi mem estis tute simila. Ĉu vi memoras kiam fervora mi estis reiri al la kara malnova lando? Kaj Afriko *vere* estas mirinda lando — negrave kion ajn diras iu alia. Nu, mi kredis ke mi estos ĝuplenega. Sed ial — mi ne scias — post kelkaj semajnoj ĝi komencis enuigi min. Mi simple ne povis kvietiĝi. Nu, por mallongigi la rakonton, unu nokton mi decidis ke mi revenos ĉi tien kaj trovos vin. Do mi elserĉis oldan Ĉi-Ĉion kaj parolis al li pri ĝi. Li diris ke li tute ne kulpigas min — ke li sentas precize same kiel mi.

Afriko estis tiom mortenuiga post nia vivado kun vi. Li nostalgiis pri la rakontoj kiujn vi kutimis legi al ni el viaj bestolibroj — kaj la konversacioj kiujn ni kutime havis sidante ĉirkaŭ la kuirejfajro dum vintraj noktoj. La bestoj tie estis tre afablaj al ni, kaj tiel plu. Sed ial la karaj afabluloj ŝajnis iom stultaj. Ĉi-Ĉio diris ke ankaŭ li rimarkis tion. Sed supozeble ne ŝanĝiĝis *ili*; *ni* estis la diferenculoj. Kiam mi foriris, povra olda Ĉi-Ĉio komencis ploregi. Li diris ke estas kvazaŭ lia sola amiko forlasas lin — kvankam vi scias ke li havis vere milionojn da parencoj tie. Li diris ke ŝajnis maljuste ke mi havas flugilojn kaj povas flugi ĉi tien kiam ajn mi deziras, kaj li havas nenian metodon sekvi min. Sed atentu kion mi diras, min neniel surprizus se li trovus metodon veni — iun tagon. Li estas lertulo, tiu Ĉi-Ĉio.”

Ĉipunkte ni atingis mian hejmon. La butikoj de mia patro estis fermita kaj la ŝutroj fermitaj; sed mia patrino staradis ĉe la pordo rigardante laŭ la longo de la strato.

“Bonan vesperon, s-ino Stubbins”, diris la Doktoro. “Mi kulpas pro la granda malfruo de via filo. Mi devigis lin resti por vespermanĝi dum liaj vestoj sekiĝis. Li estis ĝisoste malseka; ankaŭ mi. Ni renkontis unu la alian en la ŝtormo kaj mi insistis ke li venu en mian domon por ŝirmi sin”.

“Mi komencis maltrankviliĝi pri li”, diris mia patrino. “Mi dankas vin sinjoro, ĉar vi prizorgis lin tiom bone kaj revenigis lin hejmen”.

“Ne dankinde — ne dankinde”, diris la Doktoro. “Ni tre interese interbabiladis.”

“Kaj kun kiu mi havas la honoron paroli?” demandis mia patrino, gapante la grizan papagon sidantan sur ŝultro de la Doktoro.

“Ho, mi estas Johano Dolittle. “Verŝajne via edzo memoras min. Li faris por mi kelkajn vere bonegajn botojn antaŭ ĉirkaŭ kvar jaroj”, aldonis la Doktoro, rigardante siajn piedojn multe kontente.

“La Doktoro venis kuraci mian sciuron, Patrino”, diris mi. “Li scias ĉion pri bestoj”.

“Ho ne”, diris la Doktoro, “ne ĉion, Stubbins, neniel ĉion pri ili”.

“Vi estas tre afabla, veninte tiom distance por atenti lian dorlotbeston”, diris mia patrino. “Tomĉjo ĉiam alportas hejmen strangajn bestojn el la arbaro kaj la kampoj”.

“Ĉu vere?” diris la Doktoro. “Eble li fariĝos naturosciencisto iun tagon. Kiu povas diri?”

“Ĉu vi bonvolos enveni?” diris mia patrino. “La domo estas iomete malneta ĉar mi ankoraŭ ne finis la printempan purigadon. Sed agrabla fajro brulas en la salono”.

“Dankon!” diris la Doktoro. “Kiom ĉarman domon vi havas!”

Kaj tre tre zorge viŝinte siajn grandegajn botojn per la mato, la grandulo paŝis en la domon.

6. LA VUNDITA SCIURO

EN LA DOMO ni trovis mian patron okupanta sin per sinekzercado je la fluto, apud la fajro. Tion li ĉiam faris, ĉiuvespere, post la finiĝo de lia laboro.

La Doktoro tuj komencis paroli kun li pri flutoj kaj flutetoj kaj fagotoj; kaj baldaŭ mia patro diris:

“Eble vi mem ludas la fluton, sinjoro. Ĉu vi bonvolos ludi por ni?”

“Nu”, diris la Doktoro, “pasis longa tempo post kiam mi lastafoje ludis tiun instrumenton. Sed mi volonte provus. Ĉu?”

Tiam la Doktoro prenis la fluton de mia patro kaj ludis kaj ludis kaj ludis. Estis belege. Miaj patrino kaj patro sidis senmove kiel statuoj, gapante la plafonon kvazaŭ en preĝejo; kaj eĉ mi, kiu ne multe atentis muzikon, escepte per la buŝharmoniko — eĉ mi sentis min tute malfeliĉa kaj malvarma kaj stranga kaj volegis ke mi estu pli bona knabo.

“Ho, laŭ mi tio estis vere belega!” suspiris mia patrino, kiam fine la Doktoro ĉesis ludi.

“Vi estas granda muzikisto, sinjoro,” diris mia patro, “vere granda muzikisto. Ĉu vi bonvolos ludi pli por ni?”

“Nu, certe”, diris la Doktoro. “Ho, sed ne, mi plene forgesis pri la sciuro”.

“Mi montros lin al vi”, mi diris. “Li estas en la supra etaĝo, en mia ĉambro”.

Do mi gvidis la Doktoron al mia dormoĉambro plej supre en la domo kaj montris al li la sciuron en la

pakkesto plenigita per pajlo.

La besto, kiu ĉiam ŝajnis tre multe timi min — kvankam mi penegis komfortigi lin, tuj eksidis kiam la Doktoro venis en la ĉambron kaj komencis voĉadi. La Doktoro responde voĉadis kaj la sciuro, kiam li estis prenita por ebligi ekzamenon de lia kruro, aspektis plaĉita anstataŭ tima.

Mi tenis kandelon dum la Doktoro ligis la kruron inter kion li nomis “splintoj”, kiujn li faris el alumetoj per sia poŝtranĉilo.

“Mi kredas ke vi trovos ke lia kruro resaniĝos nun post tre nelonge”, diris la Doktoro, fermante sian valizon. “Ne lasu lin kuradi por almenaŭ la du sekvaj semajnoj, sed tenu lin en la libera aero kaj kovru lin per sekaj folioj se la noktoj malvarmiĝos. Li diris al mi ke li sentas sin tre sola ĉi tie, sen kompanoj, kaj li scivolas pri la stato de liaj edzino kaj infanoj. Mi certigis al li ke vi estas fidindulo; kaj mi sendos sciuron kiu loĝas en mia ĝardeno informiĝi pri lia familio kaj informi lin pri ili. Nepre necesas ke li restu sprita. Sciuroj estas nature tre sprita, aktiva raso. Estas por ili tre malfacile kuŝi senmove farante nenion. Sed ne malkvietiĝu pri li. Li fartos bone.”

Post tio ni reiris al la salono kaj miaj patrino kaj patro devigis lin plu ludadi la fluton, ĝis post la deka horo.

Kvankam miaj gepatroj ambaŭ multege amis la Doktoron ekde la unua momento kiam ili vidis lin, kaj multe fieris ĉar li venis kaj ludis por ni (ĉar vere ni estis malriĉegaj), ili ne konsciis tiam kiom vere gravega viro li poste fariĝos. Kompreneble nun, kiam

preskaŭ ĉiu persono en la mondo aŭdis pri Doktoro Dolittle kaj liaj libroj, se vi irus al tiu malgranda domo en Puddleby kie la botbutiko de mia patro lokiĝis, vi vidus, muntitan en la muron, super la malnovmoda pordo, ŝtonon sur kiu skribaĵo diras: “JOHANO DOLITTLE, LA FAMA NATUROSCIENCISTO, LUDIS LA FLUTON EN ĈI TIU DOMO EN LA JARO 1839”.

Ofte mi rerigardas tiun nokton antaŭ treege longe okazintan. Kaj se mi fermas miajn okulojn kaj strebas pensi mi povas vidi tiun salonon precize kia ĝi tiam estis: kurioza malgranda viro en baskoj, kun ronda afabla vizaĝo ludadas la fluton antaŭ la fajro; mia patrino, unuflanke de li, kaj mia patro aliflanke, retenas sian spiron kaj aŭskultas kun fermitaj okuloj; mi mem kaj Jipo, kaŭrantaj sur la tapiŝo ĉe liaj piedoj, gapadas la ardantajn karberojn; kaj Polinezio staras sur la kamenobreto apud lia ĉifa alta ĉapelo, solene balancante sian kapon flank-al-flanke laŭ la ritmo de la muziko. Mi vidas ĉion, precize kvazaŭ ĝi estus antaŭ min nun.

Kaj ankaŭ mi memoras ke, post kiam la Doktoro foriris tra la antaŭa pordo, ni ĉiuj revenis en la salonon kaj parolis pri li ĝis estis ankoraŭ pli malfrue; kaj eĉ post mia enlitiĝo (neniam antaŭe mi restis veka tiom malfrue) mi sonĝis pri li kaj bando de kuriozaj lertaj bestoj kiuj ludis flutojn kaj violonojn kaj tamburojn tra la tuta nokto.

7. KONKOFIŜA PAROLO

LA SEKVAN matenon, kvankam mi enlitiĝis tiom malfrue la antaŭan nokton, mi ellitiĝis frue. La unuaj hirundoj nur komencis pepi dormeme sur la ardezoj ekster mia subtegmenta fenestro kiam mi saltis el la lito kaj haste vestis min.

Mi apenaŭ povis atendi reiri al la malgranda domo kun la granda ĝardeno — por vidi la Doktoron kaj lian privatan zoon. La unuan fojon en mia vivo mi plene forgesis la matenmanĝon; kaj rampinte laŭ la ŝtuparo piedpinte, por ne veki miajn patrinon kaj patron, mi malfermis la antaŭan pordon kaj eliris en la malplenan silentan straton.

Kiam mi atingis la barilpordon de la Doktoro mi subite ekpensis ke eble estas tro frue por viziti iun ajn; kaj mi komencis demandi al mi ĉu la Doktoro jam estas veka. Mi rigardis en la ĝardenon. Laŭaspekte neniu estis tie. Do mi malfermis la barilpordon sensone kaj eniris.

Turnante min maldekstren por laŭiri padon inter kelkaj heĝoj, mi aŭdis voĉon tre proksiman al mi diri:

“Bonan matenon. Kiom frua vi estas!”

Mi turnis min, kaj tie, sidante sur la supro de ligustra heĝo, estis la griza papago, Polinezio.

“Bonan matenon”, mi diris. “Mi supozas ke mi iom fruas. Ĉu la Doktoro ankoraŭ estas en sia lito?”

“Ho, ne”, diris Polinezio. “Li ellitiĝis antaŭ horo kaj duono. Vi trovos lin en la domo ie. La antaŭa pordo estas malferma. Sendube li estas en la kuirejo kuir-

ante matenmanĝon — aŭ laborante en sia kabineto. Enmarŝu laŭdezire. Mi atendas por vidi la sunleviĝon. Sed verdire mi kredas ke ĝi forgesis leviĝi. Ĉi klimato estas aĉa. Nu, se ni estus en Afriko la mondo estus brilega pro sunlumo je ĉi horo de la mateno. Nur rigardu la nebulon ruliĝi sur tiujn brasikojn. La vido sufiĉas por reŭmatismigi onin. Aĉa klimato — aĉa! Vere, mi ne komprenas kial io escepte de ranoj restas en Anglujo. Nu, ne lasu min reteni vin. Ekiru serĉi la Doktoron”.

“Dankon”, mi diris. “Mi iros serĉi lin.”

Malferminte la antaŭan pordon, mi povis flari fritatan lardon, do mi celis la kuirejon. Tie mi trovis grandan kaldronon bolantan super la fajro, kaj lardon kaj ovojn en plado sur la fajrejo. Ŝajnis al mi ke la lardo tro sekiĝas pro la varmego. Do mi tiris la pladon iom pli foren de la fajro kaj trairis la domon serĉante la Doktoron.

Fine mi trovis lin en la kabineto. Mi ne sciis tiam ke li nomis ĝin sia kabineto. Certe ĝi estis tre interesa ĉambro, kun teleskopoj kaj mikroskopoj kaj ĉiaj aliaj iloj kiujn mi ne komprenis sed volonte komprenus. Pendantaj sur la muroj estis bildoj de bestoj kaj fiŝoj kaj strangaj plantoj kaj kolektoj de birdoj kaj markonkoj en vitraj ŝrankoj.

La Doktoro staris ĉe la ĉefa tablo en sia negliĝo. Unue mi kredis ke li lavas sian vizaĝon. Antaŭ li estis kvadrata vitra skatolo plena de akvo. Li tenis unu orelon sub la akvo dum li kovris la alian per sia maldekstra mano. Kiam mi eniris li stariĝis.

“Bonan matenon, Stubbins”, diris li. “Estos bela

tago, ĉu ne? Mi aŭskultadas la Viv-Vafon. Sed li tre desapontas — tre”.

“Kial?” mi diris. “Ĉu vi trovis ke li tute ne havas lingvon?”

“Ho jes”, diris la Doktoro, “li havas lingvon. Sed ĝi estas malriĉega lingvo — nur kelkaj vortoj, kiaj ‘jes’ kaj ‘ne’ — ‘varma’ kaj ‘malvarma.’ Nur tion li povas diri. Estas tre desaporite. Sciu, li efektive apartenas al du diversaj fiŝfamilioj. Mi supozis ke li estos ege helpa. Ho, nu!”

“Mi supozas”, diris mi, “ke tio signifas ke li estas malmulte inteligenta — se lia lingvo ampleksas nur du-tri vortojn, ĉu?”

“Jes, mi supozas tiel. Eble pro lia vivmaniero. Komprenu, ili estas tre raraj nuntempe, tiuj Vif-Vafoj — tre raraj kaj tre solemaj. Ili ĉirkaŭnaĝadas en la plej profundaj partoj de la oceano tute solaj — ĉiam solaj. Do mi emas konkludi ke efektive ili ne multe bezonas paroli”.

“Eble iu speco de pli grandaj moluskoj parolus pli”, mi diris. “Ja vere li estas tre malgranda, ĉu ne?”

“Jes”, diris la Doktoro, “tio estas vera. Ho, mi tute ne dubas ke estas moluskoj kiuj tre bone parolas. Sed la grandaj moluskoj — la plej grandaj — estas tre malfacile kapteblaj. Ili troveblas nur en la plej profundaj partoj de la maro; kaj ĉar ili ne multe naĝas, sed nur rampas laŭ la planko de la oceano plej kutime, ili nur tre malofte kaptiĝas per retoj. Tre volonte mi trovus ian rimedon por descendi al la fundo de la maro. Mi povus multon lerni se mi povus fari tion. Sed ni tute forgesas la matenmanĝon. Ĉu vi

jam matenmanĝis, Stubbins?”

Mi diris al la Doktoro ke mi estis tute forgesinta ĝin, kaj li tuj kondukis min en la kuirejon.

“Jes”, li diris, dum li verŝis la varman akvon el la kaldrono en la tepoton, “se oni nur povus sukcesi atingi la plej malsupran parton de la maro kaj loĝi tie kelkatempe, oni trovus mirindaĵojn — aferojn pri kiuj homoj neniam revis”.

“Sed homoj ja descendas, ĉu ne?” mi demandis, “plonĝistoj kaj tiaj homoj?”

“Ho jes, certe”, diris la Doktoro. “Plonĝistoj descendas. Eĉ mi mem descendis en plonĝovesto. Sed jen! — ili nur iras kie la maro estas malprofunda. Plonĝistoj ne povas descendi kie ĝi estas profundega. Kion mi volas estas descendi al la plej profundaj partoj — kilometrojn subsurface. Nu, nu, verŝajne mi sukcesos fari tion iam. Lasu min doni al vi plian tason da teo”.

8. ĈU VI ESTAS BONA RIMARKISTO?

ĜUSTE tiumomente Polinezio eniris la ĉambron kaj diris ion al la Doktoro per birdo-lingvo. Kompreneble mi ne komprenis kion. Sed la Doktoro tuj demetis siajn forkon kaj tranĉilon kaj foriris el la ĉambro.

“Sciu, estas ege domaĝe”, diris la papago, tuj kiam la Doktoro estis ferminta la pordon. “Tuj post lia reveno al sia hejmo, ĉiuj bestoj en la tuta regiono eksciigās pri tio kaj ĉiu malsana kato kaj skabia kuniklo el eĉ multaj kilometroj for venas konsulti lin. Nun estas granda dika leporo ĉe la malantaŭa pordo kun kriaĉanta bebo. Ĉu ŝi ‘povas konsulti la Doktoron, mi petas’! — Kredas ke ĝi konvulsios. La stultuleto denove manĝis beladonon, verŝajne. Tiuj bestoj estas tiom senpripensaj, kelkafoje — precipe la patrinaj. Ili venas kaj forvokas la Doktoron de liaj manĝoj kaj vekas lin je kia ajn horo de la nokto. Mi ne scias kiel li eltenas ĉion — vere ne komprenas. Nu, la povrulo neniam povas esti trankvila. Mi diris al li ripetade ke li difinu specialajn horojn por la konsultado kun bestoj. Sed li estas tiom komplezega kaj koncerniĝema. Li neniam rifuzas ke ili konsultu lin se efektive ili malsanas. Li diras ke la urĝaj kazoj estas tuj ekzamenendaj”.

“Kial kelkaj el la bestoj ne iras konsulti la aliajn kuracistojn?” mi demandis.

“Ho, jadi!” kriis la papago, malestime svingante

sian kapon. “Ja ne ekzistas aliaj besto-kuracistoj — ne aŭtentikaj kuracistoj. Ho, kompreneble *ja estas* tiuj veterinaroj, jes ja. Sed, tutvere, ili neniom utilas. Sciu, ili ne komprenas la lingvon de la bestoj; do kiel oni povus supozi ke ili havus utilon? Imagu ke vi mem, aŭ via patro, irus konsulti kuraciston kiu ne komprenas eĉ unu vorton kiun vi diras — eĉ ne povas diri al vi per via propra lingvo kion vi devas fari por resanĝi! Fi! — tiuj veterinaroj! Ili tiom stultas, ne estas kredeble! — Bonvolu meti la lardon de la Doktoro apud la fajron — por teni ĝin varma ĝis li revenos.”

“Ĉu vi kredas ke mi iam povus lerni la lingvon de la bestoj?” mi demandis, metante la pladon sur la fajrejon.


“Nu, dependas”, diris Polinezio. “Ĉu vi lertas pri lecionoj?”

“Mi ne scias”, mi respondis, sentante iom da honto. “Sciu, mi neniam estis en lernejo. Mia patro estas tro malriĉa por sendi min”.

“Nu, diris la papago, “Mi ne supozas ke efektive vi multe perdis pro tio — se juĝi laŭ kion *mi* vidis rilate al lernejoj. Sed atentu: ĉu vi estas bona rimarkisto? — ĉu vi rimarkas bone? Mi volas diri, ekzemple, supozu ke vi vidus du virsturnojn sur pomarbo, kaj vi nur unufoje bone vidis ilin — ĉu vi povus distingi inter ili se vi revidus ilin la sekvan tagon?”

“Mi ne scias”, mi diris. “Mi neniam provis”.

“Nu tion”. diris Polinezio, brostante kelkajn panerojn de la angulo de la tablo per sia maldekstra piedo — “tion oni nomas ‘observopovo’ — rimarki la malgrandaĵojn pri birdoj kaj bestoj: kiel ili marŝas kaj



“ESTI BONA RIMARKISTO ESTAS EGE GRAVE.”

movas la kapon kaj flirtas la flugilojn; kiel ili flaras la aeron, kaj movetas siajn lipharojn, kaj svingetas la voston. Oni devas rimarki ĉiajn tiajn malgrandaĵojn se oni volas lerni besto-lingvon. Ĉar, sciu, multaj bestoj apenaŭ parolas per siaj langoj; ili uzas siajn spiron aŭ voston aŭ piedojn anstataŭe. Tio estas ĉar multaj el ili, dum la antikva tempo kiam leonoj kaj tigroj estis pli abundaj, timis brui pro timo ke la sovaĝaj bestoj aŭdos ilin. Kompreneble, tio ne gravis al la birdoj; ĉar ili ja havis flugilojn por forflugi. Sed tio estas la unua memorendaĵo; esti bona rimarkisto estas ege grave por lerni besto-lingvon.”

“Laŭ viaj diroj, estas tre malfacile”, mi diris.

“Necesas esti tre pacienca”, diris Polinezio. “Oni bezonas longan tempon por lerni diri eĉ nur kelkajn vortojn ĝuste. Sed se vi venos ĉi tien ofte mi mem instruos al vi kelkajn lecionojn. Kaj komencinte, vi surpriziĝos pri kiom rapide vi progresos. Ja vere estus bone se vi lernus. Ĉar tiuokaze vi povus fari iom de la laboro de la Doktoro — mi pensas pri la pli facila laboro, kia bandaĝado kaj dono de piloloj. Jes, ja, tiu estas bona ideo mia. Estus bonege se la povrulo povus esti helpata — kaj povus iomete ripozi. Estas skandale, kiom li devas labori. Mi tute ne vidas kialon kiu nebligus ke vi povu tre multe helpi lin — tio estas, se vin vere interesas bestoj”.

“Ho, mi amus tion!” mi kriis. “Ĉu vi opinias ke la Doktoro permesus?”

“Certe”, diris Polinezio; “tuj kiam vi lernis iom da doktorado. Mi mem parolos pri la afero al li — Ĉit! Mi aŭdas lin veni. Hastu — reportu lian lardon al la tablo”.

9. LA ĜARDENO DE REVOJ

POST LA fino de la matenmanĝo, la Doktoro kondukis min por montri al mi la ĝardenon. Nu, la domo estis interesa, sed la ĝardeno estis eĉ centoble pli interesa. El ĉiuj ĝardenoj kiujn iam mi vidis, tiu estis la plej ĝuiga, la plej fascina. Unue oni ne konsciis kiom granda ĝi estas. Oni sentis neniam atingi ĝian finon. Kiam fine oni estas plene certa ke oni vidis ĉion, oni transrigardas heĝon, aŭ ĉirkaŭiris angulon, aŭ suprenrigardas laŭ kelkaj ŝtupoj, kaj jen tuta nova parto kiun oni neniel anticipis trovi.

Ĝi havis ĉion — ĉion kion ĝardeno povas havi, aŭ iam havis. Estis larĝegaj gazonoj kun ĉizitaj ŝtonaj benkoj, verdaj pro muskoj. Super la gazonoj pendis plorsalikoj, kaj iliaj plumecaj branĉpintoj brosis la veluran herbon kiam ili svingiĝis pro la vento. La malnovaj ŝtonaj padoj havis altajn, tonditajn, taksusajn heĝojn ambaŭflanke, tiel ke ili aspektis kiaj la mallarĝaj stratoj de malnova vilaĝo; kaj tra la heĝojn, pordejoj estis faritaj; kaj super la pordejoj estis formoj kiaj vazoj kaj pavoj kaj duonlunoj formitaj per tondado de la vivaj arboj. Estis bela marmora fiŝlageto kun oraj karpoj kaj bluaj nimfeoj en si kaj grandaj verdaj ranoj. Alta brika muro apud la kuireja ĝardeno estis tute kovrita per rozkoloraj kaj flavaj persikoj maturiĝantaj en la sunlumo. Estis mirinda granda kverko, kies trunko estis kava, sufiĉe granda por ke kvar personoj kaŝu sin en ĝi. Estis ankaŭ multaj somerdomoj — kelkaj el ligno kaj kelkaj el ŝtono; kaj unu el

ili estis plena de libroj por legi. En angulo, inter kelkaj rokoj kaj filikoj, estis eksterdoma kameno, kie la Doktoro ofte fritis hepaton kaj lardon kiam li emis manĝi en la freŝa aero. Estis ankaŭ divano sur kiu li ofte dormis, laŭdire, dum varmaj someraj noktoj kiam la najtingaloj plej bele kantadis; ĝi havis radojn tiel ke eblis movi ĝin sub kiun ajn arbon en kiu ili kantis. Sed kio plej fascinis min estis eta arbodomo, tre alte en la plej supraj branĉoj de granda ulmo, kaj longa ŝnura eskalo supren kondukis al ĝi. La Doktoro diris al mi ke li uzas ĝin por rigardi la lunon kaj la stelojn per teleskopo.

Ĝi estis tia ĝardeno en kiu oni povis vagi kaj esplori dum multaj tagoj — ĉiam trovante ion novan, ĉiam plezure retrovante malnovajn lokojn. Tiun unuan fojon kiam mi vidis la ĝardenon de la Doktoro ĝi tiom ĉarmis min ke mi sentis ke volonte mi loĝus en ĝi — por ĉiam kaj ĉiam — kaj neniam denove iri ekster ĝin. Ĉar ĝi havis inter siaj muroj ĉion necesan por feliĉo, por plaĉigi la vivon — por trankviligi la koron. Ĝi estis la Ĝardeno de Revoj.

Unu kuriozaĵon mi tuj rimarkis kiam mi eniris ĝin; kaj tio estis kiom da birdoj estas tie. Ŝajnis ke ĉiu arbo havis du aŭ tri nestojn. Kaj amasoj da aliaj sovaĝaj bestoj ŝajne trovis ankaŭ hejmon tie. Ermenoj kaj kelonioj kaj gliroj aspektis tre oftaj, kaj neniel timidaj. Diverskoloraj kaj diversdimensiaj bufoj saltetadis sur la gazono kvazaŭ ĝi apartenas al ili. Grizaj lacertoj (kiuj estis tre raraj en Puddleby) sidis sur la ŝtonoj en la sunlumo kaj palpebrumis al ni. Eĉ serpentoj videblis.

“Ne necesas timi ilin”, diris la Doktoro, rimarkante ke mi eksaltetis kiam granda nigra serpento rampetis trans la padon tuj antaŭ ni. “Tiuuj uloj ne estas venenaj. Ili multe utilas ĉar ili evitigas multajn specojn de ĝardenĝenbestoj. Mi ludas la fluton por ili kelkafoje en la vespero. Ili amas tion. Ili ekstaras rekte sur siaj vostoj kaj kvazaŭdancas senĉese. Kurioze, ke ili tiom amas muzikon.”

“Kial ĉiuj tiuj bestoj venas loĝi ĉi tie?” mi demandis. “Mi neniam vidis ĝardenon kun tiom da bestoj.”

“Nu, mi supozas ke ĉar ili trovas siajn preferatajn manĝaĵojn; kaj neniuj ĝenas ilin. Kaj, kompreneble, ili konas min. Kaj kiam ili aŭ iliaj infanoj malsaniĝas, mi supozas ke estas agrable por ili loĝi en la ĝardeno de kuracisto. Rigardu! Ĉu vi vidas tiun paseron sur la sunhorloĝo, sakrantan je la merlo tie malsupre? Nu, li venas ĉi tien jam de multaj jaroj. Li venas el Londono. La kamparaj paseroj mokas lin. Ili diras ke li pepas per orientlondona akĉento. Li estas tre amuza birdo — tre kuraĝa sed tre impertinenta. Nenio plaĉas al li pli ol argumentadi, sed ĉiam li finas per malĝentilaĵoj. Li estas aŭtentika urbobirdo. En Londono li loĝas proksime al la Katedralo Sankta Paŭlo. ‘Ĉipsajdo’ estas nia alnomo por li.”

“Ĉu ĉiuj tiuj birdoj estas el ĉi tiu regiono?” mi demandis.

“La plejparto, jes”, diris la Doktoro. “Sed kelkaj raraj birdoj vizitas min ĉiujare, kiuj kutime neniam proksimiĝas al Anglujo. Ekzemple, tiu bela uleto kiu

¹ Ĉipsajdo estas regiono en orienta Londono.

ŝvebas super la antirino, li estas Ruĝgorĝa Kolibro. El Ameriko. Verdire, li tute ne devus esti en ĉi tiu klimato. Estas tro malvarme. Mi postulas ke li dormu en la kuirejo nokte. Krome, ĉiun aŭguston Purpura Paradizeo venas el malproksima Brazilo por viziti min. Ŝi estas tre granda dando. Ankoraŭ ne alvenis, kompreneble. Kaj kelkaj aliaj fremdaj birdoj el la tropikoj vizitas min dum la someraj monatoj. Sed venu, mi montru al vi la zoon”.

10. LA PRIVATA ZOO

MI SUPOZIS ke ne povus esti io cetera kiun ni ne jam vidis en tiu ĝardeno. Sed la Doktoro prenis mian brakon kaj marŝis laŭ malgranda mallarĝa pado, kaj post multa zigzagado ni troviĝis antaŭ malgranda pordo en alta ŝtona muro. La Doktoro puŝmalfermis ĝin.

Interne estis ankoraŭ plia ĝardeno. Mi anticipis vidi kaĝojn en kiuj estas bestoj. Sed neniuj kaĝoj videblis. Anstataŭe estis malgrandaj ŝtonaj domoj disetritaj tra la ĝardeno, kaj ĉiu domo havis fenestron kaj pordon. Kiam ni eniris, multaj el tiuj pordoj malfermiĝis kaj bestoj elkuris al ni, supozeble por ricevi manĝaĵojn.

“Ĉu la pordoj ne havas serurojn?” mi demandis al la Doktoro.

“Ho, jes”, li diris, “ĉiu pordo havas seruron. Sed en mia zoo la pordoj malfermeblas de interne, ne de ekstere. La seruroj ekzistas por ke la bestoj povu *enfermi sin* kiam ili volas foriri de ĝenado fare de aliaj bestoj aŭ de homoj venintaj ĉi tien. Ĉiu besto en ĉi tiu zoo restas ĉi tie ĉar li deziras tion, ne pro devigo”.

“Ili ĉiuj aspektas tre feliĉaj kaj puraj”, mi diris. “Ĉu vi bonvolos diri al mi la nomojn de kelkaj el ili?”

“Certe. Nu: tiu kuriozaspektulo kun plakoj sur la dorso, kiu nazumas sub la briko tie, estas sudamerika armadelo. La uleto parolanta kun li estas kanada marmoto. Ili ambaŭ loĝas en tiuj truoj kiujn vi vidas ĉe la malsupro de la muro. La du bestoj kiuj fripon-

adas en la lageto estas paro da rusaj vizonoj — kaj tio memorigas min: antaŭ la tagmezo mi devos iri aĉeti kelkajn haringojn en la vilaĝo por ili — la butikoj fermiĝas frue hodiaŭ. Tiu besto kiu nunmomente paŝas el sia domo estas antilopo, unu el la malgrandaj sudafrikaj specoj. Nun ni promenu al la alia flanko de tiuj arbustoj kaj mi montros al vi pli da bestoj”.

“Ĉu tiuj estas cervoj tie?” mi demandis.

“*Cervoj!*” diris la Doktoro. “Kie vi vidas ilin?”

“Tie”, mi diris, indikante. “Ili manĝetas la herban bordon de la bedo. Estas du da ili”.

“Ho, tio”, diris la Doktoro ridetante. “Tio ne estas du bestoj: tio estas unu besto kun du kapoj — la sola dukapa besto en la mondo. Ĝi nomiĝas la ‘puŝumitiruvio’. Mi kunportis lin el Afriko. Li estas tre malsovaĝa — deĵoras kiel ia dumnokta gardisto por mia zoo. Li dormas per po nur unu kapo je iu momento, sciu — tre utilas — la alia kapo restas veka”.

“Ĉu vi havas leonojn aŭ tigrojn?” mi demandis dum ni plu promenis.

“Ne”, diris la Doktoro. “Mi ne povus loĝigi ilin ĉi tie — kaj mi rifuzus loĝigi ilin eĉ se mi povus. Se mia volo plenumiĝus, Stubbins, estus neniu kaptita leono aŭ tigo ie en la mondo. Ili neniam kutimiĝas al tia enfermiĝo. Ili neniam feliĉas. Ili neniam trankviliĝas. Ili konstante pensas pri la grandaj landoj kiujn ili forlasis. Tio videblas per iliaj okuloj, ili revas — konstante revas pri la vastaj malfermaj lokoj kie ili naskiĝis; revas pri la profundaj mallumaj ĝangaloj kie iliaj patrinoj unue instruis al ili flari kaj sekvi la spur-ojn de cervoj. Kaj kion oni donas al ili anstataŭe?”

demandis la Doktoro, haltinte dum sia marŝado kaj fariĝante tre ruĝa kaj kolera — “Kion oni donas al ili anstataŭ la gloron de afrika sunleviĝo, anstataŭ la krepuskan brizon kiu flustras inter la palmoj, anstataŭ la verdan ombron de la interplektiĝintaj grimpoplantoj, anstataŭ la malvarmetajn multestelajn noktojn de la dezerto, anstataŭ la sonon de la paŝoj de la akvobirdoj post la malfacila tagĉasado? Kion, mi demandas al vi, kion oni donas anstataŭ *tion*? Ho, senhavan kaĝon kun feraj bariloj; hidan pecon de morta viando ĵetita al ili unufoje en la tago; kaj amaso da stultuloj kiuj venas gapi ilin kun malfermitaj buŝoj! — Ne, Stubbins. Leonoj kaj tigroj, la Grandaj Ĉasistoj, neniam, tute neniam troviĝu en zooj”.

La Doktoro ŝajnis esti fariĝinta ege serioza — preskaŭ malĝoja. Sed subite lia mieno reŝanĝiĝis kaj li prenis mian brakon kun sia kutima gaja rideto.

“Sed ni ankoraŭ ne vidis la papilidomojn — nek la akvariojn. Venu. Mi multe fieras pro miaj papilidomoj”.

Do ni ekplumarŝis kaj baldaŭ venis en spacon fermitan per heĝo. Tie mi vidis plurajn grandajn domojn el maldikega drata retaĵo, kvazaŭ kaĝojn. Interne de la reto estis ĉiaj belaj floroj kreskantaj en la sunlumo, dum papilioj flugadis super ili. La Doktoro indikis la finaĵon de unu el la domegoj kie staris en vico malgrandaj kestoj en kiuj estis truoj.

“Tiu estas la koviĝkesto”, diris li. “Tien mi metas la diversajn specojn de raŭpoj. Tuj kiam ili fariĝas papilioj kaj moteoj ili elvenas en tiujn florigardenojn por manĝi”.

“Ĉu papilioj havas lingvon?” mi demandis.

“Ho, mi supozas ke jes”, diris la Doktoro — “kaj ankaŭ la skaraboj. Sed ĝis nun mi ne sukcesis lerni multon pri la lingvoj de insektoj. Mi lastatempe estas tro okupata penante scipovi la moluskan parolon. Tamen mi intencas entrepreni lerni tiujn lingvojn”.

Je tiu momento Polinezio venis al ni kaj diris, “Doktoro, estas du kobajoj ĉe la malantaŭa pordo. Ili diras ke ili fuĝis de la knabo kiu tenis ilin, ĉar ili ne ricevis la ĝustajn manĝaĵojn. Ili volas scii ĉu vi loĝigos ilin”.

“Bone”, diris la Doktoro. “Gvidu ilin al la zoo. Donu al ili la domon maldekstran, apud la enirejo — tiun kiun havis la nigra vulpo. Informu ilin pri la reguloj kaj donu al ili kontentigan manĝon. — Nun, Stubbins, ni pluiros al la akvarioj. Kaj plejunue mi volas montri al vi la grandan vitran kuvegon da marakvo, kie mi tenas la moluskojn”.

11. MIA INSTRUISTO POLINEZIO

NU, ne estis multaj tagoj post tio, pri tio vi povas esti certa, kiam mi ne venis esti kun mia nova amiko. Verdire, mi estis ĉe lia domo preskaŭ tuttage ĉiutage. Tiel ke unu vesperon mia patrino ŝerce demandis al mi kial mi ne portis mian liton tien por loĝi ĉiutempe ĉe la domo de la Doktoro.

Post kelka tempo mi kredas ke mi jam fariĝis tre utila por la Doktoro, manĝigante liajn dorlotbestojn por li; helpante konstrui novajn domojn kaj barilojn por la zoo; helpante rilate al la malsanaj bestoj kiuj alvenis; farante ĉiajn taskojn ĉe la loko. Tiel ke kvankam mi multe ĝuis ĉion (vere estis kvazaŭ mi loĝas en nova mondo), mi vere kredas ke la Doktoro bedaŭrus mian mankon se mi ne venus tiom ofte.

Kaj tutdume Polinezio akompanis min negrave kien mi iris, instruante al mi la birdolingvon kaj montrante al mi kiel kompreni la parolsignojn de la bestoj. Unue ŝajnis al mi ke mi neniam povos lerni ĝin — ŝajnis tiom malfacile. Sed la olda papago estis mirinde pacienca je mi — kvankam mi povis vidi ke kelkafoje ŝi malfacile detenis sin de kolero.

Baldaŭ mi komencis ekkoni la signifon de la stranga babilado de la birdoj kaj kompreni la kuriozan parolpetoladon de la hundoj. Mi kutimiĝis dediĉi min al aŭskultado je la musoj malantaŭ la panelaĵo post mia enlitiĝo, kaj rigardado je la katoj sur la tegmentoj kaj la kolomboj en la bazara placo de Puddleby.

Kaj la tagoj pasis tre rapide — kiel ĉiam okazas

kiam la vivo estas agrabla; kaj la tagoj fariĝis semajnoj, kaj la semajnoj monatoj; kaj baldaŭ la rozoj en la ĝardeno de la Doktoro komencis perdi siajn petalojn kaj flavaj folioj kuŝis sur la larĝa verda gazono. Ĉar la somero estis preskaŭ finiĝinta.

Unu tagon Polinezio kaj mi konversaciis en la libroĉambro. Tiu estis bela longa ĉambro kun granda kamenbreto kaj la muroj estis kovritaj de la plafono ĝis la planko per bretoj plenaj de libroj: rakontolibroj, libroj pri ĝardenoj, libroj pri medicino; vojaĝlibroj; ĉi tiujn mi amis — kaj precipe la grandan atlason de la Doktoro kun ĉiuj ĝiaj mapoj de la diversaj landoj de la mondo.

Tiun posttagmezon Polinezio montradis al mi la librojn pri bestoj kiujn Johano Dolittle mem estis verkinta.

“Ja!” mi diris, “kiom da libroj la Doktoro posedas — ĉirkaŭ la tuta ĉambro! Jadi! Volontege mi povus legi! Devas esti ege interese. Ĉu vi scias legi, Polinezio?”

“Nur iomete”, diris ŝi. “Atentu kiam vi turnas tiujn paĝojn — ne ŝiru ilin. Ne, efektive mi ne havas sufiĉan tempon por legado — ne multe. Tiu litero estas *k* kaj ĉi tio estas *b*”.

“Kion signifas tiu bildo sub la bildo?” mi demandis.

“Mi rigardu”, ŝi diris, kaj ŝi komencis voĉliterumi ĝin. “P-A-V-I-A-N-O — tio estas *Simio*. Legado tute ne estas tiom malfacila kiom ŝajnas, kiam oni konas la literojn”.

“Polinezio”, mi diris, “mi volas demandi ion tre

gravan al vi.”

“Kion, knaĉjo?” diris ŝi, glatigante la plumojn de sia dekstra flugilo. Polinezio ofte parolis al mi tre patronaĉe. Sed ne ĝenis min kiam ŝi parolis tiel. Ŝi ja estis preskaŭ ducentjara; kaj mi estis nur dekjara.

“Aŭskultu”, mi diris, “mia patrino opinias ke estas maljuste ke mi venas ĉi tien tiom ofte por manĝi. Kaj mi volis demandi al vi: supozu ke mi farus multe pli da laboro por la Doktoro — kial mi ne povus veni loĝi ĉi tie? Komprenu, anstataŭ esti pagata kiel ordinara ĝardenisto aŭ metiisto, mi ricevus miajn liton kaj manĝojn interŝanĝe por la laboro kiun mi farus. Kion vi opinias?”

“Vi volas diri ke vi volas esti reala asististo de la Doktoro, ĉu?”

“Jes. Mi supozas ke tiel oni nomus ĝin”, mi respondis. “Sciu, vi mem diris ke laŭ via opinio mi povus esti tre utila por li”.

“Nu” — ŝi pensis momente — “vere mi ne scias kial oponi. Sed ĉu tian profesion vi vere volas por kiam vi adoltiĝos, naturosciencistan?”

“Jes”, mi diris, “mi decidiĝis. Mi preferus esti naturosciencisto ol io ajn alia en la mondo”.

“Humf! — Ni iru paroli pri tio kun la Doktoro”, diris Polinezio. “Li estas en la apuda ĉambro — en la kabineto. Malfermu la pordon tre zorge — povas esti ke li laboras kaj ne volas interrompon”.

Mi senbrue malfermis la pordon kaj enrigardis. Kion mi unue vidis esti enorma nigra trovhundo sidanta en la mezo de la kamentapiŝo kun siaj oreloj levitaj, aŭskultanta la Doktoron kiu voĉlegis al li

leteron.

“*Kion* do la Doktoro faras?” mi flustris al Polinezio.

“Nu, la hundo ricevis leteron de sia posedantino kaj li portis ĝin al la Doktoro por ke li legu ĝin al li. Jen kio. Li apartenas al kurioza knabineto nomita Minjo Dooley, kiu loĝas aliflanke de la vilaĝo. Ŝia hararo estas plektita laŭlonge de ŝia dorso. Ŝi kaj ŝia frato foriris al la marbordo por la somero; kaj la olda trovhundo malgajegas dum la infanoj forestas. Do ili verkas leterojn por li — anglalingve, kompreneble. Kaj ĉar la olda hundo ne komprenas ilin, li portas ilin ĉi tien kaj la Doktoro tradukas ilin hundolingven por li. Mi pensas ke sendube Minjo skribis ke ŝi revenas — se juĝi laŭ la ekscitiĝo de la hundo. Nur rigardu!”

Vere, la trovhundo aspektis subite regata de ĝojo. Kiam la Doktoro finlegis la leteron la olda hundo komencis laŭeble plej laŭte bojadi, svingi sian voston ekstravagance, kaj saltadi tra la kabineto. Li prenis la leteron per sia buŝo kaj kuris el la ĉambro, brue spirante kaj murmurante al si.

“Li iras renkonti la diliĝencon”, flustris Polinezio. “La sindediĉon de tiu hundo al tiuj infanoj mi apenaŭ povas kompreni. Se nur vi vidus Minjon! Ŝi estas la plej orgojla friponineto kiu iam marŝis. Kaj krome, ŝi strabas”.

12. MIA GRANDIOZA IDEO

BALDAŬ la Doktoro supren rigardis kaj vidis nin ĉe la pordo.

“Ho — envenu, Stubbins”, diris li. “Ĉu vi volas paroli kun mi? Envenu kaj sidiĝu”.

“Doktoro”, mi diris, “mi volas fariĝi naturosciencisto — kia vi — kiam mi plenkreskiĝos”.

“Ho, ĉu...ĉu?” murmuris la Doktoro. “Humf! — Nu — Jadi — Ĉu vere? — Nu, nu! Ĉu vi — e..., a..., parolis al viaj gepatroj pri tio?”

“Ne, ankoraŭ ne”, mi diris. “Mi volas ke vi parolu al ili pri ĝi, por mi. Vi pli bone parolas. Mi volas esti via helpanto — via asististo, se vi akceptos min. La pasintan nokton mia patrino diris ke ŝi opinias ke ne estas juste ke mi venas ĉi tien tiom ofte por manĝoj. Kaj mi multe pripensas tion de tiam. Ĉu ni ne povus fari ian aranĝon — ĉu mi ne povus labori por miaj manĝoj, kaj dormi ĉi tie?”

“Sed mia kara Stubbins”, diris la Doktoro, ridante, “vi estas tute bonvena ĉi tie por manĝi trifoje dum la tago ĉiun tagon de la jaro. Mi tre ŝatas vian ĉeeston. Krome, vi jam ja faras multan laboron. Mi ofte sentis ke mi devus pagi vin pro viaj laboroj. — Sed kian aranĝon vi pripensis?”

“Nu, mi pensis”, diris mi, “ke eble vi venus paroli kun miaj patrino kaj patro kaj diri al ili ke se ili lasos min loĝi ĉi tie kun vi kaj multe labori, ke vi instruos min legi kaj skribi. Sciu, mia patrino multe fervoras ke mi lernu legi kaj skribi. Kaj krome, mi ne povus

esti inda naturosciencisto sen tio, ĉu?”

“Ho, mi ne dirus tion”, diris la Doktoro. “Estas bone, mi konsentas, povi legi kaj skribi. Sed naturosciencistoj ne ĉiuj similas unu al la alia, sciu. Ekzemple, tiu junulo Karlo Darvino pri kiu oni tiom parolas nun — li diplomiĝis ĉe Kembriĝo — legas kaj skribas tre bone. Kaj Kuviero — li antaŭe estis instruisto. Sed aŭskultu, la plej granda naturosciencisto vivanta eĉ ne scias skribi sian propran nomon nek legi la *aboccon*.”

“Kiu estas li?” mi demandis.

“Li estas mistera persono”, diris la Doktoro — “tre mistera persono. Li nomiĝas Longa Sago, filo de Ora Sago. Li estas Indiano”.

“Ĉu vi iam renkontis lin?” mi diris.

“Ne”, diris la Doktoro, “mi neniam vidis lin. Neniu blankulo iam renkontis lin. Mi suspektas ke S-ro Darvino eĉ ne scias ke li ekzistas. Li loĝas preskaŭ ĉiam kun la bestoj kaj kun la diversaj indianaj triboj — kutime ie en la montoj de Peruo. Neniam restas longe en unu loko. Iras de tribo al tribo, kvazaŭ ia indiana vagabondo”.

“Kiel vi scias tiom pri li”, mi demandis — “se vi eĉ neniam vidis lin?”

“La Purpura Paradizeo”, diris la Doktoro — “ŝi diris al mi ĉion pri li. Ŝi diras ke li estas plene mirinda naturosciencisto. Mi petis ŝin porti mesaĝon al li kiam lastafoje ŝi estis ĉi tie. Mi anticipas ŝian revenon tre baldaŭ. Mi apenaŭ povas atendi vidi kian respondon ŝi portas de li. Estas jam preskaŭ la lasta semajno de aŭgusto. Mi tre esperas ke nenio okazis al

ŝi dum la veturo”.

“Sed kial la bestoj kaj birdoj venas al vi kiam ili malsanas?” mi diris. “Kial ili ne iras al li, se li ja estas tiom mirinda?”

“Ŝajnas ke miaj metodoj estas pli ĝisdataj”, diris la Doktoro. “Sed laŭ kion diras la Purpura Paradizeo al mi, la scio de Longa Sago pri la naturohistorio nepre estas vere nekredbla. Li precipe studas botanikon — plantojn kaj ĉion tian. Sed li scias ankaŭ multon pri birdoj kaj bestoj. Li estas precipe sciplena pri abeloj kaj skaraboj. — Sed, nun, diru al mi, Stubbins, ĉu vi estas tute certa ke vi vere volas fariĝi naturosciencisto?”

“Jes”, diris mi, “mi firme decidiĝis”.

“Nu, sciu, ĝi ne estas tre bona profesio por lukri monon. Neniel. La plej multaj bonaj naturosciencistoj tute ne lukras. Ili nur *elspezas* monon, aĉetante papiliretojn kaj kaĝojn por birdovoj k.t.p. Nur nuntempe, kiam mi estas naturosciencisto jam de multaj jaroj, mi komencas gajni iom da mono per la libroj kiujn mi verkas”.

“Ne gravas al mi mono”, mi diris. “Mi volas esti naturosciencisto. Ĉu vi bonvolos veni manĝi kun miaj patrino kaj patro la venontan ĵaŭdon — mi informis ilin ke mi petos vin — kaj tiam vi povos paroli kun ili pri ĝi. Sciu, jen ankoraŭa celo: se mi loĝos kun vi, kaj pli-malpli apartenos al viaj domo kaj laboro, mi povos akompani vin kiam venontafoje vi vojaĝos”.

“Ho, mi komprenas”, diris li, ridetante. “Do vi volas akompani min dum vojaĝo, ĉu? — Ah, ha!”

“Mi volas akompani vin dum ĉiuj viaj vojaĝoj. Estus multe pli facile por vi se vi havus kunulon por porti la papiliretojn kaj notlibrojn. Ĉu ne?”

Dum longa tempo la Doktoro sidis pensante, tamburetante sur la skribtablo per siaj fingroj, dum mi atendis, ege malpacience, por trovi kion li diros.

Fine li ŝultrolevis kaj ekstaris.

“Nu, Stubbins”, diris li, “mi venos diskuti ĝin kun vi kaj viaj gepatroj la sekvontan jaŭdon. Salutu viajn patrinon kaj patron mianome kaj danku ilin pro ilia invito, bonvolu.”

Tiam mi kuregis hejmen rapide kiel la vento por informi mian patrinon ke la Doktoro promesis veni.

13. VETURANTO ALVENAS

LA sekvan tagon mi sidis sur la muro de la ĝardeno de la Doktoro post la vespermanĝo, parolante al Dab-Dabo. Mi nun estis lerninta tiom de Polinezio ke mi povis paroli al la plej multaj birdoj kaj kelkaj bestoj sen granda malfacilo. Mi trovis Dab-Dabon tre agrabla olda patrineca birdo — kvankam neniel tiom lerta kaj interesa kiom Polinezio. Ŝi estis mastrumisto por la Doktoro jam de multaj jaroj.

Nu, kiel mi diris, la olda anaso kaj mi sidis sur la plata supro de la ĝardenmuro tiun vesperon, rigardante malsupren al la vojo al Oksentorpo. Ni rigardis kelkajn ŝafojn pelatajn al la bazaro en Puddleby; kaj Dab-Dabo estis ĵus rakontanta al mi pri la aventuroj de la Doktoro en Afriko. Ĉar ŝi estis vojaĝinta kun li al tiu lando antaŭ tre longe.

Subite mi aŭdis kuriozan foran bruon el la vojo, direkte de la vilaĝo. Sonis kvazaŭ multaj personoj krias. Mi ekstaris sur la muro por vidi ĉu mi povos trovi kio venas. Baldaŭ venis ĉirkaŭ kurbon grandega amaso da lernejinferoj sekvantaj tre ĉifonan kurioz-aspektan virinon.

“Kio en la mondo povas esti?” kriis Dab-Dabo.

La infanoj ĉiuj ridadis kaj kriadis. Kaj certe la virino kiun ili sekvis estis eksterordinarega. Ŝi havis tre longajn brakojn kaj la plej klinitajn ŝultrojn kiujn iam mi vidis. Sur flanko de ŝia kapo estis pajla ĉapelo en kiu estis papavoj; kaj ŝia jupo estis tiom longa ke ĝi treniĝis sur la tero kiel la trejnaĵo de balrobo. Mi ne

povis vidi ŝian vizaĝon pro la larĝa ĉapelo tiritita trans ŝiajn okulojn. Sed dum ŝi pliproksimiĝis al ni kaj la ridado de la infanoj plilaŭtiĝis, mi rimarkis ke ŝiaj manoj estas tre malpalaj kaj harkovritaj, kiel tiuj de sorĉistino.

Subite Dab-Dabo apud mi konsternis min per tre laŭtvoĉa krio:

“Ho, estas Ĉi-Ĉio! — Ĉi-Ĉio fine reveninta! Kiel tiuj infanoj aŭdacas turmenti lin? Mi donos al la friponetoj ion pri kio ridi!”

Kaj ŝi ekflugis rekte de la muro malsupren al la vojo kaj rekte celis la infanojn, kvakante plej terurige kaj bekpikante iliajn piedojn kaj krurojn. La infanoj reforkuris al la vilaĝo kiel eble plej rapide.

La strangaspekta figuro en la pajla ĉapelo staris gapante ilin dum momento kaj poste venis lace al la barilpordo. Ĝi ne provis malrigli ĝin sed nur transgrimpis la barilpordon kvazaŭ temas pri ia obstaklito. Kaj tiam mi rimarkis ke ĝi prenis la baraĵojn per siaj piedoj, tiel ke efektive ĝi havis kvar manojn per kiuj grimpi. Sed nur kiam fine mi povis ekvidi la vizaĝon sub la ĉapelo mi povis certi ke ĝi ja estas simio.

Ĉi-Ĉio — ĉar tiu ja estis — sulkis la frunton al mi malfide, de la supro de la barilpordo, kvazaŭ supozante ke mi mokos lin simile al la aliaj geknaboj. Post tio li saltis en la ĝardenon, trans la barilo, kaj tuj komencis depreni siajn vestojn. Li duonige ŝiris la pajlan ĉapelon kaj ĵetis ĝin al la vojo. Post tio li deprenis siajn korsaĵon kaj jupon, saltis sur ilin sovaĝe kaj komencis piedbatadi ilin ĉirkaŭ la antaŭan ĝardenon.



“VETURANTO ALVENAS.”

Baldaŭ mi aŭdis kriegon el la domo, kaj elflugis Polinezio, sekvate de la Doktoro kaj Jipo.

“Ĉi-Ĉio! — Ĉi-Ĉio!” kriis la papago. “Fine vi venis! Mi ĉiam diris al la Doktoro ke vi trovos metodon. Kiel do vi sukcesis?”

Ili ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ li, premante liajn kvar manojn, ridante, kaj samtempe farante milionon da demandoj. Tiam ili ĉiuj komencis reiri al la domo.

“Suprenkuru al mia litĉambro, Stubbins”, diris la Doktoro turninte sin al mi. “Vi trovos sakon da arakidoj en la malgranda maldekstra tirkesto de la komodo. Mi de ĉiam konservas ilin tie por se li eble neatendite revenos iun tagon. Kaj atendu minuton — trovu ĉu Dab-Dabo havas bananojn en la manĝaĵ-ŝranko. Ĉi-Ĉio ne manĝas bananon, li diris al mi, jam de du monatoj”.

Kiam mi redescendis al la kuirejo mi trovis ĉiujn aŭskultantaj atente la simion, kiu rakontas pri sia vojaĝo el Afriko.

14. LA VOJAĜO DE ĈI-ĈIO

ŜAJNAS ke post la foriro de Polinezio, Ĉi-Ĉio fariĝis eĉ pli nostalgia je la Doktoro, kaj la malgranda domo en Puddleby. Fine li decidiĝis ke iumaniere li sekvos ŝin. Kaj unu tagon, irinte al la marbordo, li vidis amason da homoj, nigraj kaj blankaj, enirantaj ŝipon cele Anglujon. Ankaŭ li provis eniri. Sed ili forturnis kaj forpelis lin. Kaj baldaŭ li rimarkis tutan grandan familion de kuriozaspektaj personoj paŝantaj sur la ŝipon. Kaj unu el la infanoj en tiu familio memorigis al Ĉi-Ĉio kuzinon lian kiun li iam amis. Do li diris al si, “Tiu knabino tiom similas simion kiom mi similas knabinon. Se mi sukcesus akiri kelkajn vestojn, mi povus facile kaŝiri sur la ŝipon inter tiuj familioj, kaj la homoj supozus min knabino. Bona ideo!”

Do li ekiris al tre proksima vilaĝo kaj ensaltetis tra malfermitan fenestron kaj trovis jupon kaj korsaĵon kaj ĉapelon kuŝantajn sur seĝo. Ili apartenis al laŭmoda nigra virino kiu banis sin tiumomente. Ĉi-Ĉio vestis sin per ili. Post tio li reiris al la marbordo, intermiksiĝis kun la homamaso, kaj fine sukcese ŝteliris sur la grandan ŝipon. Tiam li ekpensis ke li bezonos kaŝi sin, por ke oni ne tro atente lin rigardu. Kaj li restis kaŝita dum la tuta velado de la ŝipo al Anglujo — li elvenis nur dumnokte, kiam ĉiuj dormis, por trovi manĝaĵojn.

Kiam li atingis Anglujon kaj provis deiri de la ŝipo, la maristoj fine vidis ke li estas nur simio vestita per

la vestoj de knabino; kaj ili volis reteni lin kiel dorlotbeston. Sed li sukcesis eskapi de ili; kaj kiam li jam estis sur la tero, li kuris inter la homamason kaj foriris. Sed li ankoraŭ estis tre longe distanca de Puddleby kaj devis transiri la tutan larĝon de Anglujo.

Li multe suferis dum sia irado. Kiam ajn li trapasis vilaĝon, ĉiuj infanoj postkuris lin amase, ridante; kaj ofte malsaĝuloj penis kapti lin kaj haltigi lin, tiel ke li devis suprenkuri lampofostojn kaj grimpi al la supro de kamentuboj por eskapi de ili. Nokte li kutimis dormi en fosaĵoj aŭ grenejoj aŭ ie ajn kie li povis sin kaŝi; kaj li vivis per manĝado de la beroj kiujn li prenis de heĝoj kaj la aveloj kreskantaj en la kopsoj. Post longe, post multaj aventuroj kaj preskaŭkaptiĝoj, li vidis la turon de la Preĝejo Puddleby kaj li sciis ke fine li proksimas al sia malnova hejmo.

Kiam Ĉi-Ĉio finis sian rakonton li manĝis ses bananojn senpaŭze kaj trinkis plenan bovlon da lakto.

“Ve!” li diris, “kial mi ne naskiĝis kun flugiloj, simile al Polinezio, tiel ke mi povus flugi ĉi tien? Vi tute ne povas kompreni kiom mi iom post iom malamegis tiujn ĉapelon kaj jupon. Neniam mi estis tiom malkomforta dum mia tuta vivo. La tutan iron ĉi tien el Bristol, kiam tiu aĉa ĉapelo ne faladis de mia kapo aŭ kaptiĝis en la arboj, tiuj aĉaj jupaĵoj stumbligis min kaj volviĝis ĉirkaŭ ĉion. Jadi, kial virinoj surhavas tiaĵojn? Verege, mi ĝojis vidi oldan Puddlebyn ĉimatene kiam mi transgrimpis la monteton apud la kultivejo de Bellaby!”

“Via lito super la telerrako en la postkuirejo tute pretas por vi”, diris la Doktoro. “Ni konservis ĝin

senŝanĝa por se vi revenos”.

“Jes”, diris Dab-Dabo, “kaj vi povos havi la malnovan smokingon de la Doktoro, kiun vi kutimis utiligi kiel kovrilon kiam estas malvarme dum la nokto”.

“Dankon”, diris Ĉi-Ĉio. “Estas bone reesti en la malnova domo. Ĉio estas tute sama kiel kiam mi foriris — escepte de la pura rulviŝtuko sur la malantaŭo de la tiea pordo — tio estas nova. — Nu, mi deziras enlitiĝi nun. Mi bezonas dormon”.

Post tio ni ĉiuj eliris el la kuirejo en la postkuirejon kaj rigardis dum Ĉi-Ĉio grimpis la telerrakon kvazaŭ maristo grimpanta maston. Sur la supro li buliĝis, tiris la malnovan smokingon sur sin, kaj post minuto pace ronkadis.

“Bona olda Ĉi-Ĉio!” flustris la Doktoro. “Min ĝojigas lia reveno!”

“Jes — bona olda Ĉi-Ĉio!” eĥis Dab-Dabo kaj Polinezio.

Post tio ni ĉiuj silente eliris el la postkuirejo kaj fermis la pordon tre sensone malantaŭ ni.

15. MI FARIĜAS DOKTOR-ASISTISTO

KIAM la vespero de ĵaŭdo venis, estis granda ekscitiĝo en nia domo. Mia patrino estis demandinta al mi kiujn manĝaĵojn la Doktoro plej amas, kaj mi diris al ŝi: magraj ripaĵoj, betotranĉaĵoj, fritita pano, salikokoj kaj melasotarto. Ĉinokte ŝi havis ilin ĉiujn sur la tablo, pretajn por li; kaj nun ŝi ekscitite trakontrolis la domon por certigi ke ĉio estas neta kaj preta por lia veno.

Fine ni aŭdis frapon sur la pordon, kaj kompreneble mi mem estis la unua alkurinto por enlasi lin.

La Doktoro estis kunportinta sian propran fluton, ĉifoje. Kaj post la vespermanĝo (kiun li tre multe ĝuis) la tablo estis malplenigita kaj la lavotaj teleroj lasitaj en la kuirejpelvo ĝis la sekva tago. Kaj tiam la Doktoro kaj mia patro komencis ludi duetojn.

Ili tiom interesiĝis pri tio ke mi ektimis ke ili neniam diskutos mian aferon. Sed fine la Doktoro diris,

“Via filo diras al mi ke li fervoras fariĝi naturosciencisto”.

Kaj tiam komenciĝis longa diskutado kiu daŭris ĝis malfrue en la nokto. Unue, kaj mia patrino kaj mia patro iom kontraŭis la proponon — same kiel de la komenco. Ili diris ke temas nur pri infana kaprico, kiu min tre baldaŭ malinteresos. Sed post plena diskutado de ĉiu aspekto de la propono, la Doktoro turnis sin al mia patro kaj diris,

“Nu, supozu, s-ro Stubbins, ke via filo venus al mi por du jaroj — ĝis li estos dekdujara. Dum tiuj du

jaroj li havos sufiĉan tempon por trovi ĉu aŭ ne li enuos pro ĝi. Ankaŭ dum tiu tempo, mi promesas instrui al li legi kaj skribi kaj eble ankaŭ iom da aritmetiko. Kion vi pensas pri tio?”

“Mi ne scias”, diris mia patro, kapneante. “Vi estas tre afabla kaj via propono estas tre alloga, Doktoro. Sed mi opinias ke Tomĉjo devus lerni ian metion per kiu li povos pergajni siajn vivbezonaĵojn poste”.

Post li mia patrino ekparolis. Kvankam ŝi estis preskaŭ larmanta pro la eblo ke mi foriros tiom juna el ŝia domo, ŝi emfazis al mia patro ke jen granda oportuno por ke mi instruiĝu.

“Sed Jakobo”, ŝi diris, “vi scias ke multaj knaboj en la vilaĝo studas en la lernejo ĝis ili estas dekkvar- aŭ dekkvin-jaraĝaj. Tomĉjo povas facile disponigi tiujn du jarojn por sia edukigo; kaj se li nur lernos legi kaj skribi, la tempo ne estos perdita. Kvankam jadi”, ŝi aldonis, elprenante sian poŝtukon por plori, “la domo sentiĝos ege malplena dum li forestos”.

“Mi certigos ke li venu viziti vin, s-ino Stubbins”, diris la Doktoro — ĉiutage, se vi volas. Vere, li ne estos tre malproksima”.

Nu, fine mia patro konsentis; kaj estis interkonsentite ke mi loĝos kun la Doktoro kaj laboros por li dum du jaroj interŝanĝe por lerno legi kaj skribi kaj por miaj manĝaĵoj kaj loĝado.

“Kompreneble”, aldonis la Doktoro, “dum mi havos monon mi aĉetos ankaŭ vestaĵojn por Tomĉjo. Sed mono estas tre neregula, ĉe mi; kelkafoje mi havas kaj kelkafoje ne”.

“Vi estas tre bona, Doktoro”, diris mia patrino,

sekigante siajn larmojn. “Ŝajnas al mi ke Tomĉjo estas tre bonfortuna knabo”.

Kaj tiam, ĉar mi ja estis senpensa egoista friponeto, mi klinis min kaj flustris en orelon de la Doktoro, “Bonvolu ne forgesi mencii ankaŭ la vojaĝojn”.

“Ho, aldone”, diris Johano Dolittle, “kompreneble kelkafoje mia laboro devigas min veturadi. Vi ne oponas, mi kredas, ke via filo akompanos min, ĉu?”

Mia povra patrino eksuprenrigardis, pli malfeliĉa kaj maltrankvila ol antaŭe pro tiu nova aldonaĵo; dum mi staris malantaŭ la seĝo de la Doktoro, mia koro bategadis pro eksciteco, atendente respondon de mia patro.

“Ne”, li diris lante, post kelka tempo. “Se ni akceptas la alian aranĝon, ŝajnas al mi ke ni ne rajtas oponi tion”.

Nu, certe neniam estis pli feliĉa knabo en la mondo ol mi mem tiumomente. Mia kapo estis en la nuboj. Mi marŝis suraere. Mi apenaŭ povis deteni min de ĉirkaŭdancado en la salono. Fine la plej grava revo en mia vivo efektiviĝos! Fine mi ricevos oportunon serĉi mian fortunon, sperti aventurojn! Ĉar mi tute bone sciis ke preskaŭ jam venis la tempo por ke la Doktoro komencu novan vojaĝon. Polinezio estis dirinta al mi ke li preskaŭ neniam restis ĉehejme dum pli ol ses monatoj je unu fojo. Sekve li nepre ekveturos dum la sekvaj du semajnoj. Kaj mi — mi, Tomĉjo Stubbins, akompanos lin! Nur pensu! — transiri la Maron, marŝi sur fremdaj bordoj, vagi tra la Mondo!



Parto Du

1. LA ŜIPANARO DE *LA KURLO*

EKDE tiam kompreneble mia stato en la vilaĝo estis tre ŝanĝiĝinta. Ne plu mi estis filo de povra ŝufaristo. Mi tenis mian nazon alta dum mi promenis laŭ Alta Strato kun Jipo en sia ora kolumo ĉe mia flanko; kaj altaklasaj knabetoj kiuj malestimis min antaŭe ĉar mi ne estis sufiĉe riĉa por studi en lernejo nun indikis min al siaj amikoj kaj flustris, “Ĉu vi vidas lin? Li estas doktor-asististo — kaj nur dekjara!”

Sed iliaj okuloj eĉ pli larĝe malfermiĝus pro miro se ili sciis ke mi kaj la hundo kun mi povas paroli unu kun la alia.

Du tagojn post la vizito de la Doktoro al nia domo por la vespermanĝo, li diris al mi tre malfeliĉe ke li kredas devi ĉesi provi lerni la lingvon de la moluskoj — almenaŭ provizore.

“Mi estas tre senesperiginta, Stubbins, tre. Mi provis la mitilojn kaj pektenojn, la ostrojn kaj la bukcentojn, kardiojn, sep specojn de kraboj kaj la tutan familion omaran. Mi kredas ke mi lasos ĝin aktuale kaj reprovos poste”.

“Kion vi entreprenos nun?” mi demandis.

“Nu, mi pripensas vojaĝi, Stubbins. Jam pasis multa tempo post mia foresto. Kaj multa laboro atendas min eksterlande”.

“Kiam ni ekiros?” mi demandis.

“Nu, unue mi devos atendi la revenon de la Purpura Paradizeo. Mi devos trovi ĉu ŝi havas

mesaĝon por mi de Longa Sago. Ŝi malfruas. Ŝi devus esti reveninta jam antaŭ dek tagoj. Mi esperegas ke ŝi ne akcidentis.”

“Nu, ĉu ni do ne prizorgu la akiron de boato?” mi diris. “Nepre ŝi alvenos post unu-du tagoj; kaj multo estos farenda por pretigi nin intertempe, ĉu ne?”

“Jes ja”, diris la Doktoro. “Mi proponas ke ni vizitu vian amikon Joĉjo, la mitilisto. Sendube li scias pri boatoj.”

“Mi deziras ankaŭ veni”, diris Jipo.

“Bone, ankaŭ vi venu,” diris la Doktoro, do ni foriris.

Joĉjo diris ke jes, li ja havas boaton — kiun li ĵus aĉetis — sed tri personoj necesas por veligi ĝin. Ni diris al li ke malgraŭ tio, ni deziras rigardi ĝin.

Do la mitilisto kondukis nin kelkan distancon laŭlonge de la rivero kaj montris al ni la plej allogan belan boaton kiu iam estis konstruita. Ĝi nomiĝis *La Kurlo*. Joĉjo diris ke li vendos ĝin al ni malmultekoste. Sed restis la problemo ke necesis tri homoj por la boato, sed estis nur du da ni.

“Kompreneble mi kunprenos Ĉi-Ĉion”, diris la Doktoro. “Sed kvankam li estas tre rapida kaj lerta, li ne estas tiom forta kiom viro. Ni vere devus havi alian personon por veligi tiom grandan boaton.”

“Mi konas bonan veliston, Doktoro”, diris Joĉjo — “unuaklasa maristo kiu volonte akceptus la postenon”.

“Ne, dankon, Joĉjo”, diris Doktoro Dolittle. “Mi ne volas maristojn. Mi ne havas sufiĉan monon por pagi ilin. Kaj ili tre malfaciligas aferojn por mi, tiuj maristoj, dum mi velas surmare. Ili ĉiam volas ke mi

faru aferojn laŭ la ĝusta maniero; kaj mi deziras fari ilin laŭ *mia* maniero. — Nu mi pripensu: kiun ni povus preni kun ni?”

“Eble Mateon, la porkatan viandovendiston”, mi diris.

“Ne, li ne taŭgus. Mateo estas tre agrabla persono, sed li tro multe parolas — plejparte pri sia reŭmatismo. Oni devas multe zorgi pri kiun oni kunvenigas por longaj vojaĝoj”.

“Kion pri Luko la Ermito?” mi demandis.

“Jen bona ideo — bonega — se li akceptos. Ni iru tuj peti al li”.

2. LUKO LA ERMITO

LA Ermito estis malnova amiko mia, kiel mi jam diris al vi. Li estis tute malkutima persono. Tre malproksime sur la marĉoj li loĝis en sia eta domaĉo — tute sola escepte de sia grizbrunstria buldogo. Neniu sciis el kie li venis — eĉ ne lian nomon. Nur “Luko la Ermito” oni nomis lin. Li neniam venis en la vilaĝon; ŝajne neniam volis renkonti homojn aŭ paroli kun ili. Lia hundo, Roĉjo, forpelis ilin kiam ili proksimiĝis al lia dometaĉo. Kiam oni demandis al iu ajn en Puddleby kiu li estas aŭ kial li loĝas sola en tiu soleca loko, la sola respondo kiun oni aŭdis estis, “Ho, Luko la Ermito, ĉu? Nu, estas ia mistero pri li. Neniu scias kio ĝi estas. Sed ja estas mistero. Ne proksimiĝu al li. Li sendos la hundon kontraŭ vin”.

Tamen, ja estis du personoj kiuj ofte eliris al tiu malgranda domaĉo sur la marĉoj: la Doktoro kaj mi mem. Kaj Roĉjo, la buldogo, neniam bojis aŭdante nin veni. Ĉar ni amis Lukon; kaj Luko amis nin.

Posttagmeze, dum ni transiris la marĉojn nin frontis malvarma vento el la oriento. Dum ni proksimiĝis al la dometo Jipo levis siajn orelojn kaj diris, “Tre kurioze!”

“Kio kuriozas?” demandis la Doktoro.

“Ke Roĉjo ne venis renkonti nin. Li devus esti aŭdinta nin antaŭ longe — aŭ flarinta nin. Kio faras tiun kuriozan bruon?”

“Sonas al mi kvazaŭ iu barilpordo grincas”, diris la Doktoro. “Eble la pordo de Luko, sed ni ne povas vidi

ĝin de ĉi tie; ĝi estas ĉe la malantaŭa flanko de la dometo”.

“Mi esperas ke Roĉjo ne malsanas”, diris Jipo; kaj li sonigis bojon por trovi ĉu tio alvokos lin. Sed la sola respondo ricevita estis la ululado de la vento trans la larĝan salan marĉon.

Ni hastis antaŭen, ĉiuj ni tri, profunde pensante.

Kiam ni atingis la antaŭaĵon de la dometo ni trovis la pordon malfermita, svingiĝanta kaj grincanta morne en la vento. Ni rigardis enen. Neniu estis tie.

“Ĉu do Luko ne estas ĉeĥejme?” diris mi. “Eble li promenas”.

“Li *ĉiam* estas ĉeĥejme”, diris la Doktoro, sulkante la frunton laŭ kurioza maniero. “Kaj eĉ se li estus for, promenante, li ne lasus sian pordon svingiĝanta en la vento malantaŭ li. Io kuriozas pri ĉio ĉi. — Kion vi faras en tie, Jipo?”

“Nenion gravan — nenion menciindan”, diris Jipo, ekzamenante zorgege la plankon de la dometo.

“Venu ĉi tien, Jipo”, diris la Doktoro per severa voĉo. “Vi kaŝas ion de mi. Vi vidas signojn kaj vi scias ion — aŭ divenas ĝin. Kio okazis. Diru al mi. Kie estas la Ermito?”

“Mi ne scias”, diris Jipo, aspektante tre kulpa kaj malkomforta. “Mi ne scias kie li estas”.

“Nu, vi ja scias ion. Mi povas scii tion per via maniero rigardi. Kio estas?”

Sed Jipo ne respondis.

Dum dek minutoj la Doktoro demandadis lin. Sed neniun vorton la hundo konsentis diri.

“Nu”, diris la Doktoro fine, “ne utilas staradi ĉi tie

en la malvarmo. La Ermito foriris. Jen ĉio. Ni prefere iru hejmen por lunĉi”.

Dum ni butonumis niajn mantelojn kaj remarŝis trans la marĉon, Jipo kuris antaŭe, ŝajnigante serĉi akvoradojn.

“Li vere scias ion”, flustris la Doktoro. “Kaj mi ankaŭ kredas ke li scias kio okazis. Estas strange, ke li rifuzas informi min. Li neniam faris tion antaŭ nun — ne dum dek unu jaroj. Li ĉiam diris al mi ĉion, ĝis nun. — Strange. — tre strange!”

“Ĉu vi diras ke viaopinie li scias ĉion pri la Ermito, la granda mistero pri li, kiun oni aludas, k.t.p.?”

“Tio ne mirigus min”, la Doktoro respondis lante. “Mi rimarkis ion en lia esprimo tuj kiam ni trovis tiun pordon malfermita kaj la dometon malplena. Kaj ankaŭ lia ĉirkaŭflarado je la planko — ĝi diris ion al li, tiu planko. Li vidis spurojn kiujn ni ne povis vidi. — Mi ne komprenas kial li rifuzas diri al mi. Mi provos denove. Ĉi tien, Jipo! — Kie estas la hundo? Mi kredis ke li antaŭiras nin”.

“Ankaŭ mi”, mi diris. “Li estis videbla antaŭ momento. Mi vidis lin, tute certe. Jipo — Jipo — Jipo — JIPO!”

Sed li forestis. Ni vokis ripete. Ni eĉ retromarŝis al la dometo. Sed Jipo estis malaperinta.

“Ho, nu”, mi diris, “plej verŝajne li nur kuris hejmen antaŭ ni. Li ofte faras tion, sciu. Ni trovos lin tie kiam ni atingos la domon”.

Sed la Doktoro nur fermis sian mantelkolumon pli streĉita kontraŭ la vento kaj plu marŝis murmurante, “Strange — tre strange!”

3. JIPO KAJ LA SEKRETO

KIAM ni atingis la domon, la unua demando de la Doktoro al Dab-Dabo en la enirejo estis,

“Ĉu Jipo jam revenis?”

“Ne”, diris Dab-Dabo, “mi ne vidis lin”.

“Informu min tuj kiam li envenos, bonvolu” diris la Doktoro, pendigante sian ĉapelon.

“Certe”, diris Dab-Dabo. “Ne prokrastu lavi viajn manojn; la lunĉo jam estas sur la tablo”.

Ĝuste kiam ni sidiĝis por lunĉi en la kuirejo, ni aŭdis bruegon ĉe la antaŭa pordo. Mi kuris malfermi ĝin. Ensaltis Jipo.

“Doktoro!” li kriis, “hastu veni en la libroĉambron. Mi devas diri ion al vi. — Ne, Dab-Dabo, la lunĉo devos atendi. Mi petas hasti, Doktoro. Ni devas perdi eĉ ne momenton. Ne lasu iun el la bestoj veni — nur vi kaj Tomĉjo”.

“Nun”, li diris, kiam ni estis en la libroĉambro kaj la pordo estis fermita, “turnu la ŝlosilon en la seruro kaj certigu ke neniuj subaŭskultas ĉe la fenestroj”.

“Estas bone”, diris la Doktoro. “Neniuj povas aŭdi vin ĉi tie. Do, kio estas?”

“Nu, Doktoro”, diris Jipo (li estis preskaŭ senspira pro kuregado), “mi scias ĉion pri la Ermito — scias jam de jaroj. Sed mi ne povis diri al vi”.

“Kial” demandis la Doktoro.

“Ĉar mi promesis diri al neniuj. Lia hundo, Roĉjo, informis min. Kaj mi ĵuris al li teni la sekreton”.

“Nu, kaj ĉu vi diros al mi nun?”

“Jes”, diris Jipo, “ni nepre devas savi lin. Mi ĵus sekvis la odoron de Roĉjo, foririnte de vi sur la marĉoj. Kaj mi trovis lin. Kaj mi diris al li, ‘Ĉu vi permesas’, mi diris, ‘ke mi informu la Doktoron nun? Eble li povos helpi’. Kaj Roĉjo diras al mi, ‘Jes’, diras li, ‘mi permesas, ĉar—’”

“Ho, je la Ĉielo, diru, diru!” kriis la Doktoro. “Diru la misteron al ni — ne kion vi diris al Roĉjo kaj Roĉjo al vi. Kio okazis? *Kie* estas la Ermito?”

“Li estas en la Malliberejo de Puddleby”, diris Jipo. “Li estas en karceri.”

“En karceri!”

“Jes”.

“Kial? — Kion li faris?”

Jipo transiris al la pordo kaj flaris ĝian malsupron por trovi ĉu iu aŭskultas ekstere. Post tio li revenis silente al la Doktoro kaj flustris,

“*Li mortigis viron!*”

“Dio savu nin!” kriis la Doktoro, eksidante peze en seĝon kaj viŝante sian frunton per poŝtuko. Kiam li faris tion?”

“Antaŭ dek kvin jaroj — en meksika ormino. Tial li ekde tiam estas ermito. Li forrazis sian barbon kaj tenis sin for de homoj, tie sur la marĉoj, por ke oni ne rekonu lin. Sed la pasintan semajnon, ŝajnas ke tiuj novaspecaj policianoj venis al la vilaĝo; kaj ili aŭdis ke estas strangulo kiu restas tute sola en eta domaĉo sur la marĉo. Kaj ili eksuspektis. Dumlonge oni serĉadis tra la tuta mondo la viron kiu faris tiun mortigon en la meksika ormino antaŭ dek kvin jaroj. Do tiuj policianoj eliris al la dometo, kaj ili rekonis Lukon per

lentugo sur lia brako. Kaj ili prenis lin al la karcero”.

“Nu, nu!” murmuris la Doktoro. “Kiu pensus tion? — Luko, la filozofo! — Mortigis viron! — Mi apenaŭ povas kredi tion”.

“Tamen estas tutvere — domaĝe”, diris Jipo. “Luko faris ĝin. Sed li ne estas kulpa. Roĉjo diras tion. Kaj li estis tie kaj vidis ĉion. Li estis apenaŭ pli aĝa ol juna hundido tiam. Roĉjo diras ke Luko ne povis ne fari ĝin. Li *devis* fari ĝin”.

“Kie estas Roĉjo nun?” demandis la Doktoro.

“Ĉe la malliberejo. Mi volis ke li akompanu min por paroli kun vi; sed li rifuzas lasi la malliberejon dum Luko estas tie. Li nur sidas ekster la pordo de la karcero kaj rifuzas movi sin. Li eĉ ne manĝas la manĝaĵojn kiujn oni donas al li. Ĉu vi bonvolos veni tien, Doktoro, kaj esplori ĉu vi povas helpi? La proceso okazos ĉi posttagmeze je la dua horo. Kioma horo estas nun?”

“Dek minutoj post la unua”.

“Roĉjo diras ke li kredas ke oni mortigos Lukon pune se ili povos pruvi ke li faris ĝin — aŭ certe teni lin en karcero dum lia cetera vivo. Ĉu vi bonvolos veni? Eble se vi parolos al la juĝisto kaj diros al li kiom bona homo estas Luko efektive, oni pardonos lin”.

“Kompreneble mi venos”, diris la Doktoro, stariĝante kaj preparante eliri. “Sed mi multe timas ke mi ne povos doni veran helpon”. Li turnis sin ĉe la pordo kaj hezitis penseme.

“Sed tamen — ĉu — —”

Post tio li malfermis la pordon kaj eliris kun Jipo kaj mi sekvantaj ĉe liaj kalkanumoj.

4. ROĈJO

DAB-DABO estis ege malkvieta kiam ŝi trovis ke ni denove foriros sen lunĉi; kaj ŝi devigis nin kunpreni kelkajn malvarmajn porkaĵ-paŝteĉojn en niaj poŝoj por ilin manĝi dumvoje.

Atinginte la Tribunalejon de Puddleby (ĝi estis en domo apud la malliberejo), ni trovis grandan homamason grupiĝintan ĉirkaŭ la konstruaĵon.

Estis la semajno de la Asizoj — kio okazis ĉiun trian monaton, kiam multaj poŝtelistoj kaj aliaj fuuloj subiris proceson fare de tre grava juĝisto veninta el Londono. Kaj ĉiu en Puddleby kiu havis nenion farindan kutimis veni al la Tribunalejo por spekti la procesojn.

Sed hodiaŭ estis malsame. La homamaso ne konsistis el nur kelkaj pigruloj. Ĝi estis enorma. La novaĵo disvastiĝis tra la kamparo ke Luko la Ermito subiros proceson pro mortigo de viro, kaj ke la granda mistero kiu kaŝis lin tiom longe fine klariĝos. La buĉisto kaj la bakisto fermis siajn butikojn ferie. Ĉiuj kultivistoj de la regiono, kaj ĉiuj vilaĝanoj, ĉeestis, surhavante siajn plej elegantajn vestojn, penante akiri sidlokon en la Tribunalejo aŭ klaĉante flustre ekster la domo. Alta Strato estis tiom plena ke oni apenaŭ povis laŭiri ĝin. Mi neniam antaŭe vidis la trankvilan oldan vilaĝon tiom ekscitita. Ĉar Puddleby ne havis tian Asizon depost 1799, kiam Ferdinando Phipps, la plej aĝa filo de la ĉefpastro, prirabis la bankon.

Se la Doktoro ne estus kun mi, mi certas ke mi

neniel sukcesus trairi la amason grupiĝintan ĉirkaŭ la pordo de la Tribunalejo. Sed mi nur sekvis lin, kroĉiĝante al liaj baskoj; kaj fine ni sekure eniris la malliberejon.

“Mi volas paroli kun Luko”, diris la Doktoro al tre impona persono en blua mantelo kun latunaj butonoj staranta ĉe la domo.

“Petu ĉe la oficejo de la Superintendanto”, diris la viro. “Trian pordon maldekstre, laŭ la koridoro”.

“Kiu estas la persono al kiu vi parolis, Doktoro?” mi demandis dum ni laŭiris la koridoron.

“Li estas policano”.

“Kaj kio estas policanoj?”


“Policanoj? Ili estas por teni ordon. Ili estas ĵus inventitaj — de Kav. Roberto Peel. Tial oni ankaŭ nomas ilin ‘peelistoj’ kelkafoje. Ni vivas dum mirinda epoko. Oni ĉiam elpensas ion novan. — Jen la oficejo de la Superintendanto, supozeble”.

De tie alia policano estis kunsendita por gvidi nin.

Ekster la pordo de la karcero de Luko ni trovis Roĉjon, la buldogon, kiu svingis sian voston malfeliĉe kiam li vidis nin. Nia gvidanto elprenis grandan aron da ŝlosiloj el sia poŝo kaj malfermis la pordon.

Neniam antaŭe mi estis en reala karcero; kaj mi sentis grandan ekscitiĝon post kiam la policano eliris kaj ŝlosis la pordon post si, lasante nin enfermitaj en la malmulte lumigata malgranda ŝtona ĉambro. Antaŭ ol foriri, li diris ke tuj kiam ni finos paroli kun nia amiko ni frapu sur la pordon kaj li venos ellasi nin.

Unue mi povis vidi preskaŭ nenion, estis tiom senlume tie. Sed post nelonge mi sukcesis vidi malalt-



“SUR LA LITO SIDIS LA ERMITO.”

an liton apud la muro, sub malgranda kradhava fenestro. Sur la lito, gapante la pordon inter siaj piedoj, sidis la Ermito apogante sian kapon per siaj manoj.

“Nu, Luko”, diris la Doktoro per afabla voĉo, “oni ne donas al vi multan lumon ĉi tie, ĉu ne?”

Tre lante la Ermito suprenrigardis de la planko.

“Saluton, Johano Dolittle. Kial vi venis ĉi tien?”

“Mi venis paroli kun vi. Mi estus ĉi tie pli frue, sed mi ne aŭdis pri ĉio ĉi ĝis antaŭ kelkaj minutoj. Mi iris al via dometo por peti vin akompani min dum vojaĝo; trovinte ĝin malplena mi tute ne povis konjekti kie vi estas. Min bedaŭregigas sciigi pri via misfortuno. Mi venis por trovi ĉu mi povas iel helpi vin”.

Luko kapneis.

“Ne, mi ne imagas kiel ia helpo doneblas. Ili fine trafis min. Jen la fino de la afero, supozeble”.

Li stariĝis rigide kaj komencis promeni tien kaj reen en la malgranda ĉambro.

“Kelkamaniere mi ĝojas ke venis fino”, diris li. “Mi neniam estis trankvila, ĉiam pensadis ke ili ĉasas min — timadis paroli al iu ajn. Ili ne povis ne trafi min, fine. — Jes, mi ĝojas ke venis fino”.

Tiam la Doktoro parolis kun Luko dum pli ol duona horo, penante gajigi lin; dum mi sidis demandante al mi mem kion mi devus diri, kaj vologante povi fari ion.

Fine la Doktoro diris ke li volas paroli kun Roĉjo; kaj ni frapis sur la pordon kaj la policano ellasis nin.

“Roĉjo”, diris la Doktoro al la granda buldogo en la koridoro, “venu kun mi al la verando. Mi volas demandi vin pri io”.

“Kiel li fartas, Doktoro?” demandis Roĉjo dum ni marŝis laŭ la koridoro al la verando de la Tribunalejo.

“Ho, Luko fartas bone. Tre malfeliĉas, kompreneble, sed fartas bone. Nun diru al mi, Roĉjo. Vi ĉeestis kiam la viro estis mortigita, ĉu?”

“Jes, Doktoro”, diris Roĉjo, “kaj mi diras al vi — ”

“Bone”, la Doktoro interrompis, “nur tion mi volas scii ĉimomente. Ne estas sufiĉa tempo por diri pli al mi nun. La proceso estas tuj komencota. Jen la juĝisto kaj la advokatoj ascendas la ŝtupojn. Nun atentu, Roĉjo: mi volas ke vi restu kun mi kiam mi eniros la procesejon. Kaj kion ajn mi petos al vi, tion faru. Ĉu vi komprenas? Ne miskondutu. Mordu nenium, negrave kion ili diros pri Luko. Nur kondutu tute trankvile kaj respondu ĉiun demandon kiun mi faros al vi — diru nur la veron. Ĉu vi komprenas?”

“Bone. Sed ĉu vi kredas ke vi povos liberigi lin, Doktoro?” demandis Roĉjo. “Li estas bona persono, Doktoro. Tute vere. Neniam estis pli bona”.

“Ni vidos, ni vidos, Roĉjo. Ion novan mi provos. Mi ne certas ke la juĝisto permesos ĝin. Sed — nu, ni vidos. Nun estas la ĝusta tempo por eniri la procesejon. Ne forgesu kion mi diris al vi. Memoru: je la Ĉielo, ne ekmordu iun, alie oni elpelos nin ĉiujn kaj ĉio estos ruinigita”.

5. MENDOZO

INERNE DE la procesejo ĉio estis tre solena kaj miriga.

Ĝi estis alta granda ĉambro. Super la nivelo de la planko, kontraŭ la muro, estis la skribtablo de la Juĝisto; kaj tie jam sidis la Juĝisto — maljuna belaspekta viro kun mirinda granda peruko el grizaj haroj kaj robo nigra. Sube estis alia larĝa longa skribtablo ĉe kiu sidis advokatoj kun blankaj perukoj. La tuto memorigis min pri kunmiksaĵo de preĝejo kaj lernejo.

“Tiu dek du viroj ĉe la flanko”, flustris la Doktoro — “kiuj sidas sur benkoj kvazaŭ ĥoro, ili estas kion oni nomas ĵurio. Ili decidis ĉu aŭ ne Luko kulpas — ĉu li efektive faris la krimon”.

“Kaj vidu!” mi diris, “jen Luko mem, en ia predikpupitro kun policanoj ĉiuflanke. Kaj estas alia pupitro, samaspeca, aliflanke de la ĉambro, vidu — tamen tiu estas malplena”.

“Oni nomas tiun la atestejo”, diris la Doktoro. “Nun, mi iros paroli al unu el tiuj viroj kun blankaj perukoj; kaj mi volas ke vi atendu ĉi tie kaj tenu ĉi tiujn du sidlokojn por ni. Roĉjo restos kun vi. Atentu lin — plejbone, tenu lian kolumon. Mi ne bezonos pli ol unu-du minutojn”.

Dirinte tion la Doktoro malaperis en la homamaso kiu plenigis la plej grandan parton de la ĉambro.

Tiam mi vidis la Juĝiston preni kuriozan malgrandan lignan martelon kaj bateti sian skribtablon per ĝi. Tio, ŝajne, estis por silentigi la ĉeestantojn, ĉar

tuj ĉiuj ĉesis murmuradi kaj paroladi kaj komencis aŭskulti tre respektoplene. Post tio alia viro en nigra robo stariĝis kaj komencis voĉlegi paperon kiun li tenis per sia mano.

Li murmuradis precize kvazaŭ li preĝas kaj ne volas ke iu ajn komprenu lian parolaĵon. Sed mi sukcesis kapti kelkajn vortojn:

“*Biz—biz—biz—biz—biz—*ankaŭ nomata Luko la Ermito, *el—biz—biz—biz—biz—*pro mortigo de lia partnero *per—biz—biz—biz—*ankaŭ nomata Vilĉjo la Blubarbulo dum la nokto de la *—biz—biz—biz—*en la *biz—biz—biz—*de Meksiko. Tial la *biz—biz—*de Lia Moŝto *—biz—biz—biz—*”

Tiumomente mi sentis ke iu prenas mian brakon de malantaŭe, kaj turninte min mi trovis ke la Doktoro estis reveninta kun unu el la viroj kun blankaj perukoj.

“Stubbins, jen s-ro Percio Jenkyns”, diris la Doktoro. “Li estas la advokato de Luko. Lia tasko estas senkulpigi Lukon — se eblos”.

S-ro Jenkyns aspektis ege juna viro kun ronda glata vizaĝo kia de knabo. Li premis mian manon kaj tuj turnis sin kaj daŭrigis paroladon kun la Doktoro.

“Ho, mi kredas ke tio estas vere grandioza ideo”, li diris. “*Kompreneble* la hundo devos akceptiĝi kiel atestanto; li estis la sola ulo kiu vidis la eventon. Min plezuregigas ke vi venis. Mi nenial volus maltrafi ĉi tion. Je mia ĉapelo! Ĉu tio ne atentigos la malnovan tribunalon, jes ja! Ili ĉiam estas ege tedaj, ĉi Asizoj. Sed ĉi tio estigos eksciton. Buldogo por la defendanto! Mi tre esperas ke estas multaj raportistoj ĉi

tie. — Jes, iu skizas la kaptiton. Mi famiĝos post ĉi tio. — Kaj ja vere plaĉegos al Conkey. Je mia ĉapelo!”

Li kovris sian buŝon per mano por kaŝi ridon, kaj liaj okuloj vere scintilis pro friponeco.

“Kiu estas Conkey?” mi demandis al la Doktoro.

“Ĉit! Li parolas pri la Juĝisto tie, La Honorinda Eustace Beauchamp Conckley”.

“Nun”, diris s-ro Jenkyns, elprenante notlibron, “diru al mi iom pli pri vi mem, Doktoro. Vi diplom- iĝis Doktoro de Medicino ĉe Durhamo, mi kredas ke vi diris tion al mi. Kaj la titolo de via plej nova libro estas...?”

Mi ne povis aŭdi plion, ĉar ili parolis flustre; kaj mi komencis ĉirkaŭrigardi la procesejon.

Kompreneble mi ne povis kompreni ĉion okazantan, kvankam ĉio estis tre interesa. Homoj ekstaris, unu post la alia, en la loko kiun la Doktoro nomis atestejo, kaj la advokatoj ĉe la longa tablo demandis ilin pri “la punkto de la 29a”. Poste la homoj foriris el la atestejo kaj iu alia eniris kaj estis demandata.

Unu el la advokatoj (kiu, la Doktoro informis min poste, nomiĝas la Prokuroro) ŝajne faris sian plej- eblon por embarasi la Ermiton per demandoj kiuj implicis ke li ĉiam estis fiulo. Li estas malplaĉega advokato, tiu Prokuroro, kun longa nazo.

La plejparton de la tempo mi apenaŭ povis deteni la okulojn de povra Luko, kiu sidis tie inter siaj du policanoj, gapante la plankon kvazaŭ ne interesate. La sola fojo kiam mi vidis lin eĉ iomete atenti estis kiam malgranda malpala viro kun fiaspektaj akvecaj okuloj eniris la atestejon. Mi aŭdis Roĉjon minace

grumbli sub mia seĝo dum tiu venis en la procesejon kaj la okuloj de Luko flagris kolere kaj malestime.

Tiu viro diris ke li nomiĝas Mendoza kaj ke li estis gvidinta la meksikan policon al la mino post la mortigo de Vilĉjo Blubarbulo. Kaj je ĉiu vorto kiun li diris mi aŭdis Roĉjon sub mi murmuradi inter siaj dentoj,

“Mensogo! Mensogo! Mi maĉos lian vizaĝon. Mensogo!”

Kaj la Doktoro kaj mi malfacile restigis la hundon sub la seĝo.

Tiam mi rimarkis ke nia s-ro Jenkyns estis malaperinta de la flanko de la Doktoro. Sed baldaŭ mi vidis lin stari ĉe la longa tablo por paroli al la Juĝisto.

“Via Moŝto”, diris li, “mi deziras konigi novan atestonton por la defendo, Doktoron Johano Dolittle, la naturosciencisto. Ĉu vi bonvolos paŝi en la atestejon, Doktoro?”

Estis bruo de eksciteco dum la Doktoro paŝis tra la homoplena ĉambro; kaj mi rimarkis la malagraban advokaton kun la longa nazo klini sin kaj flustri ion al amiko, ridetante laŭ malagraba maniero kiu voligis min lin pinĉi.

Tiam s-ro Jenkyns faris multajn demandojn pri li mem, kaj devigis lin respondi per laŭta voĉo por ke la tuta salonanaro povu aŭdi. Li finis per diro,

“Kaj vi pretas ĵuri, Doktoro Dolittle, ke vi komprenas la lingvon de hundoj, kaj povas komprenigi vin al ili. Ĉu ne?”

“Jes”, diris la Doktoro, “tio estas prava”.

“Kaj kiel, mi volas demandi”, interrompis la Juĝisto per tre kvieta digna voĉo, “ĉio ĉi rilatas al la mortigo

de—e...—a...—Vilĉjo Blubarbulo?”

“Ĉi tiel, Via Moŝto”, diris s-ro Jenkyns, parolante tre grandioze kvazaŭ sur la scenejo en teatro; “estas en ĉi tiu procesĉambro buldogo, kiu estis la sola vivanto kiu vidis la mortigon de la viro. Kun la permeso de la Tribunalo, mi proponas irigi tiun hundon en la atestejon kaj ke la eminenta sciencisto Doktoro Johano Dolittle faru al li demandojn”.

6. LA HUNDO DE LA JUĜISTO

UNUE estis silentego en la procesejo. Poste ĉiuj komencis flustradi aŭ subridadi samtempe, ĝis la tuta ĉambro sonis kiel granda abelejo. Multaj personoj ŝajnis ŝokitaj; la plejparto estis amuzita; kaj kelkaj koleris.

Baldaŭ ekstariĝis la malagrabra advokato kun la longa nazo.

“Mi protestas, Via Moŝto”, li kriis, svingante siajn brakojn sovaĝe je la Juĝisto. “Mi oponas. La digno de ĉi tiu tribunalo estas endanĝerigata. Mi protestas!”

“Mi mem estas la persono kiu prizorgas la dignon de ĉi tiu tribunalo”, diris la Juĝisto.

Tiam s-ro Jenkyns restariĝis. (Se ne estus tiom serioze, estus preskaŭ kiel pulĉinela prezento: konstante iu ekmalstaris kaj alia ekstaris.)

“Se ekzistas ia dubo pri nia kapablo plenumi nian pretendon, Via Moŝto sendube neniel oponos, mi kredas, ke la Doktoro demonstru sian kapablon al la Tribunalo — montru ke li efektive ja komprenas la parolon de bestoj?”

Mi kredis vidi scintilan amuziĝeton eniri la okulojn de la maljuna Juĝisto dum li sidis pripensante antaŭ ol respondi.

“Ne”, li fine diris, “mi ne oponas”. Li turnis sin al la Doktoro.

“Ĉu vi tute certas povi fari tion?” li demandis.

“Tute, Via Moŝto”, diris la Doktoro, “tute certa”.

“Do bone”, diris la Juĝisto. “Se vi povos konvinki

nin ke vi vere kapablas kompreni hundajn atestojn, la hundo rajtos fariĝi atestanto. Mi ne scias kial, tiukaze, mi povus oponi ke li atestu. Sed mi avertas vin, ke se vi provas moki ĉi tiun tribunalon, via puniĝo estos granda”.

“Mi protestas, mi protestas!” kriis la longanaza Prokuroro. “Estas skandalo, jura skandalo!”

“Sidiĝu!” diris la Juĝisto per tre solena voĉo.

“Kun kiu besto Via Moŝto deziras ke mi parolu?” demandis la Doktoro.

“Mi deziras ke vi paroli kun mia propra hundo”, diris la Juĝisto. “Li estas ekstere, en la deponejo. Mi envenigos lin; kaj tiam ni trovos kion vi povas fari”.

Tiam iu eliris kaj envenigis la hundon de la Juĝisto, belan grandan rusan luphundon kun maldikaj kruroj kaj vila felo. Li estis fiera kaj bela besto.

“Nu, Doktoro”, diris la Juĝisto, “ĉu vi iam antaŭ nun vidis ĉi tiun hundon? — Memoru, vi estas en la atestejo kaj ĵuris”.

“Ne, Via Moŝto, mi neniam vidis lin antaŭ nun”.

“Tute bone, do bonvolu peti lin informi al vi pri kion mi manĝis la pasintan vesperon. Li estis kun mi kaj rigardis min manĝi”.

Tiam la Doktoro kaj la hundo komencis interparoli per signoj kaj sonoj; kaj ili daŭrigis tion iom longe. Kaj la Doktoro komencis subridi kaj tiom interesiĝis ke li ŝajne plene forgesis la tribunalon kaj la Juĝiston kaj ĉion alian.

“Kiom da tempo li uzas!” mi aŭdis dikulinon antaŭ mi flustri. “Li nur ŝajnigas. Kompreneble li ne kapablas. Kiu iam aŭdis ke homo povas paroli kun hundo?”

Li devas supoziti nin infanoj”.

“Ĉu vi ankoraŭ ne finis?” la Juĝisto demandis al la Doktoro. “Vi nepre ne bezonas tiom da tempo nur por demandi pri mia vespermanĝo”.

“Ho, ne, Via Moŝto”, diris la Doktoro. “La hundo diris tion al mi antaŭ longe. Sed poste li plu parolis kaj diris kion vi faris post la vespermanĝo”.

“Ne gravas tio”, diris la Juĝisto. “Diru al mi lian respondon al mia demando”.

“Li diras ke vi manĝis ŝafajan kotleton, du bakitajn terpomojn, peklatan juglandon kaj glason da elo”.

La Honorinda Eustace Beauchamp Conckley blankiĝis ĝis la lipoj.

“Sonas kvazaŭ sorĉaĵo”, li murmuris. “Neniam mi supozis—”

“Kaj post via vespermanĝo”, la Doktoro daŭrigis, “li diras ke vi iris rigardi boksistan batalon kaj post tio vi sidis vetludante kartojn ĝis la dekdua horo, kaj post tio vi revenis hejmen kantante “Ni ne—”

“Sufiĉe”, la Juĝisto interrompis. “Mi konsentas ke vi povas fari kion vi pretendis. La hundo de la kaptito rajtos atesti”.

“Mi protestas, mi oponas!” kriegis la Prokuroro. “Via Moŝto, tio estas—”

“Sidiĝu” kriegis la Juĝisto. “Mi diras ke ni aŭskultos la hundon. Jen mia fina decido. Metu la atestonton en la atestejon”.

Kaj tiam, la unuan fojon en la solena historio de Anglujo, hundo metiĝis en la atestejon de la Asizo de Lia Reĝa Moŝto. Kaj mi, Tomĉjo Stubbins (kiam la Doktoro signalis al mi transĉambre) fiere kondukis



“SIDIS GRIMACANTE AL LA MIRANTA KAJ GAPANTA ĴURIO.”

Roĉjon laŭ la trairejo, tra la miregantan homamason, preter la fruntosulkantan ŝprucbalbutantan longanazan Prokuroron, kaj sidigis lin komforte sur alta seĝo en la atestejo; de tie la olda buldogo sidis grimacante trans la barilon al la miranta kaj gapanta ĵurio.

7. LA FINO DE LA MISTERO

LA proceso rapide progresis post tio. S-ro Jenkyns petis la Doktoron demandi al Roĉjo kion li vidis dum “la nokto de la 29a”; kaj kiam Roĉjo estis dirinta ĉion kion li sciis kaj la Doktoro tradukis ĝin en la anglan por la Juĝisto kaj la ĵurio, jen kion li diris:

“La nokton de la 29a de novembro, 1824, mi estis kun mia mastro, Luko Fitzjohn (alie nomata Luko la Ermito), kaj liaj du partneroj, Manuelo Mendozo kaj Vilhelmo Boggs (alie nomata Vilĉjo Blubarbulo), sur ilia ormino en Meksiko. Dumlonge tiuj tri viroj estis serĉintaj oron; kaj ili fosis profundan truon en la tero. La matenon de la 19a oro estis trovita, multa oro, ĉe la fundo de tiu truo. Kaj ĉiuj tri, mia mastro kaj liaj du partneroj, estis tre feliĉaj pro ĝi ĉar nun ili estos riĉaj. Sed Manuelo Mendozo petis Vilĉjon Blubarbulo promene akompani lin. Mi ĉiam suspektis ke tiuj du viroj estas fiuloj. Do kiam mi rimarkis ke ili postlasis mian mastron, mi sekrete sekvis ilin por vidi kion ili planas. Kaj en profunda kavo mi aŭdis ilin kune plani mortigi Lukon la Ermiton tiel ke ili akiros la tuton de la oro kaj li havos neniam.

Je tiu punkto la Juĝisto demandis, “Kie estas la atestanto Mendozo? Policano, zorgu ke li ne forlasos la tribunalejon”.

Sed la fia malgranda viro kun la akvecaj okuloj jam estis kaŝe elirinta kiam neniu rigardis lin kaj li neniam estis denove vidita en Puddleby.

“Post tio”, daŭrigis la deklaro de Roĉjo, “mi reiris al

mia mastro kaj strebis komprenigi al li ke liaj partneroj estas danĝeruloj. Sed estis senutile. Li ne komprenis la hundo-lingvon. Do mi faris kion mi povis: mi neniam lasis lin esti neobservata de mi kaj mi restis kun li dum ĉiu momento de la noktoj kaj tagoj.

“Nu, la truo kiun ili farintis estis tiom profunda ke por descendi kaj ascendi en ĝi necesis veturi en granda sitelo al kies finaĵo dika ŝnuro estis ligita; kaj la tri viroj kutimis eltiri unu la alian kaj malsuprenirigi unu la alian en la mino tiel — en la sitelo. Nu, ĉirkaŭ la sepa horo vespere mia mastro staris ĉe la supro de la mino, eltirante Blubarbulon Vilĉjon kiu estis en la sitelo. Tuj kiam li estis duone eltirinta Vilĉjon, mi vidis Mendozon veni el la dometo en kiu ni ĉiuj loĝis. Mendozo supozis ke Vilĉjo estas for, aĉetanta manĝaĵojn. Sed tiel ne estis, li estis en la sitelo. Kaj kiam Mendozo vidis Lukon tiregadi pene la ŝnuregon li kredis ke li eltiras sitelon da oro. Do li tiris pistolon el sia poŝo kaj kaŝe iris malantaŭ Lukon por pafi lin.

“Mi bojegis por averti mian mastron pri lia endanĝeriĝo; sed li tiom okupis sin per sia eltirado de Vilĉjo (kiu estis peza dikulo) ke li tute ne atentis min. Mi vidis ke se mi ne faros ion rapide li nepre estos pafita. Do mi faris ion kion mi neniam antaŭe faris: subite kaj sovaĝe mi mordis de malantaŭe kruron de mia mastro. Luko estis tiom vundita kaj surprizita ke li faris precize kion mi celis: li tuj delasis la ŝnuregon per ambaŭ manoj kaj turnis sin. Kaj tiam, *kraŝ!*, descendis Vilĉjo en sia sitelo al la fundo de la mino

kaj li mortigis.

“Dum mia mastro riproĉadis min, Mendozo metis sian pistolon en sian poŝon, alvenis ridetante kaj rigardis en la minon.

“Nu, jadi!” diris li al Luko, ‘vi mortigis Vilĉjon Blubarbulon! Mi devos informi la policon’ — esperante, komprenu, akiri la tutan minon por si mem post la enkarceriĝo de Luko. Do li saltis sur sian ĉevalon kaj forgalopis.

“Kaj baldaŭ mia mastro ektimis; ĉar li komprenis ke se Mendozo nur diros sufiĉe da mensogoj al la polico, *ja vere* aspektos kvazaŭ li intence mortigis Vilĉjon. Do dum Mendozo forestis, li kaj mi kaŝe ekveturis kaj venis al Anglujo. Ĉi tie li forrazis sian barbon kaj ermitiĝis. Kaj de tiam, jam de dek kvin jaroj, ni restas kaŝite. Nenion plian mi povas diri. Kaj mi ĵuras ke ĝi estas la vero, ĉiu vorto”.

Kiam la Doktoro finis voĉlegi la longan parolon de Roĉjo la ekscititeco inter la dek du personoj de la ĵurio fariĝis ega. Unu, tre maljuna viro kun blanka hararo, komencis plori laŭtvoĉe pro la penso ke povra Luko kaŝis sin sur la marĉo pro neintencita ago. Kaj ĉiuj aliaj ĵurianoj komencis flustradi kaj kapjesadi inter si.

En la mezo de ĉio ĉi reekstaris tiu aĉa Prokuroro, svingante siajn brakojn eĉ pli sovaĝe.

“Via Moŝto”, li kriis, “mi devas oponi ĉi tiun atestaĵon, kiu estas unuflanka. Kompreneble la hundo ne dirus la veron kontraŭ sia propra mastro. Mi oponas. Mi protestas”.

“Tute bone”, diris la Juĝisto, “vi plene rajtas

kontraŭekzameni. Via devo, ĉar vi estas Prokuroro, estas pravi ke li mensogis. Jen la hundo: demandu al li, se vi ne kredas kion li diras”.

Mi kredis ke la longanaza advokato apopleksios. Li rigardis unue la hundon, poste la Doktoron, poste la Juĝiston, poste denove la hundon kiu grimacis al li de la atestejo. Li malfermis sian buŝon por diri ion; sed neniuj vortoj sonis. Li svingis siajn brakojn iom pli. Lia vizaĝo fariĝis konstante pli ruĝa. Fine, tenante sian frunton, li malforte sinkis al sia seĝo kaj du amikoj liaj devis helpi lin eliri el la procesejo. Dum li estis duone portata tra la pordejon li ankoraŭ feble murmuradis, “Mi protestas — mi oponas — mi protestas!”

8. TRI HURAOJ

POST tio la Juĝisto tre longe parolis al la ĵurio; kaj kiam li finis, la dek du ĵurianoj stariĝis kaj eliris en la apudan ĉambron. Tiupunkte la Doktoro revenis, kondukante Roĉjon, al la sidejo apud mi.

“Kial la ĵurianoj eliris?” mi demandis.

“Ili ĉiam faras tion ĉe la fino de proceso — por decidiĝi ĉu aŭ ne la kaptito estas kulpa”.

“Ĉu vi kaj Roĉjo ne povus eniri kun ili kaj helpi ilin ĝuste decidiĝi?” mi demandis.

“Ne, oni ne permesas tion. Ili devas diskuti sekrete. Kelkafoje necesas — Jadi, vidu, ili jam revenas! Ili ne bezonis longe diskuti”.

Ĉiu restis tute silenta dum la dek du viroj retretis al siaj lokoj en la benkaro. Post tio unu el ili, la estro — malgranda viro — stariĝis kaj turnis sin al la Juĝisto. Ĉiuj retenis sian spiron, precipe inkluzive de mi kaj la Doktoro, por trovi kion li diros. Oni povus aŭdi pinglon fali dum la tuta ĉeestantaro en la procesejo, la tuta anaro de Puddleby, efektive, atendis, etendante siajn kolojn kaj streĉante siajn orelojn por aŭdi la gravajn vortojn.

“Via Moŝto”, diris la malgranda viro, “la ĵurio verdiktas *Senkulpa*”.

“Kion tio signifas?” mi demandis, turninte min al la Doktoro.

Sed mi trovis Doktoron Johano Dolittle, la faman naturoscienciston, staranta sur la supro de sia seĝo, unukrure dancante kvazaŭ lerneĵano.

“Tio signifas ke li estas libera!” li kriis. “Luko estas libera!”

“Do li povos akompani nin dum la vojaĝo, ĉu ne?”

Sed mi ne povis aŭdi lian respondon; ĉar la tuta personaro en la procesejo ŝajnis saltanta sur seĝojn simile al la Doktoro. La homamaso subite freneziĝis. Ĉiuj ridadis kaj vokis kaj mansignis al Luko por montri kiom ili ĝojas pro lia liberiĝo. La bruego estis surdiga.

Subite eksilentis. Ĉio estis denove trankvila; kaj la homoj ekstaris respektoplene dum la Juĝisto foriris el la procesejo. Ĉar la proceso kontraŭ Luko la Ermito, tiu fama proceso kiun eĉ ankoraŭ nun oni diskutas en Puddleby, estis finita.

Dum la silento, dum la Juĝisto eliris, subita kriego eksonis, kaj jen en la pordejo staris virino, kies brakoj estis etenditaj al la Ermito.

“Luko!” ŝi kriis, “Fine mi trovis vin!”

“Jen lia edzino”, la dikulino antaŭ mi flustris. “Ŝi jam de dek kvin jaroj ne vidis lin, povrulino! Kia bela rekuniĝo. Mi ĝojas pro mia veno. Mi nenial volus malĉeesti ĉi tion!”

Tuj kiam la Juĝisto estis foririnta la bruo rekomenciĝis; kaj nun la homoj grupiĝis ĉirkaŭ Luko kaj lia edzino kaj premis ilian manon kaj gratulis ilin kaj ridis kaj larmis pro ili.

“Venu, do, Stubbins”, diris la Doktoro, prenante mian brakon, “ni eliru dum ni povos”.

“Sed ĉu vi ne parolos al Luko”, mi diris — por peti lin akompani nin en la vojaĝo?”

“Estus tute senutile”, diris la Doktoro. “Lia edzino

venis al li. Neniu viro havus eĉ oportuneton vojaĝadi kiam lia edzino jam de dek kvin jaroj ne vidis lin. Venu. Ni reiru hejmen por vespermanĝi. Ni ja ne lunĉis, memoru. Kaj ni meritas manĝi. Ni havos iun el tiuj miksitaj manĝoj, kombinita lunĉo-plus-vespermanĝo — kun nasturtio kaj ŝinko. Bela kombinaĵo. Venu.”

Ĝuste kiam ni estis elpaŝontaj ĉe flanka pordo mi aŭdis la homamason kriadi:

“La Doktoro! La Doktoro! Kie estas la Doktoro!”
La ermito estus pendumita se la Doktoro ne estus helpinta. Parolu! Parolu! — La Doktoro!”

Kaj viro alkuris nin kaj diris:

“La popolo alvokas vin, sinjoro”.

“Mi multe bedaŭras”, diris la Doktoro, “sed mi devas hasti”.

“La homamaso rifuzos lasi vin, sinjoro”, diris la viro. “Ili volas ke vi parolu al ili en la placo”.

“Petu ilin pardoni min”, diris la Doktoro — “kun miaj salutoj. Mi havas rendezuon farendan ĉe mia domo — tre gravan rendezuon, kiun mi nepre devas partopreni. Petu Lukon paroladi. Kunvenu, Stubbins, ĉidirekte”.

“Jadi!” li murmuris kiam ni eliris en la freŝan aeron kaj trovis novan homamason atendanta lin ĉe la flanka pordo. “Ni laŭiru tiun strateton — maldekstre. Hastu! Kuru!”

Ni komencis kuregadi, trarapidis kelkajn flankstratojn kaj nur malfacile sukcesis foriri de la homamaso.

Nur kiam ni atingis la vojon al Oksentorpo ni

kuraĝis malrapidiĝi kaj marŝi ordinare, kaj denove spiradi. Kaj eĉ kiam ni estis atingintaj la barilon de la Doktoro kaj turnis nin por retrorigardi la vilaĝon, la nelaŭta murmurado de multaj voĉoj ankoraŭ atingis nin per la vespera vento.

“Ili pu fervore vokas vin”, mi diris. “Aŭskultu!”

La murmurado subite fariĝis nelaŭta fora kriado; kaj kvankam ĝi estis du kilometrojn for, ni ankoraŭ povis klare aŭdi la vortojn:

“Tri huraojn pro Luko la Ermito: Hura! — Tri huraojn pro lia hundo: Hura! — Tri huraojn pro lia edzino — Hura! — Tri huraojn pro la Doktoro: Hura! Hura! HUU-R-AA!”

9. LA PURPURA PARADIZEO

POLINEZIO atendis nin sur la antaŭa verando. Ŝi aspektis plena de gravaj novaĵoj.

“Doktoro!” diris ŝi, “la Purpura Paradizeo alvenis!”

“Fine!” diris la Doktoro. “Mi komencis timi ke ŝi iel akcidentis. Kaj kiel fartas Mirando?”

Pro la ekscitita maniero laŭ kiu la Doktoro penis ŝovi sian ŝlosilon en la seruron, mi divenis ke ni ne tuj vespermanĝos, eĉ ne nun.

“Ho, ŝi aspektis bonfarta, kiam ŝi alvenis”, diris Polinezio — “laca pro sia longa veturo, kompreneble, sed alie bonfarta. Sed kion vi *opinions*? Tiu friponeta pasero Ĉipsajdo insultis ŝin tuj kiam ŝi eniris la ĝardenon. Kiam mi alvenis, ŝi estis ploranta kaj volis returni sin kaj reiri rekte al Brazilo ĉinokte mem. Mi devis strebegi por persvadi ŝin atendi ĝis vi venos. Ŝi estas en la kabineto. Mi enfermis Ĉipsajdon en unu el viaj libroŝrankoj kaj diris al li ke mi informos vin precize pri kio okazis tuj kiam vi venos hejmon”.

La Doktoro sulkis la frunton, poste marŝis silente kaj rapide al la kabineto.

Tie ni trovis la kandelojn brulantaj; ĉar la taglumo estis preskaŭ malaperinta. Dab-Dabo staris sur la planko gardante unu el la vitrofrontaj libroŝrankoj en kiun Ĉipsajdo estis enkarcerigita. La bruema pasereto ankoraŭ flirtadis kolere malantaŭ la vitro kiam ni envenis.

En la centro de la granda tablo, staranta sur la inkujo, staris la plej bela birdo kiun iam mi vidis. Ŝi

havis malhele violan bruston, skarlatajn flugilojn kaj longan vastan oran voston. Ŝi estis neimageble bela, sed aspektis lacega. Jam ŝi tenis sian kapon sub flugilo; kaj ŝi balancetis sur la inkujo kvazaŭ birdo fluginta longe kaj malproksimen.

“Ĉit!” diris Dab-Dabo. “Mirando dormas. Mi havas ĉi friponeton Ĉipsajdo en ĉi tio. Aŭskultu, Doktoro: je la Ĉielo forsendu tiun paseron antaŭ ol li plu misagos. Li estas nur impertinenta ĝenuleto. Ni devis strebegi persvadi Mirandon resti. Ĉu mi portu viajn manĝaĵojn ĉi tien, aŭ ĉu vi venos en la kuirejon kiam vi estos pretaj?”

“Ni iros en la kuirejon, Dab-Dabo”, diris la Doktoro. “Liberigu Ĉipsajdon antaŭ ol vi eliros, bonvolu”.

Dab-Dabo malfermis la pordon de la libroŝranko kaj Ĉipsajdo malmodereste elpavis, penante ne aspekti kulpa.

“Ĉipsajdo”, diris la Doktoro severe, “kion vi diris al Mirando kiam ŝi alvenis?”

“Mi nenion diris al ŝi, Doktoro, tutverege nenion. Nu, preskaŭ nenion. Mi prenadis panerojn de la gruzo pado kiam ŝi venas paradante en la ĝardenon, suprenturnante sian nazon ĉiudirekte, kvazaŭ ŝi posedas la teron — nur ĉar ŝi havas multajn kolorajn plumojn. Londona pasero estas egale bona kiel ŝi, ĉiuokaze. Mi ne ŝatas tiujn trobrilajn ornamitajn fremdulojn, neniom. Kial ili ne restas en sia propra lando?”

“Sed kion vi diris kio tiom ofendis ŝin?”

“Mi nur diris, ‘vi ne konvenas en angla ĝardeno; vi

devus esti en la montrofenestro de porvirina ĉapelisto'. Nur tion.

“Vi devus honti, Ĉipsajdo. Ĉu vi ne komprenas ke ŝi venis multajn milojn da kilometroj por paroli kun mi — kaj rezulte ŝin insultas via impertinenta lango tuj kiam ŝi atingas mian ĝardenon? Kion vi celis per tio? — Se ŝi estus reforirinta antaŭ ol mi revenis ĉinokte, mi neniam pardonus vin. — Foriru el la ĉambro”.

Ŝafece, sed ankoraŭ penante aspekti fiera, Ĉipsajdo elsaltetis en la koridoron kaj Dab-Dabo fermis la pordon.

La Doktoro iris al la bela birdo sur la inkujo kaj milde karesis ĝian dorson. Tuj ĝia kapo ekaperis el sub ĝiaflugilo.

10. LONGA SAGO, LA FILO DE ORA SAGO

“**N**U, Mirando”, diris la Doktoro, “mi bedaŭregas ke tio okazis. Sed ne malkvietigu vin Ĉipsajdo; li ne scias pli bone konduti. Li estas urba birdo; sian tutan vivon li devis baraktadi por sin vivteni. Vi devas kalkuli kun tio. Li ne scias pli bone konduti”.

Mirando etendis siajn belegajn flugilojn lace. Nun kiam mi vidis ŝin veka kaj moviĝanta, mi rimarkis kiom superan bone edukitan manieron ŝi havis. Estis larmoj en ŝiaj okuloj kaj ŝia beko tremadis.

“Ne tiom ĝenus min”, ŝi diris per alta arĝenteca voĉo, “se mi ne estus tiom ege laciĝinta. — Tio, kaj io alia”, ŝi aldonis, tre mallaŭte.

“Ĉu estis malfacile por vi, flugi ĉi tien?” demandis la Doktoro.

“La plej malfacilan flugon kiun iam mi faris”, diris Mirando. “La vetero — nu! Nu, ne gravas. Mi nun estas ĉi tie, tio plej gravas”.

“Diru al mi”, diris la Doktoro kvazaŭ li estis longe kaj senpacience atendinta por diri ion: “kion Longa Sago diris kiam vi diris al li mian mesaĝon?”

La Purpura Paradizeo dolore mienis.

“Jen la plej aĉa parto de ĉio”, ŝi diris. “Estus egale bone se mi tute ne estus veninta. Mi ne povis transdoni vian mesaĝon. Mi ne povis trovi lin. *Longa Sago, la filo de Ora Sago, malaperis!*”

“Malaperis!” kriis la Doktoro. “Kial? Kio okazis al li?”

“Neniu scias”, Mirando respondis. “Li ofte antaŭe

malaperis, kiel mi diris al vi — tiel ke la Indianoj ne sciis kie li estas. Sed estas malfacilege sin kaŝi de la birdoj. Mi ĉiam sukcesis trovi iun strigon aŭ hirundon kiu povis informi min kie li estas — kiam mi volis scii. Sed ne ĉifoje. Tial mi malfruas preskaŭ du semajnojn en mia veno al vi: mi serĉadis kaj serĉadis, demandadis ĉie. Mi traserĉis la tutajn longon kaj larĝon de Suda Ameriko. Sed tute neniu vivanta ulo povis informi min pri kie li estas”.

Estis morna silento en la ĉambro post ŝia parolo; la Doktoro sulkadis la frunton laŭ kurioza maniero kaj Polinezio gratis sian kapon.

“Ĉu vi demandis la nigrajn papagojn?” demandis Polinezio. “Ili kutime scias ĉion”.

“Certe mi demandis ilin”, diris Mirando. “Kaj mi tiom maltrankviliĝis pro mia malsukceso informiĝi, ke mi tute forgesis observi la veterospurojn antaŭ ol komenci mian flugon ĉi tien. Mi eĉ ne paŭzigis mian veturon ĉe la Acoroj, sed flugis rekte, celante la Ĝibraltaran Markolon — kvazaŭ estus dum junio aŭ julio. Kaj kompreneble mi renkontis ege teruran ŝtormon meze de Atlantiko. Vere, mi pensis ke mi neniel travivos ĝin. Bonŝance mi trovis pecon el averiinta ŝipo, flosantan en la maro post parta mildiĝo de la ŝtormo; kaj mi restis sur ĝi kaj iom dormis. Se mi ne estus ripozinta tie, mi ne estus ĉi tie por informi vin”.

“Povra Mirando! Kian spertaĉon vi trafis!” diris la Doktoro. “Sed diru al mi, ĉu vi sukcesis informiĝi pri kie Longa Sago estis lastafoje vidita?”

“Jes. Juna Albatroso diris al mi ke li vidis lin sur

Insulo Atelo.”

“Insulo Atelo? Tio estas ie proksime al la bordo de Brazilo, ĉu ne?”

“Jes ja. Kompreneble mi tuj flugis tien kaj demandis ĉiun birdon sur la insulo — kaj ĝi estas granda insulo, cent sesdek kilometrojn longa. Ŝajnas ke Longa Sago vizitadis iujn kuriozajn Indianojn kiuj loĝas tie; kaj kiam li estis laste vidita, li estis ironta en la montaron serĉonte rarajn medikamentajn plantojn. Mi akiris tiun informon de malsovaĝa falko, dorlot-birdo, kiun la Ĉefo de la Indianoj tenas por ĉasi perdrikojn. Mi mem estis preskaŭ kaptita kaj enkaĝigita, pro mia enketado. Tio estas la plej doloriga rezulto de bela plumaro: oni riskas la vivon proksimiĝante al homoj, plejofte. — Ili diras, ‘Ho, belega!’ kaj pafas sagon aŭ kuglon. Vi kaj Longa Sago estis la nuraj du homoj kiujn mi sufiĉe fidis por proksimiĝi al ili — el ĉiuj homoj en la mondo.”


“Sed ĉu neniu sciis ke li revenis de la montaro?”

“Ne. Tiu estis la lasta fojo kiam oni vidis lin aŭ eĉ aŭdis pri li. Mi demandis la marbirdojn ĉirkaŭ la bordoj por trovi ĉu li foriris de la insulo per kanuo. Sed ili povis diri nenion al mi.”

“Ĉu vi kredas ke iu akcidento trafis lin?” demandis la Doktoro per timoplena voĉo.

“Mi timas ke nepre jes”, diris Mirando, skuante sian kapon.

“Nu”, diris Johano Dolittle malrapide, “se mi neni-am povus renkonti Longan Sagon vizaĝ-al-vizaĝe, tio estus la plej granda desaponto en mia tuta vivo. Ne nur tio, sed ĝi estus granda perdo por la sciaro de la



“KION ALIAN MI POVUS SUPOZI?”

homa raso. Ĉar, laŭ kion vi rakontis al mi, li sciis pli da naturoscienco ol ni ĉiuj ceteraj kune; kaj se li mortis, kaj neniu skribis ĝin por li, por ke la mondo pliboniĝu per ĝi, estus terure. Sed vi ne vere kredas ke li estas morta, ĉu?

“Kion alian mi povus supozi?” demandis Mirando, ekplorante, “kiam jam de ses tutaj monatoj lin vidas nek besto, fiŝo aŭ birdo”.

11. BLINDA VETURADO

TIU informo pri Longa Sago malfeliĉigis nin ĉiujn. Kaj mi povis scii per la silenta reva maniero per kiu la Doktoro manĝis, ke li estis ege maltrankviligita. Fojfoje li ĉesis manĝi kaj sidis gapante la makulojn sur la tablotuko, kvazaŭ liaj pensoj estas tre distancaj; ĝis Dab-Dabo, kiu atentis por certigi ke li bone manĝos, tuis aŭ sonskuis la potojn en la lavpelvo.

Mi laŭeble plej penis gajigi lin, memorigante al li ĉion kion li faris por Luko kaj ties edzino tiun posttagmezon. Kaj kiam tio malsukcesis, mi daŭrigis per parolado pri niaj preparoj por la vojaĝo.

“Sed sciu, Stubbins”, diris li, dum ni stariĝis de la tablo kaj Dab-Dabo kaj Ĉi-Ĉio komencis forpreni la telerojn, “nun mi ne scias kien iri. Mi sentas min iom perdita ekde kiam Mirando alportis al mi ĉi tiun novaĵon. Dum ĉi tiu vojaĝo mi planis viziti Longan Sagon. Mi fervore anticipis tion ekde plena jaro. Mi kredis ke eble li povos helpi min lerni la lingvon de la moluskoj — kaj eble eĉ trovi metodon atingi la fundon de la maro. Sed nun? — Li malaperis! Kaj lia tuta granda scio malaperis kun li”.

Tiam li ŝajnis ekrevadi denove.

“Nur pensu!” li murmuris. “Longa Sago kaj mi, du studentoj. — Kvankam mi neniam renkontis lin, mi sentis kvazaŭ mi tute bone konas lin. Ĉar, liamane — sen formala studo — li dum sia tuta vivo penis fari precize kion mi penis fari miamane. — Kaj nun li malaperis! — Tuta mondo estis inter ni. —

Kaj nur birdo konis nin ambaŭ!”

Ni reiris en la kabineton, kie Jipo alportis al la Doktoro liajn pantoflojn kaj pipon. Kaj bruliginte la pipon, dum la fumo komencis plenigi la ĉambron, la maljunulo ŝajnis iomete regajiĝi.

“Sed vi ja faros ian vojaĝon, Doktoro, ĉu ne?” mi demandis, “eĉ kvankam vi ne povas renkonti Longan Sagon?”

Li ekrigardis akre mian vizaĝon; kaj mi supozas ke li vidis kiom maltrankvila mi estis. Ĉar li subite faris sian malnovan knabecon rideton kaj diris:

“Jes, Stubbins. Ne maltrankviliĝu. Ni vojaĝos. Ni devas nepre ne ĉesi laboradi kaj lernadi, eĉ kvankam povra Longa Sago malaperis. — Sed kien iri? jen la demando. Kien ni iru?”

Tiom multajn lokojn mi volis aliri ke mi ne povis tuj decidi. Kaj dum mi ankoraŭ pensadis, la Doktoro rektiĝis en sia seĝo kaj diris:

“Jen kion ni faros, Stubbins: ĝi estas ludo kiun mi faradis kiam mi estis juna — antaŭ ol Sarao venis loĝi kun mi. Mi nomis ĝin Blinda Veturado. Kiam mi volis vojaĝi, kaj ne povis decidi kien iri, mi prenis la atlason kaj malfermis ĝin kun miaj okuloj fermitaj. Poste, mi svingis krajonon, ankoraŭ sen rigardi, kaj metis ĝian pinton sur kiun ajn paĝon estis malfermiĝinta. Post tio mi malfermis la okulojn kaj rigardis. Ĝi estas tre ekscita ludo, Blinda Veturado. Ĉar oni devas ĵuri, antaŭ ol komenci, ke oni iros al la loko kiun la krajonno tuŝos, negrave kie la loko estas. Ĉu ni ludu tiel?”

“Ho jes!” mi preskaŭ kriis. “Estas ekscitege! Mi esperas ke estos Ĉinujo — aŭ Borneo — aŭ Bagdado.”

Kaj post nur momento mi estis grimpinta la libroŝrankon, trenis la grandan atlason de la supra breto kaj metis ĝin sur la tablon antaŭ la Doktoro.

Mi preskaŭ parkere konis ĉiun paĝon en tiu atlaso. Kiom multajn tagojn kaj noktojn mi studis ĝiajn malnovajn fadintajn mapojn, sekvante la bluajn riverojn de la montoj al la maro; scivolante kiel vere aspektas la malgrandaj vilaĝetoj, kaj kiom larĝaj estas la disterniĝintaj lagoj! Mi multe plezurigis min per tiu atlaso, veturante, en mia imago, ĉien en la mondo. Mi povas ankoraŭ nun vidi ĝin: la unua paĝo ne havis mapon; ĝi nur informis ke ĝi estis presita en Edinburgo en 1808, kaj multe pli pri la libro. La sekva paĝo estis la sunsistemo, montranta la sunon kaj planedojn, la stelojn kaj la lunon. La tria paĝo estis mapo de la Norda kaj Suda Polusoj. Sekvis la hemisferoj, la oceanoj, la kontinentoj kaj la landoj.

Dum la Doktoro komencis akriigi sian krajonon penso ektrafis min.

“Kion se la kraiono falos sur la Nordan Poluson”, mi demandis, “ĉu ni devos tien iri?”

“Ne. La reguloj de la ludo diras ke ne necesas iri al loko al kiu oni jam iris. Mi jam veturis al la Norda Poluso”, li finis trankvile, “do ne necesos iri tien”.

Mi apenaŭ povis paroli, pro mia mirego.

“*Vi jam iris al la Norda Poluso!*” Mi fine sukcesis balbuti. “Sed mi kredis ke ĝi ankoraŭ estas netrovita. La mapo montras ĉiujn lokojn kiujn atingis esploristoj kiuj *provis* iri tien. Kial via nomo ne estas listita se vi trovis ĝin?”

“Mi promesis ke restos sekrete. Kaj vi devas

promesi al mi ke vi neniam informos iun ajn. Jes, mi trovis la Nordan Poluson en aprilo 1809. Sed baldaŭ post mia alveno la polusaj ursoj venis grupe al mi kaj diris al mi ke estas multega karbo tie, kaŝita sub la neĝo. Ili scias, ili diris, ke homoj farus ion ajn, irus ien ajn, por akiri karbon. Do ĉu mi bonvolos teni tion sekreta? Ĉar tuj kiam homoj iros tien por komenci mini karbon, ilia bela blanka lando estos ruina — kaj nenie aliloke en la mondo estas sufiĉe malvarme por la komforto de polusaj ursoj. Do kompreneble mi nepre promesis tion al ili. Ha, nu, iu retrovos ĝin, iam. Sed mi volas ke la polusaj ursoj havu sian lud-ejon por si mem kiel eble plej longe. Kaj mi suspektas ke ja estos longe — ĉar certe ĝi estas malfacilege atingebla. — Nu, do, ĉu ni pretas? — Bone! Prenu la krajonon kaj staru ĉi tie proksime al la tablo. Kiam la libro ekmalfermiĝos, ĉirkaŭsvingu la krajonon trifoje kaj ekpiku suben. Ĉu vi pretas? — Bone. Fermu viajn okulojn.”

La momento estis streĉa kaj timiga — sed tre ekscita. Ni ambaŭ tenis siajn okulojn fermitaj. La aŭdis la atlason bruege malfermiĝi. Mi demandis al mi je kiu paĝo? Anglujo, aŭ Azio. Se estos la mapo de Azio, tiom gravos precize kie la kraiono ekpikos. Mi skuis trifoje cirkle. Mi komencis malsuprenigi mian manon. La pinto de la kraiono tuŝis la paĝon.

“Bone”, mi krietis, “estas farita”.

12. DESTINO KAJ DESTINADO

NI ambaŭ malfermis niajn okulojn; tiam kunbatis niajn kapojn pro nia fervoro kliniĝi kaj vidi kien ni iros.

La atlaso kuŝis malferma montrante mapon nomitan *Karto de Sudatlantika Oceano*. La pinto de mia kraĵono troviĝis precize en la centro de eta insulo. Ĝia nomo estis presita tiom ete ke la Doktoro devis elpreni siajn lupeajn okulvitrojn por legi ĝin. Mi tremis ekscitite.

“*Insulo Atelo.*” li legis malrapide. Tiam li fajfis mallaŭte. “Kiom eksterordinare! Vi trafis precize la insulon kie Longa Sago estis lastafoje vidita sur la tero — ĉu eble — nu, nu! Kiom nekredeble!”

“Ni ja iros tien, Doktoro, ĉu ne?” mi demandis.

“Kompreneble jes. La reguloj de la ludo diras ke ni devas fari tion.”

“Min ĝojigas ke ne montriĝis Oksentorpo aŭ Bristol”, mi diris. “Ĉi tio estos grandioza vojaĝo. Vidu kiom da maro necesos transiri. Ĉu ni bezonos longan tempon?”

“Ho ne”, diris la Doktoro — “ne multan. Per bona boato kaj bona vento ni facile atingos ĝin post kvar-semajna veturo. Sed ĉu ne estas nekredeble? El ĉiuj lokoj en la mondo vi elektis tiun, kun fermitaj okuloj. Insulo Atelo, jes ja! — Nu, unu bonaĵo rezultos el tio: mi povos akiri kelkajn ĵabizrajn skarabojn”.

“Kio estas ĵabizraj skaraboj?”

“Ili estas tre rara speco de skaraboj kun mal-

kutimaj emoj. Mi volas studi ilin. En nur tri landoj en la mondo ili troveblas. Insulo Atelo estas unu el la tri. Sed eĉ tie ili estas tre maloftaj”.

“Kial estas tiu demandosigno post la nomo de la Insulo?” mi demandis, indikante la mapon.

“Tio signifas ke la pozicio de la Insulo ne estas ekzakte sciata — ke verŝajne ĝi estas ie *proksime* al tie. Ŝipoj verŝajne vidis ĝin en tiu regiono, jen ĉio, mi supozas. Estas tute eble ke ni estos la unuaj blankuloj surbordiĝintaj tie. Sed sendube ni havos iom da malfacilo trovi ĝin, unue”.

Kiom reva ĉio sonis! Ni du sidante tie ĉe la granda studotablo; la brulantaj kandeloj; la fumo kurbiĝanta ĝis la senluma plafono el la pipo de la Doktoro — ni du sidantaj tie, parolante pri trovi insulon en la oceano kaj esti la unuaj blankuloj surbordiĝantaj sur ĝi.

“Neeviteble ĝi estos grandioza vojaĝo”, mi diris. “Ĝi aspektas bela insulo, sur la mapo. Ĉu estos nigruloj tie?”

“Ne. Kurioza tribo de Indianoj loĝas sur ĝi, min informis Mirando”.

Je tiu punkto la povra Paradizeo skuiĝetis kaj vekigis. Pro nia ekscito ni forgesis mallaŭte paroli.

“Ni iros al Insulo Atelo, Mirando”, diris la Doktoro. “Vi scias kie ĝi estas, ĉu ne?”

“Mi scias kie ĝi estis kiam lastafoje mi vidis ĝin”, diris la birdo. “Sed ĉu ĝi ankoraŭ estos tie, mi ne scias”.

“Kion tio signifas?” demandis la Doktoro. “Certe ĝi estas ĉiam samloke, ĉu ne?”

“Neniel”, diris Mirando. “Ĉu vi ne sciis? Insulo

Atelo estas *flosanta* insulo. Ĝi moviĝas ĉien ajn — kutime ie proksime al suda Suda Ameriko. Sed kompreneble mi certe povos trovi ĝin por vi se vi volas iri tien”.

Je tiu freŝa novaĵeto mi ne plu povis regi min. Mi fervoregis informi iun. Mi kuris dancante kaj kantante el la ĉambro por trovi Ĉi-Ĉion

Ĉe la pordo mi stumblis pro Dab-Dabo kiu estis envenanta kun siaj flugiloj ŝarĝitaj per teleroj kaj falis kapantaŭen sur mian nazon.

“Ĉu la knabo ekfreneziĝis?” kriis la anaso. “Kien vi supozas iri, bubeto?”

“Al Insulo Atelo! mi kriis, leviĝante kaj transkapiĝante laŭ la koridoro — “Insulo Atelo! Hura! — Kaj ĝi estas *flosanta* insulo!”

“Vi iros al frenezulejo, laŭ mi,” elnazspiregis la mastrumisto. “Vidu kion vi faris al miaj plej bonaj fajencaĵoj!”

“Sed mi estis multe tro feliĉa por aŭskulti ŝian riproĉadon; kaj mi plu kuris, kantante, en la kuirejon por trovi Ĉi-Ĉion.



Parto Tri

1. LA TRIA VIRO

JAM tiusemajne ni komencis prepari por la vojaĝo. Joĉjo, la mitilisto, estis moviginta *La Kurlon* laŭflue kaj liginta ĝin ĉe la rivermuro, tiel ke ĝi estos pli oportuna por ŝarĝado. Kaj dum tri tutaj tagoj ni portis proviantojn al nia bela nova boato kaj enlokigis ilin.

Min surprizis trovi kiom vasta kaj granda ĝi estis interne. Estis tri malgrandaj kajutoj, salono (= manĝoĉambro) kaj sub ĉio ĉi granda loko nomita holdo kie la manĝaĵoj kaj ekstraj veloj kaj aliaĵoj estis tenataj.

Mi kredas ke evidente Joĉjo informis ĉiujn en la vilaĝo pri nia estonta vojaĝo, ĉar ĉiam estis regula homamaso rigardanta nin kiam ni alportis aĵojn por enŝipigi ilin. Kaj kompreneble pli-malpli frue olda Mateo Mugg neeviteble ekaperis.

“Jadi, Tomĉjo”, diris lin, dum li rigardis min enporti kelkajn sakojn da faruno, “tio ja estas tre bela boato! Kien do la Doktoro iros ĉivojaĝe?”

“Ni iros al Insulo Atelo”, mi diris fiere.

“Kaj ĉu nur vi akompanas la Doktoron?”

“Nu, li ja parolis pri deziro kunpreni alian viron”, mi diris’ “sed ĝis nun li ne decidis pri tio”.

Mateo gruntis; post tio li strabe rigardis la graciajn mastojn de *La Kurlo*.

“Sciu, Tomĉjo”, diris li, “se ne ĝenus min reŭmatismo, mi mem iom volonte akompanus la Doktoron. Io pri boato staranta preta veli ĉiam donas al mi

aventureman kaj vetureman sentojn. Kio estas en la ladskatoloj kiujn vi enprenas?”

“Jen melaso”, mi diris — “naŭ kilogramojn da melaso”.

“Jadi”, li ĝemetis, turnante sin malfeliĉe. “Tio eĉ des pli dezirigas min akompani vin. — Sed mia reŭmatismo estas tiom severa ke mi apenaŭ—“

Mi ne aŭdis plion, ĉar Mateo estis foririnta, ankoraŭ murmurante, en la homamason kiu staradis ĉe la varfo. La horloĝo en Preĝejo Puddleby sonorigis la tagmezon kaj mi rekomencis, sentante min tre okupata kaj grava, la taskon ŝarĝadi.

Sed ne daŭris longe antaŭ ol iu alia venis kaj interrompis mian laboron. Ĉi tiu estis alta, granda, solidkorpa viro kun ruĝa barbo kaj tatusignoj sur la tuta surfaco de la brakoj. Li viŝis sian buŝon per la malantaŭo de sia mano, kraĉis dufoje sur la rivermuron, kaj diris:

‘Knabo, kie estas la estro?’


“La *estro!* Pri kiu vi parolas?” mi demandis.

“La kapitano. — Kie estas la kapitano de ĉi tiu ŝipo?” Li indikis *La Kurlon*.

“Ho, vi celas la Doktoron”, diris mi. “Nu, li ne ĉeestas nunmomente”.

Ĝuste tiam la Doktoro alvenis kun siaj brakoj plenaj de notlibroj kaj papiliretoj kaj vitraj kaĝoj kaj aliaj naturhistoriaĵoj. La granda viro iris al li, respekte tuŝante sian ĉapon.

“Bonan matenon, Kapitano”, diris li. “Mi aŭdis ke vi bezonas laboristojn por vojaĝo. Mi nomiĝas Benĉjo Buĉisto, sperta maristo”.



“KNABO, KIE ESTAS LA ESTRO?”

“Min multe plezurigas renkonti vin,” diris la Doktoro. Sed domaĝe mi ne povos uzi pli da maristoj”.

“Nu, sed Kapitano”, diris la sperta maristo, “nepre vi ne frontos la veteron de la profunda maro kun la helpo de nur ĉi tiu malgranda knabo — kaj en kutro tiom granda!”

La Doktoro certigis lin ke tion li faros; sed la viro ne foriris. Li restadis, kaj argumentadis. Li diris al ni ke li scias pri multaj ŝipoj averiintaj pro “malsufiĉa dungado”. Li montris al ni ion kion li nomis sia *certifikato* — folio kiu diris kion bona maristo li estas — kaj petegis ke, se ni valorigas niajn vivojn, ni kunprenu lin.

Sed la Doktoro parolis tre firme — ĝentile, sed senŝanceliĝe — kaj fine la viro formariĝis malfeliĉa, dirante al ni ke li anticipas neniam revidi nin vivaj.

Vizitantoj diversaspecaj daŭre okupis nin tiumatene. Kiam la Doktoro estis ĵus irinta al la malsupra etaĝo por ĝustalokigi siajn notlibrojn, ankoraŭ alia vizitanto aperis sur la pas-tabulo. Ĉi tiu estis plej eksterordinaraspekta nigrulo. La solaj aliaj negroj kiujn mi estis vidinta estis en cirkoj, kie ili surhavis plumojn kaj ostajn kolringojn k.s. Sed ĉi tiu estis vestita per laŭmoda frako kun enorma brile ruĝa kravato. Sur lia kapo estis pajla ĉapelo kun gajaspekta rubando; kaj super tio li tenis grandan verdan ombrelon. Li estis tre laŭmodaspekta, escepte de la piedoj. Li surhavis nek ŝuojn nek ŝtrumpetojn.

“Pardonu min”, diris li, riverencante elegante, “ĉu ĉi tiu estas la ŝipo de la kuracisto Dolittle?”

“Jes”, mi diris, “ĉu vi deziras paroli kun li?”

“Jes — se ne estus tro malkonvene”, li respondis.

“Kiun nomon mi menciuj al la Doktoro?”

“Mi estas Bumpo Kabubu, Kronprinco de Ĝoligin-kiujo”.

Mi tuj malsuprenkuris kaj informis la Doktoron.

“Kia bonfortuno!” kriis Johano Dolittle. “Mia malnova amiko Bumpo. Nu, nu! — Li studas ĉe Oksfordo, sciu. Kiom afabla li estas, veninte tiom longan distancon por viziti min!” Kaj li rapide ekgrimpis la eskalon por saluti sian vizitanton.

La stranga nigrulo ŝajnis plenigita per ĝojo kiam la Doktoro aperis, kaj premis lian manon elkore.

“Informo atingis min”, li diris, “ke vi estas ekvelonta vojaĝe. Mi hastis vidi vin antaŭ ol via foriro okazos. Mi sublime ekstazas ke mi ne maltrafis vin”.

“Vi efektive preskaŭ maltrafis nin”, diris la Doktoro. “Tamen, verdire, nin malfruigis iom la neceso akiri sufiĉe multajn virojn por veligi nian boaton. Sen tiu ĉagreno, ni estus foririntaj antaŭ tri tagoj”.

“Kiom da viroj la velistaro de via ŝipo ankoraŭ bezonas?” demandis Bumpo.

“Nur unu”, diris la Doktoro. — “Sed ne estas facile trovi ĝustan personon”.

“Tio kredigas al mi ke mi vidas la fingron de Destino en la situacio”, diris Bumpo. “Ĉu mi estus ĝusta persono?”

“Belege!”, diris la Doktoro. “Sed, kion pri viaj studoj? Vi ja ne povas simple foriri lasante vian universitatan karieron prizorgi sin mem, sciu”.

“Mi bezonas feriojn”, diris Bumpo. “Eĉ se mi ne irus kun vi, mi intencis fine de la aktuala jarparto entrepreni trimonatan forestiĝon. — Sed krome, mi ne neglektos mian edukon se mi akompanos vin. Antaŭ ol mi foriris el Ĝoliginkiujo, mia respektenda patro, la Reĝo, diris ke mi nepre multe vojaĝu. Vi estas persono ege studiemoplena. Vidi la mondon akompanante vin estas oportuno kiun mi nepre ne maltrafu. Ja ne, tute ne”.

“Kiel plaĉis al vi la vivo ĉe Oksfordo?” demandis la Doktoro.

“Ho, akceptebla, akceptebla”, diris Bumpo. “Plaĉis al mi ĉio, escepte de la algebro kaj la ŝuoj. La algebro dolorigis mian kapon kaj la ŝuoj dolorigis miajn piedojn. Mi ĵetis la ŝuojn trans muron tuj post mia eliro el la kvarlatera placo de la kolegio ĉimatene; kaj la algebron mi tre rapide forgesadas. — Mi ŝatis Ciceronon. — Jes, mi opinias Ciceronon tre bona — tiom simultana. Krome, oni diras ke lia filo remados por nia kolegio venontajare — ĉarma homo”.

La Doktoro rigardis la grandegajn nudajn piedojn de la nigrulo penseme dum momento.

“Nu”, li diris malrapide, “estas prava via diro, Bumpo, pri akiri edukon de la mondo kiel ankaŭ de la kolegio. Kaj se vi vere certas ke vi volas veni, ni tre volonte akceptos vin. Ĉar, tute vere, mi opinias ke vi estas precize tia viro, kian ni bezonas”.

2. ADIAŬ!

DU tagojn post tio ĉio estis preta por nia foriro. Je ĉi tiu vojaĝo Jipo tiom arde petis kunveni ke la Doktoro fine cedis kaj diris ke li rajtos kunveni. El la bestoj nur Polinezio kaj Ĉi-Ĉio akompanis nin. Dab-Dabo restis por mastrumi la domon kaj la bestofamilion kiun ni lasos.

Kompreneble, kiel ĉiam, lastamomente ni konstante memoris forgesitaĵojn; kaj kiam ni fine fermis la domon kaj descendis la ŝtupojn al la vojo, ni estis ŝarĝitaj per brakoplenoj da diversaj pakaĵoj.

Duonvoje al la rivero, la Doktoro subite memoris ke li lasis la buljonpoton bolanta super la fajro en la kuirejo. Tamen, ni vidis merlon preterflugantan kiu havis sian neston en nia ĝardeno, kaj la Doktoro petis ŝin porti mesaĝon al Dab-Dabo pri la afero.

Ĉe la rivermuro ni trovis grandan amason da homoj atendantaj por vidi nia foriron.

Starantaj tute apud la surirolanko estis miaj gepatroj. Mi esperis ke ili ne emociegos aŭ ekploros aŭ faros ion tian. Sed efektive ili kondukis tre bone — tiom, kiom eblas por gepatroj. Mia patrino diris ion pri ke mi certigu ke miaj piedoj ne malsekiĝos; kaj mia patro nur faris ian feblan rideton kaj deziris al mi bonan fortunon. Adiaŭoj estas ege malkomfortaj aferoj kaj mi ĝojis kiam ili estis finitaj kaj ni transiris sur la ŝipon.

Nin iom surprizis ke ni ne vidis Mateon Mugg inter la homoj. Ni estis konvinkitaj ke li tie estos; kaj

la Doktoro intencis doni al li kelkajn ekstrajn instrukciojn pri la manĝaĵoj por la bestoj kiujn ni postrestigis ĉe la domo.

Fine, post multa tiregado ni sukcesis levi la ankron kaj malligis multajn bolardoŝnurojn. Tiam *La Kurlo* komencis moviĝi lante laŭ la rivero, movate de la elfluanta tajdo, dum la homoj sur la muro hurais kaj svingis siajn naztukojn.

Ni kolizietis kontraŭ unu-du aliaj boatoj elirante en la fluon; kaj ĉe unu severa kurbiĝo de la rivero ni fiksiĝis en kotaj malprofundaĵoj dum kelkaj minutoj. Sed kvankam la homoj sur la bordo ŝajnis tre ekscitiĝi pro tiaj aferoj, la Doktoron ili tute ne ĉagrenis.

“Tiaj malgrandaj akcidentoj okazas dum la plej bone direktataj vojaĝoj”, li diris, klinante sin super la flankon kaj penante kapti siajn botojn, kiuj estis fiksiĝintaj en la koto dum ni depuŝis nin. “Velado estas multe pli facila kiam oni jam atingis la apertan maron. Ne estas tiom da stultaĵoj kontraŭ kiujn oni povas kolizii”.

Por mi ja vere estis granda kaj miriga sento kiam, irinte en la apertan maron, pasinte la malgranda lumturon ĉe la enfluejo de la rivero, ni trovis nin tute for de la tero. Ĉio estis tiom nova kaj diferenca: nur la ĉielo supere kaj la maro sube. Ĉi tiu ŝipo, kiu estos nia domo kaj nia strato, nia hejmo kaj nia ĝardeno, dum tiom da sekvaj tagoj, aspektis tiom eta en ĉi tiu vasta akvego — tiom eta, tamen tiom komforta, sufiĉa, sekura.

Mi rigardis ĉirkaŭ min kaj profunde enspiris. La

Doktoro estis ĉe la rado stirante la boaton, kiu nun saltadis kaj malsaltadis milde tra la ondoj. (Mi anticipis senti marmalsanon, sed ĝojigis min la trovo ke tio ne okazis.) Bumpo estis ordonita descendi kaj pretigi la vespermanĝon por ni. Ĉi-Ĉio volvadis dikajn ŝnuregojn en la malantaŭo kaj nete stakis ilin. Mia tasko estis sekure ligi ĉion sur la ferdeko, tiel ke nenio povos ruliĝi se la vetero iĝos malpaca kiam ni estos pli malproksime de la tero. Jipo estis en la pruo de la boato kun siaj oreloj levitaj kaj nazo etendita — kvazaŭ statuo, tiom senmove — liaj akraj maljunaj oreloj atente serĉis flosantajn vrakojn, kotmalprofundaĵojn, kaj aliajn danĝerojn. Ĉiu el ni havis propran taskon, kiel parton de la ĝusta veturigado de ŝipo. Eĉ olda Polinezio mezuris la temperaturon de la maro per la bantermometro de la Doktoro ligita al la finaĵo de ŝnuro, por certigi ke ne estas glacimontoj proksimaj. Dum mi aŭskultis ŝin sakradi mallaŭta-voĉe al si ĉar ŝi ne povis legi la ciferaĵojn pro la fadanta lumo, mi ekkonsciis ke la vojaĝo nun serioze komenciĝis kaj ke tre baldaŭ estos nokto — mia unua nokto sur la maro!

3. NIAJ ĜENOJ KOMENCIĜAS

TUJ antaŭ la manĝohoro Bumpo aperis de mal-supre kaj iris al la Doktoro ĉe la rado.

“Kaŝveturanto en la holdo, sinjoro”, diris li per tre profesieca marista voĉo. “Mi ĵus trovis lin, malantaŭ la sako de faruno”.

“Jadi!” diris la Doktoro. “Kia ĝeno! Stubbins, akompanu Bumpon kaj alvenigu la viron. Mi ne povas foriri de la rado ĝuste nun”.

Do Bumpo kaj mi descendis en la holdon; kaj jen, malantaŭ la farunsakoj, kovritan de faruno de la kapo ĝis la piedoj, ni trovis viron. Forbalaŭte de sur li la plej grandan parton de la faruno per balailo, ni trovis ke temas pri Mateo Mugg. Ni trenis lin, ternantan, supren, antaŭ la Doktoron.

“Nu, Mateo!” diris Johano Dolittle. “Kion je la Ĉielo vi faras ĉi tie?”

“La tento estis tro multa por mi, Doktoro”, diris la porkata-viandovendisto. “Vi scias ke mi ofte petis vin preni min kun vi dum viaj vojaĝoj, kaj vi ĉiam rifuzis. Nu, ĉifoje, sciante ke vi bezonas plian laboriston, mi pensis ke se mi restos kaŝita ĝis la ŝipo estos vere surmara, vi trovos min iel utila kaj akceptos min. Sed mi devis kuŝi tiom faldiĝinte dum multaj horoj, malantaŭ tiuj farunsakoj, ke mia reŭmatismo severe atakis min denove. Mi simple devis ŝanĝi mian pozicion; kaj kompreneble, ĝuste kiam mi etendis miajn kruojn, jen venas ĉi tiu afrikana kuiristo via kaj vidas miajn kruojn etenditajn. — Ve, ĉi ŝipo

rulegiĝas! Kiom longe jam daŭris ĉi tiu ŝtormo? Mi kredas ke ĉi tiu malseka maraero ne bone efikos je mia reŭmatismo”.

“Ne, Mateo, ĝi vere ne bone efikos. Vi devus ne esti veninta. Vi tute ne taŭgas por ĉi tia vivo. Mi certas ke vi neniel ĝuus longan vojaĝon. Ni haltos ĉe Penzanco kaj surterigos vin. Bumpo, bonvolu descendi al mia litbenko; kaj aŭskultu: en poŝo de mia negliĝo vi trovos kelkajn mapojn. Alportu al mi la malgrandan mapon — ĝi havas multajn bluajn krajonsignojn ĉe sia supro. Mi scias ke Penzanco estas ie maldekstre de ni. Sed mi devos trovi kiuj lumturoj estas tie antaŭ ol ŝanĝi la direkton de la ŝipo kaj veli borden”.

“Jes ja, sinjoro” diris Bumpo, kaj li turnis sin profesiece kaj paŝis al la ŝtuparo.

“Nu, Mateo”, diris la Doktoro, “vi povos preni la diliĝencon de Penzanco al Bristol. Kaj de tie ne estas tre malproksime ĝis Puddleby, kiel vi scias. Ne forgesu porti la kutimajn proviantojn al la domo ĉiujn, kaj nepre atentu memori la ekstran kvanton da haringoj por la bebaj vizonoj”.

Dum ni atendis la mapojn Ĉi-Ĉio kaj mi komencis lumigi la lampojn: verdan dekstraflanke de la ŝipo, ruĝan maldekstraflanke, kaj blankan sur la masto.

Fine ni aŭdis iun paŝegi sur la ŝtupoj denove kaj la Doktoro diris:

“Ha, fine jen Bumpo kun la mapoj, ĉu?”

Sed multe mirigis nin ke ne Bumpo aperis sola, sed aperis *tri* personoj.

“Jadi jadi! Kiuj ili estas?” kriis Johano Dolittle.

“Ankoraŭ du pliaj kaŝveturantoj, sinjoro”, diris Bumpo, antaŭenpaŝante profesiece. “Mi trovis ilin en via kajuto sub la litbenko. Unu viro kaj unu virino, sinjoro. Jen la mapoj”.

“Vere tro multegas!” diris la Doktoro feble. “Kiu ili estas. Mi ne povas vidi iliajn vizaĝojn en ĉi tiu malforta lumo. Flamigu alumeton, Bumpo”.

Vi neniel povus diveni kiuj estis. Estis Luko kaj lia edzino. S-ino Luko aspektis tre mizera kaj marmalsana.

Ili eksplikis al la Doktoro ke post ilia reiro por loĝi en la dometo sur la marĉoj, tiom da homoj venis viziti ilin (aŭdinte pri la granda proceso), ke la vivo fariĝis malebla; kaj ili decidis eskapi el Puddleby ĉi tiel — ĉar ili ne havis sufiĉan monon por foriri alimaniere — kaj peni trovi iun novan loĝlokon kie ili kaj ilia historio ne estos tiom bone konataj. Sed tuj kiam la ŝipo komencis ruliĝi S-ino Luko fariĝis ege malsana.

Povra Luko pardonpetis multfoje pro la ĝenego kaj diris ke la tuta afero estis proponita de lia edzino.

La Doktoro, veniginte el la malsupra etaĝo sian medikamentosakon kaj doninte al S-ino Luko iom da *sal volatile* kaj odorsaloj, diris ke li opinias ke plej bone estos ke li pruntedonu al ili iom da mono kaj surbordigu ilin kun Mateo ĉe Penzanco. Li ankaŭ verkis leteron kiun Luko povos kunpreni al amiko de la Doktoro en la vilaĝo Penzanco, kiu, espereble, povos trovi laboron por Luko tie.

Dum la Doktoro malfermis sian monujon kaj elprenis kelkajn orajn monerojn mi aŭdis Polinezion,

kiu sidis sur mia ŝultro rigardante la tutan aferon, murmuri mallaŭtavoĉe:

“Jen ja — pruntedonas sian lastan sakrindan pencon — tri pundojn kaj dek ŝilingojn — nian tutan monprovizon por la tuta vojaĝo. Nun ni ne havas eĉ la prezon de poŝtmarko alilande se hazarde ni perdos ankron aŭ devos aĉeti duonan litron da gudro. — Nu, ni preĝu ke ni ne eluzos niajn manĝaĵojn. — Kial li ne donas al ili la ŝipon, kaj mem marŝas hejmen?”

Baldaŭ, helpate de la mapo, la direkto de la ŝipo estis ŝanĝita kaj, tre komfortige por S-ino Luko, ni celis Penzancon kaj la sekan teron.

Min multege interesis vidi kiel ŝipo estas stirebla en havenon dum la nokto gvidate nur per lumturoj kaj kompasoj. Ŝajnis al mi ke la Doktoro maltrafis ĉiujn rokojn kaj sablomalprofundaĵojn tre lerte.

Ni eniris tiun kuriozan kornvalan havenon je ĉirkaŭ la dekunua horo nokte. La Doktoro surbordigis siajn kaŝveturantojn per nia malgranda remboato, kiun ni tenis sur la ferdeko de *La Kurlo* kaj trovis ĉambrojn por ili en la hotelo tie. Kiam li revenis, li diris al ni ke S-ino Luko tuj enlitiĝis kaj sentas sin multe pli bonfarta.

Nun estis postnoktomeze; do ni decidis resti en la haveno kaj atendi la matenon antaŭ ol reforveturi.

Min plezurigis enlitiĝi, kvankam mi sentis ke estas tre plezurige resti veka ĝis tiom malfrua horo. Kiam mi grimpis en la benkoliton super tiu de la Doktoro kaj tiris la litkovrilojn komforte sur min, mi trovis ke mi povas travidi la lukon ĉe mia kubuto, kaj, sen levi mian kapon de la kapkuseno, mi povas vidi la lumojn

de Penzanco balanceti laŭ la moviĝo de la ankrita boato. Estis kvazaŭ oni endormiĝas lulate dum okazas malgranda distraĵo. Mi komencis decidi ke al mi tre multe plaĉas la vivo sur la maro kiam mi profunde endormiĝis.

4. NIAJ ĜENOJ PLIIĜAS

LA sekvan matenon dum ni manĝis vere bonegan matenmanĝon konsistantan el renoj kaj lardo, preparitan de nia bona kuiristo Bumpo, la Doktoro diris al mi:

“Mi demandas al mi, Stubbins, ĉu mi devus halti ĉe Insuloj Kabo Blanka aŭ rekte veturi al la brazila bordo. Mirando diris ke ni povas anticipi periodon de bonega vetero nun — dum almenaŭ kvar kaj duona semajnoj”.

“Nu”, mi diris, elkulerumante la sukeron ĉe la fundo de mia kakaotaso, “Ŝajnas al mi ke estos plej bone rekte veturi dum ni certas pri bona vetero. Kaj krome, la Purpura Paradizeo atendos nin, ĉu ne? Ŝi maltrankviliĝos pri nia fato, se ni ne atingos tien post proksimume monato”.

“Prave, tute prave, Stubbins. Alternative, Insuloj Kabo Blanka estus tre utila haltejo en nia transveturo. Se ni bezonos proviantojn aŭ riparojn, estus tre utile halti tie”.

“Kiom longe necesos por veturi de ĉi tie al Insuloj Kabo Blanka?” mi demandis.

“Ĉirkaŭ ses tagojn”, diris la Doktoro. — “Nu, ni povos poste decidi. Dum almenaŭ la du sekvaj tagoj nia direkto estos preskaŭ sama ambaŭkaze. Se vi jam finis matenmanĝi, ni ekveturu”.

Surferdeke mi trovis nian ŝipon ĉirkaŭata de blankaj kaj grizaj mevoj kiuj flirtis kaj ĉirkaŭiradis en la sunbrila matena aero, serĉante manĝaĵrestaĵojn el-

ĵetitajn el la ŝipoj en la havenon.

Ja proksimume la sepa kaj duona ni estis levintaj la ankron kaj fiksintaj la velojn por utiligi la belan senvarian venteton: kaj ĉifoje ni sukcesis eliri en la apertan maron tute sen kolizii kontraŭ ion ajn. Ni renkontis la penzancan fiŝkaptistan boataron revenantan post nokto da fiŝkaptado, kaj tre netaj kaj profesiaj ili aspektis, vicigitaj kvazaŭ soldatoj, kun siaj ruĝebrunaj veloj ĉiuj klinitaj sammaniere kaj la blanka akvo dancanta antaŭ iliaj pruoj.

Dum la sekvaj tri-kvar tagoj ĉio progresis glate kaj nenio nekutima okazis. Dum tiu tempo ni ĉiuj kutimiĝis al niaj taskoj; kaj dum liberaj momentoj la Doktoro instruis al ĉiu el ni vice deĵori ĉe la rado, kiel ĝuste direktadi la ŝipon, kaj kion fari se la vento ekŝanĝiĝas. Ni dividis la dudek kvar horojn de la tago en tri partojn; kaj ni laŭvice dormis ok horojn kaj restis vekaj dek ses. Do la ŝipo estis bone prizorgata, kaj ĉiam deĵoris du el ni.

Krome, Polinezio, kiu estis pli sperta velisto ol ĉiu alia el ni, kaj vere sciis multon pri funkciigado de ŝipoj, ŝajne estis ĉiam veka — escepte de kiam ŝi dormetis en la sunlumo, starante per unu kruro apud la rado. Tute certe neniu iam sukcesis resti enlite pli ol ok horojn kiam Polinezio ĉeestis. Ŝi zorge atentis la ŝiphorloĝon; kaj se oni trodormis eĉ duonan minuto, ŝi venis al onia kajuto kaj bekpikis onian nazon ĝis oni ellitiĝis.

Mi tre baldaŭ multe ekamis nia amuzan nigran amikon Bumpo, malgraŭ lia grandiozema parolmaniero kaj liaj enormaj piedoj, kiujn ĉiam iu surtretis, aŭ

pro kiuj iu stumblis. Kvankam li estis multe pli aĝa ol mi kaj studis en kolegio, li neniam supozis sin supera al mi. Li ŝajnis ĉiam rideti kaj bonhumorigis nin ĉiujn. Post nelonge mi komencis kompreni kiom prudenta estis la Doktoro per sia kunvenigo de li — eĉ kvankam li sciis tute nenion pri velado nek vojaĝado.

La matenon de la kvina tago sur la maro, ĝuste kiam mi estis prenonta la radon de la Doktoro, Bumpo aperis kaj diris:

“La salumita bovaĵo estas preskaŭ eluzita, sinjoro”.

“La salumita bovaĵo!” kriis la Doktoro. “Sed ni kunportis kvindek kvin kilogramojn. Ni neniel povus esti manĝintaj tiom en kvin tagoj. Kio okazis al ĝi?”

“Mi tute ne scias, sinjoro. Kiam ajn mi iras al la stokaĵoj mi trovas ke mankas alia pecego. Se ratoj manĝas ĝin, nepre ili estas kolosaj ratoj”.

Polinezio, kiu grimpadis kaj malgrimpadis velŝnuregon, por sia matena sinekzercado, interrompis:

“Ni devos traserĉi la holdon. Se ni permesos ke tio daŭru, ni ĉiuj morte malsatos post malpli ol semajno. Malsuprenvenu kun mi, Tomĉjo, kaj ni enketos pri la afero”.

Do ni descendis en la stokejon kaj Polinezio diris ke ni tute silentu kaj aŭskultu. Tion ni faris. Kaj post nelonge el senluma angulo de la holdo ni aŭdis la klaran sonon de ronkanto.

“Ha, tion mi atendis”, diris Polinezio. “Viro — granda viro. Engrimpu, vi ambaŭ, kaj eltrenu lin. Laŭ la sono li estas malantaŭ tiu barelo. — Jadi! Ŝajne ni kunvenigis duonon de la loĝantaro de Puddleby! Ni preskaŭ povus esti pramo. Kia aŭdaco! Eltrenu lin”.

Do Bumpo kaj mi lumigis lanternon kaj transgrimpis la stokaĵojn. Kaj tiel, malantaŭ la barelo, ni efektive trovis enorman barbulon dormanta kun sat-ega mieno. Ni vekis lin.

“Kiostas?” li diris dormeme.

Estis Benĉjo Buĉisto, la sperta maristo.

Polinezio flagris kvazaŭ kolera piroteknikaĵo.

“Jen la troiga pajlero”, diris ŝi. “La unusola viro kiun ni plej malvolis. Kia fiaŭdacaĵo!”

“Ĉu ne estus konsilinde”, proponis Bumpo, “dum la kanajlo ankoraŭ estas dormema, bati lian kapon per io multepeza kaj puŝi lin tra lukon en la maron?”

“Ne. Ni embarasiĝus,” diris Polinezio. “Ni ne estas en Ĝoliginkiujo nun, memoru — domaĝe! — Kaj krome, neniam ekzistis luko sufiĉe granda por trapuŝi tiun viron. Konduku lin sur la ferdekon al la Doktoro”.

Do ni kondukis la viron al la rado, kie li respekto-plene tuŝis sian kapon salute al la Doktoro.

“Plia kaŝveturanto, sinjoro”, diris Bumpo profesie.

Ŝajnis al mi ke la Doktoro preskaŭ apopleksiis.

“Bonan matenon, Kapitano”, diris la viro. “Benĉjo Buĉisto, sperta maristo por servi vin. Mi sciis ke vi bezonos min, do mi kuraĝis kaŝi min — tute malgraŭ mia konscienco. Sed mi neniel povis toleri vidi vin, povrajn terulojn, ekvojaĝi tute sen eĉ unu vera maristo por helpi vin. Vi neniam reirus vivaj al viaj hejmoj sen mi. — Nu, rigardu vian ĉefvelon, sinjoro — tute malstreĉa ĉe sia gorgo. Venas la unua ventoblovo, kaj forflugas via kanvaso. Tamen, estos bone nun, pro mia kunesto. Ni baldaŭ reĝustigos

ĉion”.

“Ne, ne estos bone”, diris la Doktoro, “estos tute malbone. Kaj tute ne plezurigas min vidi vin. Mi diris al vi en Puddleby ke mi ne volas vin. Vi tute ne rajtis kunveni”.

“Sed Kapitano”, diris la sperta maristo, “vi ne povos veligi ĉi ŝipon sen mi. Vi ne komprenas navigadon. Ja vere, rigardu la kompason nun; vi lasis ĝin iri unu kaj duonan punktojn for de sia direkto. Estas frenezo ke vi provas sola fari ĉi tiun vojaĝon — pardonu mian senkaŝan paroladon, sinjoro — ho, vi pereigos la ŝipon!”

“Atentu”, diris la Doktoro, dum subita severa rigardo aperis en liaj okuloj, “pereigi ŝipon signifas por mi nenion. Mi jam pereigis ŝipojn antaŭ nin, kaj tio neniel ĝenas min. Kiam mi entreprenas atingi iun lokon, mi atingas ĝin. Ĉu vi komprenas? Eble mi scias nenion ajn pri velado kaj navigado, tamen mi malgraŭ tio atingas mian celon. Nu, eble vi estas la plej kompetenta maristo en la mondo, sed sur *ĉi tiu* ŝipo vi estas tre vulgara tre ordinara ĝeno — tre vulgara kaj tre ordinara. Kaj mi nun haltos ĉe la plej proksima haveno kaj surterigos vin”.

“Jes, kaj kredu vin bonfortuna”, Polinezio aldonis, “ke vi ne estos enkarcerigita pro kaŝveturado kaj ĉar vi manĝis nian tutan provizon da salumita bovaĵo”

“Mi ne scias kiaĉan agon ni faros nun”, mi aŭdis ŝin flustri al Bumpo. “Ne ne havas monon por aĉeti pli; kaj tiu salumita bovaĵo estis la plej grava parto de nia provianto”.

“Ĉu ne estus bona politika ekonomiko”, responde

flustris Bumpo, “salumi la mariston kaj manĝi lin anstataŭe? Mi taksas lian pezon je pli ol kvindek kvin kilogramoj”.

“Kiom ofte mi devas ripeti al vi ke ni ne estas en Ĝoliginkiujo”, koleretis Polinezio. “Tiaĵojn oni ne faras en ŝipo de blankuloj. — Tamen”, ŝi murmuris post momento da pensado, “vere estas bela ideo. Mi supozas ke neniu vidis lin eniri la ŝipon — Ho, sed je la Ĉielo! Ni ne havas sufiĉe da salo. Krome, neeviteble li havus tabakan guston”.

5. POLINEZIO HAVAS PLANON

TIAM la Doktoro petis min preni la radon dum li faros kalkulon per sia mapo kaj decidos kiudirekte iri.

“Mi devos malgraŭ ĉio veturi al Insuloj Kabo Blanka”, li diris al mi kiam la dorso de la maristo estis turnita al ni. “Kia ĝenaĉo! Sed mi preferus renaĝi al Puddleby ol devi aŭskulti tiun ulaĉon babiladi tutvojaĝe al Brazilo”.

Vere li estis personaĉo, tiu Benĉjo Buĉisto. Estas supozeble ke kiu ajn, informite ke li estas maldezirata, estus sufiĉe deca por silenti. Sed ne Benĉjo Buĉisto. Li konstante ĉirkaŭpromenis sur la ferdeko, indikante ĉion malĝuste faritan de ni. La ankro estis misligita; la lukoj estis misfermitaj; la veloj estis inversaj; ĉiuj niaj nodoj estis malĝustaspecaj.

Fine la Doktoro ordonis ke li ĉesu paroli kaj iru malsupren. Li rifuzis — diris ke li ne akceptos esti sinkigita de teruloj dum li ankoraŭ kapablas resti sur la ferdeko.

Tio malkvietigis nin iomete. Li estis enorma viro kaj vere ne eblis scii kion li farus se li fariĝus vere neregebla.

Bumpo kaj mi diskutis ĉi tion malsupre en la manĝoĉambro kiam Polinezio, Jipo kaj Ĉi-Ĉio venis esti kun ni. Kaj, kiel kutime Polinezio havis planon.

“Aŭskultu”, ŝi diris, “Mi certas ke ĉi Benĉjo Buĉisto estas kontrabandisto kaj fiulo. Mi tre fidinde taksas maristojn, memoru, kaj al mi malplaĉas la maniero

de ĉi viro. Mi” —

“Ĉu vi vere kredas”, mi interrompis, “ke estas sekure ke la Doktoro transiros Atlantikon tute sen profesiaj maristoj sur la ŝipo?”

Komprenu ke multe maltrankviligis min la trovo ke ĉio farita de ni estis misfarita; kaj mi komencis demandi al mi kio okazus se ni renkontus ŝtormon — precipe ĉar Mirando diris nur ke la vetero restos bona dum kelka tempo; kaj ŝajnis al mi ke nin prokrastigas tiom da aferoj. Sed Polinezio nur kapskuis malestime.

“Ho, benu vin, mia knabo”, diris ŝi, “vi ĉiam estas sekura kun Johano Dolittle. Memoru tion. Neniom atentu tiun stultan salulon. Komprenoble, estas tute vere ke la Doktoro fuŝas ĉion. Sed kiam temas pri li, ne gravas. Zorge atentu min, kiam oni vojaĝas kun Johano Dolittle oni ĉiam atingas onian celokon, kiel vi aŭdis. Mi tre multafoje veturis kun li, kaj mi scias. Kelkafoje la ŝipo atingas renversita sian celokon, kaj kelkafoje malrenversita. Sed oni alvenas, tutegale. Kaj, komprenoble, io alia veras pri la Doktoro”, ŝi aldonis penseme: “li ĉiam havas eksterordinare bonan fortunon. Kelkafoje li renkontas problemojn; sed kiam temas pri li, ĉio prosperas fine. Mi memoras ke unufoje dum ni trairis Markolon Magelanan la vento estis tiom forta” —

“Sed kion ni faros pri Benĉjo Buĉisto?” Jipo interrompis. “Vi havis ian planon, Polinezio, ĉu ne?”

“Jes. Kio timigas min estas ke li eble batos la kapon de la nerigardanta Doktoro kaj faros sin kapitano de *La Kurlo*. Fimaristoj faras tion kelkafoje.

Poste ili regas la ŝipon laŭ sia propra volo kaj veturigas ĝin kien ili volas. Oni nomas tion ribelo”.

“Jes”, diris Jipo, “kaj ni devas fari tion baldaŭege. Ni ne povos atingi Insulojn Kabo Blanka antaŭ postmorgaŭ, plej frue. Mi malemas lasi la Doktoron sola kun tiu viro eĉ por minuto. Li odoras kiel tre fia persono, laŭ mi”.

“Nu, mi plene planis solvon”, diris Polinezio. “Atentu: ĉu estas ŝlosilo en tiu pordo?”

Ni rigardis ekster la manĝoĉambro kaj trovis ke ja estas ŝlosilo.

“Bone”, diris Polinezio. “Nu, Bumpo pretigos la tablon por lunĉo kaj ni ĉiuj kaŝos nin. Je la tagmezo Bumpo sonigos la manĝosonorilon ĉi tie. Tuj kiam Benĉjo aŭdos ĝin, li venos ĉi tien, anticipante pli da salumita bovaĵo. Bumpo devos kaŝi sin malantaŭ la pordo ekstere. Tuj kiam Benĉjo estas sidiĝinta ĉe la tablo Bumpo fortege fermas la pordon kaj ŝlosas ĝin. Tiel li estos kaptita, ĉu ne?”

“Kiom strategenie!” Bumpo subridis. “Kiel diris Cicerono, *papagoj kun parokanoj facilime congregacion*. Mi tuj pretigos la tablon”.

“Jes, kaj prenu la spicsaŭcon forde la tirkesto kiam vi eliros”, diris Polinezio. “Ne lasu iun ajn manĝeblaĵon ĉi tie. Tiu ulo jam manĝis sufiĉe por tri tagoj. Kaj krome, li ne tiom inklinos komenci batalon kiam ni surbordigos lin ĉe Insuloj Kabo Blanka se ni estos maldikigintaj lin iomete antaŭ ol liberigi lin”.

Do ni ĉiuj eliris kaj kaŝis nin en la koridoro kie ni povis rigardi kio okazas. Kaj baldaŭ Bumpo venis al la piedo de la ŝtuparo kaj sonegigis la manĝosonorilon.

Post tio li saltetis malantaŭ la pordon de la manĝo-
ĉambro kaj ni ĉiuj silente aŭskultadis.

Preskaŭ tuj, *tump, tump, tump* laŭ la ŝtuparo tretis Benĉjo Buĉisto, la sperta maristo. Li marŝis en la manĝosalonon, sidiĝis ĉe la kapo de la tablo sur la sidloko de la Doktoro, metis buŝtukon sub sian dikan mentonon, kaj faris suspiron de manĝanticipo.

Kaj, *bam!* Bumpo puŝfermis la pordon kaj ŝloŝis ĝin.

“Tio mankigas *lin* al ni por kelka tempo”, diris Polinezio, veninte el sia kaŝejo. “Nun li instruu navigadon al la ŝranko. Ve, kiom aŭdaca viro! Mi jam forgesis pli pri la maro ol iam scios tiu sensciulo. Ni ascendu kaj informu la Doktoron. Bumpo, vi devos prezenti la manĝaĵojn en la kajuto dum la sekvaj kelkaj tagoj”.

Kaj ekkantante viglan norvegan maristan kanton ŝi grimpis sur mian ŝultron kaj iris sur la ferdekon.

6. LA LITFARISTO DE MONTEVERDO

NI restis tri tagojn ĉe la Insuloj Kabo Blanka. Pro du kialoj ni restis tie tiom longe, kvankam ni fervoris reekvojaĝi. Unu estis la manko de provianto pro la enorma apetito de la sperta maristo. Kiam ni komencis kontroli la proviantostokon kaj fari liston, ni trovis ke li estis manĝinta multe pli ol nur la bov-aĵon. Kaj ĉar ni ne havis monon, ni estis vere perpleksaj pri kiel aĉeti pli. La Doktoro traserĉis sian kofron por trovi ĉu enestas io vendebla. Sed li povis trovi nur malnovan poŝhorloĝon kies indikiloj estis rompitaĵ kaj la dorso kavigita; kaj ni decidis ke tio ne vendeblus por sufiĉe da mono por aĉeti pli ol duonkilogramon da teo. Bumpo proponis ke li kantu en la stratoj komikajn kantojn, kiujn li lernis en Ĝoliginkiujo. Sed la Doktoro diris ke li opinias ke al la islandanoj ne plaĉos afrika muziko.

Alia afero kiu restigis nin estis la taŭrobatalo. En ĉi tiuj insuloj apartenantaj al Hispanujo, okazis taŭrobataloj ĉiudimanĉe. Ni venis vendrede; kaj foriginte de ni la spertan mariston ni promenis tra la vilaĝo.

Ĝi estis tre kurioza vilaĝeto, tute malsimila al ĉiuj aliaj kiujn mi iam vidis. Ĉiuj ĝiaj stratoj estis tre kurbiĝemaj kaj zigzagemaj kaj tiom mallarĝaj ke ĉaro nur malfacile povis trairi ilin. La supra etaĝo de la domoj elstaris super la strato kaj pro tio tiom proksimiĝis ke la homoj en la mansardoj povis kliniĝi el la fenestroj kaj manpremi kun siaj najbaroj aliflanke de la strato. La Doktoro informis nin ke la vilaĝo

estas tre tre olda. Ĝi nomiĝis Monteverdo.

Ĉar ni ne havis monon, kompreneble ni ne iris al hotelo aŭ io tia. Sed dum la dua vespero kiam ni estis pasantaj la butikon de litfaristo, ni rimarkis plurajn litojn faritajn de la viro, starantajn sur la trotuaro. La Doktoro komencis babiladi hispanlingve kun la litfaristo, kiu sidis ĉe sia pordo fajfante al papago en kaĝo. La Doktoro kaj la litfaristo tre amikiĝis parolante pri birdoj kaj aliaj aferoj. Kiam proksimiĝis al la vespermanĝohoro la viro petis nin resti por manĝi kun li.

Tion kompreneble ni volonte faris. Kaj post la manĝo (tre plaĉaj manĝaĵoj, plejparte kuiritaj en olivoleo — precipe plaĉis al mi la frititaj bananoj) ni sidiĝis ekstere sur la trotuaro denove kaj plu paroladis ĝis malfrue en la nokto.

Fine kiam ni stariĝis por reiri al nia ŝipo, tiu tre kompleza butikisto rifuzis lasi nin foriri. Li diris ke la stratoj proksimaj al la haveno estas tre maladekvate lumigataj kaj ne montriĝas la luno. Ni certe perdiĝus. Li invitis nin resti kun li dum la nokto kaj reiri al nia ŝipo matene.

Nu, fine ni akceptis; kaj ĉar nia bona amiko ne havis ekstrajn litĉambrojn, ni tri, la Doktoro, Bumpo kaj mi, dormis sur la litoj elmetitaj por vendo sur la trotuaro antaŭ la butiko. La nokto estis tiom varmega ke ni ne bezonis kovraĵojn. Estis tre plezurige endormiĝi tiel eksterdome, rigardante la homojn marŝi tien kaj reen kaj la gajan vivon de la stratoj. Ŝajnis al mi ke hispanoj neniam enlitiĝas. Kvankam estis tiom malfrue, ĉiuj restoracietoj kaj kafejoj ĉirkaŭ



“LA DOKTORO KOMENCIS BABILADI HISPANLINGVE KUN LA LITFARISTO”

ni estis malfermaj, kun klientoj trinkantaj kafon kaj gaje babilantaj ĉe la malgrandaj tabloj eksteraj. La sono de gitaro nelaŭte plektrata en la distanco intermiksiĝis kun la bruo de porcelanaĵoj kaj la babilado de voĉoj.

Ial tio pensigis min pri miaj gepatroj tre for en Puddleby, kun siaj regulaj kutimoj, la vespera praktikado per la fluto k.c. — samon farante ĉiutage. Mi iel bedaŭris pro ili, ĉar al ili mankis la plezuro de ĉi tiu veturoplena vivo, kie ni faras ion novan konstante — eĉ dormas malkutime. Sed mi supozas ke se ili estus invititaj enlitiĝi sur trotuaro antaŭ butikoj, al ili tute ne plaĉus tiu ideo. Estas kurioze kiaj estas kelkaj homoj.

7. LA VETO DE LA DOKTORO

LA sekvan matenon nin vekis bruego. Procesio venadis laŭ la strato, multaj viroj en tre gajaj vestoj sekvate de granda amaso da admiroplenaj virinoj kaj huraantaj infanoj. Mi demandis la Doktoron kiuj ili estas.

“Ili estas la taŭrobatalistoj”, li diris. “Okazos taŭrobatalo morgaŭ”.

“Kio estas taŭrobatalo?” mi demandis.

Ege surprize al mi la vizaĝo de la Doktoro multe ruĝiĝis pro kolero. Memorigis min pri kiam li parolis pri leonoj kaj tigroj en sia privata zoo.

“Taŭrobatalo estas stulta, kruela, fia afero”, diris li. “Ĉi hispanoj estas plej amindaj kaj afablaj homoj. Kiel ili povas ĝui tiujn aĉajn taŭrobatalojn estas io kion mi neniam povus kompreni”.

Tiam la Doktoro daŭrigis per eksplikado al mi ke unue oni ege kolerigas taŭron per incitado, kaj tiam lin lasas kuri en rondan ejon kie homoj venas kun ruĝaj manteloj, svingante ilin je li kaj poste forkurante. Post tio la taŭro estas lasata lacigi sin per ĵetado kaj mortigado de multaj povraj maljunaj malbonstataj ĉevaloj ne kapablaj defendi sin. Poste, kiam la taŭro estas plene senspira kaj laca pro tio, viro venas kun glavo kaj mortigas la taŭron.

“Ĉiudimanĉe”, diris la Doktoro, “en preskaŭ ĉiu granda vilaĝo en Hispanujo ses taŭroj estas tiel mortigataj, kaj same multaj ĉevaloj”.

“Sed ĉu la virojn neniam mortigas la taŭro?” mi

demandis.

“Domaĝe, tre malofte”, diris li. “Taŭro neniel estas tiom danĝera kiom li aspektas, eĉ kiam kolera, se oni estas rapidpieda kaj nekonfuzita. Tiuj taŭrobatalistoj estas tre lertaj kaj facile movas sin. Kaj la homoj, precipe la hispanaj virinoj, amegas ilin. Fama taŭrobatalisto (oni nomas ilin ‘matadoroj’) estas pli grava homo en Hispanujo ol reĝo. — Jen venas plia amaso da ili ĉirkaŭ la angulon, rigardu. Vidu la knabinojn ĵetantajn kisojn al ili. Absurdaĵo!”

Je tiu momento nia amiko la litfaristo elvenis por rigardi la procesion. Kaj dum li salutis nin kaj demandis pri kiel ni dormis, amiko lia almarŝis kaj eniris nian malgrandan grupon. La litfaristo konigis al ni tiun amikon, nomitan Don Enrique Cardenas.

Don Enrique, aŭdinte el kie ni venis, parolis al ni angle. Li ŝajnis bone edukita ĝentlemana persono.

“Kaj vi iros spekti la taŭrobatalon morgaŭ, ĉu?” li demandis al la Doktoro afable.

“Nenial”, diris Johano Dolittle firme, “al mi malplaĉas taŭrobataloj — kruelaj kovardaj prezentaĵoj”.

Don Enrique preskaŭ eksplodis. Mi neniam vidis viron tiom ekscitiĝi. Li diris al la Doktoro ke li ne scias pri kio li parolas. Li diris ke taŭrobatalado estas nobla sporto kaj ke la matadoroj estas la plej kuraĝaj viroj en la mondo.

“Absurde!” diris la Doktoro. “Vi neniam donas eĉ oportunon al la povra taŭro. Nur kiam li estas tute laciĝinta kaj konfuza viaj amataj matadoroj kuraĝas provi mortigi lin”.

Mi kredis ke la hispano batos la Doktoron pro

kolerego. Dum li plu elŝprucis sonojn penante fari vortojn, la litfaristo venis inter ilin kaj flankenprenis la Doktoron. Li klarigis flustre al la Doktoro ke ĉi Don Enrique Cardenas estas tre grava persono; ke li provizas la taŭrojn — specialan fortan nigran specion — el sia propra brutaro por ĉiuj taŭrobataloj en Insuloj Kabo Blanka. Li estas tre riĉa homo, la litfaristo diris, tre grava persono. Nenial li estu ofendita.

Mi rigardis la vizaĝon de la Doktoro kiam la litfaristo ĉesis paroli, kaj mi vidis ekbrilon de knabeca petolemo eniri liajn okulojn kvazaŭ lin ektrafis ideo. Li turnis sin al la kolera hispano.

“Don Enrique”, li diris, “vi diras al mi ke viaj taŭrobatalistoj estas tre kuraĝaj lertaj viroj. Ŝajnas ke mi ofendis vin kiam mi diris ke taŭrobatalado estas malnobla sporto. Kiel nomiĝas la plej bona matadoro kiun vi havas por la morgaŭa prezento?”

“Pepito el Malago”, diris Don Enrique, “unu el la plej grandaj nomoj, unu el la plej kuraĝaj viroj en la tuta Hispanujo”.

“Tute bone”, diris la Doktoro. “Mi faras proponon al vi. Dum mia tuta vivo mi neniam batalis taŭron. Nu, supozu ke mi eniros la ringon morgaŭ kun Pepito el Malago kaj kiuj ajn aliaj matadoroj kiujn vi selektos; kaj se mi povos ludi pli lerte kun taŭro ol ili, ĉu vi promesos fari ion por mi?”

Don Enrique retroĵetis sian kapon kaj ridis.

“Viro”, li diris, “vi plene frenezas! Vi estus tuttuj mortigita. Oni devas trejniĝi dum jaroj por fariĝi taŭga taŭrobatalisto”.

“Supozu ke mi akceptas tiun riskon. — Vi ne

timas, certe, akcepti mian proponon, ĉu?”

La hispano sulkis sian frunton.

“Timas!” li kriis, “Sinjoro, se vi povos venki Pepiton el Malago en la taŭroringo mi promesos al vi kion ajn mi povos”.

“Tute bone”, diris la Doktoro, “nu, laŭ mia kompreno vi estas tre potenca persono en ĉi tiuj insuloj. Se vi volus tute ĉesigi taŭrobataladon post morgaŭ, vi povus, ĉu ne?”

“Jes”, diris Don Enrique fiere — “mi povus”.

“Nu, tion mi petas de vi — se mi sukcesos je mia veto”, diris Johano Dolittle. “Se mi povos pli multe sukcesi pri koleraj taŭroj ol Pepito de Malago, vi devas promesi al mi ke neniam okazos plia taŭrobatalo en Insuloj Kabo Blanka dum via vivo. Ĉu konsentite?”

La hispano etendis manon.

“Konsentite”, li diris — “mi promesas. Sed mi devas averti vin ke vi nur forĵetas vian vivon, ĉar vi nepre estos mortigita. Tamen, nenion alian vi meritias, pro via deklaro ke taŭrobatalado estas malnobla sporto. Mi renkontos vin ĉi tie morgaŭ matene por se vi deziros aranĝi iujn specifajojn. Ĝis la, sinjoro”.

Kiam la hispano turnis sin kaj marŝis en la butikon kun la litfaristo, Polinezio, kiu estis aŭskultinta kiel kutime, flugis sur mian ŝultron kaj flustris en mian orelon:

“Mi havas planon. Venigu Bumpon kun vi kaj ni iru al iu loko kie la Doktoro ne povos aŭdi nin. Mi volas paroli kun vi”.

Mi puŝetis kubuton de Bumpo kaj ni transiris la straton kaj ŝajnigis gapi montrofenestron de juvelisto;

dum la Doktoro sidiĝis sur sian liton por ligi la laĉojn de siaj botoj, la sola parto de siaj vestoj kiun li estis demetinta por la nokto.

“Aŭskultu”, diris Polinezio, “mi rompadis mian kapon penante elpensi ian rimedon akiri monon por aĉeti provianton; kaj fine mi havas ĝin”.

“La monon?” diris Bumpo.

“Ne, stultulo. La ideon — kiel akiri la monon. Aŭskultu: la Doktoro tute evidente venkos en tiu ludo morgaŭ, tiom certe kiom ke vi vivas. Nu, ni nur bezonas fari flankan veton kun tiuj hispanoj — ili amegas vetludi — kaj jen la solvo”.

“Kio estas flanka veto?” mi demandis.

“Ho, mi scias kio tio estas”, diris Bumpo fiere, “Ni tre multe faris ilin ĉe Oksfordo dum la boataj konkursoj. Mi iras al Don Enrique kaj diras, ‘mi vetas al vi cent pundojn ke la Doktoro venkos.’ Kaj se li ja venkos, Don Enrique pagos al mi cent pundojn; kaj se li ne venkos, mi devos pagi al Don Enrique”.

“Ĝuste tiel”, diris Polinezio. “Sed ne diru cent pundojn: diru dumil kvincent pesetojn. Nun venu trovi oldan Donon Enrinko-tinkon kaj penu aspekti riĉa”.

Do ni denove transiris la straton kaj kaŝe eniris la butikon de la litfaristo dum la Doktoro plu okupadis sin pri siaj botoj.

“Don Enrique”, diris Bumpo, “permesu ke mi konigu min. Mi estas la Kronprinco de Ĝoliginkiujo. Ĉu vi akceptas fari malgrandan veton kun mi rilate al la taŭrobatalo morgaŭa?”

Don Enrique klinis sin.

“Nu certe”, li diris, “volontege. Sed mi devas averti

vin ke vi nepre perdos. Kiom vi vetas?”

“Ho, nur sumeton”, diris Bumpo, “nur por amuziĝi, komprenu. Kion vi diras pri tri mil pesetoj?”

“Mi akceptas”, diris la Hispano, denove riverencante. “Mi renkontos vin morgaŭ post la taŭrobatalo”.

“Do estas tute bone”, diris Polinezio dum ni elvenis por reesti kun la Doktoro. “Nun mi sentas ke granda ŝarĝo estas forprenita forde mia menso”.

8. LA GRANDA TAŬROBATALO

LA sekva tago estis granda tago en Monteverdo. Ĉe ĉiuj stratoj pendis standardoj kaj ĉie bunte vestitaj homamasoj videblis dum ili hastis al la taŭroringo, tiel oni nomis la grandan ringon kie la bataloj okazis.

La novaĵo pri la defio de la Doktoro estis ĉirkaŭirinta tra la tuta vilaĝo, kaj, ŝajne, multe amuzis la islandanojn. Kia ideo, ke nura fremdulo aŭdacas defii la grandan Pepiton el Malago! — Tutmeritite, se li mortiĝos!”

La Doktoro estis pruntepreninta taŭrobatalistan kostumon de Don Enrique; kaj tre bunta kaj miriga li aspektis en ĝi, kvankam Bumpo kaj mi devis multe strebi por fermi la antaŭon de la veŝto, kaj eĉ post tio la butonoj daŭre forflugis ĉiudirekte.

Kiam ni eliris el la haveno por marŝi al la taŭroringo, amasoj da knabetoj postkuris nin mokante la dikecon de la Doktoro, kriante “*Juan Hagapoco, el grueso matador!*” kio signifas en la hispana lingvo “Johano Dolittle, la dika taŭrobatalisto”¹

Tuj kiam ni alvenis la Doktoro diris ke li volas kontroli la taŭrojn antaŭ ol komenciĝos la batalo; kaj oni tuj kondukis nin al la taŭrokaĝo kie, malantaŭ alta krado, ses enormaj nigraj taŭroj tretadis sovaĝe.

Per kelkaj hastaj vortoj kaj signoj la Doktoro diris al la taŭroj kion li faros kaj zorge instruis al ili kiel ili agu dum la prezentaĵo. La povraj bestoj ege ĝojis

¹ En la angla lingvo “Dolittle” signifas “Faru malmulton”; en la hispana “Hagapoco” samon signifas. “Juan Hagapoco” prononciĝas: Ĥŭanagapóko.

kiam ili aŭdis ke estas oportuno ĉesigi taŭrobataladon, kaj ili promesis agi precize kiel li ordonis.

Kompreneble, la viro kiu gvidis nin tien ne komprenis kion ni faras. Li nur supozis ke la dika anglo estas freneza, kiam li vidis la Doktoron fari signojn kaj paroli per la bova lingvo.

De tie la Doktoro iris al la vestoĉambroj de la matadoroj, dum Bumpo kaj mi kun Polinezio iris en la taŭroringon kaj sidiĝis en la granda sentegmenta teatro.

Estis tre bunta vidaĵo. Miloj da virinoj kaj ĝentemanoj ĉeestis, ĉiuj estis vestitaj per siaj plej elegantaj vestoj; kaj ĉiuj aspektis tre feliĉaj kaj gajaj.

Jam je la komenco Don Enrique stariĝis kaj klarigis al la popolo ke la unua prezentaĵo en la programo estos konkurso inter la angla Doktoro kaj Pepito el Malago. Li diris al ili kion li promesis se la Doktoro venkos. Sed la popolo ŝajne malalte taksis la probablecon de tio. Ridego soniĝis pro la nura mencio de tio.

Kiam Pepito eniris la ringon, ĉiuj hurais, la virinoj blovis kisojn kaj la viroj aplaŭdis kaj svingis siajn ĉapelojn.

Baldaŭ granda pordo aliflanke de la ringo estis malfermita kaj engalopis unu el la taŭroj; post tio la pordo estis refermita. Tuj la matadoro tre vigliĝis. Li svingis sian ruĝan mantelon kaj la taŭro kuregis kontraŭ lin. Pepito lerte flanken paŝis kaj la homamaso denove hurais.

La ludo estis plurfoje ripetita. Sed mi rimarkis ke kiam ajn Pepito estis en mallarĝa loko kaj ŝajnis esti vere endanĝerigata de la taŭro, helpisto lia, kiu ĉiam

troviĝis ie proksime, atentigis la taŭron per svingo de alia ruĝa mantelo. Tiam la taŭro postkuris la helpiston kaj Pepito restis ekster danĝero. Plej ofte, tuj kiam li estis forloginta la taŭron, tiu helpisto kuris al la alta barilo kaj transsaltis el la ringo por savi sin. Evidente ĉio estis antaŭaranĝita de tiuj matadoroj; kaj ŝajnis al mi ke ilin ne minacas granda danĝero pro la povra mallerta taŭro, kondiĉe ke ili ne glitis kaj falis.

Post proksimume dek minutoj da tiaĵoj la malgranda pordo de la vestejo de la matadoroj malfermiĝis kaj la Doktoro paŝis en la ringon. Tuj kiam lia dika figuro, vestita per ĉiele blua veluro, aperis, la spektantaro ŝanceliĝis en siaj sidlokoj pro ridegado.

Juan Hagapoco, kiel ili nomis lin, marŝis al la centro de la ringo kaj riverencis ceremonie al la virinoj en la privataj sidlokoj. Post tio li riverencis al la taŭro. Kaj post tio li riverencis al Pepito. Dum li riverencis al la helpisto de Pepito la taŭro komencis kuregi kontraŭ lin el malantaŭe.

“Atentu! Atentu! — La taŭron. Li mortigos vin!” kriis la spektantaro.

Sed la Doktoro trankvile finis sian riverencon. Post tio li turnis sin, kunfaldis siajn brakojn, fikse rigardis la alkuregantatan taŭron kaj terure sulkis la frunton.

Baldaŭ kuriozaĵo okazis: la rapido de la taŭro pli kaj pli malgrandiĝis. Aspektis preskaŭ kvazaŭ li timas tiun sulkadon de la frunto. Baldaŭ li tute haltis. La Doktoro admonis lin per fingro. Li komencis tremi. Fine, puŝinte sian voston inter siajn kruojn, la taŭro

turnis sin kaj forkuris.

La spektantaro anhelegis. La Doktoro postkuris lin. Ĉirkaŭkurante kaj reĉirkaŭkurante la ringon ili ambaŭ kuris, spiregante kvazaŭ focenoj. Ekscititaj flustroj komencis soni inter la spektantoj. Jen io nova en taŭrobatalo, la taŭro fuĝas de la viro, anstataŭ la viro de la taŭro. Fine en la deka ĉirkaŭkuro, post lasta ekrapidiĝo, Juan Hagapoco, la angla matadoro, kaptis la voston de la povra taŭro.

Tiam, kondukante la nun timidan beston en la centron de la ringo, la Doktoro devigis lin fari ĉiajn lertaĵojn; stari per nur la malantaŭaj kruroj, stari per nur la antaŭaj kruroj, dancadi, saltetadi, ruliĝadi. Li finis devigante la taŭron surgenuiĝi; tiam li grimpis sur lian dorson kaj transkapsaltis kaj alie akrobatis sur la kornoj de la besto.


Pepito kaj lia helpisto estis ege hontigitaj. La spektantaro estis plene forgesinta ilin. Ili staris kune apud la barilo ne malproksime de kie mi staris, murmurante inter si kaj malrapide verdiĝante pro ĵaluzo.

Fine la Doktoro turnis sin al la sidejo de Don Enrique, kaj klinante sin diris tre laŭte, “Ĉi taŭro ne plu valoras. Li estas plena de timo kaj tute senspira. Forprenu lin, mi petas”.

“Ĉu la Nobla Sinjoro deziras freŝan taŭron?” demandis Don Enrique.

“Ne”, diris la Doktoro, “mi volas kvin freŝajn taŭrojn. Kaj mi volas ilin ĉiujn kunaj en la ringo, mi petas”.

Je tio, krio de teruriĝo eksonis de la spektantoj. Ili



“AKROBATIS SUR LA KORNOJ DE LA BESTO.”

kutimis vidi matadorojn eskapi de unu taŭro. Sed *kvin!* — Nepre tio okazigos subitan morton.

Pepito eksaltis antaŭen kaj vokis al Don Enrique ke li ne permesu tion, dirante ke estas kontraŭ ĉiuj reguloj de la taŭrobatalado. (“Ha!” subridis Polinezio en mian orelon. “Same kiel la navigado de la Doktoro: li malrespektas ĉiujn regulojn; sed li atingas la celon. Se ili nur permesos, li donos al ili la plej grandiozan prezenton pro ilia pago ol ili iam vidis.”) Granda kverelo komenciĝis. Duono de la spektantoj ŝajne akordis kun Pepito kaj duono kun la Doktoro. Fine la Doktoro turnis sin al Pepito kaj faris novan tre grandan riverencon pro kio la lastaj butonoj forflugis de lia veŝto.

“Nu kompreneble, se la Nobla Sinjoro timas—“ li komencis diri per milda rideto.

“Timas!” kriegis Pepito. “Tute nenion sur la tero mi timas. Mi estas la plej granda matadoro en Hispanujo. Per ĉi tiu dekstra mano mi mortigis naŭcent kvindek sep taŭrojn”.

“Do tute bone”, diris la Doktoro, “ni vidu ĉu vi povos mortigi kvin pliajn. Enlasu la taŭrojn!” li kriis. “Pepito el Malago ne timas”.

Terura silento kovris la grandan teatron dum oni malfermis la pezan pordon de la taŭroringo. Tiam fortege muĝante kvin grandaj taŭroj kuregis en la ringon.

“Aspektu ferocaj”, mi aŭdis la Doktoron voki al ili per la bova lingvo. “Ne disiru. Kungrupiĝu. Pretigu vin por alkurego. Ĉasu unue Pepiton, la viron purpure vestitan. Sed je la Ĉielo ne mortigu lin. Nur ĉase

pelu lin el la ringo. — Nu, ĉiuj kune, celu lin!”

La taŭroj klinis siajn kapojn kaj ĉiuj en vico, kvazaŭ skadro de kavalerio, ili kuregis trans la ringon rekte kontraŭ povran Pepiton.

Dum unu momento la hispano penegis aspekti kuraĝa. Sed vidi la kvin kornoparojn plengalopi kontraŭ lin estos tro timige. Li blankiĝis ĝis la lipoj, kuris al la barilo, transsaltis kaj malaperis.

“Nun la alian”, siblis la Doktoro. Kaj post du sekundoj la kuraĝega helpisto ne plu estis videbla. Juan Hagapoco, la dika matadoro, restis sola en la ringo kun kvin koleregaj taŭroj.

La cetero de la prezentaĵo estis vere rigardinda. Unue, ĉiuj kvin taŭroj ĉirkaŭkuris kolerege la ringon, batante la barilon per siaj kornoj, disverŝante la sablon, serĉante ion mortigeblan. Tiam, ĉiu, laŭvice, ŝajniĝis ekrimarki la Doktoron la unuan fojon kaj, farante koleran muĝegon, klinis siajn fiaspektajn kornojn kaj sagrapidis trans la ringon kvazaŭ intencante ĵeti lin ĉielen.

Estis vere timige ekscite. Kaj eĉ mi, kiu sciis ke ĉio estis antaŭaranĝita, detenis mian spiradon pro terurigo pri la sorto de la vivo de la Doktoro, kiam mi vidis kiam proksime al trafi lin ili venis. Sed ĝuste je la lasta momento, kiam la pintoj de la kornoj estis kvin centimetrojn for de la ĉiele blua veŝto, la Doktoro ĉiufoje vigle saltis flanken kaj la grandaj brutoj tondre pasis lin sen endanĝerigi lin, lasante harspacon inter si kaj li.

Post tio, ĉiuj kvin el ili kune alkuris lin, tute ĉirkaŭis lin, minacis lin per siaj kornoj kaj muĝadis

furioze. Kiel li eskapis viva mi ne scias. Dum pluraj minutoj lia ronda figuro estis apenaŭ videbla en la tumulto de balancantaj kapoj, stamfantaj hufoj kaj svingiĝantaj vostoĵoj. — Ĝi estis, konforme al la antaŭdiro de Polinezio, la plej grandioza taŭrobatalo iam vidita.

Unu virino en la amaso multe histeriiĝis kaj kriaciis al Don Enrique:

“Ĉesigu la batalon! Ĉesigu la batalon! Li estas tro kuraĝa viro por esti mortigita. Li estas la plej mirinda matadoro en la mondo. Lasu lin vivi! Ĉesigu la batalon!”

Sed baldaŭ videblis ke la Doktoro eliras el la amaso ĉirkaŭanta lin. Tiam, kaptante la kornojn de ĉiu el ili, unu post la alia, li subite turnis iliajn kapojn kaj faligis ilin sur la sablon. La grandaj brutoj plenumis siajn rolojn bonege. Mi neniam vidis dresitajn bestojn en cirko pli bone roli. Ili kuŝis tie, anhelante sur la tero kien la Doktoro estis ĵetinta ilin, kvazaŭ tute senfortigitaj kaj plene venkitaj.

Post tio, farinte lastan riverencon al la virinoj, Johano Dolittle prenis cigaron el sia poŝo, bruligis ĝin kaj malrapide paŝis el la ringo.

9. NI FORIRAS HASTE

TUJ post la fermiĝo de la pordo malantaŭ la Doktoro, la plej grandega bruo kiun iam mi aŭdis komenciĝis. Kelkaj el la viroj aspektis koleraj (amikoj de Pepito, supozeble); sed la virinoj vokis ripete ke la Doktoro revenu en la ringon.

Kiam fine li faris tion, la virinoj ŝajnis freneziĝi pro li. Ili ĵetadis kisojn al li. Ili nomis lin karulo. Post tio ili komencis depreni siajn florojn, siajn ringojn, siajn kolĉenojn, kaj siaj broĉojn kaj ĵeti ilin antaŭ liajn piedojn. Neniam vi vidis similaĵon — veran pluvegon da juveloj kaj rozoj.

Sed la Doktoro nur ridetadis al ili, denove riverencis, kaj eliris.

“Nun, Bumpo”, diris Polinezio, “nun vi devas iri kolekti ĉiujn tiujn brelokojn kaj ni vendos ilin. Tion faras la grandaj matadoroj: ili lasas la juvelojn sur la tero kaj iliaj helpistoj kolektas ilin por ili. Estos bone ke ni akiru bonan kvanton da mono dum ni havas oportunon — ne eblas scii kiam oni bezonos ĝin, kiam oni veturas kun la Doktoro. Ne atentu la rozojn — vi povas lasi ilin — sed nepre ne lasu ringojn. Kaj kolektinte, iru akiri viajn tri mil pesetojn de Don Enrinko-tinko. Tomĉjo kaj mi renkontos vin ekstere kaj ni lombardos la brelokaĵojn ĉe la butiko de tiu judo kontraŭ la butiko de la litfaristo. Ekiru — kaj eĉ ne vorton al la Doktoro, memoru”.

Ekster la taŭroringo ni trovis la homamason ankoraŭ tre ekscitita. Violentaj kvereloj okazis ĉie.

Bumpo renkontis nin kun siaj poŝoj ŝvelintaj ĉiudirekte: kaj ni malrapide paŝis tra la densa homamaso al tiu flanko de la konstruaĵo kie estas la vestoĉambro de la matadoroj. La Doktoro atendis nin ĉe la pordo.

“Bone farite, Doktoro!” diris Polinezio, fluginte sur lian ŝultron. — Bonege farite! — Sed aŭskultu: mi flaras danĝeron. Mi opinias ke estos plejbone ke vi reiru al la ŝipo kiel eble plej rapide. Kaŝu tiun kapturigan vestaron per via mantelo. Al mi malplaĉas la mieno de tiu homamaso. Pli ol duono da ili furiozas pro via venko. Don Enrinko-tinko nun devos ĉesigi la taŭrobataladon — kaj vi scias kiom ili amas ĝin. Kion mi timas estas ke kelkaj el tiuj matadoroj kiuj egale furiozas pro ĵaluzo komencos fifari. Mi kredas ke nun estas bona tempo por ke ni foriru”.

“Verŝajne vi pravas, Polinezio”, diris la Doktoro. — “Kiel kutime. La amaso ja aspektas iom malkvieta. Mi kaŝe iros sola al la ŝipo — por ke oni ne tiom rimarku min; kaj mi atendos vin tie. Vi venu laŭ alia vojo. Sed ne prokrastu. Hastu!”

Tuj post la foriro de la Doktoro, Bumpo elserĉis Don Enriquen kaj diris:

“Honorinda Sinjoro, vi ŝuldas al mi tri mil pesetojn”.

Senparole, sed aspektante konvergokula pro ĉagreno, Don Enrique pagis sian veton.

Nia posta tasko estis aĉeti proviantojn; kaj survoje ni luis fiakron kaj venigis ĝin kun ni.

Ne tre malproksime ni trovis grandan manĝaĵobutikon kiu ŝajnis vendi ĉion manĝeblan. Ni eniris kaj aĉetis la plej belan amason da manĝaĵoj kiujn iam vi

vidis dum via tuta vivo.

Efektive, Polinezio pravis pri la danĝero kiu nin frontis. La novaĵo pri nia venko evidente disvastiĝis fulme tra la tuta vilaĝo. Ĉar dum ni venis el la butikoj kaj ŝarĝis la fiakron per niaj aĉetaĵoj, ni vidis diversajn grupojn da koleruloj priserĉantaj la stratojn, svingante bastonojn kaj kriante:

“La angloj! Kie estas tiuj damnaj angloj kiuj ĉesigis la taŭrobataladon?—Pendumu ilin sur lampofosto! —Ĵetu ilin en la maron! La angloj! Ni volas la anglojn!”

Post tio, estu certaj ke ni ne perdis tempon. Bumpo ekprenis la hispanan fiakriston kaj klarigis al li per signoj ke se li ne veturigos nin al la haveno tiom rapide kiom li kapablas kaj ne silentos tutvoje, li sufokos lin ĝismorte. Tiam ni saltis en la fiakron, sur la proviantprovizon, tirfermis la pordon, tiris la kurtenojn kaj forveturis.

“Ni ne havas oportunon lombardi la juvelojn nun”, diris Polinezio, dum ni skuiĝis laŭ la ŝtone pavimitaj stratoj. “Sed ne gravas — eble ili utilos poste. Kaj krome ni havas dumil kvincent pesetojn restantajn el la veto. Ne donu al la fiakristo pli ol du pesetojn kvindekon, Bumpo. Tio estas la ĝusta veturpago, mi scias”.

Nu, ni atingis la havenon bonstate kaj ni multe ĝojis trovi ke la Doktoro estis resendinta Ĉi-Ĉion kun la remboato por atendi nin ĉe la surtereja muro.

Bedaŭrinde dum ni estis transveturigintaj jam nur duonon de la aĉetaĵoj el la fiakro en la boaton, la kolera amaso alvenis sur la varfon kaj ekatakis nin. Bumpo prenis grandegan lignan trabon kiu kuŝis proksime al ni kaj svingadis ĝin ĉirkaŭ sian kapon,

elkriante terurajn afrikajn bataalkriojn. Tio detenis la homamason dum Ĉi-Ĉio kaj mi rapidigis la ceteron de niaj aĉetaĵoj en la boaton kaj mem engrimpis. Bumpo ĵetis sian trabon inter la amason da hispanoj kaj ensaltis post ni. Tiam ni forpuŝis kaj remis kvazaŭfreneze al *La Kurlo*.

La homaĉoj sur la muro kolerege kriadis, skuis siajn pugnojn kaj ĵetis ŝtonojn kaj ĉiajn aĵojn kontraŭ nin. La kapo de kompatinda Bumpo estis trafita de botelo. Sed ĉar lia kapo estis tre fortika, ĝi nur kontuzetis ĝin, dum la botelo disfrakasiĝis en mil pecojn.

Kiam ni atingis la flankon de la ŝipo la Doktoro estis levinta la ankron kaj stariginta la velojn kaj ĉio estis preta por nia foriro. Retrorigardante ni vidis boatojn veni de la havenmuro kontraŭ nin, plenajn de koleraj kriantaj viroj. Do ni ne paŭzis por malŝarĝi nian remboaton sed nur ligis ĝin al la malantaŭo de la ŝipo per ŝnurego kaj saltis sur la ŝipon.

Ni bezonis nur momenton por turni *La Kurlon* en la venton; kaj baldaŭ ni rapidadis el la haveno cele Brazilon.

“Ha”, suspiris Polinezio, dum ni ĉiuj faligis nin sur la ferdekon por ripozi kaj renormaligi nian spiradon. “Tiu ne estis malbona aventuro — plene memorigas min pri miaj malnovaj marveturaj tagoj kiam mi veladis kun la kontrabandistoj. — Ho! tiu estis vera vivo! — Ne priatentu vian kapon, Bumpo. Ĝi resentiĝos bona kiam la doktoro metos iom da arniko sur ĝin. Konsideru kion ni akiris per la bataleto: plenan boaton da proviantoj, poŝoplenojn da juveloj, kaj milojn da pesetoj. Ne malbone, vere — ne malbone”.

1. DENOVE LA MOLUSKO-LINGVOJ

MIRANDO, la Purpura Paradizeo, pravis, kiam ŝi antaŭdiris kvanton da bona veturo. Dum tri semajnoj la bona ŝipo *Kurlo* plugis sian vojon tra ridetantaj akvoj antaŭ senvaria forta vento.

Mi supozas ke la plejparto de veraj maristoj trovas tiun parton de la vojaĝo teda. Sed ne mi. Ju pli ni pli suden kaj pli okcidenten iris des pli malsimiliĝis la faco de la maro ĉiutage. Kaj ĉiuj malgravaĵetoj de vojaĝo pri kiuj spertulo apenaŭ ĝenus sin per rimarko estis grandaj interesaĵoj por miaj fervoraj okuloj.

Ni ne preterpasis multajn ŝipojn. Kiam ni ja ekvidis ŝipon, la Doktoro elprenis sian teleskopon kaj ni ĉiuj laŭvice rigardis ĝin. Kelkafoje li signalis al ĝi, demandante pri la novaĵoj, suprentirante malgrandajn kolorajn flagojn laŭlonge de la masto; kaj la ŝipo resignalis al ni sammaniere. La signifo de ĉiuj signaloj estis presita en libro kiun la doktoro tenis en la kajuto. Li diris al mi ke ĝi estas la lingvo de la maro kaj ke ĉiuj ŝipoj povas kompreni ĝin, negrave ĉu ili estas anglaj, nederlandaj, aŭ francaj.

Nia plej grava evento dum tiuj unuaj semajnoj okazis kiam ni preterpasis glacimonton. Kiam la suno brilis sur ĝin, ĝi rebrilis per cent koloroj, scintilante kvazaŭ juvelkovrita palaco en ferakonto. Tra la teleskopo ni vidis patrinan polusurson kun bebo, sidanta sur ĝi rigardante nin. La Doktoro rekonis ŝin kiel unu el la ursoj kiuj parolis kun li dum li trovis la

Nordan Poluson. Do li veturigis la ŝipon tre proksimen al ŝi kaj proponis porti ŝian kaj ŝian bebon en *La Kurlo* se ŝi deziras. Sed ŝi nur kapneis, dankante lin; ŝi diris ke estus multe tro varme por la bebo sur la ferdeko de nia ŝipo, sen glacio por teni liajn piedojn malvarmaj. Verdire ja estis varmega tago; sed la proksimeco de tiu monto el glacio devigis nin ĉiujn suprenturni niaj mantelkolumojn kaj tremi pro la malvarmo.

Dum tiuj trankvilaj pacaj tagoj mi multe plibonigis miajn leg- kaj skrib-kapablojn helpate de la Doktoro. Mi tiom progresis ke li permesis min skribi la registrolibron de la ŝipo. Tio estas granda libro tenata en ĉiu ŝipo, speco de taglibro en kiun oni skribas la nombron da kilometroj iritaj, la direkton de la iro, kaj ĉion alian okazantan.

Ankaŭ la Doktoro, dum sia malmulta libertempo, preskaŭ ĉiam skribadis — en siaj notlibroj. Mi ofte enrigardetis ilin, ĉar mi nun povis legi, sed mi trovis ke estas tre malfacile legi la manskribon de la Doktoro. Multaj el tiuj notlibroj aspektis plenaj de martemoj. Estis ses dikaj libroj plenaj de notoj kaj kroki-zoj de diversaj marherboj; kaj estis aliaj pri marbirdoj; aliaj pri marvermoj; aliaj pri markonkoj. Ili estis ĉiuj reskribotaj, presotaj kaj bindotaj kiel normalaj libroj.

Unu posttagmezon ni vidis, flosantajn ĉirkaŭ ni, grandajn kvantojn da aĵo similanta al morta herbo. La Doktoro diris al mi ke tio estas golfoherbo. Iom pli malproksime ĝi estis tiom densa ke ĝi kovris la tutan akvon tiom malproksimen kiom oni povis vidi; ĝi donis al *La Kurso* aspekton de moviĝado trans kamp-

on anstataŭ velado sur Atlantiko.

Rampante sur tiu herbo, multaj kraboj videblis. Kaj ekvido al ili memorigis la Doktoron pri lia revo lerni la lingvon de la moluskoj. Li eltiris plurajn el tiuj kraboj per reto kaj metis ilin en sian aŭskultocisternon por esplori ĉu li povos kompreni ilin. Inter la kraboj li ankaŭ kaptis kuriozaspektan dikan fiŝeton, kies nomo, li diris al mi, estas Arĝenta Fiĝito.

Aŭskultinte sensukcese la krabojn dum kelka tempo, li metis la fiĝiton en la cisternon kaj komencis aŭskulti ĝin. Mi devis lasi lin tiumomente por fari kelkajn taskojn sur la ferdeko. Sed baldaŭ mi aŭdis lin el malsupre krei ke mi revenu al li.


“Stubbins”, li kriis tuj kiam li vidis min — “estas plej eksterordinare.—Tute nekredible.—Mi ne certas ĉu mi sonĝas.—Ne povas kredi miajn proprajn sensojn. Mi—mi—mi”

“Kial, Doktoro”, mi diris, “kio estas?—Kio okazis?”

“La fiĝito”, li flustris, indikante per tremanta fingro la aŭskultocisternon en kiu la malgranda ronda fiŝo ankoraŭ naĝadis trankvile, “li parolas angle! Kaj — kaj — *li fajfas melodiojn* — anglajn melodiojn!”

“Parolas angle!” mi kriis. — Fajfas! — Sed, estas maleble”.

“Estas fakto”, diris la Doktoro, kun vizaĝo blanka pro ekscitiĝo. “Nur kelkajn vortojn, disajn, sen klara senco — tute intermiksitaj kun lia propra lingvo kiun mi ankoraŭ ne povas kompreni. Sed ili estas angalingvaj vortoj, krom se mia aŭdkapablo tute misas. — Kaj la melodio kiun li fajfas, ĝi estas tute klara — ĉiam unusama melodio. Nu, vi aŭskultu kaj diru kion



“LI PAROLAS ANGLE!”

vi aŭdas. Diru al mi ĉion aŭdatan. Nepre ĉiun vorton”.

Mi iris al la vitra cisterno sur la tablo dum la Doktoro ekprenis notlibron kaj kraĵonon. Malliginte mian kolumon, mi staris sur la malplena pakkesto kiun li uzis kiel surstarilon kaj metis mian dekstran orelon rekte sub la akvon.

Dum kelkaj momentoj mi rimarkis tute nenion — escepte, per mia seka orelo, de la forta spirado de la Doktoro dum li atendis, rigide kaj malkviete, ĝis mi diros ion. Fine el la akvo, kun sono kiel de infano kantanta milojn kaj milojn da kilometroj for, mi aŭdis nekredeble fadan, etan voĉon.

“Ha!” mi diris.

Kio estas?” demandis la Doktoro per raŭka trema flustro. “Kion li diras?”

“Mi ne povas klare aŭdi ĝin”, mi diris. “Plejparte ĝi estas en iu fiŝlingvo kiun mi ne konas. — Ho, sed atendu minuton! — Jes, nun mi komprenas. — ‘No smoking.’¹ ... ‘My, here’s a queer one!’² ‘Popcorn and picture postcards here.’ ...³ ‘This way out.’⁴ ... ‘Don’t spit.’⁵ — Kiaj kuriozaj diraĵoj, Doktoro! — Ho, sed atendu! — Nun li fajfas la melodion”.

“Kiu melodio estas?” anhelis la Doktoro.

“John Peel”.⁶

“Ha”, kriis la Doktoro, “ankaŭ mi kredis aŭdi tion”. Kaj li skribis rapidege en sia notlibro.

Mi plu aŭskultadis.

“Estas plej eksterordinare”, la doktoro ripete murmuris al si dum lia kraĵono plu rampadis sur la

¹ “Ne fumu” ² “Ho, jen stranga fiŝo” ³ “Kraĵmaizo kaj bildkartoj ĉi tie” ⁴ “Eliru ĉidirekte”
⁵ “Ne kraĉu” ⁶ La nomo de populara folkkanto angla.

paĝo. — “Plej eksterordinare — sed ege ekscite. Kie do li—”

“Jen pli”, mi kriis — “iom pli da anglaĵo. ... ‘*The big tank needs cleaning*’¹ ... Jen ĉio. Nun li parolas fiŝe denove”.

“La granda cisterno!” La Doktoro murmuris, sulkante la frunton konfuzite. “Kie sur la tero li lernis—”

Subite li eksaltis el sia seĝo.

“Mi scias!” li kriis. “Ĉi tiu fiŝo eskapis el akvario. Komprenoble! Pripensu kiajn frazojn li lernis: ‘Bildkartoĵ’ — oni ĉiam vendas ilin en akvarioj; ‘Ne kraĉu’; ‘Ne fumu’; ‘Eliru ĉidirekte’ — tiaĵojn diras la dungitoj. Kaj ankaŭ, ‘Ho, jen stranga fiŝo!’ Tiajn vortojn eldiras homoj kiam ili enrigardas la cisternojn. Ĉio senciga. Ne dubeblos, Stubbins; ĉi tie ni havas fiŝon kiu eskapis el kaptiteco. Kaj estas tute eble — neniel certe, sed tute eble — ke mi nun, per li, kapablos establi komunikadon kun la moluskoj. Jen granda bonfortuno”.

¹ “La granda cisterno bezonas purigon.”

2. LA RAKONTO DE LA FIĜITO

NU, nun rekomencinte sian malnovan hobion pri la molusko-lingvoj, la Doktoro ne volis ĉesigi. Li tralaboris la nokton.

Iom post la noktomezo mi ekdormis en seĝo. Ĉirkaŭ la dua matene Bumpo endormiĝis ĉe la rado; kaj dum kvin horoj *La Kurlo* povis drivi kien ĝi volis. Sed ankoraŭ Johano Dolittle laboradis, plej penante kompreni la lingvon de la fiĝito, klopodante komprenigi sin al la fiĝito.

Kiam mi vekigis denove estis plena taglumo. La Doktoro ankoraŭ staris ĉe la aŭskulto-cisterno, aspektante laca kiel strigo kaj malsekega. Sed sur lia vizaĝo estis fiera feliĉa rideto.

“Stubbins”, li diris tuj kiam li vidis min moviĝi, “mi sukcesis. Mi akiris la ŝlosilon al la lingvo de la fiĝito. Ĝi estas ege malfacila lingvo — tute malsimila al ĉio kion mi ĝis nun aŭdis. La sola afero al kio ĝi similetas — nur tre malmulte, estas la antikva hebrea. Ĝi ne estas moluska lingvo; sed ĝi estas granda paŝo proksimen al tio. Nun, nu nun mi volas ke vi prenu krajonon kaj freŝan notlibron kaj skribu ĉion kion mi diros. La fiĝito promesis diri al mi la historion de sia vivo. Mi tradukos ĝin anglen kaj vi skribu ĝin en la libron. Ĉu vi pretas?”

Denove la Doktoro metis sian oreon sub la nivelon de la akvo; kaj kiam li komencis paroli, mi komencis skribi. Kaj jen la historio kiun la fiĝito diris al ni.

DEK TRI MONATOJ EN AKVARIO

“Mi naskiĝis en Pacifiko, proksime al la bordo de Ĉilio. Mi estis unu el familio da dumil kvincent dek. Baldaŭ post kiam niaj gepatroj forlasis nin, ni junuloj disiris. Mia familio estis disigita — de grego da balenoj kiuj ĉasis nin. Mi kaj mia fratino Klippo (ŝi estis mia plej amata fratino) nur tre malfacile sukcesis eskapi ilin. Kutime, balenoj ne estas malfacile defuĝeblaj, se oni estas lerta fuĝisto — kondiĉe ke oni kapablas rapide aldirektiĝi. Sed ĉi tiu kiu postsekvis Klippon kaj min estis tre danĝera baleno. Kiam ajn li perdis nin sub ŝtono aŭ io, li revenis kaj serĉis kaj serĉadis ĝis peli nin denove en la naĝakvon. Neniam alfoje mi vidis tian danĝeran persistan bruton.

“Nu, ni sukcesis forfuĝi de li fine — kvankam nur post kiam li ĉasis nin centojn da kilometroj norden, laŭ la okcidenta bordo de Suda Ameriko. Sed la fortuno malfavoris nin tiutage. Dum ni ripozis kaj penis spiri libere, alia familio de fiĝitoj preternaĝis nin kriante ‘Venu! Naĝu por savi la vivon! La hundofiŝoj venas!’

“Nu, hundofiŝoj tre amas manĝi fiĝitojn. Ni estas, oni povus diri, ilia plej amata manĝaĵo — kaj pro tio ni ĉiam fortenis nin de profunda kotoplana akvo. Krome, ne estas facile forfuĝi de hundofiŝoj; ili estas rapidegaj kaj lertaj ĉasistoj. Do ni devis eksalti kaj plu naĝadi.

“Irinte kelkcent kilometrojn pli ni retrorigardis kaj vidis ke la hundofiŝoj proksimiĝas. Do ni eniris havenon. Hazarde, ĝi estis haveno de la okcidenta bordo de Usono. Tien, ni divenis kaj esperis, la

hundofiŝoj verŝajne ne sekvos nin. Efektive, ili ne eĉ vidis nin eniri, sed plu hastis norden kaj ni neniam revidis ilin. Mi esperas ke ili morte frostiĝis en la arktaj maroj.

“Sed, kiel mi diris, la fortuno malfavoris nin tiutage. Dum mi kaj mia fratino lante krozis ĉirkaŭ la ŝipoj ankritaj en la haveno, serĉante oranĝoŝelojn, granda frandaĵo por ni — *Sob! Kapt!* — ni estis kaptitaj per reto.

“Ni baraktis kiel eble plej forte; sed estis senutile. La reto estis mallarĝa-maŝa kaj fortika. Batante kaj frapante ni estis tiritaj supren laŭ la flanko de la ŝipo kaj elŝutitaj sur la ferdekon, alte kaj seke en varmega tagmeza sunlumo.

“Tie du maljunuloj kun barboj kaj okulvitroj kliniĝis super ni, farante strangajn sonojn. Iuj gadedoj estis kaptitaj per la reto samtempe kiel ni. Tiujn la maljunuloj reĵetis en la maron; sed nin ili ŝajne opiniis tre valoraj. Ili zorge metis nin en grandan poton, kaj portinte nin sur la bordon ili iris al granda domo kaj transversis nin el la poto en vitrajn kestojn plenajn de akvo. Tiu domo estis ĉe la rando de la haveno; kaj malgranda fluo de marakvo estis fluigata tra la vitran keston tiel ke ni povis ĝuste spiri. Kompreneble neniam antaŭe ni loĝis inter vitraj muroj; kaj unue ni daŭre provis tranaĝi ilin kaj niaj nazoj ege doloriĝis pro nia plenrapida koliziado kun la vitro.

“Tion sekvis semajnoj kaj semajnoj da laciga pigro. Ili traktis nin bone, laŭ sia kompreno. La olduloj en okulvitroj venis kaj rigardis nin fiere dufoje ĉiutage

kaj certigis ke ni ricevis la ĝustajn manĝaĵojn, la ĝustan kvanton da lumo kaj ke la akvo ne estis tro varma nek tro malvarma. Sed ho, kiom enuiga estis tiu vivo! Ŝajnis ke ni estis ia ekspoziciaĵo. Je certa horo ĉiumatene la grandaj pordoj de la domo estis malfermitaj kaj ĉiuj en la urboj kiuj havis nenion farindan envenis kaj rigardis nin. Estis aliaj kestoj plenaj de diversaj specoj de fiŝoj ĉe la muroj de la granda ĉambro. Kaj la amasoj da homoj promenadis de kesto al kesto, rigardante nin tra la vitro — kun la buŝoj malfermitaj, kvazaŭ duonmensaj flesoj. Tio nin tiom tede ĉagrenis ke ni kutimis malfermi la buŝon reciproke al ili; kaj tion ili ŝajne kredis tre komika.

“Unu tagon mia fratino diris al mi, ‘Ĉu vi kredas, Frato, ke tiuj strangaj bestoj kiuj kaptis nin povas paroli?’

“Certe, diris mi, ‘ĉu vi ne rimarkis ke kelkaj parolas nur per la lipoj, kelkaj per la tuta vizaĝo, kaj ankoraŭ aliaj parolas per la manoj? Kiam ili venas tute proksimen al la vitro eblas aŭdi ilin. Aŭskultu!’

“Tiumomente ino, pli granda ol la aliaj, premis sian nazon sur la vitron, indikis al mi kaj diris al sia ido malantaŭ si, ‘Ho, rigardu, jen stranga fiŝo!’

“Kaj post tio ni rimarkis ke ili preskaŭ ĉiam diris tion kiam ili enrigardis. Kaj dum longa tempo ni supozis ke tio estas la tuto de ilia lingvo, ĉar temas pri popolo kun malmultaj ideoj. Por pasigi la tedajn horojn ni lernis ĝin parkere, ‘Ho, rigardu, jen stranga fiŝo!’ Sed ni neniam sukcesis kompreni ĝian signifon. Aliajn frazojn, tamen, ni ja sukcesis kompreni; kaj ni eĉ lernis legi iomete la homparolon. Multaj grandaj

afiŝoj estis tie, fiksitaj al la muroj; kaj kiam ni vidis ke la gardistoj avertis la homojn ne kraĉi kaj fumi, indikante kolere tiujn afiŝojn kaj voĉlegante ilin, ni eksciis tiam ke tiuj skribaĵoj signifas *Ne fumu* kaj *Ne kraĉu*.

“Kaj dum la vesperoj, post la foriro de la homoj, la sama olda viro kun unu el siaj kruroj ligna, kunbalais ĉiujn arakidŝelojn per balailo ĉiunokte. Kaj dum li faris tion li ĉiam fajfis unusaman melodion al si. Tiu melodio plaĉis al ni; kaj ni lernis ĝin parkere — kredante ĝin parto de la lingvo.

“Tiel pasis plena jaro tiel morne. Kelkajn tagojn novaj fiŝoj estis enportitaj en la aliajn kestojn; kaj aliajn tagojn aliaj fiŝoj estis elportitaj. Unue ni esperis ke oni tenos nin ĉi tie nur provizore, kaj ke post kiam oni rigardos nin sufiĉe, ni estos reliberigitaj en la maron. Sed kiam monatoj venis kaj forpasis, kaj oni lasis nin netuŝitaj, niaj koroj peziĝis en niaj vitraj karceroj, kaj ni interparolis multe malpli.

“Unu tagon kiam la homamaso estis plej densa en la ĉambrego, virino kun ruĝa vizaĝo svenis pro la varmego. Mi rigardis tra la vitro kaj vidis ke la aliaj homoj multe ekscitiĝis — kvankam al mi ne ŝajnis esti tre grave. Oni ĵetis malvarman akvon sur ŝin kaj portis ŝin eksteran en la liberan aeron.

“Tio multe pensigis min; kaj baldaŭ granda ideo ektrafis min.

“Fratino”, mi diris, turninte min al povra Klippo, kiu paŭtis ĉe la malsupro de nia karcero, penante kaŝi sin malantaŭ ŝtono for de la stulta rigardado de la infanoj kiuj amasiĝis ĉirkaŭ nia karcero, ‘supozu ke *ni*

kredigus ke ni estas malsanaj: ĉu vi kredas ke oni forprenus ankaŭ nin el ĉi tiu sufoka domo?’

“Frato, diris ŝi lace, ‘tion ili eble farus. Sed plej verŝajne ili ĵetus nin sur rubamason, kie ni mortus en la varmega sunlumo.’

“Sed’ diris mi, ‘kial ili ĉirkaŭserĉus rubamason, kiam la haveno estas tiom proksima? Kiam ni estis portataj ĉi tien, mi vidis homojn ĵeti sian rubon en la akvon. Se ili ja ĵetus nin tien, ni povus rapide atingi la maron.’

“La Maron!’ murmuris povra Klippo, kun revema okulaspekto (ŝi havis belajn okulojn, mia fratino Klippo). ‘Kiom sonas kvazaŭ songo — la Maron! Ho, Frato, ĉu iam ni denove naĝos en ĝi, laŭ via opinio? Ĉiunokte dum mi kuŝas veka sur la planko de ĉi tiu fiadora karceraĉo, mi aŭdas ĝian laŭtan voĉon soni en miaj oreloj. Kiom mi sopiris je ĝi! Nur unufoje denove senti ĝin, ĝiajn belan, grandan, sanigan hejmecon! Salti, nur salti de la kresto de atlantika ondo, ridi en la ondoŝprucoj de la nordorienta vento, malsupren en la blu-verdan kirliĝantan akvon! Ĉasi la salikokojn dum somera vespero, kiam la ĉielo estas ruĝa kaj la lumo estas roza en la ŝaŭmo! Kuŝi sur la supro, en la tagmeza trankvilo senventa, kaj varmigi la ventron en la tropika sunlumo! Vagadi man-en-mane tra la gigantaj marherbaj arbaroj de Hindia Oceano, serĉante la bongustegajn ovojn de la poppopoj! Ludi kaŝi-serĉi inter la kasteloj de la koralaj vilaĝoj kun iliaj perlaĵ kaj jaspaj fenestroj ornamantaj la plankon de la kariba bordo! Pikniki en la anemonaj kampoj, palbluaj kaj lilagrizaj, kuŝantaj

en la malaltaĵoj preter la Sudmara Ĝardeno! Transkapen saltadi sur la risortaj sponĝobedoj de la meksika golfo! Priserĉi la mortajn ŝipojn kaj vidi kiaj mirindaĵoj kaj aventuroj troviĝas interne! — Kaj, poste, dum vintraj noktoj kiam la nordorienta vento ŝaŭmigas la akvon, plongi pli kaj pli suben por fuĝi de la malvarmo, al kie la akvo estas varma, kaj sob sob kaj ankoraŭ pli sob, ĝis vidi la scintiladon de la fajrangiloj subegaj kie niaj amikoj kaj gekuzoj sidas babilante ĉirkaŭ la Konsilia Groto — babilante, Frato, pri la novaĵoj kaj klaĉaĵoj de *la Maro!* ... Ho—'

“Kaj tiam ŝi tute cedis al larmoj.

“Ĉesu!’ mi diris. “Vi nostalgiigas min. Atentu: ni ŝajnigu ke ni estas malsanaj — eĉ pli bone, ke ni estas mortaj; kaj ni trovu kio okazos. Se ili ĵetos nin sur rubamason kaj ni fritiĝos en la sunvarmego, ni ne multe pli suferos ol ĉi tie en ĉi tiu odoraĉa karcerio. Kion vi diras? Ĉu vi akceptas la riskon?’

“Jes, ŝi diris — ‘volonte.’

“Do la sekvan matenon du fiĝitoj estis trovitaj de la gardisto flosante sur la supro de la akvo en sia kesto, rigidaj kaj mortaj. Ni bonege imitis mortajn fiŝojn — se mi rajtas mem laŭdi nin. La gardisto kuris venigi la maljunajn sinjorojn kun okulvitroj kaj barboj. Ili suprenetendis siajn manojn hororite kiam ili vidis nin. Ili levis nin zorge el la akvo kaj kuŝigis nin sur malsekajn tukojn. Tiu estis la plej malfacila parto de la afero. Se oni estas fiŝo kaj estas prenita el la akvo oni devas daŭre malfermi kaj fermi la buŝon por povi spiri — kaj eĉ tion oni ne povas daŭrigi longe. Kaj dum la tuta tempo ni devis resti rigidaj kiel

bastonetoj kaj spiri silente tra duone fermitaj lipoj.

“Nu, la olduloj pikis nin kaj palpis nin kaj pinĉis nin ĝis mi kredis ke ili neniam ĉesigos tion. Poste, dum iliaj dorsoj estis dummomente fortunitaj, aĉa kato grimpis sur la tablon kaj preskaŭ manĝis nin. Bonŝance la olduloj turnis sin kaj forpuŝis ŝin. Estu certa, tamen, ke ni larĝe malfermis la buŝojn por engluti aeron kelkafoje dum ili ne nin rigardis; kaj nur tio savis nin de sufokiĝo. Mi volis flustri al Klippo ke ŝi estu kuraĝa kaj eltenu. Sed mi ne povis fari eĉ tion; ĉar, kiel vi scias, ne aŭdeblas la plej multaj specoj de fiŝparolo — eĉ ne krio — se oni ne estas sub akvo.

“Tiam, ĝuste kiam ni pretis cedi kaj sciigi ke ni plu vivas, unu el la olduloj malfeliĉe kapneis, levis nin kaj portis nin el la konstruaĵo.

“Nun, jen!’ mi pensis interne. ‘Baldaŭ ni renkontos nian faton: liberecon aŭ la rubujon.’

“Ekstere, terurante nin, li iris rekte cele grandan cindrobarelon kiu staris kontraŭ la muro aliflanke de ĝardeno. Plej feliĉige al ni, tamen, dum li transiris la ĝardenon tre malpura viro kun ĉaro kaj ĉevaloj alveturis kaj forprenis la cindrobarelon. Mi supozas ke ĝi apartenis al li.

“Tiam la maljunulo ĉirkaŭrigardis serĉante alian lokon por forĵeti nin. Li preskaŭ ĵetis nin sur la teron. Sed evidente li ekpensis ke tio malnetigus la ĝardenon do li ne ĵetis. La atendo estis timegiga. Li marŝis ekster la ĝardenpordon kaj mi rekomencis malesperi kiam mi vidis ke nun li intencas ĵeti nin en la defluilon de la vojo. Sed (bonfortuno vere akompanis nin tiutage) granda viro en bluaj vestoj kaj

arĝentaj butonoj haltigis lin ĝustatempe. Evidente, laŭ la maniero per kiu la granda viro admonis kaj gestis per kurta dika bastoneto, estis kontraŭ la reguloj de la vilaĝo ĵeti mortajn fiŝojn en la stratojn.

“Fine, nekredeble ĝojige al ni, la maljunulo turnis sin kaj marŝis tenante nin cele la havenon. Li marŝis tiom malrapide, murmurante al si tutvoje kaj rigardante la blue vestitan viron per angulo de okulo, ke mi volis mordi lian fingron por hastigi lin. Kaj Klippo kaj mi efektive estis farantaj nian lastan aergluton.

“Fine li atingis la marmuron, kaj lastafoje malfeliĉe rigardinte nin li faligis nin en la akvon de la haveno.

“Neniam ni spertis ion similan al la ekscito de tiu momento, dum ni sentis la salan malsekon kovri niajn kapojn. Farante unu vostoskueton ni ekreviviĝis. La maljunulo estis tiom surprizita ke li falis rekte en la akvon, preskaŭ sur nin. De tio lin savis maristo per hokstango; kaj kiam ni lastafoje vidis lin, la blue vestita viro estis trenanta lin per la mantelkolumo, denove admonante lin. Ŝajne ankaŭ estis kontraŭ la reguloj de la vilaĝo ĵeti mortajn fiŝojn en la havenon.

“Sed ni? — Kial ni atentus aŭ pripensus liajn problemojn? *Ni estis liberaj!* Fulme saltante, kurbe naĝante, farante ĉiajn zigzagojn — kriante pro ĝojo, ni rapidis al nia hejmo kaj la libera maro!

“Jen mia tuta historio, kaj nun, konforme al mia promeso hieraŭ nokte, mi penos respondi ĉiujn demandojn viajn pri la maro, kondiĉe ke vi liberigos min tuj poste”.

La Doktoro: “Ĉu ekzistas iu parto de la maro pli profunda ol tiu nomata Profundaĵo Nerono? — Tiu estas proksima al la Insulo Gvamo”.

La Fiĝito: “Ho, certe. Estas multe pli profunda proksime al la enfluejo de Rivero Amazono. Sed ĝi estas malgranda kaj estas malfacile trovi ĝin. Ni nomas ĝin ‘La Profunda Truo’. Kaj estas alia en Maro Antarktika”.

La Doktoro: “Ĉu vi mem scipovas iun moluskan lingvon?”

La Fiĝito: “Ne, ne eĉ unu vorton. Ni normalaj fiŝoj tute ne miksiĝas kun la moluskoj. Ni opinias ke ili estas de malsupera klaso”.

La Doktoro: “Sed kiam vi estas proksima al ili, ĉu vi povas aŭdi la sonon de ilia parolado — mi volas diri, ne nepre komprenante kion ili diras?”

La Fiĝito: “Nur kiam temas pri la plej grandaj. Moluskoj havas tiom malfortajn voĉetojn ke estas preskaŭ maleble ke iu alia ol ili mem povas aŭdi ilin. Sed rilate al la pli grandaj, estas alie. Ili faras mornan tondran bruon, iom similan al tiu de fera tubo batata per ŝtono — sed tute ne tiom laŭta, kompreneble”.

La Doktoro: “Mi multe fervoras subiri al la fundo de la maro — por studi multajn aferojn. Sed ni terbestoj, kiel vi sendube scias, ne povas spiri subakve. Ĉu vi havas iajn ideojn pri rimedo kiun mi povus utiligi?”

La Fiĝito: “Mi kredas ke por ambaŭ viaj problemoj estus plej bone ke vi provu kontakti la Grandan Vitran Marhelikon”.

La Doktoro: “E..., a... — kiu, aŭ kio, estas la Granda Vitra Marheliko?”

La Fiĝito: “Li estas enorma salakva heliko, el la litorina familio, sed granda kiel domo. Li parolas tre laŭte — kiam li parolas, sed li ne parolas ofte. Li povas iri al iu ajn parto de la oceano, al ĉiu profundo, ĉar li ne bezonas timi iun ajn marulon. Lia konko estas el travidebla perlamoto, tiel ke eblas travidi ĝin; sed ĝi estas dika kaj fortika. Kiam li estas ekster sia konko kaj portas ĝin malplenan sur sia dorso, estas sufiĉa spaco en ĝi por ĉaro kaj du ĉevaloj. Oni vidis lin porti siajn manĝaĵojn en ĝi veturante”.

La Doktoro: “Ŝajnas al mi ke tiu estas ĝuste tia besto kian mi serĉadas. Li povus porti min kaj mian asististon en sia konko kaj ni povus esplori la plej profundajn profundaĵojn sekure. Ĉu vi kredas ke vi povus venigi lin al mi?”

La Fiĝito: “Ve! ne. Mi volonte farus tion se mi povus; sed li estas preskaŭ neniam renkontata de ordinaraj fiŝoj. Li loĝas ĉe la fundo de la Profunda Truo, kaj malofte eliras. — Kaj en la Profundan Truon, kies malsupra akvo estas kotoplana, fiŝoj kia mi timas iri”.

La Doktoro: “Vere ve! Tio desapontegas. Ĉu estas multaj tiaj helikoj en la maro?”

La Fiĝito: “Ho, ne. Li estas la sola ankoraŭ ekzistanta, depost la morto de lia dua edzino antaŭ tre tre longe. Li estas la lasta el la Gigantaj Moluskoj. Li apartenas al pasintaj epokoj kiam la balenoj estis terbestoj kc. Oni diras ke li aĝas pli ol sep mil

jarojn”.

La Doktoro: “Jadi, kiajn mirindaĵojn li povus rakonti al mi! Mi vere volegas renkonti lin”.

La Fiĝito: Ĉu vi deziris fari al mi pli da demandoj? La akvo en ĉi tiu kesto fariĝas tre varma kaj febliga. Mi volas esti remetita en la maron tuj kiam eblos”.

La Doktoro: “Nur unu demandon pli: kiam Kristoforo Kolumbo transvelis Atlantikon en 1492, li ĵetis en la akvon du ekzemplerojn de sia taglibro protektatajn en bareloj. Unu el ili neniam estis trovita. Sendube ĝi sinkis. Mi deziras akiri ĝin por mia librokolekto. Ĉu hazarde vi scias kie ĝi estas?”

La Fiĝito: “Jes ja. Ankaŭ tio estas en la Profunda Truo. Kiam la barelo sinkis la fluoj drivigis ĝin norden sekvante kion ni nomas la Klinaĵo Orinoko, ĝis fine ĝi malaperis en la Profundan Truon. Se ĝi estus en iu alia parto de la maro mi provus akiri ĝin por vi; sed ne el tie”.

La Doktoro: “Nu, mi kredas ke mi finis. Mi preferus ne remeti vin en la maron, ĉar mi scias ke tuj post tio, mi elpensos cent aliajn demandojn kiujn mi volos demandi al vi. Sed mi devas plenumi mian promeson. Ĉu vi deziras manĝi ion antaŭ ol foriri? — la tago ŝajnas malvarma — kelkajn biskviterojn aŭ ion alian?”

La Fiĝito: “Ne, mi ne haltos. Ĝuste nun mi volas nur freŝan marakvon”.

La Doktoro: “Mi ne povas sufiĉe multe danki vin pro la informo kiun vi donis al mi. Vi estis tre helpa kaj pacienca”.

La Fiĝito: “Ne dankindas. Por mi estis granda plezuro helpi la grandan Johanon Dolittle. Vi estas, kiel vi kompreneble scias, jam tre fama inter la pli altaj klasoj de fiŝoj. Adiaŭ! — kaj bonan fortunon por vi, por via ŝipo, kaj por ĉiuj viaj planoj!”

La Doktoro portis la aŭskulto-keston al luko, malfermis ĝin kaj verŝis la keŝtakovon en la maron.

“Adiaŭ!” li murmuris kiam mallaŭtega plaŭdeto aŭdiĝis el ekstere.

Mi faligis mian krajonon sur la tablon kaj retrokliniĝis kun suspiro. Miaj fingroj estis tiom rigidaj pro verkista kramfo ke mi sentis kvazaŭ mi neniam denove povos malfermi mian manon. Sed mi, almenaŭ, estis bone dorminta dum la nokto. Sed la povra Doktoro, nu li estis tiom laca ke li apenaŭ estis remetinta la keston sur la tablon kaj sidiginte sin en seĝo, kiam liaj okuloj fermiĝis kaj li komencis ronki.

En la ekstera koridoro Polinezio gratis kolere la pordon. Mi stariĝis kaj lasis ŝin eniri.

“Kiom bele!” ŝi furiozis. “Kia ŝipo estas ĉi tiu? Jen tiu kolorhaŭtulo dormas sub la rado; la Doktoro dormas ĉi tie; kaj vi faras signaĉarojn en kajero per kraĵono! Ĉu vi supozas ke la ŝipo per si mem direktos sin al Brazilo? Ni nur disdrivas sur la maro kvazaŭ malplena botelo — kaj ni jam malfruis je unu semajno. Kio okazis al vi ĉiuj?”

Ŝi tiom koleris ke ŝia voĉo fariĝis kriego. Sed pli ol tio estus bezona por vekti la Doktoron.

Mi zorge metis la notlibron en tirkeston kaj iris al la ferdeko por preni la radon.

3. MALBONA VETERO

TUJ kiam mi estis reĝustiginta la direkton de *La Kurlo* mi rimarkis ion kuriozan: ni ne plu veturis tiom rapide kiom antaŭe. Nia bonpela vento estis preskaŭ tute malaperinta.

Tio, unue, ne maltrankviligis nin, ĉar ni supozis ke ĝi reekblovos. Sed la tuta tago pasis; du tagoj; semajno — dek tagoj, kaj la vento ne plifortiĝis. *La Kurlo* nur velis malrapide kiel ŝanceliĝanta infaneto.

Nun mi vidis ke la Doktoro malkvietiĝas. Li multafoje elprenis sian sekstanton (tio estas ilo kiu ebligas al oni scii en kiu parto de la oceano oni estas) kaj kalkuladis. Li konstante konsultis siajn mapojn kaj mezuris distancojn sur ili. La malproksiman randon de la maro, tute ĉirkaŭ ni, li ekzamenis per sia teleskopo centfoje dum la tago.

“Sed Doktoro”, mi diris kiam mi trovis lin unu posttagmezon murmuranta al si pri la nebula aspekto de la ĉielo, “ne vere tre gravus, ĉu, se ni ja devus iom pli longe veturi? Ni havas multan provianton enŝipe nun; kaj la Purpura Paradizeo komprenos ke io devigas nin malfrui”.

“Jes, supozeble”, li diris penseme. “Sed mi maldeziras atendigi ŝin. Ĉisezone en la jaro ŝi kutimas iri al la peruaj montoj — por sia sano. Kaj, krome, la bona vetero kiun ŝi antaŭdiris verŝajne finiĝos tre baldaŭ kaj ankoraŭ pli prokrastigos nin. Se nur ni povus daŭre veladi je eĉ mezgranda rapido, tio ne ĝenus min. Sed ĉi tiu preskaŭhalto, preskaŭ tute

senmova, malkvietigas min. — Ha, nun venas vento — ne tre forta — sed eble ĝi plifortiĝos”.

Milda venteto el la nordoriento venis kantante tra la ŝnuregoj; kaj ni ridetis esperoplene al la kliniĝintaj mastoj de *La Kurlo*.

“Ni devos iri nur pliajn ducent kvindek kilometrojn, por vidi la bordon de Brazilo”, diris la Doktoro. “Se tiu vento nur daŭros, senvarie, dum tuta tago, ni vidos la teron”.

Sed subite la vento ŝanĝiĝis, unue oriente, poste ree nordoriente—kaj post tio norde. Ĝi venis kiel ne-regulaj ekblovoj, kvazaŭ ne decidinte kiudirekte blovi; kaj mi estis multe okupata ĉe la rado, direktante *La Kurlon* tien kaj reen por teni ĝin ĉe la ĝusta direkto.

Baldaŭ ni aŭdis Polinezion, kiu estis supre sur la mastoj serĉante teron kaj preterpasantajn ŝipojn, kriegi al ni,

“Malbona vetero venas. Tiu saltema vento estas avertaĉo. Kaj vidu!—tie oriente—ĉu vi vidas tiun nigran linion, malsupre? Se tio ne estas ŝtormo do mi estas surterulo! La ventegoj en ĉi tiu regiono estas danĝeraj, kiam ili plenforte blovas — elŝiras la kanvason kvazaŭ paperon. Vi prenu la radon, Doktoro: forta brako necesos se estos vera ŝtormo. Mi vekos Bumpon kaj Ĉi-Ĉio. Laŭ mi, aŭguras malbonege. Estos plej bone ke ni tuj mallevu la velon, ĝis ni vidos kiom forte blovos”.

Vere, la tuta ĉielo nun komencis akiri tre minacan aspekton. La nigra linio orienta plinigrigis dum ĝi pliproksimiĝis. Malalta flustra bruvo muĝetis super la maro. La akvo kiu antaŭe estis tiom blua kaj rideta

fariĝis malkvieta, hide griza. Kaj trans la senlumigantan ĉielon, pecoj de nubo flugis kvazaŭ ĉifonaj sorĉistinoj flugfuĝantaj de la ŝtormo.

Mi devas konfesi ke mi timis. Komprenu, ĝis tiam mi vidis la maron nur amika: kelkafoje trankvila kaj pigra; kelkafoje ridanta, aventurema kaj riskoprenema; kelkafoje kontemplema kaj poezia, dum lunbrileroj ŝanĝis ĝiajn ondetojn en arĝentajn fadenojn kaj revantaj neĝaj noktonuboj stakis fe-kastelojn en la ĉielo. Sed ĝis nun mi neniam renkontis, eĉ ne divenis, la teruran forton de la sovaĝa kolero de la Maro.

Kiam fine tiu ŝtormo ekbatis nin ni tute kliniĝis surflanken, kvazaŭ iu nevidebla giganto estis batinta la vangon de la povra *Kurlo*.

Post tio, ĉio okazis tiom konfuze kaj rapide ke pro la vento kiu ĉesigis onian spiradon, la blindiga akvo, la surdiga bruo, kaj ĉio alia, mi ne havas klaran ideon pri kiel okazis nia averio.

Mi memoras vidi la velojn, el kiuj ni tiumomente penis fari rulaĵojn sur la ferdeko, forŝiritaj el niaj manoj de la vento kaj enmariĝi kvazaŭ malkara balono — kaj preskaŭ kunporti Ĉi-Ĉion. Kaj mi malklare memoras Polinezion kriegi ke iu el ni descendu kaj fermu la lukojn.

Kvankam niaj mastoj malhavis velojn, ni nun bloviĝis suden rapidege. Sed fojfoje gigantaj griznigraj ondoj leviĝis el sub la flanko de la ŝipo kvazaŭ koŝmaraj monstroj, ŝvelante kaj grimpante, poste subpremigante nin en la maron; kaj tiam la povra *Kurlo* ekhaltis, duone sub la akvo, kvazaŭ anhelanta dronanta porko.

Dum mi rampadis cele la radon por renkonti la Doktoron, kroĉiĝante kvazaŭ hirudo per manoj kaj kruroj al la reloj por eviti enmaren bloviĝi, unu el tiuj fortegaj maraĵoj tire nuligis mian alkroĉiĝon, kaj puŝis min kvazaŭ korkon laŭ la tuta longo de la ferdeko. Mia kapo batiĝis kontraŭ pordon kun fortega bruo. Kaj tuj post tio mi svenis.

4. AVERIO!

KIAM mi vekiĝis mia kapo estis tre nebuleca. La ĉielo estis blua kaj la maro estis trankvila. Unue mi pensis ke sendube mi endormiĝis en la sunlumo sur la ferdeko de *La Kurlo*. Pensante ke mi malfruos por mia vico ĉe la rado, mi provis stariĝi. Mi trovis ke mi ne povas; miaj brakoj estis ligitaj al io malantaŭ mi per fortika ŝnuro. Tordinte mian kolon mi vidis ke temas pri la malsupra parto de masto. Mi subite konsciis ke mi efektive ne sidas sur ŝipo; mi sidas sur nur peco de ŝipo. Mi komencis timegi malkomforte. Kunpremante miajn okulojn mi serĉis la randon de la maro norde, oriente, sude kaj okcidente: nenia tero: neniuj ŝipoj; nenio videbla. Mi estis sola en la oceano!

Fine, iom post iom, mia kontuzita kapo komencis memori kio okazis: unue, la venon de la ŝtormo; la enmariĝon de la veloj; poste la grandan ondon kiu batŝovis min kontraŭ la pordon. Sed kio okazis al la Doktoro kaj la aliaj? Kiu tago estas, morgaŭ aŭ postmorgaŭ? — Kaj kial mi sidas sur nur parto de ŝipo?

Iom post iom mi sukcesis puŝi mian manon en mian jakon, mi trovis mian poŝtranĉilon kaj tranĉis la ŝnuron kiu ligis min. Tio memorigis al mi rakonton pri averio kiun Joĉjo iam rakontis al mi, pri kapitano kiu ligis sian propran filon al masto por ke li ne estu forbalaita de ventego desur la ŝipo. Do kompreneble la Doktoro faris la samon al mi. Sed kie li estas?

La terura penso trafis min ke la Doktoro kaj la ceteraj estis dronintaj, ĉar neniu alia vrakaĵo videblis



“MI ESTIS SOLA EN LA OCEANO!”

sur la akvo. Mi stariĝis kaj denove ĉirkaŭrigardis la maron. — Nenion — nenio escepte de akvo kaj ĉielo!

Baldaŭ, de tre malproksime, mi vidis la malgrandan malhelan formon de birdofluganta tre proksime al la ŝaŭmo. Kiam ĝi proksimiĝis mi vidis ke ĝi estas Ŝtorma Petrelo. Mi provis paroli al ĝi, por trovi ĉu ĝi povos doni al mi informojn. Sed misfortune mi ne estis lerninta multe da marbirda lingvo kaj mi ne povis eĉ allogi ĝian atenton, des malpli kompreni al ĝi mian deziron.

Dufoje ĝi rondiris mian floson, pigre, apenaŭ flirtante flugilon. Kaj mi ne povis ne demandi al mi, malgraŭ mia mizero, kie ĝi pasigis la lastan nokton — kiel ĝi, aŭ iu alia vivanto, travivis tian detruplenan ŝtormon. Tio komprenigis al mi la gigantan diferencon inter diversaj bestoj; kaj ke granda kaj forto ne estas nepra solvo. Al ĉi tiu petrelo, multe malpli granda kaj malpli forta ol mi, la Maro povis fari kion ajn ĝi deziris, ŝajne; kaj lia sola respondo estis pigra impertinenta flugilmoveto! *Li* estis tiu kiu meritis la titolon *sperta maristo*. Ĉar, ĉu venas bloveganta ventego, ĉu venas sunbrila trankvilo, ĉi tiu akva sovaĝejo estis lia hejmo.

Malsupre fluginte super la maro ĉirkaŭ mi (nur serĉante manĝaĵon, supozeble) li foriris laŭ la direkto el kiu li venis. Kaj denove mi estis sola.

Mi ekkonsciis ke mi iom malsatas — kaj ankaŭ iom soifas. Mi komencis pensi ĉiajn mizerajn pensojn, kiel oni pensas kiam oni estas salsenta kaj mankas al oni la matenmanĝo. Kio okazos al mi nun, se la Doktoro kaj la aliaj dronis? Mi mortiĝe malsatos

aŭ mortos pro soifo. Tiam la suno iris malantaŭ kelkajn nubojn, kaj mi malvarmis. Kiom da centoj aŭ miloj da kilometroj mi estas de tero? Kion se nova ŝtormo okazos kaj detruos eĉ ĉi tiun povran floson sur kiu mi staras?

Mi daŭrigis tiel dum kelka tempo, fariĝante pli kaj pli morna, ĝis kiam mi ekpensis pri Polinezio. “Vi ĉiam estas sekura kun la Doktoro”, ŝi estis dirinta. “Li atingas la celon. Memoru tion”.

Mi estas certa ke mi ne sentus tiom da malplezuro se li estus ĉi tie kun mi. Estis nur la soleco kiu dezirigis min plori. Kaj tamen la petrelo estis sola! — Kia bebo mi estas, mi diris al mi, timante ĝislarme nur pro soleco! Mi estis tute sekura kie mi estas — almenaŭ provizore. Johanon Dolittlen ne timigus malgrandaĵo ĉi tia. Li ekscitiĝis nur kiam li faris novan trovon, trovis novan insekton aŭ ion. Kaj se kion diris Polinezio estis vera, li ne povus esti dronigita kaj ĉio fine fariĝos ĝusta iel.

Mi ŝveligis mian bruston, butonumis mian kolumon, kaj komencis marŝadi tien kaj reen sur la malgranda floso por varmiĝi. Mi estos kia Johano Dolittle. Mi ne ploros — kaj mi ne ekscitiĝos.

Kiom longe mi paŝis tien kaj reen, mi ne scias. Sed dum longa tempo — ĉar mi havis nenion alian por fari.

Fine mi laciĝis kaj kuŝiĝis por ripozi. Kaj malgraŭ ĉiuj miaj problemoj, mi baldaŭ endormiĝis.

Ĉifoje kiam mi vekigis, steloj rigardadis malsupren al mi el sennuba ĉielo. La maro estis ankoraŭ trankvila; kaj mia kurioza veturilo ŝanceliĝadis milde

sub mi sur negranda ondeto. Mia tuta bela kuraĝo forlasis min dum mi rigardadis supren en la grandan silentan nokton kaj sentis la dolorojn de malsato kaj soifo eĉ pli forte ol antaŭe.

"Ĉu vi estas veka?" diris alta arĝenta voĉo apud mia kubuto.

Mi eksaltis kvazaŭ iu estus puŝinta pinglon en min. Kaj jen, staranta ĉe la finaĵo mem de mia floso, kun sia bela ora vosto brilanta milde en la stellumo, sidis Mirando, la Purpura Paradizeo!

Neniam en mia vivo mi tiom ĝojis vidi iun. Mi preskaŭ falis enakven dum mi saltis ĉirkaŭbraki ŝin.

"Mi ne volis veki vin", diris ŝi. "Mi divenis ke sendube vi estas laca post ĉiuj viaj spertoj.—Ne elpremu mian vivon, knabo: mi ne estas remburita anaso, sciuj".

"Ho Mirando, karulnjo", diris mi, "Tiom ĝojigas min vidi vin. Diru, kie estas la Doktoro? Ĉu li vivas?"

"Kompreneble li vivas — kaj mi firme kredas ke li ĉiam vivos. Li estas tiudirekte, ĉirkaŭ sesdek kvin kilometrojn okcidente".

"Kion li faras tie?"

"Li sidas sur la alia duono de *La Kurlo*, razante sin — almenaŭ, tion li faris kiam mi foriris de li".

"Nu, dank' al Ĉielo ke li vivas!" diris mi. — "Kaj Bumpo — kaj la bestoj, ĉu ili estas bonstataj?"

"Jes, ili estas kun li. Via ŝipo frakasiĝis en du partojn dum la ŝtormo. La Doktoro ligis vin kiam li trovis vin kontuzita. Kaj la parto sur kiu vi estis apartiĝis kaj forfloris. Vere, *kia* ŝtormo ĝi estis! Oni devas esti mevo aŭ albatroso por travivi tian veteron.

Mi rigardis serĉante la Doktoron jam de tri semajnoj, de la supraĵo de klifo; sed la pasintan nokton mi devis rifuĝi en kavon por eviti la forbloviĝon de miaj vosto-plumoj. Tuj kiam mi trovis la Doktoron, li sendis min kun kelkaj focenoj por serĉi vin. Ŝtorma Petrelo proponis helpi nin serĉadi. Tre granda nombro da marbirdoj estis grupiĝinta por bonvenigi la Doktoron; sed la severa vetero iom nuligis la aranĝojn faritajn por taŭge bonvenigi lin. La Petrelo la unua informis nin pri kie vi estas”.

“Nu, sed kiel mi povos atingi la Doktoron, Mirando? — Mi ne havas remilojn”.

“Atingi lin!—Nu, vi jam iras al li. Rigardu malantaŭ vin”.

Mi turnis min. La luno ĵus ekleviĝis sur la rando de la maro. Kaj mi nun vidis ke mia flosa moviĝas tra la akvo, sed tiom milde ke mi ne rimarkis ĝin antaŭe.

“Kio movas nin?” mi demandis.

“La focenoj”, diris Mirando.

Mi reiris al la malantaŭo de la flosa kaj rigardis en la akvon. Kaj ĝuste sub la surfaco mi povis vidi la neklarajn formojn de kvar grandaj focenoj, kies glataj haŭtoj scintilis en la lunlumo, puŝantaj la floson per siaj nazoj.

“Ili estas malnovaj amikoj de la Doktoro”, diris Mirando. “Ili farus ĉion por Johano Dolittle. Ni baldaŭ vidos lian grupon. Ni estas iom proksimaj al la loko kie mi lasis ilin.— Jes, jen ili! Ĉu vi vidas tiun obskuran formon? — Ne, pli dekstre de la direkto de via rigardo. Ĉu vi ne povas vidi la figuron de la nigra viro starantan kontraŭ la ĉielo? — Nun Ĉi-Ĉio ekvid-

as nin — li mangestas. Ĉu vi ne vidas ilin?”

Mi ne vidis, ĉar miaj okuloj ne estis tiom akrevidaj kiel tiuj de Mirando. Sed baldaŭ el ie en la neklara krepusko mi aŭdis Bumpon kanti siajn afrikajn komikajn kantojn per la plena forto de sia enorma voĉo. Kaj post nelonge, streĉe rigardante direkte al la sono, mi fine kapablis rimarki obskuran mason da distordita frakasita vrakaĵo — la sola restaĵo el la povra *Kurlo* — flosanta malalte en la akvo.

Saluto aŭdiĝis en la nokto. Kaj mi respondis. Ni daŭrigis tion, vokante unu al la alia trans la trankvilan noktan maron. Kaj kelkajn minutojn poste la du duonoj de nia brava malgranda ruiniĝinta ŝipo kunfrapis unu la alian, milde.

Nun kiam mi estis pli proksima kaj la luno estis pli alta, mi povis pli klare vidi. Ilia parto de la ŝipo estis multe pli granda ol la mia.

Ĝi kuŝis parte sur sia flanko; kaj la plejparto de ili staris sur la supraĵo manĝante biskvitojn ŝipajn.

Sed tre proksime al la rando de la akvo, uzante la trankvilan surfacon de la maro kiel spegulon kaj pecon de rompita botelo kiel razilon, Johano Dolittle razadis sian vizaĝon per la lumo de la luno.

5. TERO!

ILI ĉiuj laŭte salutis min dum mi rampis de mia parto de la ŝipo sur ilian. Bumpo portis al mi mirindan trinkon da freŝa akvo kiun li ĉerpis el barelo; kaj Ĉi-Ĉio kaj Polinezio staris ĉirkaŭ mi manĝigante min per ŝipaj biskvitoj.

Sed la ekvido de la ridetanta vizaĝo de la Doktoro — la simpla scio ke mi denove estas kun li — plifeliĉigis min pli ol ĉio alia. Dum mi rigardis lin zorge viŝi sian vitran razilon kaj formeti ĝin por posta reuzo, mi ne povis ne kompari lin en mia menso kun la Ŝtorma Petrelo. Vere, la vasta stranga scio kiun li akiris per sia parolo kaj amikeco kun bestoj donis al li la kapablon fari aferojn kiajn neniu alia homo aŭdacus provi. Kiel la petrelo, li ŝajne povis ludi kun la maro negrave kiom ĝi petolis. Ne estis mirinde ke multaj el la sensciaj sovaĝaj popoloj inter kiuj li pasis dum siaj vojaĝoj faris statuojn de li montrantaj lin kiel duone fiŝon, duone birdon, kaj duone homon. Kaj kvankam estis ridinde, mi povis plene kompreni kion Mirando volis diri, kiam ŝi diris ke ŝi firme kredas ke li ne povos iam morti. Nur esti kun li donis al oni mirindan senton de komforto kaj sekuro.

Escepte de lia aspekto (liaj vestoj estis ĉifitaj kaj malsekaj kaj lia multebatita alta ĉapelo estis makulita de salakvo), tiu ŝtormo kiu tiom timigis min ne maltrankviligis lin ol implikiĝi en la kota malprofundaĵo en Rivero Puddleby.

Ĝentile dankinte Mirandon pro ŝia rapida alven-

igo de mi, li petis ŝin nun antaŭiri nin kaj gvidi nin al Insulo Atelo. Post tio, li ordonis al la focenoj lasi mian malnovan ŝippecon kaj puŝi la pli grandan parton al kie ajn gvidos nin la Paradizeo.

Kiom li perdis en la averio krom sia razilo mi ne sciis — ĉion, plej verŝajne, kune kun la tuta monaro kiun li estis ŝparinta por aĉeti la ŝipon. Sed ankoraŭ li ridetis kvazaŭ mankas al li tute nenio en la mondo. La solaj savitaĵoj, kiom mi povis vidi — krom la barelo da akvo kaj la sako da biskvitoj — estis liaj multevaloraj notlibroj. Tiujn, mi vidis kiam li stariĝis, li estis liginta ĉirkaŭ sian talion per metroj kaj metroj da maldikaj ŝnuroj. Li estis, kiel olda Mateo Mugg kutimis diris, grandulo. Li estis nekredeblulo.

Kaj nun tri tagojn ni daŭrigis nian veturon, malrapide sed senhalte — suden.

La sola ĝeno kiun ni spertis estis la malvarmo. Tio ŝajnis pliiĝi dum ni antaŭeniris. La Doktoro diris ke la insulo, forpuŝita de la granda ventego forde siaj kutimaj direktoj, evidente drivis pli suden ol iam antaŭe.

La trian nokton povra Mirando revenis al ni preskaŭ frostita. Ŝi diris al la Doktoro ke matene ni trovos la insulon tre proksima al ni, kvankam ni ne povis tiumomente vidi ĝin pro la malklara senluma nokto. Ŝi diris ke ŝi devas hasti tuj al pli varma klimato; kaj ke ŝi vizitos la Doktoron en Puddleby la sekvan aŭguston, kiel kutime.

“Ne forgesu, Mirando”, diris Johano Dolittle, “se vi aŭdos ion pri kio okazis al Longa Sago, sendu al mi mesaĝon”.

La Paradizeo certigis lin ke ŝi faros tion. Kaj kiam

la Doktoro estis plurfoje redankinta ŝin pro ĉio kion ŝi faris por ni, ŝi deziris al ni bonan fortunon kaj malaperis en la nokto.

Ni estis ĉiuj vekaj frue en la mateno, longe antaŭ ol lumiĝis, atendante nia unuan ekvidon al la lando al kiu ni tiom longe veturis. Kaj dum la leviĝanta suno grizigis la orientan ĉielon, kompreneble olda Polinezio la unua kriis ke ŝi povas vidi palmojn kaj montopintojn.

Kiam la lumo plifortiĝis, la insulo fariĝis facile videbla por ni ĉiuj: longa insulo kun altaj rokaj montoj en la mezo — kaj tiom proksima al ni ke oni povus preskaŭ ĵeti sian ĉapelon sur la bordon.

La focenoj faris unu lastan puŝon kaj nia strang-aspekta veturilo milde koliziis kun malalta strando. Tiam, dankante niajn stelojn pro oportuno streĉi niajn kramfiĝintajn krurojn, ni ĉiuj transiris sur la teron — la unuan teron, eĉ kvankam nur flosantan teron, kiun ni surtretis jam de ses semajnoj. Kian ekzaltan mi sentis kiam mi konsciis ke Insulo Atelo, la makuleto en la atlaso kiun mia kraĵono tuŝis, fine estas sub miaj piedoj!

Kiam la lumo ankoraŭ pli fortiĝis ni rimarkis ke la palmoj kaj herboj de la insulo aspektas velkaj kaj preskaŭ mortaj. La Doktoro diris ke sendube tio estas pro la malvarmo kiun la insulo suferas nun pro sia nova klimato. Tiuj arboj kaj herboj, li diris al ni, estas specoj kiuj bezonas esti en varma tropika vetero.

La focenoj demandis ĉu ni plu bezonas ilin. Kaj la Doktoro diris ke li kredas ke ne, ne nuntempe — kaj ankaŭ ne la flosan, li aldonis; ĉar ĝi jam komencas

dispeciĝi kaj ne povos flosi multe pli longe.

Dum ni preparis iri en la internon kaj esplori la insulon, ni subite rimarkis tutan aron da Indianoj rigardantaj nin tre scivole el inter la arboj. La Doktoro antaŭen iris por paroli kun ili. Sed li ne povis komprenigi sin. Li penis per signoj montri al ili ke li venis por amika vizito. Tamen, la Indianoj ŝajne ne ŝatis nin. Ili havis pafarkojn kaj sagojn kaj longajn ĉaslancojn kun ŝtonaj pintoj, en siaj manoj; kaj ili faris signojn al la Doktoro por diri al li ke se li faros unu paŝon pli proksimen, ili mortigos nin ĉiujn. Ili evidente volis ke ni tuj foriru de la insulo. La situacio estis tre malkomforta.

Fine la Doktoro komprenigis al ili ke li nur volas trarigardi la insulon kaj ke li post tio foriros — kvankam kiel li farus tion, sen boato per kiu veli, estis ekster mia imagpovo.

Dum ili parolis inter si alia Indiano alvenis — ŝajne kun mesaĝo ke ili estas bezonaj en iu alia parto de la Insulo. Ĉar baldaŭ, minace svinginte siajn lancojn je ni, ili foriris kun la novveninto.

“Kiaj malĝentilaj paganoj!” diris Bumpo. “Ĉu iam vi vidis tian malĝentilecon? — Eĉ ne demandis al ni ĉu ni matenmanĝis, la barbaraj kanajloj!”

“Ĉit! Ili foriras al sia vilaĝo”, diris Polinezio. “Sendube estas vilaĝo aliflanke de tiuj montoj. Se vi akceptos mian konsilon, Doktoro, vi foriros de ĉi tiu strando dum iliaj dorsoj estas deturnitaj. Ni iru sur la pli altan teron provizore — al iu loko kie ili ne scios kie ni estas. Ili eble fariĝos pli amikemaj kiam ili konstatos ke ni ne celas misagi al ili. Ili havas

honestajn afablaspektajn vizaĝojn, kaj aspektas al mi kiel tute decaj homoj. Ili estas nur sensciaj — verŝajne antaŭ nun neniam vidis blankulojn.

Do, sentante iom da senkuraĝiĝo pro nia unua renkonto, ni foriris cele la montojn en la centro de la insulo.

6. LA ĴABIZRO

NI trovis la arbaron ĉe la malsupro de la montetoj densa kaj implika, kaj iom malfacile trairebla. Laŭ konsilo de Polinezio, ni evitis ĉiujn padojn kaj vojojn, opiniante ke estas plej bone eviti renkonti Indianojn nuntempe.

Sed ŝi kaj Ĉi-Ĉio estis bonaj gvidistoj kaj bonegaj ĝangalĉasistoj; kaj ili ambaŭ tuj ekkomencis serĉi manĝaĵojn por ni. Post tre mallonga tempo ili estis trovintaj grandan nombron da diversaj fruktoj kaj nuksoj, kvankam neniu el ni sciis iliajn nomojn. Ni trovis bonan puran fluon de bona akvo kiu malsupren venis de la montoj; do ni havis ankaŭ bonan provizon de trinkaĵo.

Ni sekvis la fluon supren en la altaĵojn. Kaj baldaŭ ni atingis regionon kie la arbaro estis malpli densa kaj la tero rokoplana kaj kruta. Tie ni povis vidi mirindajn aspektojn de la tuta insulo, kun la pretera blua maro.

Dum ni admiris unu el ili la Doktoro ekdiris, Ĉit! — Ĵabizro! — Ĉu vi ne aŭdas ĝin?”

Ni aŭskultis kaj aŭdis, el ie en la aero ĉirkaŭ ni, eksterordinaran muzikan zumon — kia de abelo, sed ne nur unu noto. Ĉi tiu zumo altiĝis kaj malaltiĝis — preskaŭ kiel homo kantanta.

“Neniu alia insekto ol la ĵabizra skarabo zumas tiel”, diris la Doktoro. “Kie li povas esti? — tre proksime, laŭ la sono — verŝajne flugante inter la arboj. Ho, se nur mi havus mian papilireton! Kial mi

ne pensis ligi ankaŭ tion ĉirkaŭ mian talion? Ve al tiu ŝtormo! Mi eble maltrafos nun la solan oportunon dum mia vivo akiri la plej raran skarabon en la mondo. — Ho, rigardu! Jen li!”

Giganta skarabo, almenaŭ sep kaj duonan centimetrojn longa, subite preterflugis niajn nazojn. La Doktoro ege ekscitiĝis. Li deprenis sian ĉapelon por uzi ĝin kiel reton, falatakis la skarabon kaj kaptis ĝin. Li preskaŭ malsupren falis laŭ klifo sur la subajn rokojn pro sia senzorga hasto, sed tio tute ne ĝenis lin. Li surgenuiĝis, ĝojklukante, sur la tero kun la ĵabizro sekura sub la ĉapelo. El sia poŝo li prenis skatolon kun vitra klapo, kaj en ĝin li tre lerte marŝigis la skarabon el sub la rando de la ĉapelo. Post tio li stariĝis, feliĉa kiel infano, por ekzameni sian novan trezoron tra la vitra klapo.

Ĝi ja estis belega insekto. Sube ĝi estis pale blua; sed ĝia dorso estis glacee nigra kun ruĝaj makuloj.

“Ne ekzistas entomologo en la tuta mondo kiu ne donus ĉion kion li posedas por esti en mia pozicio hodiaŭ”, diris la Doktoro. — “Ha! Ĉi tiu ĵabizro havas ion sur sia kruro. — Ne aspektas kiel koto. Kio ĝi povas esti?”

Li zorge prenis la skarabon el la skatolo kaj tenis ĝin je la dorso per siaj fingroj, kie ĝi skuadis siajn ses krurojn en la aero. Ni ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ lin, gapante ĝin. Rulita ĉirkaŭ la mezon de ĝia dekstra antaŭa kruro estis io aspektanta kiel maldika seka folio. Ĝi estis surligita per tre fortika aranea fadeno.

Estis grandioze vidi kiel Johano Dolittle, per siaj dikaj pezaj fingroj malligis tiun aranean retkordon kaj

malrulis la folion, nerompitan, sen ŝiri ĝin aŭ dolorigi la valoran skarabon. La ĵabizron li remetis en la skatolon. Post tio li etendis la folion kaj ekzamenis ĝin.

Imagu nian surpriziĝon kiam ni trovis ke la interno de la folio estis kovrita per signoj kaj bildoj, desegnitaj tiom malgrande ke preskaŭ necesis lupeo por rekoni ilin. Kelkajn el la signoj ni tute ne povis rekoni, sed preskaŭ ĉiuj bildoj estis tute klaraj, figuroj de viroj kaj montoj plejparte. La tuto estis desegnita per kurioza speco de bruna inko.

Dum pluraj momentoj estis morta silento, dum ni ĉiuj gapadis la foliojn, fascinate kaj perpleksate.

“Mi kredas ke ĉi tio estis skribita per sango”, diris la Doktoro fine. “Ĝi fariĝas tiakolora kiam ĝi estas seka. Iu pikis sian fingron por fari tiujn bildojn. Ĝi estas malnova rimedo kiam mankas inko — sed ege malhigiena. — Kia eksterordinara afero ligita al kruro de skarabo! Mi volegas scipovi la skaraban lingvon por trovi kie la ĵabizro akiris ĝin”.

“Se kio ĝi estas?” mi demandis. — “Vicoj de malgrandaj bildoj kaj signoj. Kio ĝi estas, laŭ via opinio, Doktoro?”

“Ĝi estas letero”, li diris — “bilda letero. Ĉiuj ĉi etaĵoj kune estas mesaĝo. — Sed kial doni mesaĝon al skarabo por porti ĝin — eĉ al ĵabizro, la plej rara skarabo en la mondo? — Kiom eksterordinare!”

Li komencis murmuri pri la bildoj.

“Kion ĝi signifas? viroj ascendas monton; viroj marŝas en truon en monto; monto falas — tio estas bone desegnita; viroj indikas siajn malfermitajn buŝojn; bariloj — karceraj kradoj, eble; viroj preĝas; viroj

kuŝas — ili aspektas eble malsanaj; kaj fine, nur monto — kurioza formo de monto”.

Subite la Doktoro ekrigardis min, kaj miriga rideto pro ĝojplena kompreno etendiĝis sur lia vizaĝo.

“*Longa Sago!*” li kriis, “Ĉu vi ne komprenas, Stubbins? — Kompreneble! Nur naturosciencisto elpensus ĉi tian rimedon: doni sian leteron al skarabo — ne al ordinara skarabo, sed al la plej rara, kian aliaj naturosciencistoj penus kapti. — Nu, nu! Longa Sago! — Bilda letero de Longa Sago. Ĉar bildoj estas la sola skribarto kiun li konas”.

“Jes, sed por kiu estas la letero?” mi demandis.

“Verŝajne por mi. Mirando informis lin, mi scias tion, antaŭ jaroj, ke iun tagon mi intencas veni ĉi tien. Sed se ne por mi, do por kiu ajn kaptos la skarabon kaj legos ĝin. Ĝi estas letero adresita al la mondo”.

“Nu, sed kion ĝi diras? Ĝi ne ŝajnas tre utila por vi, ricevinta ĝin”.

“Jes ja”, li diris, “ĉar vidu, mi povas legi ĝin nun. Unua bildo: viroj marŝas supren sur monto — jen Longa Sago kaj lia grupo; viroj eniras truon en monto — ili eniras kavon serĉante medikamentajn plantojn aŭ sfagnojn; monto falas — iuj pendantaj rokoj sendube falis kaj kaptis ilin, enkarcerigis ilin en la kavo. Kaj ĉi tiu estis la sola vivanta besto kiu povus porti mesaĝon por ili al la ekstera mondo — skarabo, kiu povus *fosi* vojon por si en la liberan aeron. Kompreneble estis malmulte verŝajne ke la skarabo iam kaptiĝos kaj la letero legiĝos. Tamen *ja* estis ebleco; kaj kiam oni estas en granda danĝero oni kaptas kian ajn pajleron da espero. ... Bone. Nun

rigardu la sekvan bildon: viroj indikas siajn malfermajn buŝojn — ili malsatas; viroj preĝas — petegas ke kiu ajn trovos ĉi tiun leteron venu por helpi ilin; viroj kuŝas — ili malsanas, aŭ malsategas. Ĉi tiu letero, Stubbins, estas ilia lasta helpokrio”.

Li ekstariĝis dum li diris tiujn vortojn, elprenis notlibron kaj metis la leteron inter la foliojn. Liaj manoj tremis pro hasto kaj agitiĝo.

“Venu!” li kriis — “supren sur la monton — vi ĉiuj. Ni devas perdi eĉ ne momenton. Bumpo, kunportu la akvon kaj nuksojn. Nur la Ĉielo scias kiom longe ili jam estas kaptitaj subtere. Ni esperu kaj preĝu ke ni ne tro malfruas!”

“Sed kie vi serĉos?” mi demandis. “Mirando diris ke la insulo estas pli ol cent kilometrojn longa kaj la montoj laŭaspekte kovras ĝian tutan centron de maro al maro”.

“Ĉu vi ne vidis tiun lastan bildon?” li diris, kaptante sian ĉapelon de la tero kaj ŝovante ĝin sur sian kapon. “Ĝi estis kuriozaspekta monto — aspektis kiel kapo de falko. Nu, tie li estas — se li ankoraŭ vivas. Nia unua tasko estas suriri altan montosupron kaj rigardi la tutan insulon por trovi monton kun la formo de kapo de falko. — Nur pensu! Eblas ke mi ja povos renkonti Longan Sagon, la filon de Ora Sago, malgraŭ ĉio. — Venu! Rapidu! Prokrasti eble signifus la morton de la plej granda naturosciencisto kiu iam naskiĝis!”

7. LA FALKOKAPA MONTO

NI ĉiuj interkonsentis, poste, ke neniu el ni iam antaŭe tiom forte laboris kiom tiutage. Rilate al mi, mi scias ke mi ofte estis preskaŭ plene elĉerpita pro laco; sed mi nur daŭrigis — kiel maŝino — firme decidinte ke, negrave kio okazos, *mi* ne estos la unua cedanto.

Grimpinte al la supro de alta montopinto, preskaŭ tuj ni vidis la kuriozan monton bildigitan en la letero. Laŭforme ĝi estis perfekta bildo de falkokapo, kaj estis, laŭ nia takso, la due plej alta pinto en la insulo.

Kvankam ni ĉiuj estis senspiraj pro la grimpo, la Doktoro ne permesis ke ni ripozu, tuj kiam li ekvidis ĝin. Unufoje rigardante la sunon, por la direkto, malsupren li rehastis, rompante vojon tre densaj arbustaroj, traplaŭdante rojojn, ĉiam elektante la plej kurtan vojon. Kvankam dikulo, li estis certe la plej rapida transtera kuristo kiun iam ajn mi vidis.

Ni baraktade sekvis lin kiel laŭeble plej rapide. Dirante *ni*, mi parolas pri Bumpo kaj mi mem; ĉar la bestoj, Jipo, Ĉi-Ĉio kaj Polinezio, estis multadistance antaŭ ni — eĉ preter la Doktoro — ĝuante la ĉason kvazaŭ spurludon.

Fine ni atingis la montomalsupron kiun ni celis; kaj ni trovis ĝiajn flankojn tre krutaj. Diris la Doktoro:

“Nun ni disiros kaj serĉos kavojn. Ĉi tiu loko, kie ni nun estas, estos nia renkontiĝejo. Se iu trovos ion similan al kavo aŭ truo kie la tero kaj rokoj enfalis, li devos kriegi plej laŭtege al ni ceteraj. Se ni trovos

nenion, ni ĉiuj kunrenkontiĝos ĉi tie post proksimume unu horo. — Ĉu ĉiuj komprenas?

Post tio ni ĉiuj disiris aparte.

Ĉiu el ni, vi povas certi pri tio, fervoris esti la trovonto. Kaj neniam estis monto tiom plene traserĉita. Sed ve! nenio trovebla de ni aspektis eĉ iomete kiel enfalinta kavo. Estis multaj lokoj kie rokoj estis falintaj al la malsupro de la krutaĵoj; sed neniu el ili aspektis kvazaŭ eble kuŝas kavoj aŭ trairejoj malantaŭ ili.

Po unu, laca kaj desapontita, ni lace remarŝis al la renkontiĝejo. La Doktoro aspektis morna kaj senpacienca, sed neniel cedema.

“Jipo”, li diris, “ĉu vi nenie povis *flari* ion indianecan?”

“Ne”, diris Jipo. “Mi flaris ĉe ĉiu breĉeto sur la monto. Sed mi emas kredi ke mia nazo neniom utilos al vi ĉi tie, Doktoro. La problemo estas, ke la tuta aero estas tiom plenplena de laodoro de ateloj ke tio dronigas ĉiun alian odoron. — Kaj krome, estas tro malvarme kaj seke por bona flarado”.

“Certe estas tiel”, diris la Doktoro — “kaj pli malvarmiĝas konstante. Mi kredas ke la insulo ankoraŭ drivas suden. Ni esperu ke ĝi baldaŭ haltos, alie ni ne povos akiri eĉ nuksojn kaj fruktojn por manĝi — ĉio en la insulo pereos. — Ĉi-Ĉio, kian fortunon vi havis?”

“Nenian, Doktoro. Mi grimpis ĉiun altaĵon kaj pinton kiun mi povis vidi. Mi serĉis ĉiun kavaĵon kaj fendon. Sed nenie mi povis trovi lokon kie viroj povus esti kaŝitaj.”

“Kaj Polinezio”, demandis la Doktoro, “ĉu vi vidis

nenion kio povus helpi nin?”

“Nenion, Doktoro. — Sed mi havas planon.”

“Ho, bonege!” kriis Johano Dolittle, plena de nova espero. “Kio estas? Ni aŭdu ĝin”.

“Vi ankoraŭ havas tiun skarabon kun vi, ĉu ne?” ŝi demandis — “La Biz-bizon aŭ kiel ajn vi nomas tiun insektaĉon?”

“Jes”, diris la Doktoro, elprenante la vitrokapulan skatolon el sia poŝo, “jen ĝi”.

“Bone. Nun aŭskultu”, diris ŝi. “Se via supozo pravas — ke Longa Sago estis kaptita de falinta roko interne de la monto, li verŝajne trovis tiun skarabon en la kavo — eble ankaŭ multajn aliajn alispecajn skarabojn, ĉu ne? Estas malverŝajne ke li estus kunpreninta la Biz-bizon kun si, ĉu ne? — Li serĉis plantojn, laŭ vi, ne skarabojn. Ĉu mi pravas?”

“Jes”, diris la Doktoro, “jes, verŝajne”.

“Tute bone. Do estas prave supozoj ke la hejmo, aŭ truo, de la skarabo estas tie — en la parto de la monto kie Longa Sago kaj lia grupo kaptiĝis, ĉu ne?”

“Jes, jes”.

“Bone. Do kion ni liberigu la skarabon — kaj zorge rigardadu lin; pli-malpli baldaŭ li reiros al sia hejmo en la kavo de Longa Sago. Kaj jen, ni sekvos lin — aŭ, ĉiukaze”, ŝi aldonis, glatigante siajn flugoplumojn kun aroganta mieno, “ni sekvos lin ĝis la insektaĉo komencos eniri la teron. Sed almenaŭ li montros al ni en kiu parto de la monto Longa Sago estas kaŝita”.

“Sed li eble flugos, se mi liberigos lin”, diris la Doktoro. “Kaj tiel ni simple perdos lin kaj nenion plian scios tiam ol jam nun”.

“Do, *lasu* lin flugi”, diris Polinezio malestime. “Papago povas flugi tiom rapide kiom Biz-bizo, laŭ mia kredo. Se li ekflugos, mi garantias ne lasi la diableton ekster mia rigardo. Kaj se li nur rampos laŭ la tero vi povos mem sekvi lin”.

“Bonege!” kriis la Doktoro. “Polinezio, vi havas grandan cerbon! Mi tuj liberigos lin kaj ni vidos kio okazos”.

Denove ni ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la Doktoro dum li zorge demetis la vitran kapsulon kaj lasis la grandan skarabon elgrimpi per lia fingro.

“Flugu hejmen, kokcinelo!” kantetis Bumpo, “Dom’ incendias, inf—”¹

“Ho, silentu!” kriis Polinezio kolere. “Ĉesu insulti lin! Ĉu vi supozas ke li ne estas sufiĉe inteligenta por hejmeniri sen via ordono?”

“Mi pensis ke eble li havas amoreman inklinon”, diris Bumpo humile. “Povas esti ke enuigas lin la hejmo kaj necesas kuraĝigi lin. Eble mi kantu al li ‘Hejmo, dolĉa Hejmo?’ ĉu?”

“Ne. Tiukaze li neniam reirus. Via voĉo bezonas ripozi. Tute ne kantu al li: nur rigardu lin.— Ho, kaj Doktoro, eble vi devus ligi novan mesaĝon al kruro de la besto, informante Longan Sagon ke ni klopodegas atingi lin kaj ke li ne perdu esperon”.

“Mi faros tion” diris la Doktoro. Kaj post minuto li estis fortirinta sekan folion de proksima arbusto kaj kovradis ĝin per krajonaj bildetoj.

Fine, bele ekipite per sia nova poŝtosako, S-ro Ĵabizro derampis de la fingro de la Doktoro al la tero

¹ Parto de infana kanteto. — Red.

kaj ĉirkaŭrigardis. Li streĉis siajn krurojn, poluris sian nazon per siaj antaŭaj piedoj kaj post tio lante promenis okcidenten.

Ni anticipis ke li marŝos sur la monto *supren*; anstataŭe, li marŝis *ĉirkaŭ* ĝin. Ĉu vi scias kiom da tempo bezonas skarabo por marŝi ĉirkaŭ monton? Nu, mi certigas vin ke la kvanto da tempo estas nekred-eble longa. Dum la horoj lantege forpasis, ni esperis kaj plu esperis ke li decidus flugi, tiel ke Polinezio povos sekvi lin anstataŭ ni. Sed li ne eĉ unufoje malfermis siajn flugilojn. Mi ne komprenis antaŭe kiom malfacile estas por homo marŝi sufiĉe malrapide por sekvi skarabon. Estis la plej teda afero kiun iam mi spertis. Kaj dum ni tiom lante marŝis post li, rigardante lin kvazaŭfalke por ne perdi vidon al li sub folio aŭ io, ni ĉiuj fariĝis tiom koleraĵ kaj mishumoroj ke ni estis pretaj demordi la kapojn unu de la alia. Kaj kiam li haltis por rigardi la pejzaĝon aŭ denove plu poluri sian nazon, mi povis aŭdi Polinezion malantaŭ mi elbuŝigi la plej fiajn maristajn sakraĵojn iam aŭditajn.

Kondukinte nin tute ĉirkaŭ la monton li gvidis nin al la preciza loko de kie ni komencis marŝi kaj tie li abrupte haltis.

“Nu,” diris Bumpo al Polinezio, “kion vi pensas pri la inteligento de la skarabo nun? Vidu li *efektive ne* estas sufiĉe inteligenta por reiri al sia hejmo”.

“Ho, ĉit, Hotentoto!” kolere kriis Polinezio. “Ĉu ne *ankaŭ* vi volus streĉi viajn krurojn se estus enfermita en skatolo dum la tuta tago? Verŝajne lia hejmo estas proksima kaj tial li revenis”.

“Sed kial,” mi demandis “li unue ĉirkaŭiris la tutan

monton?”

Tiam ni tri kverelegis. Sed meze de la kverelo la Doktoro subite kriis:

“Rigardu, rigardu!”

Ni turnis nin kaj vidis lin indik la ĵabizron, kiu nun marŝas *supren* laŭ la monto multe pli rapide kaj decideme.

“Nu”, diris Bumpo, sidiĝante lace, “se li intencas *transmarŝi* la monton kaj retroveni, por pli provi siajn krurojn, mi atendos lin ĉi tie. Ĉi-Ĉio kaj Polinezio sekvu lin”.

Verdire, ja necesus simio aŭ birdo por grimpi la lokon kiun nun suprenmarŝas la skarabo. Ĝi estis glata plata parto de la flanko de la monto, kruta kiel muro.

Sed baldaŭ, kiam la ĵabizro ne estis pli ol tri metrojn super niaj kapoj, ni ĉiuj kune elkriis. Ĉar, jen dum ni rigardis lin, li malaperis en la facon de la roko kvazaŭ pluvero sorbiĝanta en sablon.

“Li foriris!” kriis Polinezio. “Devas esti truo tie”. Kaj tujege ŝi flugis supren laŭ la roko kaj kroĉiĝis al ĝia faco per siaj ungoj.

“Jes”, ŝi kriis al ni, “ni fine eltrovis lin. Lia truo estas ĝuste ĉi tie, malantaŭ iom da likeno — sufiĉe granda por enmeti du fingrojn”.

“Ha” kriis la Doktoro, ĉi tiu granda roka slabo sendube ekglitis de la pinto kaj fermis la enirejon de la kavo kiel pordo. Povruloj! Kiom teruran sperton ili havis tie! — Ho, se nur ni havus kelkajn pioĉojn kaj ŝovelojn nun!”

“Pioĉoj kaj ŝoveloj malmulte utilis”, diris Poline-

zio. “Vidu la grandon de la slabo: tridek metrojn alta kaj egale larĝa. Necesus ke strebu armeo dum tuta semajno por nur iomete movi ĝin”.

“Sed kiom dika ĝi estas?” diris la Doktoro; kaj li prenis grandan ŝtonon kaj batis la facon de la roko per ĝi plenforte. Ĝi faris kavecان tondran sonon, kiel de giganta tamburo. Ni ĉiuj staris silente, aŭskultante dum ĝia eĥo malrapide fadis.

Kaj tiam malvarma tremo atakis mian spinon. Ĉar, el interne de la monto, venis tri respondajn batojn: *Bat! ... Bat! ... Bat!*

Grandokule ni rigardis unu la alian kvazaŭ la tero mem estus parolinta. Kaj la solenan malgrandan silenton kiu sekvis interrompis la Doktoro.

“Dank’ al Ĉielo”, li diris per mallaŭta adorvoĉo, “almenaŭ kelkaj el ili plu vivas!



Parto Kvin

1. GRANDA MOMENTO

LA sekva parto de nia problemo estis la plej malfacila el ĉiuj: kiel flanken ruli, malsuprentiri aŭ trompi tiun gigantan slabon. Dum ni rigardadis ĝin superaltanta niajn kapojn, la tasko vere ŝajnis senespera por nia eta forto.

Sed la vivsonoj el interne de la monto estis rekuraĝigintaj nin. Kaj post momento ni ĉiuj ĉirkaŭgrimpadis penante trovi ian apertaĵon aŭ breĉeton kiun ni povos prilabori. Ĉi-Ĉio grimpis la krutan muron de la slabo kaj ekzamenis ĝian supron kie ĝi kliniĝis kontraŭ la flanko de la monto; mi elradikigis arbustojn kaj fortiris pendajn grimpoplantojn kiuj povus kaŝi malsolidan parton; la Doktoro akiris pli da folioj kaj verkis novajn bildoleterojn kiujn la ĵabizro povos kunpreni se li reaperos; dum Polinezio portis manplenon da nuksoj kaj puŝis ilin, unuope, en la truon de la skarabo, por ke la kaptitoj povu manĝi.

“Nuksoj bonege nutras”, ŝi diris.

Sed Jipo, kiu perpiede gratadis ĉe la malsupro de la slabo, kiel bona ratkaptisto, faris la trovon kiu ebligis nian finan sukceson.

“Doktoro”, li kriis, kurante al Johano Dolittle kun sia nazo tute kovrita de nigra koto, “ĉi tiu slabo staras sur nur mola teraĵo. Neniam vi vidis ion egale facile foseblan. Mi supozas ke la kavo malantaŭa devas esti nur tro alta tiel ke la Indianoj ne povas atingi la teron per siaj manoj, alie ili povus esti jam antaŭ longe

elgratintaj vojon. Se ni povos nur elgrati la tujsuban teron, la slabo eble descendos iomete. Tiam eble la Indianoj povos grimpi trans la supraĵon”.

La Doktoro hastis ekzameni la lokon kie estis gratinta Jipo.

“Nu, jes”, li diris, “se ni povos eligi la teraĵon el sub ĉi tiu antaŭa eĝo, la slabo staras tiom rekte ke ni eble eĉ povos plene faligi ĝin ĉidirekten. Vere valoros la penon. Ni tuj komencu, haste”.

Niaj solaj iloj estis bastonaĵoj kaj maldikaj ŝtonoj kiujn ni povis trovi proksime. Strange ni nepre aspektis, nia tuta aro, kaŭrante sur niaj kalkanoj, gratante kaj fosetante ĉe la malsupro de la monto, kvazaŭ ses meloj en vico.

Post proksimume unu horo, dum kiu, malgraŭ la malvarmo, ŝvito gutadis de niaj fruntoj ĉiudirekte, la Doktoro diris:

“Pretiĝu elsalti desube, tute flanken, se ĝi komencos montri moviĝon. Se ĉi tiu slabo falos sur iun, ĝi platigos lin eĉ pli ol platkuka”.

Baldaŭ aŭdiĝis grata pista sono.

“Atentu!” kriegis Johano Dolittle. “Ĝi ekfalas! — Diskuru!”

Ni kuris por savi la vivon, elen, flanken. La granda roko softe glitis malsupren, ĉirkaŭ duonan metron, en la trogon kiun ni estis farintaj sub ĝi. Dum momento mi sentis desaponton, ĉar kiam ĝi estis en tiu pozicio, estis ankoraŭ egale senesperige kiel antaŭe. Sed dum mi supren rigardis, mi vidis la supron tre malrapide moviĝi for de la montoflanko. Ni estis ĝenintaj ĝian ekvilibron. Dum ĝi apartiĝis de

la faco de la monto, sonoj de homaj voĉoj, ĝojkriantaj en fremda lingvo, aŭdiĝis el malantaŭe. Pli kaj pli rapide la supro falis antaŭen, malsupren. Tiam, farante bruegan kraŝon kiu skuis la tutan montaron sub niaj piedoj, ĝi batiĝis kontraŭ la teron kaj duoniĝis.

Kiel priskribi tiun unuan renkontiĝon de la du plej gravaj naturosciencistoj kiujn iam konis la mondo, Longa Sago, la filo de Ora Sago, kaj Johano Dolittle M.D., el Puddleby-sur-la-Marĉo? La sceno revidigas sin antaŭ mi ankoraŭ nun, tute klara kaj detala, kvankam ĝi okazis antaŭ tiom multe da jaroj. Sed kiam mi entreprenas skribi pri ĝi, vortoj ŝajnas ege maladekvataj por paroli al vi pri tiu gravega evento.

Mi scias ke la Doktoro, kies vivo certe estis sufiĉe plena de gravaj eventoj, ĉiam kalkulis la liberigon de la Indiana sciencisto kiel sian plej gravan agon. Rilate al mi, ĉar mi sciis kiom ĉi tiu renkontiĝo nepre signifas al li, mi estis plenplena de anticipo kaj scivolo dum la granda ŝtono fine tondris malsupren kaj kuŝiĝis ĉe niaj piedoj kaj ni transrigardis por vidi kio estis malantaŭ ĝi.

La obskura nigra komenco de tunelo, almenaŭ ses metrojn alta, ekvidiĝis. En la centro de tiu aperturo staris enorma Indiano, pli ol du metrojn alta, bela, muskola, maldika kaj nuda — escepte de bidkovrita tuko ĉirkaŭ la talio kaj agla plumo en la hararo. Li tenis unu manon sur sia vizaĝo por ŝirmi siajn okulojn kontraŭ la blindiga sunlumo kiun de multaj tagoj li ne vidis.

“Jen li!” mi aŭdis la Doktoron flustri apud mia

kubuto. “Mi rekonas lin per lia granda alto kaj la cikatro sur la mentono”.

Kaj li malrapide paŝis antaŭen tra la falintan slabon kun la mano etendita al la ruĝulo.

Baldaŭ la Indiano malkovris siajn okulojn. Kaj mi vidis ke en ili estis kurioza pika brilo — kiel la okuloj de aglo, sed pli afablaj kaj pli mildaj. Li malrapide levis sian dekstran manon, dum la cetero de lia korpo restis senmova kiel statuo, kaj prenis la manon de la Doktoro per sia. Estis granda momento. Polinezio kapgestis al mi laŭ kontentigita maniero. Kaj mi aŭdis karan Bumpon ploreti sentimentale.

Tiam la Doktoro provis paroli kun Longa Sago. Sed la Indiano ne scipovis la anglan, kompreneble, kaj la Doktoro scipovis neniom da Indiana lingvo. Baldaŭ, surprize al mi, mi aŭdis la Doktoron provi paroli al li per diversaj bestolingvoj.

“Saluton” li diris hundolingve; “Plezurigas min renkonti vin” per ĉevalsignoj; “Kiom longe vi estis en la tero?” per cervolingvo. Tamen la Indiano ne moviĝis, nur staris, rekta kaj rigida, komprenante nenium vorton.

Ĝis fine li provis la lingvon de la agloj.

“Granda Ruĝhaŭtulo”, li diris per la ferocaj krioj kaj gruntoj kiujn uzas la birdoj, “dum mia tuta vivo neniam mi ĝojis kiom hodiaŭ, trovante vin viva”.

Fulmorapide la ŝtone rigida vizaĝo de Longa Sago ekbrilis per komprenoplena rideto; kaj eksonis la respondo per la agla lingvo:

“Potenca Blankulo, al vi mi ŝuldas mian vivon. Dum la tuta longo de mia cetera vivo mi servos vin”.



“ESTIS GRANDA MOMENTO.”

Poste Longa Sago informis nin ke tiu estis la sola birda aŭ besta lingvo kiun li sukcesis lerni. Sed ke li ne estis parolinta ĝin jam de longe, ĉar agloj neniam venis al ĉi tiu insulo.

Tiam la Doktoro signalis al Bumpo, kiu antaŭen venis kun la nuksoj kaj akvo. Sed Longa Sago nek manĝis nek trinkis. Dankinte per kapmoveto, li prenis la provianton kaj portis ĝin en la internan obskuron de la kavo. Ni sekvis lin.

En la interno ni trovis naŭ aliajn Indianojn, virojn, virinojn, kaj knabojn, kuŝantajn sur la roka planko en terura stato de maldikeco kaj elĉerpiĝo.

Kelkaj havis fermitajn okulojn, kvazaŭ mortaj. Rapide la Doktoro iris al ĉiu kaj aŭskultis ties koron. Ĉiuj plu vivis; sed unu virino estis tro febla por stari.

Ordonite de la Doktoro, Ĉi-Ĉio kaj Polinezio rapidis enĝangalen por alporti pli da fruktoj kaj akvo.

Dum Longa Sago disdonis tiom da manĝaĵoj kiom ni havis al siaj malsategaj amikoj, ni subite aŭdis sonon el ekster la kavo. Turninte nin, ni vidis, grupiĝinta ĉe la enirejo, la aron da Indianoj renkontintaj nin tiom malamike sur la strando.

Ili rigardetis en la kavon sinzorge, unue. Sed tuj kiam ili vidis Longan Sagon kaj la aliajn Indianojn kun ni, ili enkuris, ridante, kunfrapante siajn manojn pro ĝojo kaj parolante rapidege.

Longa Sago klarigis al la Doktoro ke la naŭ Indianoj kiun ni trovis en la kavo kun li estas du familioj kiuj akompanis lin en la montojn por helpi lin kolekti medikamentajn plantojn. Kaj dum ili serĉis specon de musko — utilan por kuraci dispepsion —

kiu kreskas nur interne de malseketaj kavoj, la granda roka slabo malsupren glitis kaj enfermis ilin. Post tio por du semajnoj ili vivtenis sin per la medikamenta musko kaj iom da freŝa akvo trovebla gutanta de la malseketaj muroj. La aliaj Indianoj sur la insulo kredis ilin perditaj kaj lamentis pri ili kvazaŭ ili mortis; kaj ili nun estis tre surprizitaj kaj feliĉaj pro la trovo ke iliaj parencoj vivas.

Kiam Longa Sago turnis sin al la novvenintoj kaj diris al ili per ilia propra lingvo ke la blankulo trovis kaj liberigis iliajn parencojn, ili grupiĝis ĉirkaŭ Johanon Dolittle, ĉiuj parolante samtempe kaj frapante siajn brustojn.

Longa Sago diris ke ili pardonpetas kaj diras al la Doktoro kiom ili bedaŭras ke ili ŝajnis malamikaj sur la strando. Verdire, ili neniam antaŭe vidis blankulon kaj timegis lin — precipe kiam ili vidis lin konversacii kun la focenoj. Ili kredis lin la Diablo, ili diris.

Post tio ili eliris kaj rigardis la grandan ŝtonon kiun ni estis malstarigintaj, grandan kiel kampo; kaj ili ree kaj ree ĉirkaŭmarŝis ĝin, indikante la grandan rompiĝon en la mezo kaj demandante al si kiel tio estis farita.

Veturantoj kiuj post tiam vizitis Insulon Atelo informas min ke la giganta ŝtona slabo estas nun unu el la vidindaĵoj de la insulo. Kaj ke la Indianaj gvidistoj, montrante ĝin al vizitantoj, ĉiam rakontas *sian* rakonton pri kial ĝi estas tie. Ili diras ke kiam la Doktoro trovis ke la rokoj estis kaptintaj lian amikon Longan Sagon, li tiom koleris ke li disŝiris la monton per ambaŭ siaj manoj kaj liberigis lin.

2. “LA VIROJ DE LA MOVIĜANTA LANDO”

EKDE tiam la Indianoj traktis nin tre malsame. Ni estis invititaj al ilia vilaĝo por festeno por festi la reaperon de la perditaj familioj. Kaj farinte portoliton el arbidoj por porti la malsanan virinon, ni ĉiuj komencis descendi la monton.

Survoje la Indianoj diris al Longa Sago ion kio ŝajne estis malbona novaĵo, ĉar aŭdinte ĝin lia vizaĝo fariĝis tre mornaspekta. La Doktoro demandis al li kio ĝenas lin. Kaj Longa Sago diris ke oni ĵus informis lin ke la ĉefo de la tribo, maljunulo okdekjara, mortis frue tiun matenon.

“Sendube tial”, flustris Polinezio en mian orelon, “ili reiris al la vilaĝo, kiam la mesaĝisto revenigis ilin. — Ĉu vi memoras?”

“Kio kaŭzis lian morton?” demandis la Doktoro.

“La malvarmo”, diris Longa Sago.

Efektive, nun la suno komencis malleviĝi kaj ni ĉiuj mem komencis frostotremi.

“Jen vere danĝera afero”, diris la Doktoro al mi. “La insulon ankoraŭ drivigas suden tiu mara fluaĉo. Ni devos priatenti tion morgaŭ. Se nenio estos farebla, la Indianoj devos enkanuiĝi kaj forlasi la insulon. La ebleco ke ili averios estas pli bona ol morte frostiĝi en la glacifluoj de Antarktiko”.

Baldaŭ ni transiris selon en la montetoj, kaj mal-supren rigardante al la fora flanko de la insulo, ni vidis la vilaĝon — grandan grupon da herbaj dometoj kaj gaje koloraj totemostangoj tre proksimaj al la maro.

"Kiom artisme!" diris la Doktoro. — "Belega situo. Kiel la vilaĝo nomiĝas?"

"Popsipetelo", diris Longa Sago. "Jen ankaŭ la tribnomo. La vorto signifas en la Indiana lingvo, *La Viroj de la Moviĝanta Lando*. Estas du triboj de Indianoj sur la insulo: la Popsipetelanoj ĉe ĉi tiu finaĵo de la insulo, kaj la Bag-ĵagderaganoj ĉe la alia".

"Kiu estas la pli granda el la du popoloj?"

"La Bag-ĵagderaganoj. Ilia urbo etendiĝas dek kvin kilometrojn. Sed", aldonis Longa Sago, iomete sulkante sian belan vizaĝon, "rilate al mi, mi preferus havi unu Popsipetelanon ol cent Bag-ĵagderaganojn".

La novaĵo pri la saviĝo kiun ni okazigis evidente multe antaŭiris nin. Proksimiĝante al la vilaĝo ni vidis amasojn da Indianoj elvenantaj por saluti la amikojn kaj parencojn kiujn ili estis supozintaj ne revidotaj.

Ĉi tiuj bonuloj, kiam ankaŭ ili informiĝis ke la savon faris la stranga blanka vizitanto al la insulo, ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la Doktoron, premis lian manon, karesfrapetis kaj ĉirkaŭbrakumis lin. Post tio ili levis lin sur siajn fortajn ŝultrojn kaj portis lin al la vilaĝo ĉe la malsupro de la monteto.

Tie la bonvenigo al ni estis eĉ pli grandioza. Malgraŭ la malvarmega aero de la estiĝanta nokto, la vilaĝanoj, kiuj ĉiuj frostotremadis en siaj domoj, ĵetmalfermis siajn pordojn kaj elvenis centope. Mi antaŭe tute ne supozis ke la vilaĝeto povus enteni tiom da personoj. Ili amasis ĉirkaŭ ni, ridetante kaj kapmovante kaj mansalutante al ni; kaj dum Longa Sago deklamis la detalojn de nia faro, ili konstante kriis strangajn kantajn sonojn, kiujn ni supozis vortoj de

dankemo aŭ laŭdo.

Post tio oni gvids nin al tute nova herba domo, pura kaj dolĉodora, kaj informis ke ĝi estas nia. Ses fortaj Indianaj knaboj doniĝis al ni kiel servistoj.

Survoje tra la vilaĝo ni rimarkis domon pli grandan ol la aliaj, fine de la ĉefstrato. Longa Sago indikis ĝin kaj diris al ni ke ĝi estas la domo de la Ĉefo, sed ĝuste nun ĝi estas neokupata — ĉar ankoraŭ neniu nova ĉefo estas elektita por anstataŭi la mortintan.

En nia nova domo festeno de fiŝoj kaj fruktoj estis preparita. La plej multaj gravuloj de la tribo jam sidiĝis ĉe la longa manĝotablo kiam ni alvenis. Longa Sago invitis nin sidiĝi kaj manĝi.

Tion ni volonte faris, ĉar ni ĉiuj malsatis. Sed nin kaj surprizis kaj desapontis trovi ke la fiŝoj ne estis kuiritaj. La Indianoj ŝajne neniel kredis tion nekutima, sed ekmanĝis, tre ĝue manĝante la fiŝojn kiaj ili estis, nekuiritaj.

Kun multaj pardonpetoj, la Doktoro klarigis al Longa Sago ke, se ili ne oponas, ni preferas ke niaj fiŝoj estu kuiritaj.

Imagu nian miregon kiam ni trovis ke la granda Longa Sago, tiom erudicia pri la naturaj sciencoj, ne konis la signifon de la vorto *kuirita*!

Polinezio, sidanta sur la benko inter Johano Doolittle kaj mi, tiris manikon de la Doktoro.

"Mi diros al vi kio misas, Doktoro", ŝi flustris dum li kliniĝis por aŭskulti ŝin: "*ĉi tiuj homoj ne havas fajrojn!* Ili ne scias fari fajron. Rigardu eksteren: estas preskaŭ senlume, kaj eĉ ne unu lumo videblas en la tuta vilaĝo. Ĉi tiu estas senfajra popolo".

3. FAJRO

TIAM la Doktoro demandis Longan Sagon ĉu li scias kio estas fajro, klarigante ĝin al li per bildoj desegnitaj sur la cervohaŭta tablotuko. Longa Sago diris ke li ja vidis tiaĵon — venantan el la supro de vulkanoj; sed ke nek li nek iu alia Popsipetelano sciis kiel fari ĝin.

“Povraj pereantaj paganoj!” murmuris Bumpo. “Ne mirigas ke la malnova ĉefo mortis pro malvarmego”.

Tiumomente ni aŭdis plorsonon ĉe la pordo. Kaj turniĝinte ni vidis plorantan Indianan patrinon kun bebo en la brakoj. Ŝi diris ion nekomprenatan de ni al la Indianoj; kaj Longa Sago diris al ni ke la bebo malsanas kaj ŝi volas ke la blanka kuracisto provu resanigi ĝin.

“Ho, jadi!” ĝemis Polinezio en mian orelon. — “Tute same kiel Puddleby: pacientoj venas meze de nia manĝo. Nu, unu bonaĵo: la manĝaĵo estas nekuirita, do nenio povas malvarmiĝi”.

La Doktoro ekzamenis la bebon kaj tuj trovis ĝin malvarmega.

“Fajro — *fajro!* Tion ĝi bezonas, li diris, turninte sin al Longa Sago. — “Tion vi ĉiuj bezonas. Ĉi infano suferos pneŭmonion se ĝi ne teniĝos varma”.

“Jes, vere. Sed kiel fari fajron”, diris Longa Sago.— “kie akiri ĝin: jen la problemo. Ĉiuj vulkanoj en ĉi tiu lando estas mortaj”.

Tiam ni komencis traserĉi niajn poŝojn por trovi ĉu iuj alumetoj transvivis la averion. Ni povis trovi

nur du kaj duonan — ĉiuj kun la kapoj forverŝitaj de salakvo.

“Aŭskultu, Longa Sago”, diris la Doktoro: “diversaj metodoj ekzistas por fari fajron sen alumetoj. Unu: per dika vitro kaj sunradioj. Tamen, ĉar jam malleviĝis la suno, tion ni ne povas fari. Alia per ŝlifado de dura bastoneto en mola ŝtupo. — Ĉu jam mankas lumo ekstere? — Ve, jes! Tial mi timas ke ni devos atendi la morgaŭon; ĉar krom la lignojn ni bezonas malnovan sciurneston kiel fuelon — kaj sen lampoj vi ne povus trovi tion en viaj arbaroj je la nuna horo”.

“Grandaj estas viaj scio kaj lerto, ho Blankulo”, Longa Sago respondis. “Sed vi maljustas pensante tion pri ni. Ĉu vi ne scias ke ĉiuj senfajraj popoloj povas vidi en la mallumo? Ĉar mankas al ni lampoj, ni devas trejni nin veturi dum la plej mallumaj noktoj, sen lumo. Mi sendos mesaĝiston kaj vi ricevos vian sciurneston post nemulta tempo”.

Li donis ordonon al du el niaj knabservistoj, kiuj tuj malaperis kurante. Kaj tutvere, post tre malmulta tempo sciurnesto kun dura kaj mola lignaĵoj estis portita al nia pordo.

La luno ankoraŭ ne estis leviĝinta, kaj en la domo estis preskaŭ plene mallume. Mi povis senti kaj aŭdi, tamen, ke la Indianoj moviĝas komforte kvazaŭ en la taglumo. La taskon fari fajron la Doktoro devis plenumi preskaŭ nur pertuŝe, dum li petis Longan Sagon kaj la Indianojn transdoni al li liajn ilojn kiam li mismetis ilin en la mallumo. Kaj tiam mi kurioze eltrovis ke nun pro la neceso, mi trovis ke mi mem povas iomete vidi en la mallumo. Kaj unuafoje mi

ekkonsciis ke kompreneble ne *ekzistas* absoluta mallumo, dum estas malfermita pordo aŭ ĉielo super vi.

Petinte la prunton de arko, la Doktoro malstreĉis la ŝnuron, metis la duran lignon en maŝon kaj komencis boradi per tiu bastoneto en la mola ligna ŝtipo. Baldaŭ mi flaris ke la ŝtipo fumas. Poste li daŭre puŝis la internan tegon de la sciurnesto en la fumantan parton, kaj li petis ke mi blovu sur ĝin per mia spiro. Li pli kaj pli rapidigis la boradon per la bastono. Pli da fumo plenigis la ĉambron. Kaj fine la mallumo ĉirkaŭ ni eklumiĝis. La sciurnesto ekflamis.

La Indianoj murmuris kaj gruntis pro miro. Unue ili volis surgenuiĝi kaj adori la fajron. Post tio ili volis preni ĝin per siaj nudaj manoj kaj ludi per ĝi. Ni devis instrui al ili kiel uzi ĝin; kaj ilin tre fascinis kiam ni metis niajn fiŝojn trans ĝin sur branĉetoj kaj kuiris ilin. Ili flaris ĝuplene la aeron dum, la unuan fojon en la historio, la odoro de fritataj fiŝoj trairis la vilaĝon Pipsipetelo.

Post tio ni igis ilin porti al ni amasojn kaj stakojn da seka ligno; kaj ni faris enorman fajron en la mezo de la ĉefa strato. Ĉirkaŭ ĝin, sentinte ĝian varmon, la tuta tribo grupiĝis kaj ridetis kaj miris. Estis tre frapa vidaĵo, unu el la bildoj el niaj vojaĝoj kiujn mi plej ofte memoras: Tiu ardega ĝojiga flamaro sub la nigra nokta ĉielo, kaj tute ĉirkaŭ ĝi vasta ringo da Indianoj, sur kies bronzajn vangojn la fajrolumo radiis, la blankajn dentojn kaj lumoplenajn okulojn — tuta vilaĝo klopodanta varmiĝi, ridante kaj interpuŝetante samkiel lernejoj infanoj. Post kelka tempo, kiam ni

estis plikutimigintaj ilin prizorgi fajron, la Doktoro montris al ili ke oni povas preni ĝin en la domon se oni faris truon en la tegmento tra kiun povas iri la fumo. Kaj antaŭ ol enlitiĝi post tiu longega laciga tago ni vidis fajron en ĉiu dometo en la vilaĝo.

La povra popolo tiom ĝojis denove esti vere varma ke ni pensis ke ili neniam enlitiĝos. Ankoraŭ dum la fruaj horoj de la mateno la vilaĝeto zumis per granda mallaŭta murmuro: la Popsipetelanoj sidis parolante pri sia mirinda palvizaĝa vizitanto kaj tiu stranga bonaĵo kiun li kunportis — *fajro!*

4. KIO FLOSIGAS INSULON

TRE frue en nia sperto de la afableco de la Popsipetelanoj ni komprenis ke por sukcese fari ion ajn, ni devos ĉiam fari ĝin sekrete. La Doktoro estis tiom populara kaj amata de ĉiuj ke tuj kiam li vidiĝis ĉe sia pordo en la mateno amasoj da admirantoj, pacience atendantaj ekstere, ariĝis apud li kaj sekvis lin negrave kien li iris. Post lia sukceso fari fajron, ĉi tiu infan-
anima popolo supozis, mi kredas, ke li konstante faros magion; kaj ili fervoris ne maltrafi eĉ unu magiaĵon.

Nur malfacile ni eskapis de la homamaso la unuan matenon kaj eliris kun Longa Sago por esplori la insulon malhaste.

En la interno ni trovis ke ne nur la plantoj kaj arboj suferas pro la malvarmo: la bestaro estis eĉ pli mizera. Ĉie videblis birdoj tremantaj pro la frostoj kun la plumoj taŭzaj, grupiĝantaj por flugi al someraj landoj. Kaj multaj kuŝis mortaj sur la tero. Irante mal-supren al la bordo, ni rigardis terokrajn grandanombre moviĝi cele la maron por trovi iun pli bonan hejmon. Samtempe, sudoriente ni povis vidi multajn flosantajn glacimontojn — indiko ke ni nun ne estas tre malproksime de la terura regiono de Antarktiko.

Dum ni rigardis malproksimen laŭ la maro, ni rimarkis niajn amikojn la focenojn saltantaj tra la ondoj. La Doktoro vokis al ili kaj ili venis proksimen.

Li demandis al ili kiom malproksime ni estas de la Sudpolusa Kontinento.

Ĉirkaŭ cent sesdek kilometrojn, ili diris al li. Kaj ili demandis kial li volas tion scii.

“Ĉar ĉi tiu flosanta insulo sur kiu ni estas”, diris li, “drivas suden konstante laŭ la fluo. Ĝi estas insulo kiu kutime apartenas ie en la tropika zono — vera humida vetero, sunfrapoj kaj ĉio tia. Se ĝi ne baldaŭ ĉesos drivi ĉio sur ĝi pereos”.

“Nu”, diris la focenoj, “do kio farendas estas remeti ĝin en pli varman klimaton, ĉu ne?”

“Jes, sed kiel?” diris la Doktoro, “ni ne povas *remi* ĝin tien”.

“Ne”, diris ili, “sed balenoj povus puŝi ĝin — se nur vi havus sufiĉe da ili”.

“Bonega ideo! — Balenoj, ĝuste tio!” diris la Doktoro. “Ĉu vi kredas povi akiri kelkajn por mi”.

“Nu, certe”, diris la focenoj, “ni pasis gregon da ili en la maro, ludantan inter la glacimontoj. Ni petos ilin veni al vi. Kaj se ne estas sufiĉe da ili, ni provos trovi pliajn. Plej bone estos havi multajn”.

“Dankon”, diris la Doktoro. “Vi estas tre afablaj. — Krome, ĉu hazarde vi scias kiel ĉi tiu insulo fariĝis flosanta? Almenaŭ duono da ĝi, mi rimarkas, konsistas el ŝtono. Estas tre strange ke ĝi flosas, ĉu ne?”

“Ja estas malkutime”, ili diris. “Sed la ekspliko estas tre simpla. Iam ĝi estis monta parto de Suda Ameriko — supermara pendanta parto — ia malgracia angulo, oni povus diri. Antaŭ tre longe, dum la glacia epoko, antaŭ miloj da jaroj, ĝi derompigis de la ĉeftero; kaj pro ia kurioza hazardo ĝia interno, kiu estas kava, pleniĝis per aero dum ĝia falo en la oceanon. Oni povas vidi nur duonon de la insulo: la plej granda

parto estas subakva. Kaj en ĝia mezo, sube, estas giganta roka aerkamero, tute interne de la montoj. Kaj tio flosigas ĝin”.

“Kia markutima fenometro!” diris Bumpo.

“Jes ja”, diris la Doktoro. “Mi devos fari noton pri tio”. Kaj li elprenis sian neniammankantan notlibron.

La focenoj forsaltis cele la glacimontojn. Kaj post nelonge, ni vidis la maron ondadi kaj ŝaŭmadi dum granda grego da balenoj venis plenrapide cele nin.

Ili certe estis enormaj bestoj; kaj estis almenaŭ ducento da ili.

“Jen ili”, diris la focenoj, puŝinte siajn kapojn el la akvo.

“Bone!” diris la Doktoro. “Nun bonvolu klarigi al ili, mi petas, ke temas pri gravega afero por ĉiuj vivantoj en ĉi tiu lando. Kaj petu ilin bonvoli iri al la plej fora finaĵo de la insulo, meti siajn nazojn sur ĝin, kaj puŝi ĝin reen al proksime de la bordo de Suda Brazilo”.

La focenoj evidente sukcesis persvadi la balenojn agi laŭ la peto de la Doktoro; ĉar ni baldaŭ vidis ilin ŝprucnaĝi tra la maro, irante cele la sudan finaĵon de la insulo.

Tiam ni kuŝiĝis sur la strando kaj atendis.

Post proksimume horo la Doktoro stariĝis kaj ĵetis branĉon en la akvon. Dum kelkaj momentoj ĝi flosis senmove. Sed baldaŭ ni vidis ĝin komenci moviĝi nerapide laŭlonge de la bordo.

“Ha!” diris la Doktoro, “ĉu vi vidas? — la insulo fine iras norden. Dank’ al Dio!”

Pli kaj pli rapide ni postlasis la branĉon; kaj la

glacimontoj fariĝis malpli grandaj kaj malpli klaraj sur la horizonto. La Doktoro elprenis sian horloĝon, ĵetis pliajn branĉetojn en la akvon kaj rapide kalkulis.

“Humf! — Dudek sep kilometrojn hore”, li murmuris. — “Tre bela rapido. Ni bezonos eble kvin tagojn por reproksimiĝi al Brazilo. Nu, fariĝas. — Mia menso povas trankviliĝi. Mi eĉ jam sentas min pli varma. Ni iru trovi mangajon”.

5. MILITO!

SURVOJE al la vilaĝo la Doktoro komencis diskutadi naturhistorion kun Longa Sago. Sed ilia plej interesa temo, plejparte pri plantoj, apenaŭ komenciĝis, kaj ekvenis Indiana kuristo al ni kun mesaĝo.

Longa Sago aŭskultis plenpense la senspiran balbutatan parolo, poste turnis sin al la Doktoro kaj diris per la agla lingvo:

“Granda Blankulo, katastrofo trafas la Popsipetelanojn. Niaj sudaj najbaroj, la ŝtelemaj Bag-ĵagderaganoj, kiuj de tiom longe envias niajn staplojn da matura maizo, ekmilitis; kaj jam nun marŝas ataki nin”.

“Vere katastrofo”, diris la Doktoro. “Tamen ni ne juĝu tro severe. Eble ili senespere bezonegas manĝaĵojn, ĉar iliajn proprajn rikoltaĵojn detruis la frostoj. Ĉar ili estas eĉ pli proksimaj al la malvarma sudo ol vi, ĉu ne?”

“Ne pravigu iun homon el la tribo de Bag-ĵagderaganoj”, diris Longa Sago, kapneante. “Ili estas pigra malfidinda raso. Ili nur vidas oportunon akiri maizon sen agrokultura laborado. Se ne estus ĉar ili estas multe pli granda tribo kaj esperas venki siajn najbarojn per la forto de pli granda batalantaro, ili ne aŭdacus ataki la kuraĝajn Popsipetelanojn”.

Kiam ni atingis la vilaĝon ni trovis ĝin tre ekscitita. Ĉie viroj pretigis siajn pafarkojn, akriĝis lancojn, konstruis batalhakilojn kaj faris centojn da sagoj. Virinoj estis konstruantaj altan barilon el bambu-

stangoj ĉirkaŭ la vilaĝon. Spionoj kaj mesaĝistoj konstante venis kaj iris, alportante informojn pri la movado de la malamikaro. Dum ni ankoraŭ estis alte inter la arboj kaj momentoj ĉirkaŭ la vilaĝo ni povis vidi gvatistojn gvatantajn la sudajn montojn.

Longa Sago alvenigis alian Indianon, nealtan sed enorme larĝan, kaj konigis lin al la Doktoro kiel Grandajn Dentojn, la ĉefmilitiston de la Popsipetelanoj.

La Doktoro proponis iri renkonti la malamikojn kaj provi persvadi ilin paciĝi anstataŭ batali; ĉar milito, li diris, ne povas esti pli ol stulta malŝparoplena afero. Sed la du viroj kapneis. Tia plano estas senespera, ili diris. Dum la lasta milito kiam ili sendis mesaĝiston por diskuti interpaciĝon, la malamikoj simple batis lin per hakilo.

Dum la Doktoro demandis al Grandaj Dentoj kiel li planas defendi la vilaĝon kontraŭ atako, alarman kriegon faris la gvatistoj.

“Ili venas! — La Bag-ĵagderaganoj — svarmas laŭ la montoj multmilope!”

“Nu”, diris la Doktoro, “mi supozas ke estas farende. Mi malkredas je milito; sed se la vilaĝo estos atakata ni devos helpi defendi ĝin”.

Kaj li prenis klabon de la tero kaj provis ĝian fortikon kontraŭ ŝtonon.

“Ĉi tio”, li diris, “ŝajnas al mi sufiĉe bona ilo”.

Tiam ni ĉiuj akiris ian specon de batalilo per kiu ni povos helpi niajn amikojn, la kuraĝajn Popsipetelanojn: mi prunteprenis pafarkon kaj ujon da sagoj; Jipon kontentigis uzi siajn maljunajn sed ankoraŭ

fortajn dentojn; Ĉi-Ĉio prenis sakon da rokoj kaj grimpis palmon de kiu li povos ĵeti ilin sur la kapojn de la malamikoj; kaj Bumpo marŝis post la Doktoro al la barilo, armite per juna arbo en unu mano kaj pordostango en la alia.

Kiam la malamikoj proksimiĝis sufiĉe por esti vidataj el kie ni staris ni ĉiuj anhelegis pro miro. Ili efektive kovris la flankojn de la montetoj — miloj plus miloj. Kompare kun ili, nia malgranda armeo en la vilaĝo aspektis nur manoplano.

“Jadi!” murmuris Polinezio, “nia areto neniel sukcesos kontraŭ tiu svarmo. Nepre ne sufiĉas. Mi foriros akiri helpon”.

Kien ŝi iros kaj kian helpon ŝi intencis akiri, mi tute ne sciis. Ŝi nur malaperis de apud mia flanko. Sed Jipo, kiu estis aŭdinta ŝin, puŝis sian nazon inter la bambuajn barilojn por pli bone rigardi la malamikojn kaj diris:

“Plej verŝajne ŝi iris alveni la Nigrajn Papagojn. Ni esperu ke ŝi akurate trovos ilin. Nur rigardu tiujn hidajn brutulojn malgrimpi la rokojn — milionojn da ili! Ĉi batalo ne permesos nin malaktivi”.

Kaj Jipo pravus. Antaŭ ol forpasis kvarono da horo nia vilaĝo estis tute ĉirkaŭita de giganta grego da kriegantaj furiozantaj Bag-ĵagderaganoj.

Mi nun venas al parto de la historio de niaj vojaĝoj en kiu ĉio okazis tiom rapide, unu evento tuj post alia, ke retrorigardante mi vidas la bildon nur laŭ tre konfuzita maniero. Mi scias ke se mankus la Terura Trio — tiel oni ameme nomis ilin poste en la Popsi-petelana historio — Longa Sago, Bumpo kaj la Dok-



"LA TERURA TRIO"

(Laŭ indiana rokgravuraĵo trovita sur Monto Falko-Kapo, Atelinsulo.)

toro, la milito baldaŭ estus finiĝinta, kaj la tuta insulo apartenus al la senvaloraj Bag-ĵagderaganoj. Sed la Anglo, la Afrikano kaj la Indiano mem konsistigis regimenton; kaj kune ili faris el la vilaĝo danĝeran lokon por ĉiu viro penanta eniri.

La bambubarilo kiu estis haste konstruita ĉirkaŭ la vilaĝon ne estis tre fortika; kaj jam de la komenco cedis unu parto post alia dum la malamikaro amase premis sin kontraŭ ĝin. Tiam la Doktoro, Longa Sago kaj Bumpo rapidis al la malfortiĝinta parto, terura man-al-mana batalo okazis kaj la malamikoj estis elpelitaj. Sed preskaŭ tuj alarmokrio venis el iu alia parto de la vilaĝmuro; kaj la Trio devis forrapidi kaj denove fari samon.

La Popsipetelanoj mem ne estis malfortaj batalistoj; sed la forto kaj pezo de tiuj tri viroj el diversaj landoj kaj koloroj, kune starantaj, svingantaj siajn enormajn militoklabojn, vere estis vidaĵo mirinda kaj admirinda por ĉiuj.

Multajn semajnojn poste, dum mi preterpasis Indianan kampadofajron dum la nokto, mi aŭdis ĉi kanton kantata. Ĝi poste fariĝis unu el la tradiciaj folkkantoj de la Popsipetelanoj.

LA KANTO PRI LA TERURA TRIO

Ho aŭdu la Kanton pri la Trio Terura,
Kaj l' batalo farita ĉe l' maro la dura.

De la montoj, la rokoj kaj deklivaj zigzagoj,
Kiel vespoj svarmadis la Bag-ĵagderaganoj,

Ĉirkaŭinte l' vilaĝon, trarompante la murojn.
Ho veis la homoj kaj rapidis forkuroj!
Sed Ĉielo decidis liberigi la landon
Al ni sendis do helpon, la Teruran Bandon.

Unu viron nigran — kiel la nokto malluma;
Unu viron ruĝan — kiel krepusko la suna;
Sed ĉefe Blankulon — kune ĉiuj kun krio,
En vico starantajn — tiu Terura Trio.

Ŝultro-al-ŝultre — martelege batante.
Furioze, demone — kaj ĉiam mallante.
Kiel muro detrua, starantaj en vico,
Kontraŭ ilin batali vere mankis la lico.

Ho fortis Ruĝulo, kaj ferocis Nigrulo.
Pro l' Bag-ĵagderaganoj jam tremis l' insulo.
Sed pri la Blankulo neniu enketis,
Li prenis l' atakantojn, enaeren li ĵetis!

Longe ektimos infanoj pro l' histori' kanta
Pri tiuj tri homoj, la Ruĝa, la Nigra, la Blanka.
Kaj longe ni kantos pri la Trio Terura
Kaj l' batalo farita ĉe l' maro la dura.

6. GENERALO POLINEZIO

SED ve! eĉ la Trio, malgraŭ sia forto, ne povis senfine kontraŭbatali armeon kiu ŝajnis senfina. En unu el la plej ardaĵoj, kiam la malamiko estis rompinta nekutime grandan truon en la barilo, mi vidis la grandan figuron de Longa Sago ŝanceliĝi kaj fali kun lanco pikinta lian larĝan bruston.

Dum plia duona horo Bumpo kaj la Doktoro bataladis flank'-al-flanke. Kiel ilia forto daŭris tiom longe mi ne scias, ĉar ili neniam paŭzis dum sekundo por spiri aŭ ripozigi siajn brakojn.

La Doktoro — la trankvila, afabla, pacama, malgranda Doktoro! — nu, vi ne rekonas lin se vi vidus lin tiutage dum li faris bategojn aŭdeblajn eĉ kilometron for, draŝante kaj frapante ĉiudirekte.

Kaj Bumpo, kun gapantaj okulogloboj kaj feroce fiksitaj dentoj, li estis vera demono. Neniu kuraĝis proksimiĝi eĉ al metroj for de tiu terura larĝe svingata pordofosto. Sed ŝtono, lerte ĵetita, fine batis la centron de lian frunton. Kaj falis la dua el la Trio. Johano Dolittle, la lasta el la Teruruloj, restis batalanta sola.

Jipo kaj mi rapidis al lia flanko kaj provis anstataŭi la falintojn. Sed multe tro malpezaj kaj tro malgrandaj, ni estis povra anstataŭaĵo. Plia parto de la barilo falis kraŝe, kaj tra la plilarĝiĝantan breĉon enfluis la Bag-ĵagderaganoj kvazaŭ inundo.

“Al la kanuoj! — Al la maro!” kriis la Popsipetelanoj. “Fuĝu por savi viajn vivojn! — Ĉio finiĝis! — Ni

malvenkis!”

Sed la Doktoro kaj mi tute ne havis oportunon fuĝi por savi niajn vivojn. Ni estis malstarigitaj kaj platigitaj de la pezego de la homamaso. Kaj falinte, ni ne kapablis restariĝi. Mi kredis ke nepre oni tretos nin ĝismorte.

Sed tiumomente, super la bruoj kaj konfuzo de la batalo, ni aŭdis la plej timigan sonon kiu iam trafis homajn orelojn: la sonon de milionoj plus milionoj da papagoj ĉiuj kune kriĉantaj feroce.

La armeo, kiun lastamomente Polinezio venigis por savi nin, senlumigis la okcidentan ĉielon. Mi demandis al ŝi poste kiom da birdoj estis; ŝi diris ke ŝi ne scias la ekzaktan nombron, sed ke nepre estis inter sesdek kaj sepdek milionoj. En tiu eksterordinare malmulta tempo ŝi estis veniginta ilin de la ĉeftero sudamerika.

Se iam vi aŭdis papagon kriĉi pro kolero, vi scias ke ĝi faras vere timigan sonon; kaj se ĝi iam mordis vin, vi scias ke ĝia mordo povas esti aĉe doloriga.

La Nigraj Papagoj (tute karbonigraj — escepte de skarlata beko kaj ruĝa strio sur la flugiloj kaj vosto) laŭ komando de Polinezio ekatakis la Bag-ĵagderaganojn, kiuj tiam kurinundadis la vilaĝon serĉante rabaĵojn.

Kaj la batalmetodo de la Nigraj Papagoj estis kurioza. Jen kion ili faris: sur la kapon de ĉiu Bag-ĵagderagano tri-kvar papagoj eksidis kaj firme prenis liajn harojn per siaj ungoj; post tio ili klinis sin laŭ la flankoj de lia kapo kaj komencis mordi pecojn el liaj oreloj, tute kvazaŭ ili tratraugas biletojn. Nur tion ili

faris. Ili mordis neniun alian parton ol la orelojn. Sed tio donis al ni la venkon en la milito.

Farante kriojn kiuj kompatige aŭdeblajn, la Bag-ĵagderaganoj stumblis unu pro alia dum sia hasto eliri el tiu damnita vilaĝo. Ne utilis al ili peni fortiri la papagojn de siaj kapoj; ĉar ĉiam kvar pliaj papagoj senpacience atendis ataki ĉiun kapon.

Kelkaj malamikoj estis bonŝancaj; kaj nur unu-dufoje mordite sukcesis iri ekster la barilon — kie la papagoj tuj forlasis ilin. Sed por la plejparto da ili, antaŭ ol la nigraj birdoj ĉesis ataki ilin, la oreloj havis tre kuriozan aspekton — kiel tiun de la randoj de poŝtmarko. Tiu pritrakto, kvankam dolorega tiutempe, ne por ĉiam damaĝis ilin, escepte de la ŝanĝita aspekto. Kaj post tio ĝi fariĝis triba insigno de la Bag-ĵagderaganoj. Neniu vere laŭmoda junulino de tiu tribo akceptus promeni kun viro sen dismorditaj oreloj — ĉar tiaj oreloj pruvis ke li partoprenis en la Granda Milito. Kaj tial (kvankam la sciencistoj ĝenerale ne scias tion) la popolo nomiĝis de la aliaj Indianaj nacioj, la *Ĉiforelaj Bag-ĵagderaganoj*.

Tuj kiam el la vilaĝo malaperis ĉiuj malamikoj, la Doktoro ekatentis la vunditojn.

Malgraŭ la longo kaj feroco de la baraktado, estis mirinde malmultaj gravaj vundoj. Povra Longa Sago pleje suferis. Tamen, post kiam la Doktoro lavis liajn vundojn kaj enlitigis lin, li malfermis siajn okulojn kaj diris senti sin jam denove sana. Bumpo estis nur grave stupora.

Fininte tiun parton de la afero, la Doktoro petis Polinezion ordoni al la Nigraj Papagoj repeli la

malamikojn rekte en ilian propran landon kaj atendi tie, gardante ilin tutnokte.

Polinezio faris mallongan komandon; kaj tutkune tiuj milionoj da papagoj malfermis siajn ruĝajn bekojn kaj denove sonigis sian timegigan batalokriçon.

La Bag-ĵagderaganoj ne atendis por esti denove morditaj, sed fuĝis pelmele trans la montojn de kiuj ili estis venintaj; dum Polinezio kaj ŝia venka armeo sekvis rigardante ilin kvazaŭ granda minaca nigra nuboj.

La Doktoro prenis sian ĉapelon, kiu estis forbatita dum la batalo, zorge senpolvigis ĝin kaj surmetis ĝin.

“Morgaŭ”, li diris, skuante sian pugnon cele la montetojn, “ni establos la packontrakton — kaj ni establos ĝin — en la Urbo Bag-ĵagderago!”

Liajn vortojn renkontis triumfaj krioj de la admirantaj Popsipetelanoj. La milito estis finita.

7. LA PACO DE LA PAPAGOJ

LA sekvan tagon ni komencis veturon al la fora fin-aĵo de la insulo, kaj atingis ĝin en kanuoj (ĉar ni veturis surmare) post dudekkvinhora vojaĝo, kaj ni restis en la urbo Bag-ĵagderago kiel eble plej nelonge.

Kiam li partoprenigis sin en tiu batalo ĉe Popsipetelo, mi la unuan fojon en mia vivo vidis la Doktoron vere kolera. Sed lia kolero, kiam aktivigita, malrapide mildiĝis. Tutvoje laŭ la bordo de la insulo li neniam ĉesis riproĉi tiun kovardan popolon kiu atakis liajn amikojn, la Popsipetelanojn, nur por ŝteli ilian maizon, ĉar ili estis tro pigraj por mem kultivi la teron. Kaj li estis ankoraŭ kolera kiam li atingis la urbon Bag-ĵagderago.

Longa Sago ne venis kun ni, ĉar li ankoraŭ estis tro febla pro sia vundo. Sed la Doktoro — ĉiam lerta pri lingvoj — jam komencis familiariĝi kun la Indiana lingvo. Krome, inter la seso da Popsipetelanoj kiuj akompanis nin por pagaji la kanuojn, estis knabo al kiu ni estis instruintaj iom da angla lingvo. Li kaj la Doktoro, kune, sukcesis komprenigi sin al la Bag-ĵagderaganoj. Tiuj homoj, kies ŝtona vilaĝo estis ankoraŭ nigre ĉirkaŭata de la teruraj papagoj, kiuj atendis ordonon descendi kaj ataki, estis, kiel ni trovis, tre humiloplenaj.

Lasinte niajn kanuojn ni laŭiris la ĉefan straton al la palaco de la ĉefo. Bumpo kaj mi ne povis ne rideti kontente kiam ni vidis la atendantajn homamasojn laŭ la flankoj de la vojo klini siajn kapojn al la tero,

dum la malgranda, ronda, kolera figuro de la Doktoro fiere marŝis antaŭ ni kun sia mentono levita.

Ĉe la malsupro de la palacaj ŝtupoj la ĉefo kaj ĉiuj gravuloj de la tribo atendis renkonti lin, humile ridetante kaj etendante siajn manojn amikeme. La Doktoro tute ne atentis ilin. Li pretermarŝis ilin, ascendis la ŝtupojn al la pordo de la palaco. Tie li turnis sin kaj tuj komencis paroladi al la popolo per firma voĉo.

Dum mia tuta vivo mi neniam aŭdis similan paroladon — kaj mi plene certas ke ankaŭ ili nenion similan aŭdintis. Unue li nomis ilin per longa aro da finomoj: kovardoj, pigruloj, senutiluloj, tiranaĉoj, kc. Post tio li diris ke li ankoraŭ serioze pripensas permesi la papagojn peli ilin en la maron, por ke al ĉi tiu plaĉa lando manku, por eterne, iliaj senvaloraj korpaĉoj.

Je tio laŭtega krio petanta kompaton aŭdiĝis, kaj la ĉefo kaj ĉiuj aliaj surgenuiĝis, kriante ke ili akceptos kiajn ajn kondiĉojn li postulos por paco.

Tiam la Doktoro alvokis skribiston — tio estas, viro kiu faras bildoskribon. Kaj sur la ŝtonajn murojn de la palaco de Bag-ĵagderago li skribigis la postulojn kiujn li diktis por ke estu paco. Tiu paco estas nomata *La Paco de la Papagoj*, kaj — malsimile al la plej multaj packontraktoj — estis, kaj estas, severe obeata — eĉ ankoraŭ nun.

Ĝi estis tre multevorta. Duono de la faco de la palaco estis kovrita per bildoskribo, kaj kvindek potoj da farbo estis uzitaj, antaŭ ol la laca skribisto finis. Sed la ĉefa postulo estis ke neniam denove estu

batalo; kaj ke la du triboj solene promesu helpi unu la alian kiam ajn estos manko de maizo aŭ ia alia mizero en iliaj landoj.

Tio multe surprizis la Bag-ĵagderaganojn. Ili supozis pro la kolera vizaĝo de la Doktoro ke li almenaŭ dehakos kelkcent kapojn — kaj verŝajne sklavigos la ceterajn homoj por ilia tuta vivo.

Sed kiam ili vidis ke li celas nur afable trakti ilin, ilia granda timo pro li ŝanĝiĝis en grandegan admiron. Kaj kiam li finis sian longan paroladon kaj vigle redescendis la ŝtupojn por reiri al la kanuoj, la grupo de ĉefoj ĵetis sin antaŭ liajn piedojn kaj kriis:

“Bonvolu resti kun ni, Bona Mastro, kaj ĉiuj riĉoj de Bag-ĵagderago estos verŝitaj sur viajn genuojn. Pri orminoj en la montoj ni scias, kaj perlobedoj sub la maro. Nur restu kun ni, por ke via ĉiopova saĝo povu gvidi nian Konsilion kaj nian popolon prospere kaj pace”.

La Doktoro levis sian manon por silentigi ilin.

“Neniu”, diris li, “volus esti gasto de la Bag-ĵagderaganoj, antaŭ ol ili pruvos per siaj agoj ke ili estas honesta raso. Obeu la postulojn de la Paco kaj el vi mem venos bona regado kaj prospero — Adiaŭ!”

Tiam li turnis sin kaj sekvate de Bumpo, la Popsipetelanoj kaj mi mem, rapide marŝis al la kanuoj.

8. LA PENDANTA ŜTONO

SED la korŝanĝiĝo de la Bag-ĵagderaganoj estis vere sincera. La Doktoro faris grandan impreson sur ili — pli profundan ol eĉ li mem konsciis tiutempe. Efektive kelkafoje mi pensas ke tiu parolado lia eĉ la palacoŝtupoj pli grave efikis la Indianojn de Insulo Atelo ol ĉiuj aliaj gravaj agoj liaj, kiuj, kvankam gravaj, estis ĉiam pligrandigitaj kaj trograndigitaj kiam la rakonto pri ili iris de buŝo al buŝo.

Malsana knabino estis portita al li kiam li atingis la boataron. Montriĝis ke ŝi suferas pro io tute simpla por kio li rapide donis medikamenton. Sed tio des pli pliigis lian popularecon. Kaj kiam li paŝis en sian kanuon, ĉiuj homoj ĉirkaŭ ni efektive komencis plori. Ŝajnas (pri tio mi post sciiĝis) ke ili kredis ke li foriras trans la maron por eterne, al la misteraj fremdaj landoj de kiuj li estis veninta.

Kelkaj el la ĉefuloj parolis al la Popsipetelanoj dum ni depuŝis la kanuon. Kion ili diris mi ne komprenis; sed ni rimarkis ke pluraj kanuoj plenaj de Bag-ĵagderaganoj sekvis nin, je respektoplena distanco malantaŭ ni, tute ĝis Popsipetelo.

La Doktoro estis decidinta reiri laŭ la alia bordo, por ke ni tiel faru kompletan veturon ĉirkaŭ la bordojn de la insulo.

Baldaŭ post nia ekiro, dum ni ankoraŭ estis apud la suda finaĵo de la Insulo, ni ekvidis krutaĵon sur la bordo kie la maro tre tumultis, blanka per sapeca ŝaŭmo. Pliproksimiĝinte, ni trovis ke tion kaŭzas niaj



“FIDELE PUŞANTAJ LA FINAĴON DE LA INSULO PER SIAJ NAZOJ.”

amikaj balenoj fidele puŝaantaj la finaĵon de la insulo per siaj nazoj, pelante nin norden.

Ni estis tiom okupitaj de la milito ke ni estis tute forgesintaj ilin. Sed dum ni paŭzis kaj rigardis iliajn potencajn vostojn bati kaj kirli la maron, ni ekkonsciis ke jam de longe ni ne plu sentas malvarmon. Rapidiginte nian boaton por ke la insulo ne estu puŝita tute for de ni, ni pasis laŭ la bordo; kaj tie kaj tie ni rimarkis ke la arboj sur la bordo jam aspektas pli verdaj kaj pli sanaj. Insulo Atelo revenas en sian hejman klimaton.

Proksimume duonvoje al Popsipetelo ni surbordigis kaj pasigis du-tri tagojn esplorante la centran parton de la insulo. Niaj Indianaj pagajistoj kondukis nin alten en la montaron, tre kruta kaj alta en ĉi tiu regiono, pendanta super la maro. Kaj ili montris al ni tion kion ili nomis la Fluŝrantaj Rokoj.

Ĉi tio estis tre kurioza kaj okulfrapa pejzaĝo. Ĝi estis kia granda vasta pelvo, aŭ amfiteatro, en la montoj, kaj el ĝia centro estis alta roka tablo sur kiu estis ebura seĝo. Tute ĉirkaŭ tio leviĝis la monto kvazaŭ ŝtuparo, aŭ teatro-sidlokoj, ĝis tre granda alto — escepte de unu mallarĝa finaĵo kiu estis aperta kaj vidigis la maron. Eblus imagi ĝin konsiliejo aŭ koncertejo por gigantoj, kaj la rokan tablon en la centro scenejo por la rolantoj aŭ podio por preleganto.

Ni demandis al niaj gvidistoj kial ĝi nomiĝas la Fluŝrantaj Rokoj; kaj ili diris; “Descendu en ĝin kaj ni demonstras al vi”.

La giganta pelvo estis multajn kilometrojn larĝa. Ni malgrimpis la rokojn kaj ili montris al ni ke, eĉ



"LA FLUSTRANTAJ ROKOJ."

kiam oni staras ege for unu de la alia, se oni nur frustras en tiu granda loko ĉiu persono en la teatro povas aŭdi. Tion kaŭzis, diris la Doktoro, la eĥoj kiuj disĵetiĝis inter la altaj rokaj muroj.

Niaj gvidistoj diris al ni ke ĉi tie, dum antikva epoko, kiam la Popsipetelanoj posedis la tutan Insulon Atelo, la reĝoj estis kronataj. La ebura seĝo sur la tablo estis la trono en kiu ili sidis. Kaj tiom granda estis la giganta teatro ke ĉiuj Indianoj de la insulo povis sidiĝi en ĝi por rigardi la ceremonion.

Ili montris al ni ankaŭ enorman pendantan ŝtonon sidantan sur la rando de vulkana kratero — la plej alta pinto de la tuta insulo. Kvankam ĝi estis tre malproksima sub ni, ni povis tute klare vidi ĝin; kaj ĝi aspektis sufiĉe ŝancelebla ke oni povus puŝi ĝin de sia sidejo per mano. Estis legendo inter la popolo, ili diris, ke kiam la plej granda Reĝo de Popsipetelo estos kronita en la ebura seĝo, tiu pendanta ŝtono falos en la aperturon de la vulkano kaj iros rekte al la centro de la tero.

La Doktoro diris ke li volonte iros ekzameni ĝin pli proksime.

Kaj kiam ni atingis la lipon de la vulkano (ni bezonis duonon de tago por atingi ĝin) ni trovis la ŝtonon nekredeble granda — tiom granda kiel katedralo. Sub ĝi ni povis rigardi rekte en nigran truon kiu aspektis ne havi fundon. La Doktoro eksplikis al ni ke vulkanoj kelkafoje elŝprucas fajron el tiuj truoj en siaj suproj; sed ke la vulkanoj sur flosantaj insuloj estas ĉiam malvarmaj kaj mortaj.

“Stubbins”, li diris, rigardante la gigantan ŝtonon

turantan super ni, “ĉu vi scias kio plej verŝajne okazus se tiu rokego enfalus?”

“Ne”, diris mi, “kio?”

“Ĉu vi memoras la aerkameron kiu laŭ la focenoj kuŝas sub la centro de la insulo?”

“Jes”.

“Nu, tiu ŝtono estas sufiĉe peza, ke se ĝi falus en la vulkanon, ĝi trarompus en tiun aerkameron. Kaj post tiu okazo, la aero eskapus kaj la flosanta insulo ne plu flosus. Ĝi sinkus”.

“Sed tiuokaze ĉiuj homoj sur la insulo dronus, ĉu ne?” diris Bumpo.

“Ho ne, ne nepre. Dependus de la profundo de la maro kie la sinko okazus. La insulo eble atingus la fundon subirinte, ni diru, tridek metrojn. Sed ankoraŭ restus tre granda parto de ĝi ankoraŭ super la akvo, ĉu ne?”

“Jes”, diris Bumpo, “mi supozas ke jes. Nu, ni esperu ke la multepeza fragmento *ne* perdos sian ekvilibrecon, ĉar mi kredas ke ĝi ne haltus ĉe la centro de la tero — pli verŝajne ĝi tute trafalus la mondon kaj elirus el la alia flanko”.

Multajn aliajn mirindaĵojn tiuj viroj montris al ni en la centraj regionoj de sia insulo. Sed mi havas nek sufiĉan tempon nek sufiĉan spacon por paroli pri ili nun.

Denove descendante borden, ni rimarkis ke nin ankoraŭ gvatas, eĉ ĉi tie en la alta lando, la Bag-ĵagderaganoj kiuj estis sekvintaj nin. Kaj kiam ni denove surmariĝis, boato da ili antaŭiris nin cele Popsipetelon. Ĉar iliaj kanuoj estis malpli pezaj, ili

veturis pli rapide ol nia grupo; kaj ni taksis ke ili atingos la vilaĝon — se efektive ili iras tien — multajn horojn antaŭ ol ni.

La Doktoro nun komencis maltrankvile demandi al si kiel fartas Longa Sago, do ni ĉiuj laŭvice pagajis kaj plu veturis en la lunlumo tra la tuta nokto.

Surprize al ni, ni trovis ke ne nur ni sed ankaŭ la tuta vilaĝo estis veka dum la tuta nokto. Granda homamaso estis grupiĝinta ĉirkaŭ la domon de la morta ĉefo. Kaj dum ni surbordigis niajn kanuojn sur la strandon ni vidis grandan nombron da maljunuloj, la ĉefaj olduloj de la tribo, veni el la ĉefa pordo.

Ni demandis pri la signifo de ĉio ĉi; kaj oni informis nin ke la elekto de nova ĉefo okazis dum la tuta nokto. Bumpo demandis pri la nomo de la nova ĉefo; sed tio, ŝajne, ankoraŭ ne estis diskonigita. Oni anoncos ĝin je la tagmezo.

Tuj kiam la Doktoro vizitintis Longan Sagon kaj trovis ke li bone progresas, ni marŝis al nia propra domo ĉe la rando de la vilaĝo. Tie ni matenmanĝis kaj post tio kuŝiĝis por longe dormi.

Dormon ni ja bezonis; ĉar la vivo estis postuloplena kaj multokupa por ni ekde la momento kiam ni surbordiĝis ĉe la insulo. Kaj nemultajn minutojn post kiam niaj lacaj kapoj kuŝiĝis sur la kapkusenojn nia tuta grupo estis profunde dormanta.

9. LA ELEKTO

NIN vekis muziko. La brileganta tagmeza sunlumo enverŝiĝis tra nian pordejon, ekster kiu ia bando ŝajne muzikis.

Ni ellitiĝis kaj elrigardis. Nian domon ĉirkaŭis la tuta loĝantaro de Popsipetelo. Ni jam kutimiĝis al la ĉeesto de granda nombro de scivolaj kaj admirantaj Indianoj atendantaj ĉe nia pordo je ĉiu ajn horo; sed ĉi tio estis tute malsimila. La vasta homaro estis vestita plej elegante. Brilantaj bidoj, buntaj plumoj kaj buntaj tukoj donis gajan koloron al al sceno. Ĉiuj aspektis bonhumoraj, kantante aŭ ludante muzikilojn — plejparte pentritajn lignajn fajfilojn aŭ tamburojn el haŭtoj.

Ni trovis Polinezion — kiu dum nia dormo estis reveninta de Bag-ĵagderago — sidanta sur nia pordofosto rigardante la scenon. Ni demandis al ŝi pri kio temas la festo.

“Oni ĵus anoncis la elektorezulton”, diris ŝi. “La nomo de la nova ĉefo estis diskonigita je la tagmezo”.

“Kaj kiu estas la nova ĉefo?” demandis la Doktoro.

“Vi”, diris Polinezio trankvile.

“*Mi!*” anhelis la Doktoro. “Neniel!”

“Jes”, diris ŝi. “Estas vi. — Kaj aldone, ili ŝanĝis vian familinomon. Ili opiniis ke ‘Farumalmulton’ ne estas deca aŭ respektoplena nomo por viro kiu faris tiom. Do vi nun nomiĝos Jongo Pensomulta. Ĉu plaĉas al vi?”

“Sed mi *malvolas* esti ĉefo”, diris la Doktoro per

iritita voĉo.

“Ne estos facile por vi maldecidigi ilin”, diris ŝi — krom se vi decidus resurmariĝi en iu el iliaj malfortikaj kanuoj. Sciu, vi estis elektita ne nur Ĉefo de la Popsipetelanoj; vi estos reĝo — la Reĝo de la tuta Insulo Atelo. La Bag-ĵagderaganoj, kiuj tiom fervoris ke vi regu ilin, sendis spionojn kaj mesaĝistojn antaŭ vi; kaj trovinte ke vi estis elektita Ĉefo de la Popsipetelanoj dum la nokto ili estis amare desapontitaj. Tamen, prefere ol tute perdi vin, la Bag-ĵagderaganoj akceptis cedi sian sendependecon, kaj insistis ke ili kaj iliaj landoj unuiĝu kun la Popsipetelanoj por ke vi estu la reĝo de ambaŭ. Do nun via sorto estas decidita”.

“Jadi!” ĝemis la Doktoro. “Se nur ili ne estus tiom entuziasmaj! Fi! Mi ne *volas* esti reĝo!”

“Mi supozus, Doktoro” diris mi, “ke vi estus iom fiera kaj plaĉita. Volonte *mi* akceptus oportunun esti reĝo”.

“Ho, mi scias ke sonas grandioze”, diris li, malfeliĉe surtirante siajn botojn. “Sed la ĉagreno estas ke oni ne povas akcepti respondecojn unumomente kaj simple delasi ilin kiam oni deziras. Mi havas mian propran laboron. Mi havis apenaŭ unu momenton por prilabori naturohistorion ekde kiam mi surteriĝis ĉe ĉi tiu insulo. Mi devis konstante prizorgi aliajn personojn. Kaj nun ili volas ke mi plu faru tion! Nu, fariĝinte Reĝo de la Popsipetelanoj, mi renkontus la finon de mia utilo kiel naturisto. Mi estus tro okupata de aliaj aferoj. Tiam mi estus, tute simple, a..., e..., e... nur reĝo”.

“Nu, tio estas valora!” diris Bumpo. “Mia patro

estas reĝo kaj havas cent dudek edzinojn”.

“Des pli malbone” diris la Doktoro — “cent-dudekoble pli malbone. Mi havas laboron por fari. Mi ne volas esti reĝo”.

“Atentu”, diris Polinezio, “jen la ĉefulo venas anonci vian elekton. Rapidu ligi viajn botlaĉojn”.

La homamaso antaŭ nia pordo estis subite apartiĝinta, por fari longan vojon; kaj laŭ la vojo ni nun vidis grupon de personoj veni niadirekte. La viro en la antaŭo, bela maljuna Indiano kun faltoplena vizaĝo, portis en siaj manoj lignan kronon — vere belan, ja belegan kronon, eĉ kvankam nur el ligno. Belege ĉizita kaj farbita, ĝi havis du belajn blujajn plumojn etendiĝantajn el ĝia antaŭo. Malantaŭ la maljuna viro venis ok fortaj Indianoj portantaj palankenon, tio estas speco de seĝo sub kiu estas longaj stangoj por porti ĝin.

Surgenuiĝnte, kun sia kapo klinita preskaŭ ĝis la tero, la oldulo parolis al la Doktoro, kiu nun staris en la pordejo surmetante siajn kolumon kaj kravaton.

“Ho Potenculo”, diris li, “ni portas al vi parolon de la Popsipetelana popolo. Nekredeble grandaj estas viaj faroj, afabla estas via koro, kaj via saĝo estas pli profunda ol la maro. Nia ĉefo mortis. La popolo elkore petas indan estron. Niaj malnovaj malamikoj, la Bag-ĵagderaganoj nun fariĝis, pro vi, niaj fratoj kaj bonaj amikoj. Ankaŭ ili volas ĝui la sunbrilon de via rideto. Jen, do, mi portas al vi la Sanktan Kronon de Popsipetelo, kiu, ekde la antikva tempo kiam ĉi tiu insulo kaj ĝiaj popoloj estus unueca, kun unu monarko, sidis sur neniu reĝa brovo. Ho Afablulo,

nin petas la unuiĝintaj voĉoj de la popoloj de ĉi tiu lando porti vin al la Flustrantaj Rokoj, kaj ke tie, kun plenaj respekto kaj majesto, vi estu kronita nia reĝo — Reĝo de la tuta Moviĝanta Lando”.

La bonkoraj Indianoj evidente eĉ ne pensis ke eble Johano Dolittle rifuzus. Kaj rilate al la povra Doktoro, mi neniam vidis lin tiom malkvietigita de io ajn. Efektive, estis la sola fojo kiam mi vidis lin tute agitita.

“Ho ve!” mi aŭdis lin murmuri, ĉirkaŭserĉante ian rimedon eskapi. “*Kion* mi faru? — Ĉu iu el vi vidis kien mi metis tiun kolumligilon? — Kiel, je la dio, mi povos surmeti ĉi tiun kolumon sen ligilo? Kia tago, jes ja! — Eble ĝi ruliĝis sub la liton, Bumpo — Kial ili ne donis al mi almenaŭ unu tagon por pripensi ĝin? Ĉu iam antaŭe okazis ke oni vekis plene dormantan viron kaj diris ke li devas esti reĝo, antaŭ ol li eĉ lavis sian vizaĝon? Ĉu neniu el vi povas trovi ĝin? Eble vi staras sur ĝi, Bumpo. Movu viajn piedojn”.

“Ho, ne atentu pri via ligilo”, diris Polinezio. “Vi devos esti kronita sen kolumo. Ili ne sentos la mankon”.

“Mi diras al vi ke mi ne estos kronita”, kriis la Doktoro — “ne se mi povos eviti ĝin. Mi faros paroladon al ili. Eble tio kontentigos ilin”.

Li returnis sin al la Indianoj ĉe la pordo.

“Miaj amikoj”, li diris, “mi ne meritas ĉi tiun grandan honoron kiun vi volas doni al mi. Malmultan, eĉ nenian, lerton mi havas pri reĝado. Nepre inter viaj propraj bravaj viroj vi trovos multajn pli taŭgajn por gvidi vin. Pro la komplimento, la fido, mi dankas vin. Sed, mi petas, ne konsideru min por tiaj altaj devoj

kiujn mi neniel povus plenumi”.

La maljunulo ripetis liajn vortojn al la popolo malantaŭa per pli laŭta voĉo. Unuanime ili kapneis, kaj neniom formovis sin. La maljunulo returnis sin al la Doktoro.

“Vi estas la elektito”, diris li. “Ili akceptos nur vin”.

En la perpleksan vizaĝon de la Doktoro subite ekbrilis espero.

“Mi iros paroli kun Longa Sago”, li flustris al mi. “Eble li scios ian manieron liberigi min de ĉi tio”.

Kaj petinte la gravulojn pardoni lin dum momento, li lasis ilin tie, starantajn ĉe lia pordo, kaj hastis al la domo de Longa Sago. Mi sekvis lin.

Ni trovis nian amikon kuŝanta sur herba lito ekster sia hejmo, kien li estis movita por vidi la festadon.

“Longa Sago”, diris la Doktoro, parolante rapide per la agla lingvo por ke proksimuloj ne komprenu lin, “en mortiga danĝero mi venas al vi petante helpon. Tiuj homoj volas fari min sia reĝo. Se tio okazus al mi, la tuta grava laboro kiun mi esperis fari devus resti nefarita, ĉar kiu estas malpli libera ol reĝo? Mi petegas vin paroli al ili kaj persvadi iliajn afablajn bonintencajn korojn ke tio, kion ili planas fari, estus malsaĝa”.

Longa Sago levis sin per sia kubuto.

“Ho Afablulo”, diris li (ĉi tio ŝajne nun fariĝis la kutima titolo kiam oni parolas al la Doktoro), “amare malĝojigas min ne povi plenumi vian unuan peton al mi. Ve! Mi povas fari nenion. Ĉi tiuj homoj tiom fervoras reĝigi vin, ke se mi provus interveni, ili pelus

min el la lando kaj verŝajne fine kronus vin malgraŭ ĉio. Reĝo vi devos esti, se nur dum kelka tempo. Ni devos tiel aranĝi la regotaskojn ke vi havos tempon por dediĉi vin al la sekretoj de la Naturo. Poste eble ni povos elpensi ian planon por liberigi vin de la devoj de la krono. Sed nunmomente vi devos esti reĝo. Ĉi tiu popolo estas firmensa tribo kaj ili nepre efektivigos sian volon. Nenio alia fareblas.”

Malfeliĉe la Doktoro turnis sin for de la lito. Kaj tie malantaŭ li staris denove la maljunulo, ankoraŭ tenante la kronon en siaj faldoplenaj manoj, kaj la reĝa palankeno ankoraŭ atendis apud lia kubuto. Tre respektoplene la portantoj indikis la sidejon de la seĝo, invitante la blankulon eniri.

Ankoraŭ denove la povra Doktoro ĉirkaŭserĉis sovaĝe, por trovi ian metodon eskapi. Dum momento mi pensis ke li ekforkuros. Sed la homamaso ĉirkaŭ ni estis multe tro densa kaj plena por lasi la forkuron de iu ajn. Bando de fajfiloj kaj tamburoj proksimaj subite komencis la muzikon de solena procesio. Li returnis sin petegante al Longa Sago. Sed la granda Indiano nur kapneis kaj indikis, same kiel la portistoj, la atendantan seĝon.

Fine, preskaŭ larme, Johano Dolittle malrapide paŝis en la palankenon kaj sidiĝis. Dum li estis levata sur la larĝajn ŝultrojn de la portistoj mi aŭdis lin ankoraŭ feble murmuri subvoĉe:

“Je ĉio ĉagrena! — mi *malvolas* esti reĝo!”

“Adiaŭ!” vokis Longa Sago de sia lito, “kaj bona fortuno ĉiam staru en la ombro de via trono!”

“Li venas! — Li venas!” murmuris la amaso.

“For! — For! — Al la Flustrantaj Rokoj”.

Kaj dum la procesio pretigis sin por foriri el la vilaĝo, la homaro ĉirkaŭ ni komencis hasti direkte al la montoj por certigi al si bonajn sidlokojn en la giganta teatro kie la kronada ceremonio okazos.

10. LA KRONADO DE REĜO JONGO

DUM mia longa vivo mi vidis multajn grandajn kaj inspirajn aferojn, sed neniam io imponis al mi eĉ duone tiom kiom vidi la Flustrantaj Rokojn dum la tago de la kroniĝo de Reĝo Jongo. Kiam Bumpo, Ĉi-Ĉio, Polinezio, Jipo kaj mi fine atingis la kapturnigan randon de la granda pelvo kaj rigardis suben en ĝin, estis kvazaŭ vidi senrandan oceanon de kuprokoloraj vizaĝoj ĉar ĉiu sidloko en la teatro estis plena, ĉiu viro, virino kaj infano sur la insulo — inkluzive de Longa Sago, kiun oni estis portinta sur lia lito de malsanulo — ĉeestis por rigardi la eventon.

Tamen neniu sono, nenia soneto, ĝenis la solenan silenton de la Flustrantaj Rokoj. Estis hirtige kaj malvarmaj sentoj transkuris sub kaj sor mian spinon. Bumpo poste diris al mi ke la vidaĵo tiom senspirigis lin ke li ne povis paroli, ĝis tiam li tute ne sciis ke ekzistas tiom da homoj en la mondo.

Tre malproksime apud la Tablo de la Trono staris la nove farita bunta totemfosto. Ĉiu Indiana familio havis totemfoston kaj ĝi estis starigita antaŭ la pordo de la domo. La koncepto de totemfosto estas iom simila al tiu de pordoplako aŭ vizitkarto. Per siaj ĉizaĵoj ĝi reprezentas la agojn kaj kvalitojn de la familio al kiu ĝi apartenas. Ĉi tiu, bele ornamita kaj multe pli alta ol ĉiu alia, estis la totemo Dolittle, aŭ, kiel de tiam oni nomis ĝin, La Reĝa Pensomulta totemo. Sur ĝi estis bildoj nur de bestoj, por indiki la grandan scion de la Doktoro pri bestoj. Kaj la bestoj

elektitaj estis bestoj kiuj laŭ la kredo de la Indianoj reprezentas bonajn karakterizaĵojn, ekzemple, cervo por rapido; bovo por persisto; fiŝo por diskreto, ktp. Sed ĉe la supro de la totemo ĉiam prezentiĝas la signo aŭ besto per kiu la familio plej fieras koniĝi. Tiu sur la Pensomulta fosto estis enorma papago, omaĝe al la fama Paco de la Papagoj.

La Ebura Trono estis zorge polurita per odoro-plena oleo kaj ĝi blanke brilis en la forta sunlumo. Ĉe ĝia piedo estis disŝutitaj grandaj kvantoj da branĉoj de florantaj arboj, kiuj pro la nova varmo de pli milda klimato nun floradis en la valoj de la insulo.

Baldaŭ ni vidis la reĝan palankenon, en kiu sidis la Doktoro, malrapide ascendi la sinuajn ŝtupojn de la Tablo. Fine atinginte la platan supron, ĝi haltis kaj la Doktoro elpaŝis sur la florornamitan tapiŝon. Tiom kvieta kaj perfekta estis la silento ke eĉ je mia supra malproksimeco mi klare aŭdis branĉeton rompiĝi sub lia paŝado.

Marŝinte al la trono akompanate de la maljunulo, la Doktoro suriris la podion kaj sidiĝis. Kiom eta lia malgranda ronda figuro aspektis vidate el tiom supre. La trono estis farita por plilongekruraj reĝoj; kaj kiam li sidis, liaj piedoj ne atingis la teron sed pendis dek kvin centimetrojn super la plej alta ŝtupo.

Tiam la maljunulo turnis sin kaj supren rigardante la popolon komencis paroli per nelaŭta senemfaza voĉo; sed ĉiu vorto dirita de li estis facile aŭdebla en eĉ la plej malproksima angulo de la Flustrantaj Rokoj.

Unue li deklamis la nomojn de ĉiuj grandaj popsi-petelaj reĝoj kiuj en antikva epoko estis kronitaj en ĉi

tiu ebura seĝo. Li parolis pri la granda karaktero de la popsipetela popolo, pri iliaj triumfoj, pri iliaj problemoj. Poste, indikante per sia mano la Doktoron li komencis deklari la agojn de ĉi tiu estonta reĝo. Kaj mi devas diri ke facile ili superis la agojn de liaj antaŭintoj.

Tuj kiam li komencis paroli pri kion la Doktoro faris por la tribo, la popolo, ankoraŭ severe silenta, ĉiuj komencis gesti cele la tronon per siaj dekstraj manoj. Tio donis al la vasta teatro tre unikan aspekton: hektaroj plus hektaroj da movo — tute sensona.

Fine la maljunulo kompletigis sian paroladon kaj paŝinte al la seĝo, tre respektoplene deprenis la ĉifitan altan ĉapelon de la Doktoro. Li intencis meti ĝin sur la teron; sed la Doktoro haste prenis ĝin de li kaj tenis ĝin sur siaj genuoj. Poste, preninte la Sanktan Kronon li metis ĝin sur la kapon de Johano Dolittle. Ĝi ne sidis tie tre bone (ĉar ĝi estis farita por reĝoj kun malpli grandaj kapoj), kaj kiam la vento blovis freŝe de la sunlumigata maro la Doktoro iom malfacile tenis ĝin sur sia kapo. Sed ĝi aspektis belega.

Denove turninte sin al la popolo, la oldulo diris:

“Homoj de Popsipetelo, jen via elektita reĝo! — Ĉu vi kontentas?”

Kaj tiam, finfine, la voĉo de la popolo sonegis:

“JONGO! JONGO!” ili kriis. “VIVU REĜO JONGO!”

La sono rompis la solenan silenton kvazaŭ la pafsono de cent kanonoj. Tie, kie eĉ flustro disaŭdiĝis trans kilometrojn, ĝia ŝoko estis kia bato sur la vizaĝon. Zigzage la montoj interĵetis ĝin. Mi kredis ke ĝiaj eĥoj neniam finiĝos dum ĝi muĝe trairis la tutan

insulon, tintegante inter la malpli altaj valoj, tamburegante en la malproksimaj markavoj.

Subite mi vidis la maljunulon indiki supren, al la plej alta mondo en la insulo; kaj transrigardante mian ŝultron mi estis sufiĉe akurata por vidi la Pendantan Ŝtonon malrapide ŝanceliĝi kaj fali en la koron de la vulkano.

“Vidu, Homoj de la Moviĝanta Lando!” la maljunulo kriis. “La ŝtono falis kaj nia legendo montriĝis prava: la Plejsupera Reĝo estis kronita hodiaŭ!”

Ankaŭ la Doktoro vidis la ŝtonon fali kaj li nun staris rigardante la maron anticipoplene.

“Li pensas pri la aerkamero”, diris Bumpo en mian orelon. “Ni esperu ke la maro ne estas tre profunda ĉiloke”.

Post plena minuto (tiom longe la ŝtono devis fali por atingi la fundon) ni aŭdis dampitan malproksiman kraŝan bumsonon — kaj tuj poste, grandan sibladon de eskapanta aero. La Doktoro, kies vizaĝo estis streĉa pro antaŭtimego, residiĝis en la tronon, ankoraŭ rigardante la bluan akvon de la oceano per gapantaj okuloj.

Baldaŭ ni sentis la insulon malrapide sinki sub ni. Ni vidis la maron rampadi sur la teron trans la strandojn dum la bordoj subakviĝis — duonan metron, metron, tri metrojn, dek, dudek, tridek. Kaj tiam, dank’ al Dio, milde kiel papilio sidiĝanta sur rozon, ĝi haltis! Insulo Atelo ripozis sur la sablokovrita fundo de Atlantiko, kaj tero unuiĝis kun tero denove.

Kompreneble multaj domoj apud la bordo nun estis sub la akvo. Vilaĝo Popsipetelo mem estis tute

malaperinta. Sed ne gravis. Neniu dronis; ĉar ĉiu homo en la insulo estis alte en la montetoj rigardante la kroniĝon de Reĝo Jongo.

La Indianoj mem ne komprenis tiutempe kio okazas, kvankam kompreneble ili sentis la teron sinki sub ili. La Doktoro diris al ni poste ke sendube la ŝoko de tiu grandega krio, venanta samtempe el miliono da gorĝoj, faligis la Pendantan Ŝtonon de ĝia pozicio. Sed en la historio de Popsipetelo la rakonto diras (kaj oni ankoraŭ nun firme kredas ĝin) ke kiam Reĝo Jongo sidiĝis sur la tronon, tiom granda estis lia grandioza pezo, ke la insulo mem sinkis honore al li kaj neniam denove sin movis.

1. NOVA POPSIPETELO

JONGO PENSOMULTA estis reginta sian novan regnon dum nur kelkaj tagoj kiam miaj nocioj pri reĝoj kaj ilia maniero vivi draste ŝanĝiĝis. Mi estis supozinta ke la sola tasko de reĝoj estas sidi sur trono por ke oni kliniĝu antaŭ ili plurfoje dum ĉiu tago. Mi nun vidis ke reĝo povas esti la plej laboreganta persono en la mondo — se li ĝuste priatentas sian taskon.

Ekde la momento kiam li ellitiĝis, frue en la mateno, ĝis la momento de sia enlitiĝo, malfrue en la nokto — sep tagojn ĉiusemajne — Johano Dolittle devis labori, labori, labori. Unue, necesis konstrui la novan vilaĝon. La vilaĝo Popsipetelo estis malaperinta: la Urbo Nova Popsipetelo estis konstruenda. Nova situo tre zorge estis selektita por ĝi — kaj ja vere bela situo ĝi estis, ĉe la enfluejo de granda rivero. La bordoj de la insulo tiuloke faris belan larĝan golfon kie kanuoj — kaj ankaŭ ŝipoj, se iam ili venos — povos situi trankvile ankritaj sen danĝero pro ŝtormoj.

Por la konstruo de ĉi tiu vilaĝo la Doktoro donis al la Indianoj multajn novajn ideojn. Li montris al ili kio estas vilaĝaj kloakoj, kaj kiel kolekti rubon ĉiutage kaj bruligi ĝin. Alte en la montetoj li faris grandan lagon per digado de rivero. Nenion tian la Indianoj antaŭe vidis; kaj multaj el la malsanoj kiujn ili antaŭ tiam suferis nun estis tute malebligataj de taŭga drenado

kaj pura trinkakvo.

Popoloj kiuj ne uzas fajron kompreneble ankaŭ ne havas metalojn; ĉar sen fajro estas preskaŭ neeble fari feron kaj ŝtalon. Unu el la plej unuaj agoj de Johano Dolittle estis traserĉi la montojn ĝis li trovis minojn de fero kaj kupro. Tiam li komencis instrui la Indianojn fandi tiujn metalojn kaj fari el ili tranĉilojn kaj plugilojn kaj akvotubojn kaj ĉiajn aĵojn.

En sia regno la Doktoro penegis nuligi la plej grandan parton de la malnovmodaj pompo kaj gloro de reĝa kortego. Kiel li diris al Bumpo kaj mi, se li devas esti reĝo, li intencas esti plene demokrata reĝo, t.e. reĝo kiu estas amikema kun siaj regatoj kaj ne arogantas. Kaj kiam li preparis la planojn por la Urbo Nova Popsipetelo li indikis tute nenian palacon. Nur malgrandan dometon en malĉefa strato li provizis por si.

Sed tion la Indianoj nenial aprobis. Laŭ ilia kutimo la reĝoj devas regi laŭ vere grandioza kaj reĝa maniero; kaj ili insistis ke li konstruigu por si la plej grandiozan palacon iam viditan. Pri ĉio alia ili permesis ke li agu laŭvole; sed ili tute ne permesis ke li elruzu metodon eviti ian ceremonion aŭ demonstracion kio konvenas por reĝo. Mil servistojn li devis havi en sia palaco, nokte kaj tage, por servi lin La Reĝa Kanuo estis prizorgenda — belega polurita mahagona boato, dudek metrojn longa, inkrustita per perlamoto kaj pagajata de cent el la plej fortaj viroj en la insulo. La ĝardenoj de la palaco etendiĝis sur tri kvadrataj kilometroj kaj dungitaj estis cent sesdek ĝardenistoj.

Eĉ rilate al sia vestaro la povrulo devis ĉiam esti grandioza kaj eleganta kaj malkomforta. La amata ĉifa alta ĉapelo estis formetita en ŝrankon kaj li rajtis nur sekrete rigardi ĝin. Ŝtataj roboj estis surhavendaj ĉiam. Kaj kiam la Doktoro diversafoje sukcesis sekrete foriri por mallonga naturhistoria ekspedicio, li neniam kuraĝis surhavi siajn malnovajn vestojn, sed devis ĉasi siajn papiliojn portante kronon sur la kapo kaj skarlatan mantelon kiu treniĝis en la aero malantaŭ li pro la vento.

Ne ekzistis limo de la specoj de taskoj kiujn la Doktoro devis fari kaj la disputoj pri kiuj li devis decidi — ĉio, de juĝi disputojn pri parceloj kaj parcellimoj, ĝis interpacigi edzon kaj edzinon kiuj estis ĵetintaj ŝuojn unu kontraŭ la alian. En la orienta alo de la Reĝa Palaco estis la Halo de Justico. Kaj tie Reĝo Jongo sidis ĉiumatene de la naŭa horo ĝis la dekunua, juĝante ĉiun kazon kiun oni venigis antaŭ lin.

Post tio, posttagmeze li instruis en lernejo. La temoj kiujn li instruis ne estis ĉiam tiaj kiajn oni trovas en ordinaraj lernejoj. Plenkreskuloj kiel ankaŭ infanoj venis por lerni. Sciu ke al tiuj Indianoj mankis scio pri multaj aferoj kiujn scias tre junaj blankaj infanoj — tamen estas ankaŭ vere ke ili sciis multon pri kio blankaj plenkreskuloj neniom eĉ scietis.

Bumpo kaj mi helpis laŭeble en la instruado — simpla aritmetiko, kaj facilaj temoj tiaj. Sed la klasojn pri astronomio, agrokulturo, la ĝusta prizorgo de beboj, kaj amaso da aliaj temoj, la Doktoro devis mem instrui. La Indianoj ege fervoris pri lernado kaj



“DEVIS ĈASI SIAJN PAPILOJN PORTANTE KRONON SUR LA KAPO.”

ili venis amase; tiel ke eĉ farante plenaerajn klasojn (lerneja domo estis neebla, kompreneble) la Doktoro devis preni ilin en grupoj po kvin aŭ ses mil kaj uzis grandan megafonon aŭ trumpeton por aŭdigi sin.

La cetera parto de lia tago estis pli ol plena per vojfarado, konstruado de akvomueliloj, vizitoj al mal-sanuloj, kaj miliono da aliaj aferoj.

Malgraŭ sia granda malvolo estiĝi reĝo, Johano Dolittle estis vere bona reĝo — farinte la komencon. Eble li ne estis tiom digna kiom multaj reĝoj en la historio kiuj konstante entreprenis militadi kaj embarasiĝis en amoraj aferoj; sed ekde mia plenkreskiĝo mi vidis fremdajn landojn kaj registarojn kaj mi ofte pensas ke Popsipetelo regata de Jongo Pensomulta estis eble la plej bone regata ŝtato en la historio de la mondo.

La naskiĝtago de la Doktoro okazis kiam ni jam estis ses kaj duonan monatojn sur la insulo. La popolo faris el ĝi grandan publikan feritagon kaj estis multaj festenado, dancado, piroteknikaĵoj, paroladoj kaj ĝuado.

Kiam proksimiĝis la fino de la tago la ĉefuloj de la du triboj procesiis tra la stratoj de la vilaĝo, portante belege pentritan tabulon el ebono, tri metrojn altan. Ĝi estis bildohistorio, kian ili konservis por ĉiu el la antikvaj reĝoj de Popsipetelo por konigi iliajn agojn.

Kun granda kaj solena ceremonio ĝi estis starigita super la pordo de la nova palaco: kaj ĉiuj tiam grupiĝis ĉirkaŭe por rigardi ĝin. Ĝi surhavis ses bildojn memorigantajn la ses grandan eventojn en la vivo de Reĝo Jongo kaj sub ili estis skribitaj versoj por klarigi

ilin. Ilin verkis la Kortega Poeto; kaj jen traduko:

I.

(Li albordiĝas ĉe la Insulo)

Elĉiele sendite,
En sia kanuo tirata de delfenoj,
El mondoj nekonataj
Li albordiĝis ĉe ni.
La palmoj mem
Klinis siajn kapojn
Bonvenigante la estontan Reĝon.

II

(Li Renkontas la Skarabon)

En lunlumo en la montoj
Li konversaciis kun bestoj.
La timida Ĵabizro portas al li bildovortojn
Pri granda sufero.

(III)

(Li Liberigas la Perditajn Familiojn)

Grandis lia koro pro kompatato;
Grandis liaj manoj pro forto.
Vidu lin disŝiri la montojn kvazaŭ dioskoreon!
Vidu la perditajn
Eldanci en la taglumon!

(IV)

(Li faras fajron)

Nia lando malvarmis, mortontis.
Li skuis sian manon kaj jen!
Fulmo saltis el sennuba ĉielo;
La suno sin klinis;
Kaj Fajro naskiĝis!

Tiam dum ni grupiĝis ĉirkaŭ
La bonvenan brilon, puŝis li
Nian misvagintan, flosantan landon
Retroen al trankvila ankrejo
En sunoplana maro.

(V)

(Li Venkigas la Popolon en Milito)

Unufoje sole
Lian amoplenan vizaĝon
Kovris mortiga brovsulko.
Ve al la fiaj malamikoj
Kiu ajn aŭdacas ataki
La tribon regatan de Pensomulta!

(VI)

(Li Ricevas la Reĝan Kronon)

La birdoj de l' aero ĝojis;
La Maro ridis kaj dancis ĉe borde;
Ĉiuj Ruĝuloj ĝoje ploris
Kiam ni kronis lin, nian Reĝon,
Li la Konstruisto, Kuracisto, Instruisto, kaj Princo;
Li la plej granda homo de l' eterno,
Vivu li milon da milo da jaroj,
Feliĉa en sia koro,
Benante nian landon per Paco.

2. SOPIRO AL LA HEJMO

EN la Reĝa Palaco Bumpo kaj mi havis belan aron da ĉambroj por nia loĝado — ĝin dividis kun ni Polinezio, Jipo kaj Ĉi-Ĉio. Oficiale Bumpo estis Ministro de la Landinterno; kaj mi estis Unua Lordo de la Fisko. Longa Sago ankaŭ havis loĝejon tie; sed ĉi-momente li forestis, veturante alilande.

Unu nokton post la vespermanĝo dum la Doktoro forestis ie en la vilaĝo vizitante nove naskitan bebon, ni ĉiuj sidis ĉirkaŭ la granda tablo en la akcepto-ĉambro de Bumpo. Tion ni faris ĉiuvespere por diskuti la planojn por la sekva tago kaj diversajn ŝtataferojn. Ĝi estis ia Kabineta Kunveno.

Ĉinokte, tamen, ni parolis pri Anglujo — kaj ankaŭ pri manĝaĵoj. Nin komencis iom tedi Indianaj manĝaĵoj. Sciu, neniu el la indiĝenoj konis la kuirarton: kaj ni multe desapontiĝis kiam ni provis trejni kuiriston por la Reĝa Kuirejo. La plejmultaj el ili estis ekspertaj ruinistoj de bonaj manĝaĵoj. Ofte ni tiom malsatiĝis ke la Doktoro kaŝe descendis kun ni en la kelon de la palaco, kiam ĉiuj kuiristoj estis enlitiĝintaj, kaj sekrete fritis patkukojn super la fadantaj cindroj de la fajro. La Doktoro mem estis la plej alta-kvalita kuiristo iam vivinta. Sed ĉiam li aĉe malnetigis la kuirejon; kaj kompreneble ni devis multe zorgi por ne esti trovitaj.

Nu, kiel mi komencis diri, ĉinokte manĝaĵoj estis la diskuttemo en la Kabineta Kunveno; kaj mi estis ĵus memoriginta Bumpon pri la belaj manĝaĵoj kiujn

ni ricevis en la domo de la litfaristo en Monteverdo.

“Mi diru al vi kion mi volas nun”, diris Bumpo: “grandan tason da kakao kun kirlita kremo sur ĝi. En Oksfordo ni ĉiam povis akiri bonegan kakaon. Estas vere domaĝe ke ne estas kakaoarboj sur ĉi tiu insulo nek bovinoj por doni kremon”.

“Kiam, laŭ via supozo”, demandis Jipo, “la Doktoro intencas foriri el ĉi tie?”

“Mi ĵus diskutis kun li pri tio hieraŭ”, diris Polinezio. “Sed mi ne sukcesis akiri kontentigan respondon de li. Li ŝajnis eĉ malvoli paroli pri ĝi”.

Estis paŭzo en la konversacio.

“Ĉu vi scias kion mi kredas?” ŝi baldaŭ aldonis. “Mi kredas ke la Doktoro ne plu eĉ pripensas reiri hejmen”.

“Jadi!” kriis Bumpo. “Ĉu vere?”

“Ĉit!” diris Polinezio. “Kio kaŭzas tiun bruon?”

Ni aŭskultis; kaj de la tre malproksimaj koridoroj de la palaco ni aŭdis la gardistojn krei,

“La Reĝo! — Faru spacon! — La Reĝo!”

“Jen li — fine”, flustris Polinezio — malfrue, kiel kutime. Povrulo, kiom li laboregas! — Ĉi-Ĉio, prenu la pipon kaj la tabakon el la ŝranko kaj metu la negliĝon preta sur lian seĝon”.

Kiam la Doktoro venis en la ĉambbron li aspektis serioza kaj pensoplena. Lace li deprenis la kronon kaj pendigis ĝin sur keĵlo malantaŭ la pordo. Tiam li interŝanĝis la reĝan mantelon por la negliĝo, faligis sin en sian seĝon ĉe la kapo de la tablo kun profunda suspiro kaj komencis plenigi sian pipon.

“Nu”, demandis Polinezio kviete, “kia vi trovis la

bebon?”

“La bebon?” li murmuris — ŝajne liaj pensoj estis ankoraŭ tre malproksimaj. — “Ha jes. La bebo estis multe pli bonfarta, dankon. — Ĝia dua dento nun travenis.”

Post tio li denove silentis, gapante reveme la plafonon tra nuboj de tabakfumo; dum ni ĉiuj restis ĉirkaŭsidantaj atendante.

“Ni demandadis al ni, Doktoro”, diris mi fine, — “tuj antaŭ ol vi envenis — kiam vi ekreiros hejmen. Morgaŭ ni estos jam sep monatojn sur ĉi tiu insulo”.

La Doktoro antaŭen klinetis sin en sia seĝo, aspektante iom nekomforta.

“Nu, verdire”, diris li post momento, “Mi mem intencis paroli kun vi pri precize tio, ĉivespere. Sed estas — e... — iom malfacile komprenigi la situacion. Mi timas ke estus maleble por mi lasi la laboron kiun mi nun faradas. ... Memoru, kiam ili unue insistis reĝigi min, mi diris al vi ke estas malfacile for-meti respondecojn, surprizeninte ilin. Ĉi tiuj homoj nun kutimiĝis dependi de mi por multaj aferoj. Ni trovis ilin sensciaj pri multo kion konas la blankuloj. Kaj eblas diri ke ni multe ŝanĝis la naturon de iliaj vivoj. Nu, tio estas tre delikata afero, ŝanĝi la vivojn de aliaj personoj. Kaj ĉu aŭ ne la ŝanĝoj kiujn ni faris rezultos bone, pri tio ni respondecas.”

Li pensadis dum momento — poste li daŭrigis per pli mallaŭta, pli malfeliĉa voĉo:

“Mi volonte daŭrigus miajn vojaĝojn kaj mian laboron pri la naturhistorio; kaj mi tre multe volas reiri al Puddleby — tute same kiel vi. Estas marto

nun, kaj la krokusoj jam videblas en la greso. ... Sed mia timo efektiviĝis: mi ne povas fermi miajn okulojn al kio eble okazus se mi lasus ĉi tiun popolon kaj forkurus. Ili verŝajne rekomencus siajn malnovajn kutimojn: militojn, superstiĉojn, demonadoron, kaj tiel plu; kaj multajn novajn aferojn kiujn ni instruis al ili, ili eble misuzus, kaj ilia kondiĉo tiukaze estus multe pli malbona ol kiam ni ektrovis ilin. ... Ili amas min; ili fidus min; ili kutimiĝis konsulti min por helpo pri ĉiuj siaj problemoj kaj ĉagrenoj. Kaj neniu homo volas maljuste agi al personoj kiuj fidus lin. ... Kaj krome, *mi* amas *ilin*. Ili estas kvazaŭ miaj infanoj — mi neniam havis proprajn infanojn — kaj min multe koncernas kiel ili kreskos. Ĉu vi ne komprenas kion mi volas diri? — Kiel mi aŭdacus forkuri kaj lasi ilin senhelpaj? ... Ne. Mi tre multe pripensis la aferon kaj penis trovi kio estos plej bona. Kaj mi timas ke la laboron kiun mi akceptis kiam mi akceptis la kronon mi devos daŭrigi. Mi timas ke — mi devos resti”.

“Por ĉiam? — por via tuta vivo?” demandis Bumpo per nelaŭta voĉo.

Dum kelkaj momentoj la Doktoro, sulkante la frunton, ne respondis.

“Mi ne scias”, li fine diris. — “Ĉiukaze, nuntempe nepre ne eblas por mi foriri. Tio ne estus justa”.

La mornan silenton kiu sekvis fine rompis frapo sur la pordon.

Pacience suspirante la Doktoro stariĝis kaj resurmetis siajn kronon kaj mantelon.

“Envenu”, li vokis, residiĝante en sian seĝon.

La pordo malfermiĝis, kaj lakeo — unu el la cent

kvardek tri kiuj ĉiam deĵoris nokte — staris klininte sin en la enirejo.

“Ho Afablulo”, diris li, “veturanto estas ĉe la enirejo de la palaco kaj deziras paroli kun Via Moŝto”.

“Nova bebo naskiĝis, mi vetas ŝilingon je tio!” murmuris Polinezio.

“Ĉu vi demandis pri la nomo de la veturanto?” demandis la Doktoro.

“Jes, Via Moŝto”, diris la lakeo. “Li estas Longa Sago, la filo de Ora Sago”.

3. LA SCIENCO DE LA RUĜULO

“LONGA SAGO!” kriis la Doktoro. “Bonege! Enkonduku lin — tuj enkonduku lin”.

“Tio min tiom feliĉigas”, li daŭrigis, turninte sin al ni tuj post la foriro de la lakeo. “Mi ege sentis la mankon de Longa Sago. Li estas ege bona amiko — eĉ kvankam li nemulte parolas. Mi pensu: jam pasis kvin monatoj post lia foriro al Brazilo. Min tiom ĝojigas ke li revenis sekura. Li ja vere tiom riskas en tiu kanuo — malgraŭ sia saĝeco. Ne estas ŝerco, transiri ducent kilometrojn da maro en kanuo eĉ ne kvarmetra. Mi ne volus provi tion”.

Nova frapo; kaj kiam la pordo malfermiĝis responde al la voko de la Doktoro, jen staranta sur la sojlo estis nia granda amiko, kun rideto sur lia forta bronza vizaĝo. Malantaŭ li videblis du portistoj portantaj ŝarĝojn volvitajn en Indianaj palmmatoj. Ilin, post la kompletiĝo de la unuaj salutoj, Longa Sago ordonis demeti siajn ŝarĝojn.

“Jen, ho Afablulo”, diris li, “mi portas al vi, kiel mi promesis, mian kolekton de plantoj kiun mi kaŝis en kavo en Andoj. Ĉi tiuj trezoroj reprezentas la laborojn de mia vivo”.

La pakoj estis malfermitaj; kaj interne estis multaj malpli grandaj pakoj kaj pakaĵoj. Zorge ili estis elmetitaj en vicoj sur la tablo.

Aspektis unuavide granda sed desaponta montraĵo. Estis plantoj, floroj, fruktoj, folioj, radikoj, nuksoj, faboj, mieloj, gumoj, arboŝeloj, semoj, abeloj kaj kelk-

aj specoj de insektoj.

La studado pri plantoj — oni nomas ĝin botaniko — estis speco de naturhistorio kiu neniam multe interesis min. Mi konsideris ĝin, kompare kun la studado pri bestoj, seninteresa scienco. Sed kiam Longa Sago komencis preni la diversajn erojn de sia kolekto kaj klarigis iliajn kvalitojn al ni, mi pli kaj pli fasciniĝis. Kaj antaŭ ol li finis mi estis tute absorbita de la mirindaĵoj de la Vegetala Regno kiun li kunportis trans tiom longan distancon.

“Ĉi tiujn”, diris li, prenante paketon da grandaj semoj, “mi nomas ridfaboj”.

“Por kio ili valoras?” demandis Bumpo.

“Por ridigi”, diris la Indiano.

Bumpo, dum la dorso de Longa Sago estis turnita al li, prenis tri el la faboj kaj glutis ilin.

“Ve!” diris la Indiano kiam li trovis kion Bumpo estis farinta. “Se li volus provi la potencon de ĉi tiuj semoj li devus manĝi ne pli ol kvaronon de unu fabo. Ni esperu ke li ne mortos pro ridegado”.

La efiko de la faboj je Bumpo estis eksterordinarega. Unue li komencis larĝe rideti; poste li komencis iomete ridi; fine li faris tiom longajn eksplodajn ridegojn ke ni devis porti lin en la apudan ĉambron kaj enlitigi lin. La Doktoro diris poste ke verŝajne li estus mortinta pro ridegado se lia korpo ne estus tiom fortika. Dum la tuta nokto li ridadis feliĉe en sia dormo. Kaj eĉ post kiam ni vekis lin la sekvan matenon li ellite saltis ankoraŭ ridante.

Kiam ni reiris al la Akceptoĉambroj, al ni estis montrataj kelkaj ruĝaj radikoj kiuj, Longa Sago diris

al ni, kapablas, kiam oni el ili faras supon kun sukero kaj salo, kaŭzas homojn dancadi eksterordinare rapide kaj senlaciĝe. Li petis nin provi ilin; sed ni rifuzis, kun dankoj. Post la sperto de Bumpo ni iomete timis fari pli da eksperimentoj tiutempe.

Ne estis limo al la nombro da kuriozaj kaj utilaj aĵoj kiujn Longa Sago estis kolektinta: oleo el grimpo-planto kiu kreskigas oniajn harojn en unu nokto; oranĝo granda kiel kukurbo kiun li kultivis en sia propra montoĝardeno en Peruo; nigra mielo (li ankaŭ estis kunportinta la abelojn kiuj faras ĝin kaj la semojn de la floroj de kiuj ili manĝas) da kiu unu kulero dormigas onin, kaj matene oni vekiĝas tute freŝa; nukso kiu donas belan sonon al onia kanto-voĉo; akvoplanto kiu ĉesigas la sangadon el vundoj; likeno kiu evitigas marmalsanon.

La Doktoro, kompreneble, ege interesiĝis. Ankorau dum la fruaj horoj de la mateno li ekzamenadis la erojn sur la tablo, laŭvice, listante iliajn nomojn kaj skribante iliajn nomojn kaj efikojn en notlibro dum Longa Sago diktadis.

“Estas aferoj ĉi tie, Stubbins”, li diris finante la liston, “kiuj en la manoj de spertaj farmaciistoj multege utilis al la medicino kaj kemio de la mondo. Mi suspektas ke ĉi tiu dormiga mielo mem anstataŭus duonon de la malbonaj farmaciaĵoj kiujn ni ĝis nun uzas. Longa Sago trovis propran medikamentaron. Mirando pravis: li vere estas granda naturosciencisto. Lia nomo meritas lokiĝi apud Linnæus. Iun tagon mi devos porti ĉion ĉi al Anglujo. — Sed kiam”, li aldonis malfeliĉe. — “Jen la problemo: kiam?”

4. LA MARSERPENTO

DUMLONGE post tiu Kabineta Kunveno pri kiu mi ĵus skribis por vi ni ne redemandis al la Doktoro pri reiro hejmen. La vivo en Insulo Atelo daŭris, monaton post monato, plena de laboro kaj plaĉe. La vintro, kun kristnaskaj festoj, venis kaj foriris, kaj la somero denove estis ĉe ni preskaŭ antaŭ ol ni konsciis tion.

Dum la pasado de la tempo, la Doktoro konstante pli okupadis sin per zorgado pri sia granda familio; kaj la nombro da horoj kiujn li povis dediĉi al sia laboro pri la naturhistorio fariĝis konstante malpli. Mi sciis ke li ankoraŭ pensas pri siaj domo kaj ĝardeno en Puddleby kaj pri siaj malnovaj planoj kaj ambicioj; ĉar kelkafoje ni rimarkis ke lia vizaĝo aspektas pensema kaj iomete malfeliĉa, kiam io memorigis lin pri Anglujo aŭ lia malnova vivo. Sed li neniam parolis pri tiaj aferoj. Kaj mi vere kredas ke li restus sur Insulo Atelo ĝis sia morto se ne okazus akcidento — plus ago de Polinezio.

La maljuna papago multe enuis pro la Indianoj kaj ŝi neniom provis kaŝi tiun fakton.

“Tiu ideo”, ŝi diris al mi unu tagon dum ni promenadis sur la strando — “tiu ideo ke la fama Johano Dolittle malŝparas sian vivon servante ĉi tiujn grasajn indiĝenojn! — Nu, estas absurde!”

Tiun tutan matenon ni rigardis la Doktoron kontroli la konstruadon de la nova teatro en Popsipetelo — jam estis operdomo kaj koncertejo; kaj fine ŝi

fariĝis tiom malbonhumora kaj ĉagrenita de la afero ke mi proponis ke ŝi promenadu kun mi.

“Ĉu vi vere kredas”, mi demandis kiam ni sidis sur la sablo, “ke li neniam reiros al Puddleby?”

“Mi ne scias”, diris ŝi. “Iam mi certis ke pensoj pri la dorlotbestoj kiujn li postlasis en la domo reirigos lin hejmen. Sed post kiam Mirando informis lin last-aŭguste ke ĉio estas bona tie, tiu espero malaperis. Jam de multaj monatoj mi elĉerpas mian cerbon penante elpensi planon. Se ni nur povus trafi ion kio re-direktus liajn pensojn al la naturhistorio—mi parolas pri io sufiĉe granda por vere eksciti lin — ni eble sukcesus. Sed kiel?”—ŝi levis siajn ŝultrojn pro naŭzo—“Kiel?—nuntempe li pensas nur pri la pavimado de stratoj kaj instruado al beboj ke duoble unu faras du!”

Estis perfekta Popsipetela tago, lumoplena kaj varmega, blua kaj flava. Dormeme mi gapis la maron, pensante pri miaj patrino kaj patro. Mi demandis al mi ĉu ili komencas maltrankviliĝi pro mia longa foresto. Apud mi maljuna Polinezio plu grumbladis per malaltaj senvariaj tonoj; kaj ŝiaj vortoj komencis intermiksiĝi kun la milda plaŭdado de la ondoj sur la bordon. Eble la senvaria murmurado de ŝia voĉo, helpate de la milda kvietiga aero, instigis min dormi. Mi ne scias. Ĉiukaze, mi baldaŭ sonĝis ke la insulo denove moviĝas — ne flosante, kiel antaŭe, sed subite, skuiĝe, kvazaŭ io enorme forta levis ĝin, nur unufoje, de ĝia kuŝejo kaj relasis ĝin.

Kiom longe post tio mi dormis mi tute ne scias. Min vekis milda bekpikado sur la nazo.

“Tomĉjo! — Tomĉjo!” (sonis la voĉo de Polinezio)

“Vekiĝu! Jadi, kia knabo, li dormas tra tertremo tute sen rimarki ĝin! — Tomĉjo, aŭskultu: venis nia oportuno. *Vekiĝu*, je Dio!”

“Kio ĝenas?” mi demandis, sidiĝante kaj oscedante.

“Ĉit! — Rigardu!” flustris Polinezio, indikante la maron.

Ankoraŭ nur duone veka, mi gapis antaŭ min per neklarvidaj dormemaj okuloj. Kaj en la malprofunda akvo, ne pli ol tridek metrojn de la bordo, mi vidis enorman palroz koloran konkon. Kupolforma, ĝi turis laŭ gracia ĉielarka kurbo altege; kaj ĉirkaŭ ĝia bazo la akvo rompiĝis milde en malgrandajn blankajn ondojn. Ĝi povus esti parto de plej malkredebla songo.

“Kio en la mondo ĝi estas?” mi demandis.

“Tion”, flustris Polinezio, “la maristoj de centoj da jaroj nomas la *Marserpento*. Mi mem vidis ĝin pli ol unufoje de la ferdekoj de ŝipoj, tre malproksime, kurbiĝantan en kaj el la akvo. Sed nun kiam mi vidas ĝin pli proksime kaj senmove, mi tre forte suspektas ke ke la Marserpento de la historio estas efektive la Granda Vitra Marheliko pri kiu parolis la fiĝito. Se tiu ne estas unika fiŝo en la sep maroj, vi rajtas nomi min kadavraĵokorvo! — Tomĉjo, ni havas bonfortunon. Nia nuna tasko estas venigi la Doktoron ĉi tien por rigardi tiun elegantegan specimenon antaŭ ol ĝi forrampos en la Profundan Truon. Se ni sukcesos, nu fidu min, ni ja eble povos foriri de ĉi tiu damnita insulo. Vi restu ĉi tie kaj atentu ĝin dum mi venigos la Doktoron. Ne moviĝu nek parolu — eĉ ne spiru forte: li povus ektimi — ege timidaj uloj estas la helikoj. Nur atentu lin; kaj mi jam post momenteto revenos”.

Kaŝe rampante supren sur la sablo ĝis ŝi povis kaŝiĝi malantaŭ kelkaj arbustoj antaŭ ol ekflugi, Polinezio foriris cele la vilaĝon; dum mi restis sola sur la bordo fascinate rigardante tiun nekredeblan monstron sidantan en la malprofunda maro.

Ĝi tre malmulte movis sin. Fojfoje ĝi levis sian kapon super la akvon, montrante siajn enorme longajn kolon kaj kornojn. Kelkafoje ĝi provis levi sin, kiel agas heliko pretiganta sin movi, sed preskaŭ tuj ĝi malleviĝis kvazaŭ elĉerpita. Aspektis al mi ke eble ĝi estis vundita malsupre; sed ĝian malsupran parton, kiu estis sub la nivelo de la akvo, mi ne povis vidi.

Min ankoraŭ absorbis rigardi la grandan beston kiam Polinezio revenis kun la Doktoro. Ili proksimiĝis tiom silente kaj zorgeme ke mi nek vidis nek aŭdis ilin veni antaŭ ol trovi ilin kaŭrantaj apud mi sur la sablo.

Unu ekvido je la heliko tute ŝanĝis la Doktoron. Liaj okuloj komencis scintili pro ĝojo. Mi ne vidis lin tiom ĝojigita kaj feliĉa de kiam ni kaptis la ĵabizran skarabon kiam ni unue surbordiĝis ĉe la insulo.

“Estas li!” li flustris — “la Granda Vitra Marheliko mem — tute sendube. Polinezio, iru iom laŭ la marbordo kaj provu trovi iujn el la delfenoj por mi. Eble ili povos informi nin pri kial la heliko estas ĉi tie. — Estas tre malkutime por li esti en malprofunda akvo kiel ĉi tie. Kaj Stubbins, vi iru al la haveno kaj venigu al mi malgrandan kanuon. Sed ege zorgu pri via pagajado en ĉi tiun golfon. Se la heliko ektimos kaj foriros en la pli profundan akvon, eble ni neniam denove havos oportunon revidi lin”.

“Kaj ne informu iun el la Indianoj”, Polinezio aldonis flustre dum mi estis ekironta. “Ni nepre tenu ĉi tion sekreta, alie amaso da rigardantoj rapidos ĉi tien en kvin minutoj. Estas bonfortunege ke ni trovis la helikon en neatentata golfo.”

Atinginte la havenon, mi elektis malgrandan nemultepezan kanuon el inter la multaj troviĝantaj tie, kaj sen diri al iu ajn kial mi volas ĝin, eniris ĝin kaj komencis pagaji ĝin laŭlonge de la bordo.

Mi timegis ke la heliko eble estos foririnta antaŭ mia reveno. Kaj vi povas imagi kiom mi ĝojis, kiam mi ĉirkaŭiris rokan kabon kaj povis vidi la golfon kaj vidis ke li ankoraŭ estas tie.

Polinezio, mi vidis, estis farinta sian taskon kaj revenis antaŭ mi, kunvenigante paron da delfenoj. Ili jam konversaciadis kun Johano Dolittle per mallaŭtaj voĉoj. Mi surterigis la kanuon kaj aliris por aŭskulti.

“Kion mi volas scii”, la Doktoro estis diranta, “estas kial la heliko estas ĉi tie. Mi kredis ke li kutime restas en la Profunda Truo; kaj kiam li ja alsurfaciĝas, ĉiam estas en la mezo de la oceano”.

“Ho, ĉu vi ne sciis? — Ĉu vi ne aŭdis?” la delfenoj respondis. “Vi kovris la Profundan Truon kiam vi sinkigis la insulon. Ho jes: vi kuŝigis ĝin precize sur la supron de la Truo, kvazaŭ surmetante kovrilon. La fiŝoj kiuj estis en ĝi ekde tiam provas eliri. La Granda Heliko estis plej misfortuna: la insulo trafis lian voston ĝuste dum li estis eliranta el la Truo por trankvila vespera promeno. Kaj li restis kaptita tie dum ses monatoj dum li penis liberigi sin. Fine li devis levi la tutan insulon ĉe unu finaĵo por liberigi

sian voston. Ĉu vi ne sentis ian tertremon antaŭ ĉirkaŭ horo?”

“Jes ja”, diris la Doktoro; “ĝi faligis parton de la teatro kiun mi konstruadis”.

“Nu, tion kaŭzis la heliko kiam li levis la insulon por eliri el la Truo”, ili diris. “Ĉiuj aliaj fiŝoj vidis sian oportunon kaj eskapis kiam li levis la kovrilon. Feliĉige al ili li estas tiom granda kaj forta. Sed la trostreĉo pro tiu giganta levo vundis lin: li tordis muskolon en la vosto kaj ĝi komencis grave ŝveli. Li volis iun trankvilan lokon kie li povos ripozi; kaj vidinte ĉi tiun molan strandon li rampis ĉi tien”.

“Ve!” diris la Doktoro. “Mi bedaŭregas. Mi supozas ke mi devus esti dissciiginta ke la insulo malleviĝos. Sed verdire, ni mem ne sciis tion; ĝi okazos pro ia akcidento. Ĉu vi supozas ke la povrulo estas grave vundita?”

“Ni ne certas”, diris la delfenoj; “ĉar neniu el ni scipovas lian lingvon. Sed ni zorgis ĉirkaŭnaĝi lin dum ni venis ĉi tien, kaj li vere ne aspektis tre grave vundita”.

“Ĉu neniu el via popolo parolas moluske?” la Doktoro demandis.

“Eĉ ne vorton”, diris ili. “Ĝi estas malfacilega lingvo”.

“Ĉu vi kredas ke eble vi povus trovi por mi ian fiŝon kiu ja povas?”

“Ni ne scias”, diris la delfenoj. “Ni povus provi”.

“Mi ege dankemos al vi se vi provos”, diris la Doktoro. “Multajn gravajn demandojn mi volas fari al ĉi tiu heliko. — Kaj krome, mi volas laŭeble resanigi

lian voston por li. Mi devas fari almenaŭ tion. Ja mi mem kulpas, neintence, pri lia vundiĝo”.

“Nu, se vi atendos ĉi tie”, diris la delfenoj, “ni serĉos”.

5. LA MOLUSKA ENIGMO FINE SOLVITA

DO Doktoro Dolittle kun krono sur sia kapo sidiĝis sur la strando samkiel Reĝo Knuto, kaj atendis. Dum tuta horo la delfenoj venadis kaj foriradis, venigante diversajn specojn de profundamaraj bestoj por trovi ĉu ili povos helpi lin.

Multaj kaj kuriozaj estis la bestoj venigitaj. Montriĝis, tamen, ke malmultegaj scipovis paroli moluske, escepte de la moluskoj mem. Tamen, la delfenoj iomete pli esperiĝis trovinte tre maljunan ekinon (kurioza pilkosimila uleto kovrita de longaj mentonharoj) kiu diris ke li ne povas vere paroli moluske, sed ke li iam povis kompreni la asterian lingvon — sufiĉe por ĉiutagaĵoj — kiam li estis juna. Nu, tiel ni iomete progresis, eĉ kvankam ne multe. Lasante la ekinon kun ni, la delfenoj denove foriris por trovi asterion.

Ili ne bezonis longe serĉi, ĉar ili estas tre oftaj en tiu regiono. Tiam, uzante la ekinon kiel interpretiston, ili demandis al la asterio. Li estis iom stulta besto; sed li klopodis laŭeble helpi nin. Kaj post iom da pacienca demandado nin ĝojigis trovi ke li scipovas paroli moluske mezbone.

Sentante grandan kuraĝiĝon, la Doktoro kaj mi nun eniris la kanuon; kaj, dum la delfenoj, la ekino kaj la asterio apude kunnaĝis, ni tre softe pagajis ĝis esti tre proksimaj sub la turanta konko de la Granda Heliko.

Tiam komenciĝis la plej kurioza konversacio kiun

iam mi ĉeestis. Unue la asterio demandis al la heliko; la respondon de la heliko la asterio diris al la ekino, tion tradukis la ekino al la delfenoj, kaj la delfenoj diris ĝin al la Doktoro.

Tiel ni akiris multegan informon, plejparte pri la tre antikva historio de la Besta Regno; sed nin maltrafis multaj el la nuancoj de la pli longaj paroloj de la heliko pro la stulteco de la asterio kaj tiom da tradukado inter lingvoj.

Dum la heliko parolis, la Doktoro kaj mi metis niajn orelojn kontraŭ la muron de lia konko kaj trovis ke tiel ni povas tute klare aŭdi la sonon de lia voĉo. Ĝi estis, kiel antaŭe diris al ni la fiĝito, basa kaj sonorileca. Sed kompreneble ni ne povis kompreni eĉ unu vorton de liaj diroj. Tamen, la Doktoro jam estis ege ekscitita de la proksimiĝo de oportuno lerni la lingvon kiun de tiom da tempo li serĉas. Kaj baldaŭ, devigante la aliajn fiŝojn plurfoje ripeti mallongajn frazojn uzitajn de la heliko, li komencis mem kunmeti vortojn. Komprenu ke li jam bone konis unu-du fiŝlingvojn, kaj tio multe helpis lin. Praktikinte tiel dum iom da tempo li kliniĝis trans la flankon de la kanuo, metis sian vizaĝon sub la akvon, kaj provis paroli rekte al la heliko.

Estis longa malfacila laboro; kaj forpasis horoj antaŭ ol li atingis rezultojn. Sed baldaŭ mi povis konstati per la feliĉa aspekto de lia vizaĝo ke iom post iom li sukcesas.

La suno estis malalta en la okcidento kaj la malvarmeta vespera venteto komencis softe blovi tra la bambuaroj kiam la Doktoro fine turnis sin de sia

laboro kaj diris al mi:

“Stubbins, mi persvadis la helikon veni sur la sekan parton de la strando tiel ke mi povos ekzameni lian voston. Bonvolu reiri al la vilaĝo kaj ordoni al la laboristoj ke ili ĉesu konstruadi la teatron por hodiaŭ. Poste iru al la palaco kaj prenu mian medikamento-valizon. Mi kredas ke mi lasis ĝin sub la trono en la Akceptoĉambro.

“Kaj memoru”, Polinezio flustris dum mi deturnis min, “eĉ ne unu vorton al iu ajn. Se oni demandos al vi, ne parolu. Ŝajnu ke vi havas dentodoloron aŭ ion tian”.

Ĉifoje kiam mi reatingis la strandon — kun la medikamento-valizo — mi trovis la helikon sur la seka sablo. Vidante lin etendita tiel, mi facile komprenis kial la iamaj superstiĉaj maristoj nomis lin la Marserpento. Li certe estis plej giganta kaj, siamaniere, gracia bela besto. Johano Dolittle ekzamenadis lian voston.

El la valizo kiun mi kunportis la Doktoro prenis grandan botelon da linimento kaj komencis froti la tordon. Post tio li prenis ĉiujn bandaĝojn el la valizo kaj kunligis ilin. Sed eĉ kunligite ili ne estis sufiĉe longaj por pli ol duone ĉirkaŭi la enorman voston. La Doktoro insistis ke necesas iel severe strikte bandaĝi la ŝvelaĵon. Do li forsendis min denove al la palaco por preni ĉiujn littukojn el la Reĝa Toloŝranko. Tiujn Polinezio kaj mi disŝiris por fari bandaĝojn por li. Fine, post ega penado, ni sukcesis sufiĉe strikte ligi la tordon.

La heliko vere aspektis tre kontenta pro la atento

donita al li; kaj li komforte etendis sin kiam la Doktoro finis la ligadon. En tiu pozicio, kiam la konko sur lia dorso estis malplena, eblis rekte trarigardi ĝin kaj vidi la palmojn ĉe la alia flanko.

“Mi opinias ke iu el ni devos sidi kun li dum la nokto”, diris la doktoro. “Ni deĵorigu Bumpon por tio; li dormetis dum la tuta tago, mi scias — en la somerdomo. Tiu tordo estas severa; kaj se la heliko ne povos dormi, li estos pli feliĉa kun kompano. Li resaniĝos bone — post kelkaj tagoj, mi konjektas. Se mi ne estus tiom troege okupata mi mem sidus kun li. Mi tre ŝatus fari tion, ĉar ankoraŭ multajn temojn mi volas preparoli kun li.”

“Sed, Doktoro”, diris Polinezio dum ni pretiĝis reiri al la vilaĝo, “vi devus havi feriojn. Ĉiuj reĝoj ferias kelkafoje — ĉiu reĝo ja. Reĝo Karlo, ekzemple — kompreneble Karlo estis antaŭ via tempo — sed li! ho, li *konstante* feriadis. Estas vere ke li apenaŭ nomeblus modela reĝo. Sed malgraŭ tio, li estis ege populara. — Ĉiuj amis lin — eĉ la ora karmo en la fiŝlago ĉe Kortego Hamptona. Kiel reĝo, nu kontraŭ li mi scias nur unu aferon, ke li inventis tiujn stultajn malgrandajn mordemajn hundojn kiujn oni nomas Spanieloj Reĝo Karlo. Oni parolas multe pri povra Karlo; sed tio, laŭ mia opinio, estis lia plej malinda ago. Kiel mi diris, reĝoj bezonas feriadu same kiel ĉiu alia homo. Kaj vi ne havas feriojn ekde via kroniĝo, ĉu?”

“Ne”, diris la Doktoro, “mi supozas ke vi pravas”.

“Nu, do, jen kion vi faru”, diris ŝi: “tuj kiam vi reiros al la palaco vi diskonigu reĝan proklamon ke vi

foriros por semajno en la kamparo por protekti vian sanon. Kaj ke vi foriros *tute sen servistoj*, ĉu vi komprenas? — *tute* same kiel ordinara persono. Oni nomas tion veturi inkognite, kiam reĝoj faras tion. Ili ĉiuj faras tion. — Nur tiel ili povas plezure ferii. Kaj dum via libera semajno vi povos ripozi sur la strando tie kun la heliko. Ĉu vi konsentas?”

“Mi vere volus”, diris la Doktoro. “Sonas tre alloge. Sed necesas konstrui tiun novan teatron;— neniu el niaj ĉarpentistoj scius surmeti la ĉevronojn sen mia konsilado. — Kaj ankaŭ la beboj: tiuj indiĝenaj patrinoj estas tiom ege sensciaj”.

“Ho, fi al la teatro — kaj ankaŭ al la beboj”, kurte diris Polinezio. “La teatro povos prokrastiĝi dum semajno. Kaj pri la beboj, nu ili neniam suferas pro io escepte de koliko. Jadi, kiel, laŭ via supozo, beboj sukcesis vivi antaŭ ol vi venis? — Feriu. ... Vi bezonas tion”.

6. LA LASTA KABINETA KUNVENO

LAŬ la karaktero de la parolo de Polinezio, mi divenis, ke ĉi tiu ideo pri ferio estas parto de ŝia plano.

La Doktoro ne respondis; kaj ni plu marŝis cele la vilaĝon. Tamen mi povis vidi ke ŝiaj vortoj ja faris impreson sur li.

Post la vespermanĝo li malaperis el la palaco sen diri kien li iras — antaŭ tiam li neniam faris tion. Kompreneble ni ĉiuj sciis kien li iris: ree al la strando por sidi kun la heliko. Ni estis certaj pri tio, ĉar li diris nenion al Bumpo pri plenumado de tiu tasko.

Tuj kiam la pordoj estis fermitaj je la Kabineta Kunveno tiunokte, Polinezio parolis al la Ministraro:

“Atentu, uloj”, diris ŝi: “ni nepre devas iel devigi la Doktoron feradi — krom se ni volas resti en ĉi tiu damnita insulo ĝis la fino de niaj vivoj”.

“Sed kian diferencon”, Bumpo demandis, “farus lia ferio?”

Senpacience Polinezio turnis sin al la Ministro de la Landinterno.

“Ĉu vi ne komprenas? Se li havos plenan semajnon liberan por tute reinteresiĝi pri sia naturhistorio — maraj temoj, lia revo vidi la plankon de la oceano kaj ĉio tia — povos esti ebleco ke li konsentos foriri el ĉi tiu lokaĉo. Sed dum li deĵoras ĉi tie kiel reĝo li neniam havas eĉ momenton por pensi pri io alia ol regado”.

“Jes, estas vere. Li estas multe tro konsciencenca”.

konsentis Bumpo.

“Kaj krome”, Polinezio daŭrigis, “lia sola espero iam foriri el ĉi tie estus eskapi sekrete. Li devos foriri dum li ferias, inkognite — kiam neniu scias kie li estas aŭ kion li faras, escepte de ni. Se li konstruus ŝipon sufiĉe grandan por transiri la maron, ĉiuj Indianoj vidus ĝin, kaj aŭdus ĝin, konstruata; kaj ili demandus ĝian celon. Ili malebligus ĝin. Ili preferus ion ajn anstataŭ perdi la Doktoron. Ho, mi kredas ke se ili pensus ke li eĉ pripensas eskapi ili enkatenuigis lin”.

“Jes, mi vere kredas ke ili farus tion”, mi akordis. “Tamen sen ia ŝipo mi ne komprenas kiel la Doktoro povos foriri, eĉ sekrete”.

“Nu, mi diros al vi”, diris Polinezio. “Se ni ja sukcesos devigi lin feriad, nia sekva tasko estos instigi la Marhelikon promesi preni nin ĉiujn en sia konko kaj porti nin al la enfluejo de Rivero Puddleby. Se ni sukcesos konsentigi la helikon, la tento estos tro granda por Johano Dolittle, kaj li venos, mi scias tion — precipe ĉar li povos kunpreni tiujn novajn plantojn kaj farmaciaĵojn de Longa Sago al la anglaj kuracistoj, kaj ankaŭ vidi la plankon de la oceano dumvoje”.

“Estas ekscitege!” mi kriis. “Ĉu vi volas diri ke la heliko povus porti nin sub la maro la tutan vojon reen al Puddleby?”

“Certe”, diris Polinezio. “Vetureto tia estus tre facila por li. Li rampus laŭ la planko de la oceano kaj la Doktoro povus vidi ĉion. Tute simple. Ho, Johano Dolittle nepre venos, se ni nur sukcesos konvinki lin ferii — *kaj* se la heliko konsentos veturigi nin”.

“Vere mi esperegas ke li ja konsentos!” suspiris Jipo. “Min tedegas ĉi tiuj tropikaĉoj — ili tiom pigrigas kaj mallaboremigas min. Kaj estas tute neniam ratoj aŭ io tia ĉi tie — kvankam mi ne havus sufiĉan energion por ĉasi ilin eĉ se ili estus ĉi tie. Ho, kiom volonte kaj ĝoje mi revidus oldan Puddlebyn kaj la ĝardenon! Kaj kiom plezurigos Dab-dabon ke ni revenis!”

“Fine de la venonta monato”, diris mi, “estos du jaroj post nia foriro el Anglujo — ekde kiam ni levis la ankron ĉe Reĝponto kaj trabatis nian vojon en la riveron”.

“Kaj fiksiĝis sur la kotaĵo”, aldonis Ĉi-Ĉio per revema forema voĉo.

“Ĉu vi memoras kiom la homoj adiaŭe mansignis al ni de la rivermuro?” mi demandis.

“Jes. Kaj mi supozas ke ili ofte parolas pri ni en la vilaĝo post tiam”, diris Jipo — “demandante al si ĉu ni mortis aŭ vivas”.

“Ĉesigu”, diris Bumpo, “mi sentas ke mi ekploros pro sedimento”.

7. LA DECIDO DE LA DOKTORO

NU, vi povas diveni kiom feliĉaj ni estis kiam la sekvan matenon la Doktoro, post sia tutnoka konversacio kun la heliko, diris al ni ke li decidis ferii. Proklamon disvastigis tuj la Vilaĝa Anoncisto ke Lia Moŝto iros enlanden por septaga ripozo, sed ke dum lia foresto la palaco kaj la registaraj oficejoj estos malfermaj kiel kutime.

Tio ege plaĉis al Polinezio. Ŝi tuj ekkomencis aranĝi nian foriron — tre zorgante ke neniu eksuspektos kien ni iros, aŭ kion ni kunprenos, la tempon de nia foriro aŭ tra kiu el la pordo de la palaco ni iros.

Estante sperta ruzulo, ŝi forgesis nenion. Kaj eĉ ne ni, kiuj estis en la grupo de la Doktoro, povis imagi kial ŝi faris kelkajn preparojn. Ŝi tiris min flanken kaj diris al mi ke la unusola afero kiun mi nepre devas memori estas kunporti *ĉiujn* notlibrojn de la Doktoro. Longa Sago, kiu estis la sola Indiano konanta la sekreton de nia celo, diris ke li deziras akompani nin al la strando por vidi la Grandan Helikon; kaj al li Polinezio diris ke li nepre kunportu sian plantokolekton. Al Bumpo ŝi ordonis porti la altan ĉapelon de la Doktoro — zorge kaŝitan sub lia mantelo. Ŝi forsendis preskaŭ ĉiujn lakeojn kiuj nokte deĵoras por fari diversajn taskojn en la vilaĝo, tiel ke estos kiel eble plej malmultaj servistoj kiuj eble vidus nin foriri. La noktomezon, la horo kiam la plej multaj vilaĝanoj dormos, ŝi fine selektis por nia foriro.

Ni devis kunpreni plenan semajnon da provianto por la reĝa ferio. Do, kun niaj aliaj pakaĵoj, ni estis peze ŝarĝitaj kiam je la preciza sonorigo de la dekdua horo ni malfermis la okcidentan pordon de la palaco kaj paŝis zorge kaj senbrue en la lunlumigatan ĝardenon.


"Piedpinte marŝu inkognite", flustris Bumpo dum ni silente fermis la pezajn pordojn malantaŭ ni.

Neniu vidis nin foriri.

Ĉe la malsupro de la ŝtonaj ŝtupoj kiuj kondukas de la Teraso Fazana al la Rozario Sinka, ial mi haltis por reregardi la grandiozan palacon kiun ni konstruis en tiu stranga malproksima lando kien neniu blankulo escepte de ni mem iam iris. Iel mi sentis per miaj ostoj ke ni foriras ĉinokte kaj neniam revenos. Kaj mi demandis al mi kiuj aliaj reĝoj kaj ministroj loĝos en ĝiaj belegaj haloj post nia foriro. La aero estis varmega; kaj ĉio estis morte kvieta escepte de la milda plaŭdado de la malsovaĝaj fenikopteroj en la lililageto. Subite la scintilanta lanterno de noktogardisto aperis ĉirkaŭ la angulo de cipresa heĝo. Polinezio tiris mian ŝtrumpon kaj, per senpacienca flustro, ordonis ke mi rapidu antaŭ ol oni malkovros nian forfuĝon.

Atinginte la strandon ni trovis la helikon jam multe pli bonfarta kaj kapabla movi sendolore sian voston.

La delfenoj (kiuj estas laŭnature scivolemuloj) ankoraŭ atendis proksime por vidi ĉu io interesa okazos. Polinezio, la ruzulo, dum la Doktoro okupis sin pri sia nova paciento, signalis al ili kaj flankenvenigis ilin por malgranda privata konversacio.



“PIEDPINTE MARŠU INKOGNITE,” FLUSTRIS BUMPO.

“Nun atentu, miaj amikoj”, diris ŝi, parolante ne-laŭte: “Vi scias kiom Johano Dolittle faris por la bestoj—dediĉis sian tutan vivon al ili, efektive. Nu, jen via oportuno fari ion por li. Aŭskultu: li fariĝis kontraŭvole reĝo de ĉi tiu insulo, ĉu vi komprenas? Kaj nun akceptinte tiun taskon, li sentas ke li ne povas forlasi ĝin — kredas ke la Indianoj ne povos plu vivi sen li kaj cetere — kio estas absurda, kiel vi kaj mi bone scias. Bone. Jen mia penso: se ĉi tiu heliko akceptus kunporti lin kaj nin — kaj iom da bagaĝo — ne multan, nur tridek aŭ kvardek erojn, eble — interne de sia konko kaj porti nin al Anglujo, ni certas ke la Doktoro ja irus; ĉar li fervoregas priokupi sin pri la planko de la oceano. Krome, ĉi tiu estus lia sola oportuno eskapi de la insulo. Nu, estas gravege ke la Doktoro reiru al sia propra lando por plu plenumi sian veran laboron, kiu tiom valoras por la bestoj de la mondo. Do kion ni volas de vi estas ke vi ordonu al la ekino ordoni al la asterio peti la helikon porti nin en sia konko al Rivero Puddleby. Ĉu estas klare?”

“Jes ja tute”, diris la delfenoj. “Kaj ni volonte klopodegos persvadi lin — ĉar estas, kiel vi diris, vere domaĝe ke la grandulo malŝparas sian tempon ĉi tie dum lin tiom bezonas la bestoj”.

“Kaj ne lasu la Doktoron scii kion vi faras”, diris Polinezio, dum ili komencis fornaĝi. “Li eble rifuzus, se li sciis ke ni miksis nin en la afero. Certigu ke la heliko proprainiciate proponos kunpreni nin. Ĉu vi komprenas?”

Johano Dolittle, nekonscia pri ĉio escepte de la laboro kiun li tiumomente faras, staris en la mal-

profunda akvo ĝis la genuoj, helpante la helikon provi la riparitan voston por trovi ĉu ĝi estas sufiĉe sana por veturado. Bumpo kaj Longa Sago, kun Ĉi-Ĉio kaj Jipo, sidis ĉe la malsupro de palmo iomete malproksime sur la strando. Polinezio kaj mi* iris esti kun ili.

Duona horo forpasis.

Kiom da sukceso la focenoj havis ni ne sciis, ĝis subite la Doktoro foriris de la flanko de la heliko kaj venis plaŭdante al ni, tute senspira.

“*Kion* vi supozas?” li kriis. “Dum mi ĵus parolis al la heliko li proponis, proprainciate, preni nin ĉiujn reen al Anglujo en sia konkono. Li diras ke ĉiukaze li devas vojaĝi por serĉi novan hejmon, post la fermiĝo de la Profunda Truo. Diris ke li ne bezonus multe devojiĝi por lasi nin ĉe Rivero Puddleby, se ni volus kuniri. — Jadi, kia oportuno! Mi volontege irus. Ekzameni la plankon de la oceano tute de Brazilo ĝis Eŭropo! Neniu homo iam faris tion antaŭ nun. Kia grandioza vojaĝo! — Ho, mi tiom volas ne esti permesinta ke oni min reĝigu. Nun mi devos lasi la oportunon de mia vivo forgliti”.

Li turnis sin de ni kaj moviĝis sur la sablo denove al la mezo de la strando, rigardante deziroplenege la helikon. Li aspektis strange malfeliĉa kaj malĝoja dum li staris tie sur la soleca lunlumigata bordo, kun la krono sur sia kapo, kaj lia figuro vidiĝis nigrega kontraŭ la brilanta maro malantaŭ li.

El la mallumo ĉe mia kubuto Polinezio levis sin kaj sensone moviĝis al lia flanko.

“Nu, Doktoro”, diris ŝi per softa persvada voĉo, kvazaŭ parolante al misaginta infano, “vi scias ke ĉi

tiu reĝagado ne estas via vera vivlaboro. Ĉi tiuj indiĝenoj povos vivi sen vi — ne tiom bone kiom kun vi, kompreneble — tamen ili sukcesos — same kiel antaŭ ol vi venis. Neniu povas diri ke vi ne plenumis vian devon rilate al ili. Kial ne akcepti la proponon de la heliko; kaj nur forlasi ĉion jam nun kaj foriri? La laboro kiun vi faros, la informon kiun vi portos hejmen, valoros multe pli ol kion vi faras ĉi tie.”

“Bona amiko”, diris la Doktoro, malfeliĉe turninte sin al ŝi, “mi ne povas. Ili reirus al siaj malnovaj malsanigaj kutimoj: malbona akvo, nekuiritaj fiŝoj, nenia drenado, entera febro kaj ĉio alia. ... Ne. Mi devas konsideri ilian sanon, ilian farton. Mi komencis mian vivon kiel kuracisto por homoj: ŝajnas ke fine mi revenis al tio. Mi ne povas forlasi ilin. Poste, eble, oportuno montriĝos. Sed mi ne povas foriri de ili nun”.

“Pri tio vi eraras, Doktoro”, diris ŝi. “Jam nun estas la plej bona forirtempo. Neniu oportuno ‘montriĝos’. Ju pli longe vi restos, des pli malfacile estos foriri. — Iru nun. Iru ĉinokte”.

“Kion? Kaŝe foriri sen eĉ adiaŭi ilin! Ho, Polinezio, kian fiagon vi proponas!”

“Pro kia miraklo ili ebligus ke vi diru ‘adiaŭ?’” malestime diris Polinezio, fine senpacienĉigante. “Mi diras al vi, Doktoro, se vi reiros al tiu palaco ĉinokte, ĉu por adiaŭi, ĉu por iu alia celo, vi restos tie. Nun — jam ĉimomente — estas la tempo por via foriro”.

La vero de la vortoj de la olda papago ŝajne trafis la koron; ĉar la Doktoro staris silente dum minuto, pensante.

“Sed la notlibroj”, li diris baldaŭ: “necesas reiri por preni ilin”.

“Mi havas ilin ĉi tie, Doktoro”, diris mi, ekparolante — “ilin ĉiujn”.

Denove li pripensadis.

“Kaj la kolekto farita de Longa Sago”, li dirus. “Ankaŭ tion mi devus kunpreni”.

“Jen ĝi estas, Ho Afablulo”, sonis la basa voĉo de la Indiano kiu staris en la ombro de la palmo.

“Sed kion pri provianto?” demandis la Doktoro — “sufiĉa por la vojaĝo”.

“Ni havas semajnon da provianto kun ni por nia ferio”, diris Polinezio — “tio pli ol sufiĉos”.

Triafoje la Doktoro silentis kaj pensis.

“Sed mian ĉapelon”, li fine diris maltrankvile. “Jen la ĉefa problemo: mi *devos* reiri al la palaco. Mi ne povos foriri sen mia ĉapelo. Kiel mi povus marŝi en Puddleby kun ĉi tiu krono sur mia kapo?”

“Jen ĝi, Doktoro”, diris Bumpo, prenante la ĉapelon, malnovan, ĉifan, kaj amatan, el sub sia mantelo.

Polinezio ja vere antaŭplanis ĉion.

Tamen eĉ nun ni povis rimarki ke la Doktoro ankoraŭ penas elpensi aliajn rifuzkialojn.

“Ho Afablulo”, diris Longa Sago, “kial tenti misfortunon? Via vojo estas klara. Viaj estonteco kaj laboro alvokas vin reiri al via fremda hejmo trans la maro. Kun vi iros ankaŭ la scio kiun mi akiris por la homaro — al landoj kie ĝi estos pli vaste utila ol eblas ĉi tie. Mi vidas la komencon de la matena krepusko en la orienta ĉielo. La tago proksimas. Iru antaŭ ol viaj regatoj vekigōs. Iru antaŭ ol via projekto eltrov-

iĝos. Ĉar vere mi kredas ke se vi ne iros nun vi restos vian tutan ceteran vivon kiel kaptita reĝo en Popsipetelo”.

Fari gravajn decidojn ofte ne necesigas pli ol momenton. Mi vidis la figuron de la Doktoro subite rigidiĝi antaŭ la nun paliĝanta ĉielo. Malrapide li levis la Sanktan Kronon de sia kapo kaj metis ĝin sur la sablon.

Kaj kiam li parolis lian voĉon plenigis larmoj.

“Ili trovos ĝin ĉi tie”, li murmuris, “kiam ili venos serĉi min. Kaj ili scios ke mi foriris. ... Miaj infanoj, miaj povraj infanoj! — Ĉu iam ili komprenos kial mi forlasis ilin? ... Ĉu iam ili komprenos — kaj pardonos?”

Li prenis de Bumpo sian malnovan ĉapelon; poste, turninte sin al Longa Sago, premis lian etenditan manon silente.

“Vi decidis prave, Ho Afablulo”, diris la Indiano — “kvankam neniuj sentos vian foreston kaj bedaŭros ĝin pli ol Longa Sago, la filo de Ora Sago.— Adiaŭ, kaj bonfortuno ĉiam gvidu vin per la mano!”

Kaj la unuan kaj solan fojon mi vidis la Doktoron plori. Sen parolo al iu el ni, li turnis sin kaj paŝis de la strando en la malprofundan akvon de la maro.

La heliko kurbigis sian dorson kaj faris aperturon inter siaj ŝultroj kaj la rando de sia konko. La Doktoro grimpis kaj eniris. Ni sekvis lin, transdoninte al li la bagaĝon. La aperturo fermiĝis strikte, farante fajfetan suĉsonon.

Post tio, turninte sin orienten, la granda besto komencis glate antaŭen moviĝi, sekvante la deklivon

en la profundan akvon.

Ĝuste kiam la kirliĝantaj senlumaj verdaj akvondoj komencis superiri niajn kapojn, la granda matena suno puŝis sian randon super la horizonton de la oceano. Kaj tra niaj travideblaj muroj el perlo ni vidis la akvan mondon ĉirkaŭ ni eklumiĝi per tiu plej mirinde bunta vidaĵo, mateniĝo sub la maro.

La cetero de nia hejmeniro estas rapide direbla.

Nian novan loĝlokon ni trovis tute kontentiga. Interne de la vasta konko, la larĝa dorso de la heliko estis komfortega por sidado — pli bona ol sofo, kiam oni kutimiĝis al ĝia malseka humida sento. Li petis nin, baldaŭ post mia eniro, bonvole depreni niajn botojn, ĉar la plandonajloj en ili dolorigis lian dorson dum ni ekscitite kuradis de unu flanko al alia por rigardi la diversajn vidaĵojn.

La movado ne estis malplaĉa, sed glata kaj senskua; vere, sen la pretermoviĝo de la ekstera pejzaĝo, oni ne sciis, pro la glata irado, ke oni ja moviĝas.

Mi ĉiam supozis pro ia kialo ke la fundo de la maro estas plata. Mi trovis ĝin egale neregula kaj ŝanĝoplena kiel la surfaco de la seka tero. Ni grimpis trans grandajn montarojn, kies pintoj turis super aliaj pintoj. Ni trovis vojon inter densaj arbaroj da altaj marplantoj. Ni transiris vastajn malplenajn regionojn de sabloplena koto, kvazaŭ dezertojn — tiom vastaj ke oni veturis dum tuta tago kun nur malklara horizonto antaŭ si. Kelkafoje la sceno estis kovrita de muskoj, montetoplena kamparo, verdaj kaj trankvilaspektaj; tiel ke oni preskaŭ volis rigardi por vidi ŝaf-

ojn paŝti sin sur tiuj subakvaj kampoj. Kaj kelkafoje la heliko rulis nin antaŭen en sia interno kvazaŭ pizojn, kiam li subite malrektigis sin por descendi en iun profundan apartan valon kun krute deklivaj flankoj.


En tiuj pli profundaj niveloj ni ofte renkontis la ombroplenajn formojn de mortaj ŝipoj, vrakoj sinkintaj antaŭ nur la Ĉielo scias kiom da jaroj; kaj preterpasante ilin ni parolis nur per mallaŭtaj flustroj kvazaŭ infanoj vidantaj monumentojn en preĝejoj.

Tie ankaŭ, en la pli profunda, pli senluma akvo, monstraj fiŝoj, trankvile manĝantaj en kavoj kaj kavernoj, subite eksaltis, alarmite de nia proksimiĝo, kaj fulme forglitis en la obskuron rapide kiel sago. Sed aliaj pli kuraĝaj, kun ĉiaj malkutimaj formoj kaj koloroj, venis tute apud nin kaj rigardis nin en la konko.

“Mi supozas ke ili kredas nin ia sanakvario”, diris Bumpo — al mi malplaĉegus esti fiŝo”.

Estis ekscita kaj konstante ŝanĝiĝanta spektaklo. La doktoro skribis aŭ skizis senĉese. Post nelonge jam ĉiuj neenskribitaj notlibroj estis plenigitaj. Tiam ni traserĉis niajn poŝojn por trovi kian ajn papereron sur kiun eblus noti ankoraŭ pli da observoj. Ni eĉ reuzis la uzitajn librojn, skribante inter la linioj, kaj sur la kovriloj antaŭaj kaj malantaŭaj.

La plej granda malfacilaĵo estis akiri sufiĉan lumon per kiu rigardi. En la plej profunda akvo estis tre senlume. La trian tagon ni preterpasis aron da fajrangiloj, ia speco de grandaj maraj lampiroj; kaj la Doktoro petis la helikon peti ilin akompani nin dum kelka tempo. Ili faris tion, apude naĝante; kaj ilia lumo multe helpis, kvankam ĝi ne estas tre brila.



“KIAM LI SUBITE MALREKTIGIS SIN.”

Kiel nia giganta molusko trovis sian vojon tra tiu vasta kaj senluma mondo estis granda enigmo por ni. Johano Dolittle demandis al li pri lia navigada sistemo—kiel li scias ke li sekvas la ĝustan vojon al Rivero Puddleby. Kaj kion la heliko diris responde tiom eks-citis la Doktoron, ke ĉar li plu havis nun neniom da papero, li elŝiris la internan tegajon de sia amata ĉapelo kaj kovris ĝin per notoj.

Nokte, kompreneble, tute ne eblis vidi ion ajn; kaj dum la senlumaj horoj la heliko naĝis anstataŭ rampi. Farante tion li povis veturi rapidege, simple per vibrigado de sia vosto. Pro tio ni kompletigis la veturon en tre mallonga tempo — kvin kaj duona tagoj.

La aero de nia ĉambro, ĉar ĝi ne estis ŝanĝita dum la tuta vojaĝo, fariĝis tre densa kaj sufoka; kaj dum la unuaj du tagoj ni ĉiuj suferis kapdolorojn. Sed post tio ni kutimiĝis al ĝi kaj ĝi tute ne ĝenis nin.

Frue en la posttagmezo de la sesa tago, ni rimarkis ke ni grimpas longan malkrutan deklivon. Dum ni suprengrimpis fariĝis pli lume. Fine ni vidis ke la heliko estis grimpinta tute el la akvo kaj nun haltis sur longa strio de griza sablo.

Malantaŭ ni ni vidis la surfacon de la maro ondetigata de la vento. Maldekstre de ni estis la enfluejo de rivero kun la tajdo malflusanta. Antaŭ ni, la malalta plata tero etendiĝis foren en la nebulo — kiu malebligis vidi tre malproksimen laŭ iu direkto. Paro da sovaĝaj anasoj kun klinitaj koloj kaj zumantaj flugiloj transflugis nin kaj malaperis mardirekte, kvazaŭ ombroj.

Kiel pejzaĝo, ĝi multe kontrastis kun la varmega

brilanta sunlumo de Popsipetelo.

Kun la sama fajfeta suĉsono, la heliko malfermis la aperturon por ke ni povu elrampi. Dum ni malsupren paŝis sur la marĉan teron ni rimarkis ke maldensa aŭtuna pluvo faladas.

“Ĉu ĉi tio vere estas Gaja Anglujo?” demandis Bumpo, rigardante tra la nebulo — “ne aspektas kiel iu specifa loko. Eble la heliko misveturigis nin.”

“Jes”, suspiris Polinezio, skuante la pluvon de siaj plumoj, “ja estas Anglujo. — Oni povas certi pri tio pro la aĉa klimato”.

“Ho, sed uloj”, kriis Jipo, enflaregante la aeron, “ĝi havas *odoron* — bonan eĉ bonegan odoron! — Pardonu min momente: mi vidas akvoraton”.

“Ĉit! — Aŭskultu!” diris Ĉi-Ĉio inter dentoj kiuj klaksonis pro la malvarmego. “La horloĝo de Preĝejo Puddleby sonorigas la kvaran horon. Kial ni ne interdividu la bagaĝon kaj ekmoviĝu? Ni devos piediri longan vojon por atingi la hejmon trans la marĉoj”.

“Ni esperu”, mi aldonis, “ke Dab-Dabo havas belan fajron brulantan en la kuirejo”.

“Mi certas ke tiel estos”, diris la Doktoro, dum li prenis sian malnovan valizon el inter la bagaĝaĵoj. — “Pro ĉi tiu vento el la oriento ŝi bezonos ĝin por teni la bestojn en la domo varmaj. Venu. Ni laŭiru la bordon de la rivero tiel ke ni ne misvojiĝos pro la nebulo. Sciu, la veteraĉo de Anglujo estas iom alloga — kiam oni povas anticipi kuirejan fajron. ... La kvara horo! Venu — ni tre akurate venos por vespermanĝi”.